

Johán Valano

Ĉu li venis trakosme?



Romano originale verkita en esperanto
de Claude Piron

Eldonita de GEO
2015

Johán Valano

Ĉu li venis trakosme?

Romano originale verkita en esperanto

de Claude Piron

Eldonita de GEO

2015

La Enhavo

[Ĉapitro 1](#)

[Ĉapitro 2](#)

[Ĉapitro 3](#)

[Ĉapitro 4](#)

[Ĉapitro 5](#)

[Ĉapitro 6](#)

[Ĉapitro 7](#)

[Ĉapitro 8](#)

[Ĉapitro 9](#)

[Ĉapitro 10](#)

[Ĉapitro 11](#)

[Ĉapitro 12](#)

[Ĉapitro 13](#)

[Ĉapitro 14](#)

[Ĉapitro 15](#)

[Ĉapitro 16](#)

[Ĉapitro 17](#)

[Ĉapitro 18](#)

[Ĉapitro 19](#)

[Ĉapitro 20](#)

[Ĉapitro 21](#)

[Ĉapitro 22](#)

[Ĉapitro 23](#)

[Ĉapitro 24](#)

[Ĉapitro 25](#)

[Ĉapitro 26](#)

[Ĉapitro 27](#)

[Ĉapitro 28](#)

[Ĉapitro 29](#)

[Ĉapitro 30](#)

[Ĉapitro 31](#)

[Ĉapitro 32](#)

[Glosaro](#)

1

Roberto – aŭ ĉu ni, kiel ĉiuj liaj amikoj, familiare lin nomu Bob? – gratis al si la nazon. Tiu gesto, aŭtomata ĉe li ekde l' frua infaneco kiam problemo stariĝis, neniam mankis, dum li malkodis mesaĝon. La kodon li abomenis.

Li pene atingis la finon de l' laboro, minuteton kontemplan la deĉifritan tekston, ekstaris kaj komencis paŝi tien kaj reen en la ĉambro, ĉar li bezonis pensi, kaj pensi side al li preskaŭ tute ne prosperis. Li ja estis viro agema.

Li prezentis per si belan specimenon de la homa speco, se oni limigas siajn kriteriojn al tiu modelo de sana besto, kiu ŝajnas esti la hom-idealo ĉe kuracistoj niatempe: simetria belhaŭta kunmetaĵo el sengrasaj muskoloj kaj sanaj organoj, kun bona koro kaj bonaj pulmoj, facila rideto blankdenta kaj frunto ne markita per troo da intelektaj turmentoj. Domaĝe nur ke la tro longa nazo iom fuŝis la cetera harmonian vizaĝon.

La bonfarta koro de Bob Sulavi ne akcelis sian ritmon pro la ĵus deĉifritaj laŭdoj, sed dum li paŝadis enĉambre, fiero tamen ŝveligis lian bruston. Estas plaĉe senti sin ŝatata.

Lia nuna tasko estos pli malfacila. Jes ja, posteno kiel lia, ĉe vaste aŭskultata radiostacio, ege favoras orientadon de la publikopinio – ĝuste tial “ili” petis lin kunlabori – sed estas pli facile plifortigi jam ekzistantan tendencon ol helpi konfuzan opinion sin difini laŭ dezirata senco. Organizis la intervjuon, kiu multigis la vendadon de la koncerna numero de Legantula Plezuro, estis infanludo; sufiĉis iom akcenti la sadisman aspekton de la reĝimo atakata, por ke la homoj sin ĵetu sur la revuon kaj sorbu ties mesaĝon avide. Lukti kontraŭ la eksterteranoj estos malpli simple. Al la publiko, kiu rave voras ĉiun detalon pri suferiga diktatora reĝimo, la eksterteranoj ja simpatie aspektas.

La enhavo de la mesaĝo estis tute klara, kaj paŝante tien kaj reen Bob encerbe kvazaŭ-aŭdis la voĉon de la kolonelo:

“Vi faris bonegan laboron vaste diskonigante la rivelojn de Legantula Plezuro. Konsiderinda parto de la publiko estis impresita kaj proksimiĝis al ni. Nun necesas eviti, ke ĝi voĉdonu por la fantaziuloj, kiuj pretendas rilati kun la kosmo: ties partio estas tro malserioza por havi veran ŝancon sukcesi, sed la plejparto de la voĉoj, kiujn ĝi ricevos, estos perdita de ni. Tio povus sufiĉi, por ke niaj kontraŭuloj ricevu plimulton kaj eniru en la registaron, kun bedaŭrindaj sekvoj el milita kaj internaci-politika vidpunkto...”

Tio estis tute prava. La homoj, kiuj voĉdonos por la nova kosmana partio, ne imagos, ke ili favoras la ruĝulojn. Ili voĉdonos por nova partio, nova homo, sen multe atenti la mankon de rigoro en ties ideoj, sed ili sencecie malfortigos la solan grupon kapablan venke kontraŭstari la orientan malamikon. Provi ilin racie konvinki estus perdi sian tempon. La intereso al la

eksterteranoj estas pure neracia. Necesos trovi rimedon por malgrandigi la prestiĝon de tiu nova homo, kiu sin lanĉis tiel strange en politikon, de tiu Rikardo Ospaci. Sed kiamaniere? Finfine, kiu estas tiu Rik Ospaci?

*

Veronika Munzo volvis harbuklon ĉirkaŭ la montra fingro, malvolvis ĝin, revolvis ĝin, kaj tiel plu senfine, dum ŝia frunto sulkiĝis. Tio estis ĉe ŝi nepra kaj nekonscia akompano de ĉia intensa pensado, ĉefe kiam la meditado tiklis la incita pikilo de zorgo.

Zorga ŝi estis nun, efektive. La artikolo en Legantula Plezuro havis multe pli da efiko, en ĉi tiu tempo elektada, ol ĝi normale devus, kaj ŝiaj ĉefoj en Komitato por Geopolitika Bonfarto – mallonge KGB – pri tio tre malkontentis. Ŝi provis rebati disvastigante onidiron, ke Legantula Plezuro estas redaktaĵo de Centra Informkolekta Agentejo – mallonge CIA – kaj ke ties artikoloj estas aŭtomate stampitaj kiel politike senvaloraj, sed ŝi, manke de pruvo, ne povis tion publikigi, eĉ se persone ŝi ne havis dubon, time ke oni lanĉus kontraŭ ŝi la tutan justican aparaton en brua proceso pri misfamigo.

Ne mirige do, ke Veronika volvadis kaj malvolvadis la buklon sen trovi en tiu kutima gesto ian ajn trankviliĝon. KGB atribuis egan gravecon al la baldaŭa voĉdonado, ĉar unuafoje post longa periodo prezentiĝis okazo enscenigi registaron, kiu povus distancigi sin de la okcidenta mondo. Sen ia dubo, ĝi tute korekte analizis la situacion: la plej efika taktiko estis favori la fantaziulojn, kiuj kredas je kunlaboro kun eksterteraj vizitantoj. Ĉiu voĉo donita al Rikardo Ospaci estos voĉo perdita de la fortoj porokcidentaj, eĉ se la voĉdonanto mem tion tute ne konscios...

Por taŭge plenumi siajn instrukciojn, ŝi devos pli rekte rilati kun la kosmana partio. Multo ja turniĝas ĉirkaŭ la demando, kiu estas tiu Rik Ospaci?

*

“Frenezulo”, diagnozis Ĝoja.

“Ruzulo”, opiniis Jano.

“Kial ne homo sincera?” Stefano demandis.

Jano Karal, polica detektivo, ties edzino Ĝoja kaj ilia nevo Stefano eliris kun impresa homamaso el la vastega kunvenejo, kie Rikardo Ospaci ĵus prezentis sian politikan programon.

“Ĉu li ne aperas al vi purintenca?” Stefano insistis.

“Nuanco: purintenca li ŝajnas”, respondis Karal.

“Li estas sincera”, Ĝoja asertis. “Tiu malsanuloj ĉiam sinceras. Li rakontas ion fantazian, sed li mem kredas ĝin. Tial lia voĉo enhavas tiun konvinkan povon.”

“Mi ne konsentas”, komentis la detektivo. “Li efektive havas ian ĉarmon, ian allogon, kiel bona teatra aktoro, kaj li ruze ekspluatas la propran talenton por konvinki naivulojn kiel Stefano. Ĉiu bona komedianto ŝajnas sincera, ĉu ne?”

“Tamen vi ne neos, ke lia argumentaro estas kohera!” la junulo diris.

“Kompreneble ĝi estas kohera, oni tion nomas sistema deliro precize, ĉar troviĝas io tre kohera en la rezona logiko”, iom sentence klarigis Ĝoja, la psikologo el la triopo. “Kiam li diras, ke li vidis vizitantojn el la spaco, li diras la veron, sian veron, ĉar li efektive vidis ilin, parolis kun ili, kaj ricevis de ili la taskon reformi la mondon. Nur necesas aldoni, ke tio okazis kvazaŭ songe, kaj lia mensa malsano konsistas en tio, ke li ne distingas halucinojn, kiajn ni ĉiuj havas dumsonĝe, disde la realo.”

“Kion vi diras, tio estas impresive rigora...” ŝia edzo ekdiris.

“Ĉu ne?” ŝi interrompis, kontenta ke ŝi konvinkis lin.

“...sed kiel vi ĵus brile prelegis al ni, rezono povas esti tre kohera kaj tamen delira”, li frazfinis.

“Grrr!” ŝi gruntis, kun grimaco.

“Ne delira estas via rezono,” Stefano prononcis kun konsola voĉo, “nur erara. Vi lasas vin misgvidi de via psikologa trejniĝo. Vi ne kapablas vidi la realon tute simple: homo diras, ke li parolis kun eksterteranoj; eble li efektive parolis kun eksterteranoj. Vi juĝas antaŭ ol kontroli: puran antaŭjuĝon vi havas.”

“Almenaŭ mi”, Karal emfazis, “juĝas ne antaŭe, sed poste. Mi rigardis lin, kaj vidis bonan aktoron ĉarmoplenan. Mi aŭskultis, kaj aŭdis nekredblaĵojn lerte aranĝitajn por delogi naivan publikon. Min tuŝis lia nedubebla elokvento, kaj mi demandis al mi: kion li celas? Formiĝis en mi hipotezo: li celas povon, famon, riĉon. Kaj mi testis mian hipotezon ĉe ĉiu lia vorto. Ĝi neniam estis kontraŭdirita. Konkludu mem.”

“Tamen,” pledis Stefano, “ĉu vi ne trovis impresaj liajn argumentojn pri la Biblio, la anĝeloj, ktp? Estas interese vidi, kiel logike li klarigas multajn tekstojn bibliajn, miraklojn, aperojn kaj similaĵojn per la agado de vizitantoj el la kosmo, el planedo de alia stél ol nia suno. Min tio ege impresis.”

“Ba! Ne min”, respondis Jano. “Li prezentas tiujn klarigojn kvazaŭ li ilin ricevis freŝdate de eksterteranoj, sed ili aperis jam antaŭlonge en la soveta revuo Scienco kaj Religio, kaj en

multaj aliaj eldonaĵoj. Ili preskaŭ fariĝis klasikaj.”

“Fakte Rikardo Ospaci ekspluatas la religian bezonon”, Ĝoja aldonis. “Ĉu vi rimarkis, kiom da junuloj tie lin aŭskultis religie? Nia generacio havis aŭ tradician religion, aŭ tiun alian religion, kiu estis kontraŭreligia sciencismo, aŭ laikismo. Sed la juna generacio grandparte havas nek unu nek la alian. Ospaci parolas al ili pri eksterteraj estaĵoj, kiuj deziras interveni en la homajn aferojn, kiel la grekaj dioj aŭ la mezepokaj anĝeloj, kaj la junuloj fervore kredas lin. Tio estas normala, ĉar la emo eliri, eĉ se nur image, el nia eta tero profunde radikas en la homa kór, sed ilia sinteno estas zorgiga, ĉar la politika programo de Rik Ospaci ne enhavas ion vere praktike utilan, kaj li riskas delogi al si multajn voĉojn, kiuj pli utilis aliloke.”

“Nu, nu, lia politika programo...” komencis Stefano, ne sciante kiel fini la frazon, ĉar li nur volis kontraŭstari la onklinon kaj ne havis ion precizan por rebati, “...ĝi estas tre fleksebla.”

“Ĝuste tio estas danĝera”, la policano diris. “La voĉdonantoj, kiuj sendos tiajn ulojn al la parlamento, tute ne scias, kion iliaj elektitoj tie faros. Ne ligitaj per preciza politika programo, ili povos fari ion ajn.”

La tri plu iris dum momento silente. Malvarmetis la nokto, sed ne tiagrade, ke ĝi malagrablus. Milionoj da steloj lumis en vasto sennuba. ‘Tie supre troviĝas pensantaj estaĵoj, tute certe,’ Stefano pensis, ‘eĉ se ni neniam kontaktos ilin.’ Li rigardis sian onklon. Ankaŭ Karal paŝante jen kaj jen ĵetis rigardon al tiu admirinda ĉielo, kaj en lia sinteno, kiam li levis la okulojn stelaren, Stefano perceptis timetan esprimon, kvazaŭ la detektivo timus, ke la paroloj de Rik Ospaci enhavus pli da vero ol li racie allasas.

La voĉo de Ĝoja subite sonis, disrompante la silenton.

“Eĉ se li ne ricevos sidlokon en la parlamento,” ŝi diris kun la tono de persono pli pensanta laŭte ol vere deziranta ion komuniki, “almenaŭ ion li rikoltos: la eblecon vivteni sin dank’ al sia halucino, aŭ ruzo, aŭ sperto, kio ajn vi konsideru ĝin. Liaj libroj tiom disvendiĝis, ke li jam tiris el ili riĉegon, kaj la kotizoj al lia partio ankaŭ amasiĝas laŭ impresa kadenco. Ne mirige, kiam oni vidis la fervoron de l’ ĉi-vespera publiko. Ĉu vi rimarkis, kiajn malamikajn rigardojn tiuj junuloj ĵetis al la kelkaj, kiuj kuraĝis kontraŭdiri?”

Respondis nur la bruo de la ŝuoj ritme frapantaj la trotuaron, dum ŝvebis en ĉies menso la sama demando: finfine, kiu estas tiu Rik Ospaci?

Jano Karal troviĝis en la eta kvartala policejo de Tegolista strato, kiam envenis tri ekscititaj buboj, kies rapida spiro signis ĵusan kuradon.

“Rigardu, sinjoro, kion ni trovis”, diris la plej granda, kiu devis aĝi ne pli ol dek jarojn, kaj li triumfe transdonis al uniforma policisto rektangulan ujon el griza plasta materialo.

La policisto malfermis ĝin kaj ne povis reteni miran ekkrieton.

“Monbiletoj!” li diris, dum Jano faris kelkajn paŝojn por stari malantaŭ li kaj rigardi la kaptaĵon. Estis efektive faskoj da altvaloraj biletoj. La uniformulo rapide taksis, laŭ la dikeco, ke la tuto sume egalas kvar- aŭ kvinoble lian monatan salajron. Li grimacis, kaj demandis:

“Kie vi tion trovis?”

La tri knaboj komencis samtempe.

“Ej! Ne ĉiuj kune!” li interrompis. “Ni procedu bonorde. Unue diru al mi viajn nomon, aĝon, adreson, kaj poste kie kaj kiel vi tion trovis.”

El la konfuza raportado, kiu sekvis, kompreniĝis, ke la infanoj ludis ĉe la muro de la malnova kaserolfabriko, jam plurajn jarojn forlasita nun, kiam sunradio briligis ion en fendo inter du ŝtonoj. Scivolaj, ili iris rigardi tute proksime kaj malkovris la platan saketon, kiun ili ĵus alportis.

“Mi ĝojas, ke vi troviĝas ĉi tie,” la policisto flustris al Karal, “ĉar mi bonvenigos konsilon de iu pli sperta ol mi. Kion ni faru per tiu mono? Ne estas ordinara perditaĵo, kiel estus paperujo trovita sur aŭtobusa seĝo aŭ eĉ surtrotuare. La monon oni tien lokis intence. Krome ekzistas neniu maniero identigi la posedanton.”

Karal responde turnis sin ne al li, sed al la infanoj:

“Restu ĉi tie momenteton, almenaŭ unu el vi. Mi ŝatus, ke vi montru al mi la lokon, kie vi trovis vian trezoron. Post minuto ni iros.” Kaj tion dirinte, li kapsignis al la uniformulo iri kun li al la apuda ĉambro, kie ili povos paroli en plena privateco.

Tie okazis telefona konversacio kun la ĉefo de Karal, leŭtenanto Remon, fine de kiu decidiĝis, ke oni remetos la monon en la truon, kie ĝi estis trovita, kaj ke oni provos aranĝi sistemon por scii, kiu venas repreni ĝin. Esperante, ke la koncernato ne rimarkis ĝian portempan malaperon, leŭtenanto Remon instrukciis Janon akompani la infanojn al la kaŝejo kaj tie diskrete atendi, ĝis alia policano venos anstataŭi lin. Intertempe li petos la helpon de la ĉefurba kontraŭspiona servo, por ke ĝi venu aranĝi sistemon ebligantan nevidate foti la

personon, kiu tuŝos la plastan poŝeton. De similaj sistemoj, funkciantaj plej diskrete eĉ nokte, la kontraŭspionaj moŝtoj disponas diversajn specojn.

Tiel la afero organiziĝis. Antaŭ ol Karal foriris kun la infanoj por remeti la plastan ujon, li zorge “kaptis” la fingropremojn de sur ĝi. La tri buboj tre fieris, kiam li petis ilin doni fingrostampan specimenon, kun la celo distingi la manipulajn spurojn de la nekonato disde iliaj. Karal forte rekomendis al la knaboj ne paroli pri sia trovaĵo, sed li sciis, ke li petas ion superhoman. Oni povis nur esperi, ke la famo preskaŭ certe lanĉota de la triopo kaj de iliaj familianoj ne disvastiĝos ĝis la oreloj de tiu, al kiu la mono estas destinita.

“Tiuj uloj el la kontraŭspiona servo estas vere kompetentaj”, Stefano diris kelkajn tagojn poste, rigardante la foton. “Mi ne sciis, ke ilia aparato krome stampas la daton kaj horon.”

“Jes, ili estas kompetentaj, kaj ili havas modernan ekipon”, respondis Karal.

La foto estis farita je la dua post noktomezo. Ĝi montris virinon ne tre grandan, kun plaĉa vizaĝo kaj – gesto neatendita en simila cirkonstanco – fingro de la maldekstra mano ŝovita en la haroj, kun buklo volvita ĉirkaŭ ĝi, dum la dekstra kaptis la plastan saketon plenan je monbiletoj.

*

En la ĉiovendejo svarmis aĉetantoj. Oni multe parolis pri ekonomia krizo, sed se juĝi laŭ la sumoj, kiuj elspeziĝis en tia magazeno, el la krizo eskapis ampleksa tavolo da loĝantoj.

“Pardonu!” petis Stefano nevole surtretinte piedon de altulo, kiu, hezitante inter diverskoloraj ŝtrumpetoj, gratis al si la nazpinton. La alia turnis al Stefano vizaĝon lumigitan per rideto, en kiu legiĝis malavara disdono de pardonoj.

La junulo plu trabatis al si vojon en la densa homamaso, kies konstantaj haltoj kaj turniĝoj ne faciligis la iron. La altkreskulo, rezigninte la ŝtrumpetojn, paŝis post li, ne pli glate. Ili tiel alvenis je negranda distanco de l’ maŝino fotokopia, kiun virineto nutradis per paĝo post paĝo de dika dokumento. Ĉiufoje kiam paĝo estis kopiita, ŝi metis la originalan folion en tiun saman fakon, kiun trafis ĉiu preta kopio.

“Pardonu!” ekdiris la altkreska viro kolizianta kun Stefano, kvankam pardonon devis peti ĉi-lastata, kiu kaŭzis la kunpuŝiĝon haltante tute subite.

Ke li tiel abrupte ĉesigis sian pluiron, tio ne estis senkaŭza: la ino fotokopianta ja ĵus metis maldekstran montran fingron al harbuklo laŭ tiel karakteriza gesto, ke Stefano tuj rekonis la virinon el la foto. Ĉu sentante, ke oni ŝin rigardas, ĉu pro la bruo de la plurhoma karambolo, kiun okazigis la senprepara halto de Stefano, ŝi levis la okulojn, surprizsaltis kvazaŭ rekone kaj, plej neatendite, svenis.

“Atentu”, “Iu malsanas!”, “Mi ja diris, ke mankas aero ĉi tie”, voĉoj diverskoloraj samtempe kriis, inter kiuj unu infana – “ĉu la sinjorino subite mortis?” – elstaris malkvietige. Dum du viroj genuis apud la falinta junulino, Stefano trovis sin puŝita ĉe la kopian maŝinon. Vidante la faskon da fotokopioj kaj aliaj folioj, li ĝin ekprenis sin demandante, ĉu estos pli saĝe ĝin redoni al la virino aŭ ĝin havigi al la polico, konsidere al la mistero pri la mono kaŝita. Sed fakto kvazaŭ devigis lin elekti la duan eblecon: antaŭ liaj surprizitaj okuloj, mano fulmrapide kaptis la reston de la dokumento, t.e. la nekopiitan parton, kiu kuŝis sur la maŝino mem, kaj ĝi malaperis. Stefano apenaŭ havis la tempon konstati, ke tiu mano apartenas al la ŝtrumpetulo, sur kies piedo li antaŭe paŝis, jam tiu estis for. La junulo vane serĉis. Malgraŭ sia alta kresko, la viro sukcesis dissolviĝi en la ĉirkaŭan homan oceanon.

“Kio okazis poste?” Jano demandis la nevon.

“Alvenis iu magazena gravul,” Stefano respondis, “kaj li portigis ŝin al la flegejo, kie ŝi tuj retrovis la konscion.”

“Vi do ne scias, kiu ŝi estas, ĉu?”

“Ho jes. Kiam mi konstatis, ke mi ne povus trovi la ulon, kiu ŝtelis ŝian dokumenton, mi tuj revenis al la loko, kie ŝi svenis. La gravulo ankoraŭ ne alvenis tiutempe. Iu provis ŝin veki vangofrape. Estis multaj personoj ĉirkaŭe. Mi diris: ‘kiu ŝi estas?’ kaj malfermis ŝian mansaketon. Neniu taksis tion stranga en la donitaj cirkonstancoj. En ŝia saketo troviĝis nenio aparte rivela, nur la kutimaj aĵetoj. Tamen mi havis la eblecon parkerigi al mi la indikojn de ŝia identiga karto.”

Jano prenis paperon kaj globkrajonon.

“Nomo: Veronika Munzo,” la junulo diktis, “fraŭlino, naskiĝdato: 14-a de junio 1950; naskiĝloko: Sankta-Stefano. Tio estis amika favoro de la sorto por ke mi pli facile memoru. Adreso: Tribunalstrato 76, Valĉefa; profesio: sekretariino.”

“Bonege. Mi transdonos tiujn informojn al la kontraŭspiona servo.”

“Kaj ĉu la dokumenton, kiun ŝi fotokopiis...?”

“Ankaŭ la dokumenton mi sendos al ili. Ĉio ĉi ilin certe interesos.”

“Ĉu vi havis tempon rigardi tiujn foliojn?”

“Nemulte. Ĉu vi?”

“Nur iomete, sed sufiĉe por konstati, ke estas listo de personoj el la tuta lando kun politikaj kaj psikologiaj komentoj: ĉu ili favoras tiun aŭ alian partion, kiaj estas iliaj ĉefaj malfortaj punktoj, kiamaniere ilin eventuale manipuli, ktp.”

“Jes. Ni ne povas scii, kiu kunmetis tiun liston, sed okulfrapas, ke ĝi estus treege utila al iu ajn fremda registaro, kiu volus enmiksiĝi en nian politikon. Mi rimarkis, ke inter multaj nekonatoj troviĝas jen kaj jen nomo de gravulo. Tial mi ne dubas, ke niaj amikoj kontraŭspionaj ĝojos pri tiu kaptajo.”

“Sed ĉu, leĝe, ni ne devas redoni la dokumenton al ŝi?”

“Sendube jes. Ni faros fotokopion kaj sendos nur tiun al la spionvoruloj. La paperojn, kiujn vi prenis, estos plej bone, plej nature, ke redonu vi. Se vi povus tiuokaze iom pli ekscii pri ŝi, vi faros grandan servon al ni ĉiuj.”

“Se ŝi estas sekretariino, kial do ŝi faris fotokopiojn en ĉiovendejo? Ŝi certe havas pli oportunan eblecon uzi oficejan maŝinon, ĉu ne?”

“Dependas... Tiuj ĉi paperoj certe ne rilatas al ŝia laboro. Se ŝi timas, ke oni surprizos ŝin fotokopianta ion, kion ŝi ne rajtus, eble estas pli sekure por ŝi uzi la anonimecon de granda magazeno.”

“Eble jes, mi ne pensis pri tio. Ĉu vi havas ideon pri tio, kion niaj spionspionoj faros pri ŝi?”

“Ho jes, mi scias, ili jam diskutis la aferon kun ni, kiam ili venis aranĝi la fotosistemon. Ili ne havas sufiĉe da disponeblaj homoj por sekvadi ŝin ĉien, sed tion ili dezirus. Ili petis nin tion aranĝi laŭeble, sed mi dubas, ĉu ni havas sufiĉe da homoj. Fakte mi pensis, ke... nu... nun estas la paskaj ferioj, ĉu ne? Kion vi faras? Ĉu vi laboras nuntempe?”

“Ne. Kun tiu ekonomia krizo oni ne facile dungas portempajn ulojn kiel via studenta nevo. Mi ne trovis laboron. Verdire mi ne multe serĉis. Mi decidis, ke foje ne malbonos al mia sano, se mi ripozos dum la libertempo.”

“Se vi do volas distron, kiu samtempe utilos al la komuna bono...”

“Ne faru paroladon, mi komprenis. Kaj vi konas mian malvirton: enketi ĉiam estis por mi volupto. Mia ekspluatinda moŝto do denove komplezos al la polico, kvankam mi kelkfoje min demandas, kion ĝi farus, se mi ne oportune ekzistus. Via mendo estas, ke mi simple eksciu pri tiu Veronika ĉion, kion vi mem ne kapablas trovi, ĉu ne?, por ke vi havu la gloron triumfe savi la ŝtaton el kruela reto da spionoj. Mian rolon oni ne rajtos mencii, ĉar ĝi estas ne laŭregula. Bone, bone. Mi grandanimos plian fojon, kaj malkovros pri Veronika aferojn, kiujn ŝi mem tute ne scias...”

Kaj kun unu el tiuj humuraj vizaĝesprimoj, kiujn tiom ŝatas lia onklino Ĝoja, li faris komikan riverencon, kaj foriris.

Estis unu el tiuj ŝtal- kaj betonkonstruaĵoj, kiuj, similaj al gigantaj alumetskatoloj, provizas loĝon al miloj kaj miloj en urbo moderna. Stefano liftis ĝis la tria etaĝo kaj tuj trovis la pordon. Li sonorigis.

Mikson el dubo kaj timo elmontris la vizaĝo de Veronika Munzo, kiam ŝi malfermis la pordon. Ne tre granda, ŝi surhavis bluĝinon kaj malhele ruĝan trikaĵon, kies fortikecon du agresemaj mampintoj ŝajne penis kontroli ĝisekstreme.

“Sinjoro...?” ŝi diris kun demanda esprimo kaj voĉo profunda.

“Mi staris apude, kiam vi... ĉe la fotokopia maŝino...” Stefano ne facile trovis la vortojn.

“Ho jes, eniru, mi petas.” Ŝi aperis al Stefano tre dezira rapide fermi la pordon. Ŝi invitis lin sidi.

“Ĉu vi fartas tute bone nun?” la junulo demandis.

“Jes. Estis nenio grava. Verŝajne la manko de aero en tiu magazeno... Sed ĉu nur por scii pri mia sano vi venis? Estas tre ĝentile kaj mi sentas min danka; tamen, mi havas multon por fari, kaj...”

“Ne”, Stefano interrompis. “Fakte mi venis por redoni al vi la paperojn, kiujn vi fotokopiis.”

Ŝi videble sentis egan malpeziĝon.

“Mi troviĝis tie, kiam oni kondukis vin for”, li aldonis. “Mi konstatis, ke en la ĝenerala kriz- etoso neniu pensas pri viaj dokumentoj, kaj mi ilin savis.”

“Dankegon,” ŝi diris, kaj ŝia sincero sonis kortuŝe, “estas vere tre afable.”

Dum li transdonis la paperojn, ŝi proponis trinkaĵon, kion Stefano, ema elpumpi informojn, ĝoje akceptis. Ŝi forlasis la ĉambron kaj revenis kun pleto, sur kiu staris tera kruĉo, du glasoj kaj pladeto da biskvitoj.

“Mi esperas, ke plaĉos al vi”, ŝi diris kun falsmodesta esprimo. “Estas trinkaĵo, kiun mi faras mem.”

Stefano gustumis. Iom acida, sed tre parfuma sensaĵo tiklis liajn palaton kaj nazon.

“Bonege”, li diris. “Kio estas en ĝi?”

“Citrono kaj sambuko, plus kelkaj aliaj aferoj: mia sekreto!” ŝi respondis kun eta rido.

“Mia avino faris ion pli malpli similan, sed tamen ne tiel perfekte paradizan”, Stefano komentis kun flato, kiun ŝi videble ĝuis.

“Ĉu vi kolektis la tuton?” ŝi demandis foliumante la ĵus transdonitajn paperojn.

“Mi prenis ĉion, kio estis en la... kiel oni nomas tion?... en tiu ujo, kie la fotokopioj finas sian vojaĝon. Estis nenio alia.”

“Ho jes, estis io alia. Mi fotokopiis nur duonon de la dokumento, kiam tiu malfeliĉo okazis. La alia duono estis sur la maŝino mem.”

“Ne”, Stefano mensogis. “Kiam mi prenis ĉi tion, estis nenio sur la maŝino. Mi estas tute certa. Mi kompreneble tuj rigardis, ĉar la plimulto el la homoj tien metas la kopiotajn paperojn.”

“Oj”, ŝi respondis ĉagrenite. “Tio estas tre malgraba, ĉar estas grava dokumento. Iu verŝajne prenis ĝin kaj ne scias, al kiu ĝin redoni.”

“Presigu en gazeto anonceton”, tuj diris Stefano.

“Jes, eble mi tion faros”, ŝi diris dubeme.

Ŝvebis silento. Stefano rigardis ŝin. Li sin sentis embarasita. Li sciis, ke se li lasus siajn sentojn nature disvolviĝi, li enamiĝus. Veronika ja havis ĉarmon, multege da ĉarmo. Ŝia relative eta korpo estis tre bele proporcia, sed precipe la vizaĝo allogis. La trajtoj estis fajne, delikate ĉizitaj, kun buŝo farita por ridi kaj kisi, kaj io mistera en la brunaj okuloj. Pli ol ĉio, lin tuŝis ŝia milda. Nenio akra en ŝi, nenio iam ajn abrupta, nur tiu agraba, glata harmonieco de la voĉo, de la movoj, de la tuta estmaniero. ‘Kiel bone oni sentus sin, vivante tutvive kun ŝi!’ li pensis, kaj tiu ideo efikis perturbe. Por kroni la tutan impreson – ankaŭ ĉi tio pikis la koron de Stefano – iom da malgajo sur la frunto legiĝis. La junulo perceptis ĝuste: Veronika Munzo estis dolĉa knabino, kvazaŭ destinita de la naturo por simpla, tenerplena ekzisto, sed kaptita de la vivo en zorgojn, kiuj malebligis al ŝi iam ajn komplete sereni.

“Belan apartamenton vi havas”, la junulo diris, ne sciante kiel daŭrigi la konversacion, kaj tamen nepre decidinte tiri el ŝi maksimumon da informoj. La salono, kie ili sidis, estis vere vasta kaj nun plaĉe lumigata de la suno.

“Jes, belan”, ŝi eĥis.

“Mi esperas,” diris Stefano, kiu trovis tiun vastan apartamenton ne kongrua kun sekretaria salajro, “ke foje mi perlaboros sufiĉe da mono por havigi al mi ion similan, eĉ se mi devas okupi ĝin kun kamaradoj.”

“Espereble via revo realiĝos”, ŝi respondis. “Tiu ĉi apartamento estas iom granda, sed ĝi tuj

plaĉis al mi, kiam mi vidis ĝin unuafoje. Kaj ĝi estas tre proksima al mia laborloko.”

“Ha jes? Ĉu vi do laboras ĉi-apude?”

“Jes, mi sekretarias en la regiona administracio.”

“Devas esti interese”, Stefano diris per laŭda, gratula tono.

“Jes. Mi ekscias multon pri la tuta Sanktavaldo, eĉ pri la tuta lando, fakte, kvankam nia oficejo estas regiona. Ĉio estas tiel multaspekte interligita niatempe.”

Stefano, traserĉante la menson por trovi manieron ĉerpi pri ŝi pliajn informojn, aŭdace ekdiris:

“Mi bedaŭras, ke mi ne trovis la tuton de via dokumento. Mi nevole vidis iom el ĉi tiuj folioj, kaj ili ŝajnas tre gravaj, ĉefe konsidere al la baldaŭa voĉdonado.”

“Ĉu vere?” ŝi diris kun kvazaŭ-naiva esprimo. “Mi faris tiujn fotokopiojn kiel servon al amiko. Mi mem ne rigardis la enhavon. Mi ne multe interesiĝas pri la voĉdonado. Mi ankoraŭ havas nelaŭmodajn ideojn: por mi politiko estas afero vira.”

Kun sincera mieno de ŝatanto, Stefano trinkis iom el la vere refreŝiga nektaro. Lia gesto estis des pli malrapida, ke li volis uzi la tempon por serĉi interesajn demandojn, kiuj tamen aspektu nature. Ĉar la inspiro ne venis, li provis ĉerpi ĝin el biskvitoj, sen pli da sukceso.

“Kaj vi?” ŝi demandis per sia belsona voĉo. “Kion vi faras en la vivo?”

“Nuntempe mi estas senlaborulo”, li respondis.

“Ĉu vere? Kia malfeliĉo!” ŝi ekkrietis. “Mi scias, ke por junuloj, kiuj devus eniri la profesion vivon, ne estas facile trovi dungigon hodiaŭ. Mi deziras al vi plej agrablan bonŝancon en via serĉado. Simpatia knabo kiel vi, kun inteligenta vizaĝo, tamen certe trovos ion taŭgan, laŭ mi.”

“Espereble”, li prononcis kun profunda ĝemspiro. Li sentis sin ne tre talenta ĉifoje en sia strebado informiĝi. Eble la lasta rimarko de f-ino Munzo malfermis pardonon al posta pli bona konatiĝo. Li do indikis al ŝi siajn nomon, adreson kaj telefonnumeron por la kazo se, hazarde en sia grava oficejo, ŝi aŭdus pri ebla laboro. Kaj li adiaŭis ŝin.

“Mi treege dankas vin”, ŝi diris al li sursojle.

“Ne dankinde”, li aŭtomate respondis, kaj li peze paŝis al la lifto, nekontenta pri siaj detektivaj kapabloj: pri ŝi li sciis preskaŭ nenion pli ol enirinte.

“Joĉjo, filo de Karleto, eble min savos vi!” Stefano kriis tiel laŭte, ke du preterpasantoj turnis sin por lin akre rigardi.

Stefano, kiel scias ĉiu kulturita leganto – t.e. persono jam leginta la aliajn rakontojn el la krimkroniko sanktavala – estas homo neniel rimarkinda: mezgranda, mezpeza, mezbela, mezforta, ordinare vestita, lin karakterizas la manko de tipaj karakterizoj (pro tio jam en la lernejoj oni donis al li la kromnomon “Mezetúl”).

La junulo, al kiu li direktis la preskaŭ solenan formulon notitan ĉi-supre, male prezentas per si tipon tre difinitan, tiun de troulo: li estas tro maldika, tro altkreska, kun tro longaj membroj kaj ŝultroj tro mallarĝaj, liaj haroj estas tro senordaj, kvazaŭ neniam kombilo ilin tuŝus – aŭ ĉar neniam kombilo ilin tuŝas –, lia rigardo tro mirplena, kaj ĉefe lia maniero sin teni multe tro klina: ŝajnas, ke ekdorminte unu nokton kun kresko de 1,60 metro, li vekigis la morgaŭon du metrojn alta kaj neniam repaciĝis kun tiu fakto.

Se nur aldoni, ke li estas ido de Karleto, la restoraciisto, kiu estas bokuzo de Jano Karal, la edzo de Ĝoja, onklino de Stefano, vi tuj komprenos la parencon rilaton inter tiuj du knaboj, kaj se plu diri, ke Joĉjo (mallongigo de Jozefo, ne de Johano) aĝas 21 jarojn, kaj ke du pasioj plenigas lian vivon, spionromanoj kaj elektroniko, vi jam scios multon gravan pri nia nova simpatia rolulo. Kaj por ke vi sciu ĉion vere sciindan, ni krome precizigu, ke Joĉjo havas specialan talenton por enamiĝi al virinoj pli aĝaj ol li, kiuj superece traktas lin kiel amuzan sentoobjekton antaŭ ol lin forlasi ege malfeliĉa. Nunperiode, li “oftumas” (kiel oni diras en Sanktavalo) kun iu nerimarkinda sekretariino nomata Lizabeta, kies gusto por strangaĵoj eble klarigas ŝian akcepton, verŝajne portempan, al lia aminduma fervoro.

Kiam li aŭdis la saluton de Stefano, la okuloj de Joĉjo, kutime mirplenaj, iĝis miregplenegaj: li gapis.

“Ej! Stefano! Estas vi!” li krietis, montrante per tiuj kvar vortoj, ke mankas al li nek kapablo observi, nek povo sin esprimi koncize, du kvalitoj ege valoraj en polica enketado.

“Joĉjo, mi bezonegas vian helpon”, Stefano diris. “Ĉu vi havus momenton por aŭskulti min?”

“Dekojn da momentoj, centojn da momentoj”, respondis Joĉjo, kiu ĉiam estis malavara, per la tro naza voĉo, kiun Naturo donacis al li.

Pluvego abrupte ekfalas, kaj ambaŭ junuloj kure rifuĝis al oportuna kafejo.

Stefano rakontis pri la okazaĵoj ĵus raportitaj ĉi-supre, kaj esprimis sian elreviĝon ĉe la penso, ke f-ino Munzo nun konas lin, tiel ke fariĝis praktike neeble, ke li observu ŝin nerekonate. Li elokvente vortigis sian mallaŭdan opinion pri tiu polico, kiu samminute petas

onin porti dokumenton al virino, kaj diskrete spioni ŝin, kvazaŭ la du ordonoj ne kontraŭdirus sin reciproke.

Kiam Stefano menciis la monbiletojn el la murfendo, la svenon kaj la misteran dokumenton, la okuloj de Joĉjo brilis per io pli ol miro. Li ĝuis. Stefano bezonis nek klarigi nek peti. Jam la troulo flaris partoprenon en viva spionromano, kaj liaj naztruoĵ moviĝetis, kiel ĉe hundo spurtrova.

Pro devoĵ en la familia restoracio, Joĉjo ne estis libera antaŭ la fino de la vespero, sed li senpacience deziris partopreni en la spionaventuro. Li promesis, ke ĉi-nokte jam li iros Tribunalstraten por observi kiel eble plej multe. “Ŝi nur eliru,” li anoncis, “kaj mi spionsekvos ŝin ĝis infero se necese.”

*

Estis la unua nokte, kaj Stefano jam dormis la profundan dormon de l’ junaĝo.

“Tintin tintin tintin”, vokis la telefono.

La nevo de Ĝoja Karal havas ĉambron en apartamento, kiun li kunluas kun tri aliaj studentoj, sed dum la paskaj ferioĵ la tri estis for, ĉiu en sia familio, tiel ke Stefano, kies patrino mortis kaj patro, reedziĝinta, foriris eksterlanden, nun okupis la apartamenton sola.

“Tintin tintin tintin.”

Stefano plu dormis.

“Tintin tintin tintin.”

“Kio estas?” li fine oscedis en la telefonon.

“Kruĉo da krudo! Mizera mezetŭl! Vi krepuska korpusklo! Se vi ne respondas al la telefono, nia enketo komplete fuŝiĝos!” tondris, kiel vi jam divenis, sagaca leganto, la voĉo de Joĉjo kolera.

La vorto ‘enketo’ efikis tute veke.

“Kie vi estas?” Stefano demandis.

“En telefonbudo. Aŭskultu. Mi sekvis vian belan buklulinon. Feliĉe, ke ŝi eliris, ĉar mi estis tuj forironta. Mankas io en nia organizo: anstataŭantoĵ, sed pri tio ni parolos...”

“Alifoĵe”, interrompis Stefano. “Tempon vi ne havas, ĉu?”

“Nu, ne. Mi do sekvis ŝin. Ŝi nun estas eksterurbe en domo kun du apartamentoj. Ŝi estas en la supra apartamento. Mi aŭdis ŝin kaj ŝian gastiganton supreniri ŝtupare, tiel mi scias. Estas negranda domo kun ĝardeno ĉirkaŭe; ĝi troviĝas ĉe t.n. Vojo Rozarba, tio estas ne malproksime de la ŝoseo al Farobel, en Punjano, do notu: Vojo Rozarba n-ro 12. Mi telefonas al vi, ĉar mi tute forgesis kunpreni mian elektronikan ekipon. Vi imagas, kiel bone estus surbendigi... Sed dum mi iros preni ĝin, iu alia devas observi la domon por vidi, ĉu ŝi eliras. Tial mi vokis vin. Ni esperu, ke ne estos tro malfrue, kaj ke ŝi ne jam eliris.”

“Nu, bone, mi tuj venos, reiru gardi. Ĉu vi rigardis la nomon de la loĝanto de tiu apartamento?”

“Jes. Fama nomo. Estas Rikardo Ospaci.”

*

“Ĉu ŝi ne foriris?” demande flustris Stefano.

“Sendube ne. Plu estas lumo, kaj oni aŭdas du voĉojn, unu viran, unu virinan. Mi esperas, ke estas la sama virino, kaj ke Veronika ne eldomiĝis, dum mi provis vin skui el la ronkado.”

“Kion ekzakte vi volas fari?”

“Nu, mi havas hejme tre sensivan mikrofonon. Kun pila portebla magnetofono ni povus per ĝi surbendigi multon.”

“Sed ĉu via drato estas sufiĉe longa?”

“Jes. La malfacilaĵo estos trovi, kiel fiksi la mikrofonon al stango sufiĉe alta por atingi la fenestron. Pripensu la aferon dum mi forflugas por preni mian ekipaĵon.” Kaj apenaŭ li finis paroli, jam li ekrajdis sian motorciklon, kaj veturis for.

Stefano rigardis la domon. Ne estis multe da lumo, sed tio estis avantaĝo por iu, kiu kompreneble deziras resti nevidata. Feliĉe la domanoj ne havis hundon, aŭ ĝi estus jam bojinta. La junulo tre singarde paŝis ĉirkaŭ la domo sukcesante ne brui.

Ju pli li rigardis, des pli li opiniis nefarebla la intencon de Joĉjo. Se ties ekipo ne enhavas longan stangon por la mikrofono, neniam prosperos al ili solvi la problemon. Longa branĉo ne troviĝas purŝance en tia loko. Stefano serĉis, sed vidis nenion taŭgan.

“Necesos grimpi al la balkono”, murmuris interna voĉeto. Al tiu sugesto la knabo respondis tremete. Altigi sin al la balkono signifus preni sur sin konsiderindan riskon. Se li faros bruon kaj oni malkovros lin, oni prave kulpigos lin pri provo enŝteliĝi aŭ almenaŭ atenci privatecon. Kaj ĉu estas eble tien grimpi tute senbrue?

Stefano estas bona gimnasto, kaj se li povus salte kapti la randon de l' balkono, li senpene sukcesus levi la korpon al ĝi. Sed, unue, eble la balkono estas tro alta, kaj, due, fari tion kun plena silento estus superi la kapablon de ordinarulo.

Ĉu ŝtupetaro solvus la problemon? Parto de Stefano diris “jes”: tiu parto volis raporti al la onklo rezultojn indajn je gratulo. Alia parto diris “ne”: tiu ĉi timis eltroviĝon; ĝi akre memoris la fojon, kiam, en monta lignodomo ne malproksime de Valmu, oni malkovris lin en ŝranko, kie li sin kaŝis, kaj la multajn malagrablajn sekvojn de tiu aventuro.

Tamen vivi senriske ne estas vere vivi. La riskojn oni nur kalkulu. Ĉu iu povus vidi lin de la vojo? Ĉi-hore preterpasas neniu. Tamen iu povus reveni al unu el la apudaj domoj aŭtomobile. La risiko fakte estas malgranda, kaj oni povas forigi ĝin uzante la parton de l' balkono, kiun aŭtolumoj ne povas – aŭ apenaŭ povas – prilumi de la vojo.

Pli serioza estas la risiko, ke oni aŭdus lin el interne. Vidi oni ne povus, ĉar la kurtenoj estas fermitaj, kaj estus vere ne tre probable, ke iu venus sur la balkonon ĝuste, kiam Stefano tien grimpos. La risiko do dependas ĉefe de la aŭdebleco, kun kiu la junulo prenos kaj metos la ŝtupetaron.

La fina risiko – fina en la mensa listigo de Stefano, sed logike komenca – estas... ne trovi ŝtupetaron. Tiun riskon oni povas alfronti tuj. Serĉu, amiko Stefano: estas la sola rimedo scii, ĉu oni vere deziras trovi aŭ ne!

Stefano serĉis kaj trovis. Ŝtupetaro kuŝis laŭlonge de muro. La junulo komencis levi ĝin kun plej delikataj movoj. Kiam io metala renversiĝis, tuŝite de unu el la ekstremaĵoj de la ŝtupetaro, la knabo havis la impreson, ke la bruoj vibrigas la tutan domon kaj longe longe resonas. Li haltis meze de sia movo kaj provis subpremi la bruon de sia spiro. Tion li sukcesis, sed ŝajnis al li, ke lia koro batas tiel laŭte, ke iu altirita de la falbruo nepre perceptos ĝin.

Fakte nenio okazis. Li apenaŭ rekomencis singarde levi la ŝtupetaron, kiam lia koro jam ree misbatis. Io glacia ĵus falis sur lian nukon, kaj, pro lia nerva stato, ĝi preskaŭ surprizsaltigis lin kun bruaj konsekvencoj. Li feliĉe regis sin. Estis nur guto el la posttagmeza pluvego, kiun vento forskuis de sur folio.

Tenante la ŝtupetaron, li paŝis al la balkono. Kato el ie ekaperis kaj frotis sin ĉe liaj kruroj kun amika ronrona zumzumo. Amika, sendube, sed ĝena, ĉar la besteto trovis nenion pli sprita ol salti kaj resalti tuj antaŭ la piedoj de Stefano. Por iu, kiu tenas senspire relative pezan ŝtupetaron, la akompano ne estis ideala.

Kiam finfine li staris sub la balkono kaj aranĝis ĉe ĝi la ŝtupetaron, la junulo firme decidis, ke ne li supreniros. Joĉjo estas maniulo pri spionromanoj, li do prenu la honoron. Stefano, pri la fakto, ke li sukcesis meti ĝuste la ŝtupetaron sen fari eĉ plej etan bruon, ne malmulte fieris.

Li grimpis du, tri, kvar ŝtupetojn kaj aŭskultis. Sen ia dubo aŭdiĝis voĉoj vira kaj virina. Sed la sencon de ilia interparolo oni ne povis kompreni.

La balkono laŭiris la murojn ne nur ĉe la antaŭo de la domo, sed ankaŭ laŭ parto de la flankoj, kaj ĉe unu flanko Stefano fiksas la ŝtupetaron, por ke la virino ne vidu ĝin, se ŝi elirus.

Strange, kiel la tempo pasas malrapide, kiam oni atendas. Laca resti senage, la junulo pliafoje komencis supreniri, kiam veturilo pasis sur la vojo. Ties reflektoroj aperis tre potencaj, kaj li horore konstatis, ke ili bonege prilumas la ŝtupetaron. Li havis la tempon rifuĝi en la malsupran mallumon antaŭ ol la ŝtupetaro estis plene prilumata, sed tamen...

*

Stefanon skue surprizis flustro en la orelon:

“Ĉu vi frenezas? Mi parolis pri stango, ne pri ŝtupetaro!”

“Ej! Finfine vi! Mi tute ne aŭdis vin.”

“Mi lasis la motorciklon en la paralela vojo, por ne brui. Sed ni ne bezonas vian ŝtupetaron, rigardu!” Kaj Joĉjo fiere montris fiŝkanon.

“Mi havis la ideon survoje”, li klarigis. “Ĉu ŝi ankoraŭ enestas?”

“Mi opinias, ke jes.”

“Bone. Tamen via ŝtupetaro helpas, ŝajnas al mi”, li diris, kaj li fiksas la mikrofonon al la ekstremaĵo de la fiŝkaptita stango per fortaj kaŭĉukaj ligiloj, kiujn li kunprenis. Li senbrue grimpis, ŝtupon post ŝtupo, kaj metis la mikrofonon ĉe la balkona fenestropordo. La magnetofonon li surhavis, fiksitan per rimeno.

Longtempe ili tiel restis: Stefano malsupre, rigardante kun zorga mieno, Joĉjo tute kviete sur la ŝtupetaro, kun la mikrofono tenata ĉefenestre.

Finfine la lumo estingiĝis en la apartamento. Joĉjo murmure demandis:

“Kion vi opinias? Ĉu ili nun gekuŝos?”

“Ŝajnas, ke jes.”

“Do ni foriru. Ĉu ni remetnu la ŝtupetaron, aŭ lasu ĝin tiel?”

“Ni remetnu ĝin. Helpas al neni, se ili havos la impreson, ke iu provis enŝteliĝi aŭ spioni.”

Ili sukcesis remeti la ŝtupetaron tute senbrue, kaj revenis al siaj respektivaj hejmoj. Ili sin sentis tro lacaj por tuj aŭskulti la plurajn bobenojn da bendo.

*

“Ĉu vi aŭskultis?” Stefano telefone demandis al Joĉjo, tuj kiam li ellitiĝis.

“Jes”, respondis la alia.

“Nu, kaj kio? Ĉu interese?”

“Treege interese”, diris la magnetofonulo.

“Diru tuj, mi estas terure senpacienca”, petegis Stefano. Sed io en la voĉo joĉja ne plaĉis al li.

“Ni surbendigis teatran radioprogramon”, lamentis la kunspiono. “Ŝi certe eliris, dum mi telefonis al vi...”

“Aŭskultu, geamikoj, kial resti ĉi tie? Mi proponas al vi glason en la apuda trinkejo. Estas tre trankvile tie.”

Stefanon, kiu ĵus prononcis laŭte tiujn vortojn, ĉiuj rigardis des pli scivole, ĉar – krom Veronika – neniu konis lin. Sed tuj poste la vizaĝoj sin turnis al la centra figuro, respektive atendante ties respondon.

“Kial ne?” diris ĉi tiu per vibra baritono, “estas bona ideo, ni iru.” Kaj li majeste ekiris.

Rik Ospaci aspektis kiel profeto, kun siaj bela barbo kaj fajraj okuloj. Kiam li sidis, li ŝajnis altkreska, sed post kiam li stariĝis, oni konstatis, ke li apenaŭ superas la mezan korpoalton: li havis torson misproporcie grandan kompare kun la nelongaj kruroj. Al tri detaloj eble ŝuldiĝis lia ĉarmo: al la rigardo, kiu jen boris ĝiskerne, jen ameme karesis, al la moviĝemo de la vizaĝtraĵoj, kaj al io vibra, profunde resona en la voĉo.

La dekopo procesie sekvis la profeton el la kunvenejo, kie li ĵus paroladis. Kiam, antaŭ eble dudek minutoj, la homamasoj disiris, restis grupeto da admirantoj aŭ scivoluloj, preskaŭ ĉiuj junaj, kiuj proksimiĝis al la barbulo kaj religie aŭskultis, kiel li respondas tiun aŭ alian demandon. Rimarkinte, ke Veronika Munzo restas kun tiu rondo, Stefano opiniis la okazon oportuna por scii pli pri la majstro kaj pri ŝi.

La trinkejo efektive estis tre kvieta, kaj ili komforte sidis ĉirkaŭ ronda tablo. Stefano observis. Ke tiuj junuloj volas kredi, laŭ la teorio de Ĝoja, tio evidentis el la streĉaj, detal-avidaj vizaĝoj. Kaj Ospaci sciis taŭge sensofigi ilian avidon.

“Mi estas simpla homo kiel vi kaj vi, eta ordinarulo”, li diris kun modesteco des pli impresa, ĉar li videble neniel klasiĝis inter la ordinarajn homojn. “Ili elektis min ne pro iu speciala supereco. Ili bezonis iun, kaj hazarde mi tie troviĝis.”

“Sed kial vi iris tien? Ne hazarde, sed ĉar vi aŭdis internan voĉon, telepatian alvokon, ĉu ne?” diris ruĝharulino, en kies okuloj adoro legiĝis.

“Ne, ĝuste ne, mi iris tien por foti cervojn. Fotado estas unu el miaj pasioj. Bestojn mi ŝategas foti, ankaŭ birdojn. Sed tio postulas, ke oni restu longe en sovaĝa loko tute senbrue.” Li direktis al la parolinta virino tre mildan, dolĉan, karesan rigardon, kiu igis ŝin fandiĝi tenere.

Stefano komprenis ion pli pri lia sukceso. Rik prezentis per si neordinaran miksaĵon el pur-infana bonkoreco, natura simpla amemo kaj potenco kvazaŭ ekstertera. Tenereco legiĝis ĉi-foje en la okuloj, sed samtempe la tuta sinteno kaj la reeĥa voĉo pensigis pri io superhome forta, pri ia multjarmila, vastaspaca energio. La larĝa alta busto sur la nelongaj kruroj eble esprimis

fizike tiun duoblan eston, kiu cetere ŝajnis bone integrita, dubigante Stefanon pri la interpretado de Ĝoja, laŭ kio Ospaci estus frenezulo.

“Kiun lingvon ili parolis? Neniun, verŝajne, nur telepatie”, diris virino iom malpli juna ol la aliaj, kiu impresis kelke vireska.

“Tute ne, tute ne, mia kara Lizabeta”, li respondis riproĉete. “Estas eksterordinare, kiom da malĝustaj ideoj vi ĉiuj havas! Vi legis tro da t.n. sciencfikciaj verkoj. Ne. Ili parolis nian lingvon. Ili studas ĝin jam multajn jardekojn, eĉ se nur aŭskultante niajn radioprogramojn.”

“Mi pretus kredi multon el tio, kion vi diras,” anoncis junulo kun okulvitroj, “se ne estus tiu fantazia ideo starigi novan politikan partion. Mi povas imagi, ke nin vizitas estaĵoj el malproksima planedo, sed kial ili sin miksus en niajn lokajn politikajn kverelojn, tion mi ne povas prezenti al mi.”

“Ankaŭ al mi tio ŝajnis nekredibla”, Rik Ospaci respondis, kaj lia voĉo, riĉa je harmonioj, ekhavis tonon de humileco. “Sed komprenu ilin. Ili nin observas jam longe. Ili ŝatus rilati kun ni. Tamen ili ne povas, ĉar ni senprofite investas nian tutan energion en stultajn kverelojn sociajn kaj ŝtatajn. Ili opinias, ke tio ne respondas al la vera deziro de la ter-loĝantoj. Ĉar ili rigardas nin de tiel alte, ili vidas pli klare niajn erarojn, kaj la manieron ilin korekti. Ili sekve decidis komisi teranon klarigi ilian vidpunkton al la tuta homaro.”

“Sed kial nova partio?”

“Ĉar ili pensas, ke la malnovaj perdiĝis en erarajn analizojn, kiel en marĉon, kaj staras trans korekteblo. Tial nur nova partio, bazita sur plenaj honesteco kaj aŭtenteco, sur nova maniero formuli la homajn problemojn, havas laŭ ili ŝancon okazigi la ŝanĝojn en la pensmaniero, kiujn ili bezonas por starigi kun ni daŭrajn harmoniajn rilatojn. Sed atentu! Se ni volas sekvi la saĝecon eksterteran, la evoluo estos treege longa. Ni estas nur ĝermo. Ili ne kalkulas laŭ nia temposkalo. Ili scias, ke la venko ne lumos morgaŭ. Tamen ĉu pro tio mi rajtis diri ‘ne’?”

“Ne”, respondis la grupo unuvoĉe. Kaj Stefano mire konstatis, ke ankaŭ li eligis tiun firman “ne”. ‘Li havas kvazaŭ-hipnotigan povon’, li pensis. Kaj la konsciiĝo, ke tiu barbulo sukcesis igi lin diri ion ne pripensitan, per la pura forto de hipnotiga retoriko, komplete renversis la sentojn de l’ junulo. Kie antaŭe regis scivolo, admiro, mikso el dubo kaj preteco sekvi, tie nun nur unu emocio restis: timo.

‘Egale ĉu li diras la veron, frenezas aŭ estas nur ruza avidulo, tiu viro estas danĝera’, li diris al si. Li ne plu aŭskultis. Li kvazaŭ perdis konscion pri la tempo. La aliaj pagis, adiaŭis, disiris, li premis manojn aŭtomate, kaj subite trovis sin sola en la trinkejo.

“Ĉu vi estas malsana?” la kelnerino patrine demandis.

“N-n-ne”, li balbutis, fuŝpalpante en sia monujo. Sed li ne estis tute certa.

Reveninte hejmen, li konstatis grandan ŝanĝon en si. Ĝis tiu vespero lia sento koncerne la loĝantojn de la kosmo enhavis ĉefe esperon, entuziasmon kaj deziron komuniki. Nun okulfrapis lin, kiel neracie tiuj sentoj naskiĝis. Antaŭe eksterteranoj signifis por li solvon. Nun, subite, problemon ili levis. ‘Ankaŭ ili povus esti imperiistoj’, li flustris al si. Kaj li ekstremitis.

*

Joĉjo, Stefano, Ĝoja kaj Jano kune sidis en la salono de Karal. Kiel planite, ili reciproke sin informis pri la respektivaj rezultoj. Ili ja antaŭe decidis ĉeesti aparte la paroladojn de Rik Ospaci kaj provi poste partopreni en grupaj diskutoj, por kiel eble plej bone koni la (relative) junan “profeton” kaj liajn rilatojn kun Veronika Munzo.

Pri ĉi-lastaj neniuj eksciis ion ajn. Sed pri la privata vivo de l’ barbulo pluraj interesaj detaloj kolektiĝis.

“Knabino en tiu grupo freneze amas lin, mi eksciis”, diris Joĉjo. “Ŝi laboras ĉe Vespera Folio, kie li antaŭe estis ĵurnalisto.”

“Ĉu vi scias ŝian nomon?” demandis la policano, kiu tenis notlibreton surgenue.

“Elga Misuro”, respondis Joĉjo, rigardante propran potlibreton. “Ŝi jam amis lin, aŭ ametis, kiam li laboris por la gazeto, sed ekde kiam li foriris, ĉar li havis kontaktojn kun eksterteranoj, ŝia pasio pli kaj pli fajre ardis, laŭ miaj informoj.”

“Ĉu li foriris mem, aŭ estis maldungita?” Ĝoja demandis. “Oni aŭdas ambaŭ interpretojn.”

“Li foriris mem, sed fakte estis maldungita. Oni efektive devigis lin for. La direktoro furiozis, kiam la gazeto publikis serioztonan artikolon pri lia sperto kun hometoj el la kosmo”, diris Karal (kiu, kvankam mem ne sanktavalano, nerimarkante uzis la dialektan radikon publianstataŭ publik-).

“Prave,” aprobis Joĉjo, “sed ion mi eksciis, pri kio vi eble neniam aŭdis. Oskaro Kolombét, la direktoro de Vespera Folio, kiu tiom koleris pri tiu artikolo, estas la amanto de... divenu...”

“De tiu... kiel vi ĵus nomis ŝin... de tiu, kiu flamas por Ospaci?” Stefano sugestis.

“Ĝuste, mezetúl, tute ĝuste”, respondis Joĉjo. “Oskaro Kolombét kaj Elga Misuro formas aman paron jam de jaroj, kaj oni diris al mi, ke al la bela Oskaro – ĉar laŭdire li estas bela kiel buldogo – tute ne plaĉis la subita fervoro de Elga por la trakosmaj rilatoj.”

“Interese, ege interese”, Karal murmuris, eble pli al si ol al la tuta kunularo.

“Kaj en via grupo, onklino, kion oni rakontis?” Stefano demandis al Ĝoja. Sed ĉi tiu nur levis la ŝultrojn.

“Mi ne havis bonŝancon”, ŝi diris. “Mi ne sukcesis eniĝi en grupon. Mi nur aŭdis du junulojn babili pri ia tekniko de etaj verdaj estaĵoj el la kosmo por mortigi telepatie, kontraŭ kio ekzistus neniu defendebleco, sed ili rimarkis, ke mi aŭskultas, kaj malaperis, ĵetinte al mi rigardon, kiu tute elvokis provon telepatie murdi min...”

En sia tuta vivo, Melania Georgido stumblis ĉe la sama nesolvebla problemo. Ŝi ege ŝatis sian sendependecon, kaj pro tio neniam eltenus vivon en domo maljunula. Sed soleco al ŝi pezis: forte viglis en ŝi la deziro dividi kun iu alia la ĉefajn spertojn de la vivo.

Tial, se ŝi – laŭ fantazia hipotezo – foje forlasus la ortodoksan religion, en kiu ŝi estis edukita, por alpreni kredon paganan, ŝi certe kultus unuarange al tiu unuaranga beno de l' soluloj: la dio Telefono.

Vidu nun, kiom telefonemo ŝin tiklas. Ŝi hazarde trafis sur la televida ekrano programon el malproksime, kiun oni neniam listigas en la gazetoj de Valĉefa, ĉar ĝi estas ĝenerale nericevebla, kaj la afero montriĝis tiel spirhaltiga, ke ŝi nepre devas komuniki siajn sentojn al iu alia.

Efektive, jen ŝi jam telefonas:

“Adela? Ĉu estas vi? Rigardu sur kanalo 7. Kion?... Televido, kompreneble! Jes, 7. Estas eksterordinara raportaĵo... Ne... Ne en la gazeta programo. Vi scias, ke kanalo 7 neniam listiĝas ĉe ni... Kial?... Hazarde. Mi serĉis alian, sed mislokis miajn okulvitrojn... La sono, la paroloj, kompreneble... Mi ne bezonis vidi por aŭdi, ke ĝi... Pli ol interesa, kiel oni povas diri? Terure intereseĝa... Ne, mi trovis ilin en mia poŝo... Tiuj eksterteranoj refoje venis, sed ĉi-foje la televido ĉeestis kaj ili filmis ĉion... Kiel mi diras, kara, ekzakte tiel. Ili venis kaj oni ilin filmas. Mi adiaŭas tuj, ĉar mi ne volas perdi minuton. Sciencisto parolis, kiam mi decidis telefoni al vi. Lia klarigo ja estis tute nekomprenebla por mi... Ĝis!”

Adela Gregor vidis. Nebone, ĉar la elsenda stacio malproksimis, kaj la meteologiaj kondiĉoj estis favoraj nur sporade. Sed ŝi vidis sufiĉe por scii, ke necesas averti la najbarinon Julian.

“Haloo! Jes, parolas Julia Blankavóĵ... Kion? Sed mia aparato neniam donas ion per kanalo 7... Ĉu vere?... Dankon, sinjorino Gregor, mi tuj rigardos.”

Kaj tiel, de vidvino al vidvino, de najbarino al najbár, de amiko al amikino, la famo disvastiĝis: ili venis kaj estis filmataj.

La adiciiloj de l' telefona kompanio laboris laŭ freneza ritmo. Ĉar dum parto de Valĉefa telefonis al la konatoj la miraĵon pri programo 7, alia parto telefone disvastigis informon ne malpli gravan:

“Rikardo Ospaci ĵus mortis!”, “Oni trovis Ospacin mortan!”, “Mi ne scias, nur ke li estis tute sana, kaj jen mortis subite”, “Krimo! Rik estis murdita!”. La vortigo variis, sed ne la signifo. “Rik mortis”, “Rik mortis”, “Rik mortis”, ripetis la telefonaj lineoj kaj ties milvoĉa eĥo

kafeja, drinkeja, restoracia, aŭtobusa aŭ privatloĝeja.

Ne necesis multe da tempo por ke kruciĝu ambaŭ informlinioj. Baldaŭ la famo prenis novan formon: “La verdaj hometoj alteriĝis kaj murdis Ospacin, verŝajne ĉar li rifuzis labori por havigi al ili la povon..”

Sprituloj aldonis amuzajn detalojn, kiujn homoj kredemaj tuj prenis serioze. Mensmalfortuloj enmiksitis siajn sonĝojn, prenitajn por realo. Vidiluzioj kombinitaj kun la forta kolektiva sugestio aldoniĝis al la tuto. Kaj post du horoj oftiĝis komentoj kiel jenaj: “Mi vidis ilin propraokule: du flugantaj telerformajn aferojn, tute lumajn en la nokto”, aŭ “Ŝi rakontis mem al mi la aferon: ŝi pasis laŭ Hugostrato, kie la publiĝaj lumoj paneis, kaj eta homo stis tie kaŝita kaj kuris post ŝi, kaj li havis enmane armilon, specon de tubeto, kaj kiam li ekfunkciigis ĝin, venis fasko da lúm, kaj muso, kiu kuris tie, ekestis nevidebla, fulmrapide neniigita. Feliĉe ŝi sukcesis sin forsavi dank’ al ĵus alvenanta bús...”

Post iom da tempo estis neeble atingi telefone oficejon polican, armean aŭ administran. En la ĉefurbo, la ministro pri defendo kaj tiu pri enlandaj aferoj devis forlasi, la unua komitatkunsidon, la dua varman liton virinhavan, por rapidi al televida studio kaj tie turni sin “ĉefe al la loĝantaro de Sanktavallo, sed ankaŭ de aliaj regionoj” kaj klarigi al ĝi, ke la eksterlanda programo sur kanalo 7 estas fikciaĵo, kaj ke oni ne konfuzu ĝin kun la efektiva morto de s-ro Rikardo Ospaci, juna ĵurnalisto el Valĉefa, fondinto de partio, kiu prezentas kandidatliston por la baldaŭa elektado.

Tio, kune kun la klarigo sur la morgaŭa gazetaro, kvietigis la spiritojn, se escepti aron da obstinuloj, laŭ kiuj la ministroj intervenis nur “por kaŝi al la popolo la amplekson de la katastrof”.

*

Jano Karal ĉirkaŭrigardis. Estis io prema en la loko mem. Jam la antaŭan tagon, kiam li venis tuj post la funebra malkovro, la loko lin impresis preme. Nun, la korpo estis for, la fotoj jam faritaj, restis sur la grundo nur la kreta silueto de homo kun granda larĝa torso, kruroj ne tre longaj, kaj la brakoj etenditaj preskaŭ kruce.

Rokoj, nur nudaj rokoj ĉirkaŭis la polican detektivon. Nuboj densis en la ĉielo, kaj Jano, tiom por fari ion helpan al pensado, kiom por konservi la formon de l’ falinto en la okazo, se komencus pluvi, kovris la kretan desegnon per ŝtonetoj.

Ne necesis nekropsia raporto por scii, ke Rik Ospaci mortis pro rompo de ostoj kaj histoj. Sufiĉis rigardi supren: li falis de proksimume 150-metra alteco, kaj neniu arbo, neniu vepro, neniu herbejo povis moligi la baton, li falis sur grundon betone malmolan, nur de ŝtonoj kaj rokoj kovritan.

Rik Ospaci ĉiam rifuzis diri, kie, laŭdire, li renkontas la elkosmanojn, sed li plurfoje menciis “tre sovaĝan kaj dezertan lokon en la montoj ne pli ol 60 kilometrojn for de Valĉefa”. Li eble elektis ĉi tiun lokon kiel bazon por siaj elpenŝaĵoj.

Malsupre de la alta apikaĵo, de kie Ospaci falis, etendiĝis relative vasta ebena spaco, en kiu iom da imago povus vidi alteriĝan terenon. La reliefo, malglata pro la rokoj piede de la natura ŝtonmurego, fariĝis plata kaj kovrita de malabunda herbaro je negranda distanco de la klifo. Ĉirkaŭrigardante, Karal starigis al si du demandojn, kies respondo li eble trovos en turista gvidlibro, nome, pro kiu natura kaŭzo preskaŭ nenio kreskas ĉi-loke, dum tute proksime, je pli alta nivelo, videblas vastaj pinarbaroj, kaj de kie venas – do kion signifas – la nomo Rafunja donita al ĉi tiu rokdezerto.

Nenio pli restis vidinda piede de la roka vertikalaĵo, kaj la detektivo reiris la krutan vojon supren. La loko, de kie Rik Ospaci falis, povus liveri pri la evento indikojn, kiujn la rokoj malsupre obstine rifuzis doni.

La natura teraso, de sur kiu la mortiga plonĝo okazis, ne estis tre glata. Tie kreskis arboj kaj herbo. Voĵeto paralelis la randon de la klifforma altaĵo tiel proksime al la abismo, ke multaj certe sentus kapturiniĝon ĝin irante. De ĉi tie la malsupra ebenaĵo eĉ pli pensigis pri alteriĝa tereno, tiom ĝia glateco kontrastis kun la ĥaosa naturo ĉirkaŭa.

Jano Karal tre atente ekzamenis la grundon, sed vane. Neniu indikaĵo, neniu spuro montriĝis. La vetero estis seka dum la tri aŭ kvar lastaj tagoj, kaj la ŝtonabunda tero ne povis konservi la stampon de plandumoj. Eĉ se homoj luktis ĉi tie, neniu spuro restus, ĉar la naturo estis per si mem ĥaosa, al kiu neniu baraktado povus aldoni malordon.

Al la randa voĵeto, kiu sekvis la neregulan formon de la kvazaŭklifo, perpendikle kondukis, sur la alia flanko, voĵeto alsupranta laŭ ne tre forta deklivo. Jano ekiris ĝin. Post centoj da metroj ĝi atingis pli larĝan teran vojon, pli malpli kovritan de ŝtonoj, kiu unusence serpentis valen, kaj alisence kondukis al la kulmino. Ambaŭflanke staris koniferoj, kaj verŝajne pro ili la grundo ĉi tie ne estis same seka kiel rando de la krutaĵo: la pluvego de la antaŭa semajno ne lasis sin forgesi tiel rapide ĉi-loke. Sur kelkaj grundopecoj, arbe ŝirmitaj kontraŭ suno kaj vento, vera koto troviĝis, kaj en ĝi nete aperis spuroj pneŭmatikaj. La plej spurriĉa koto eĉ tenis stampaĵon de du bone distingeblaj kaŭĉukaĵoj. Ne povis esti dubo, ke du aŭtomobiloj tie pasis post la forta pluvo lastsemajna.

Kontenta fine renkonti materian sciigon, Jano faris gipsan muldaĵon de la spuroj. Tion farinte, li decidis sekvi la vojon supren. Estus utile scii, ĉu la veturanto lasis sian aŭton tie por piediri al la rafunja belvedero, aŭ ĉu li plu stiris direkte al la montkulmino. Bedaŭrinde, la lokoj sufiĉe malsekaj por konservi spurojn ne abundis, kaj ili ĝenerale troviĝis nur ĉe la vojrandoj, kie rado ne bezonis pasi. Jano do devis alsupri plurajn centojn da metroj antaŭ ol retrovi pneŭmatikajn premaĵojn. Tiuj estis videble la samaj kiel unuj el la pli malsupraj: almenaŭ unu el la du aŭtoj nekontesteble daŭrigis la veturadon.

Sekvante la vojon supren per la rigardo, Jano Karal ekvidis ion, kio similis al ligna muro. Paŝante plu, li konstatis, ke estas kabano. Li proksimiĝis. La lignodomo estis ne malgranda, pli granda, eble, ol la plimulto el similaj montaj konstruaĵoj. Ĝi estis relative malnova, sed evidente bone prizorgata. Ĝi staris je cento da metroj distance de la ĉefa vojo, sed la terstrio, kiu kondukis al ĝi, estis sufiĉe larĝa por ke oni ĝin atingu aŭte. La fenestrokovriloj estis fermitaj, kaj nenio indikis la ĉeeston de iu ajn. La policano tamen iris frapi al la pordo. Kiel atendite, neniu respondis, kaj la pordo estis ŝlosita.

Promenante ĉirkaŭ la domo, Karal rimarkis instalaĵojn, kies ĉeesto en tia sovaĝejo tuj elvokis riĉecon: elektra lampo ĉe la enirpordo, kaj elektra pumpilo, kiu, se Jano prave interpretis, kion li vidas, tiris akvon el puto al rezervujo lokita supre. Ĉar kompreneble elektra energio ne estis publike liverata ĉi-alte, tio signifis sufiĉe potenca generatoron. Estus interese scii, kiu originalulo vivas aŭ – pli probable – sporade vivas en tiu lignodomo. Estis strange, ke homo sufiĉe riĉa por provizi sian domon per tiaj instalaĵoj ne elektis pli taŭgan situon. Multaj lokoj pli pentrindaj troviĝis samregione.

Komencis pluveti, kaj Jano ĝojis, ke li havis la tempon fari la muldaĵojn, ĉar se la pluvo intensiĝos, baldaŭ restos nenio plu el la spuroj. Li rapidis returne.

*

“Kaj ĉu vi scias, kiu frenezulo konstruis al si loĝejon en tia neimagebla loko?” demandis leŭtenanto Remon.

“Jes, Izabela trovis la informon”, Karal respondis

En la ĉefpolicejo de Valĉefa Izabela ludas gravan rolon: ŝi respondecas pri la dokumenta parto de ĉia serĉado, kaj alianco inter ŝiaj sliparoj, notlibroj, referenclibroj kaj gazetkolektoj kun, unuflanke, reto de bone situantaj konatoj, kaj, aliflanke, fulmrapida cerbo konektita al memoro ŝajne senlima faras el ŝi unu el la plej utilaj kunlaborantoj de enketisto.

“Kompreneble”, basis la leŭtenanto. “Al kiu ĝi apartenas?”

“Al originalulo, kiel vi divenis: la fama pentristo Gido Verstrata.”

“Ĉu vi vidis lin?”

“Ne. Ni ne sukcesis scii, kie li troviĝas nun. Mi kompreneble kontaktos lin, sed mi dubas, ĉu li povos montriĝi utila atestanto. El lia kabano oni ne vidas la lokon, de kie falis Rik Ospaci, nek, cetere, la lokon, sur kiun li falis.”

“Surloke vi trovis neniun indikaĵon, neniun postsignon?”

“Neniun, krom la pneŭmatikaj spuroj, pri kiuj ni nun serĉas plu.”

“Kaj en la apartamento de Ospaci? Vi diris, ke li havas apartamenton en eksterurba domo, ĉu ne?”

“Jes, en Punjano. Tie ni trovis plurajn aferojn, kiuj interesos vin. Rigardu.” Jano transdonis tajpaĵojn.

“Kio ili estas?” la leŭtenanto demandis.

“La unua estas projekto de artikolo, kiun verkis Ospaci – li estas ĵurnalisto, ĉu ne? – kaj en kiu li asertas, mi devas diri, tre konvinke, ke la monata revuo Legantula Plezuro estas fakte lerta kaj kaŝa propagandilo apartenanta al CIA...”

“Diable!” interrompis la fortika, denskorpa leŭtenanto. “Sed tiu revuo havas grandegan eldonnombron! Ĝi estas ekstreme populara!”

“Ĝuste tial ĝi estas bonega armilo por CIA, tiel longe kiel la publiko ne scias pri ĝia vera esenco. Nia popolo ne ŝatas esti manipolata. Se oni povus pruvi la apartenon de tiu periodaĵo al CIA, ni ĉeestus furiozan reagon fare de la legantaro. Kaj tio klarigas la duan dokumenton.”

“Kio ĝi estas?”

“Trakopio de ĉantaĝa letero. La apostolo de la eksterteranoj eble ricevis kosman komision de la elspaculoj, sed li estas pruvebla ĉantaĝisto. Per ĉi tiu letero, adresita al iu Roberto Sulavi (kiu laŭ li ŝajnas labori por CIA), li minacas publike fari rivelon pri Legantula Plezuro, se oni ne plenumos difinitajn kondiĉojn.”

“Ĉarme, kaj interese. Jen bona motivo por murde faligi iun sur la rokaĉan ebenon de Rafunja!”

“Jes. Bedaŭrinde, ĉantaĝemulo ĝenerale ne limigas sin je unu kliento. Kaj do la motivhavantoj povus svarmi. Jen alia dokumento, kiun mi trovis ĉe la Profeto.” Li prenis paperon kaj ĝin transdonis al la ĉefo.

“Estas trakopio de letero al Oskaro Kolombét, la direktoro de Vespera Folio. En ĝi Ospaci diras, ke se Kolombét plu rifuzos pagi, li publikigos la dosieron. Tiu dosiero, plena je interesaj riveloj, estas kaŝita ĉe amiko de Rik, kiu povos ĝin komuniki al la polico aŭ al aliaj koncernatoj. Kiam la Profeto laboris ĉe Vespera Folio, li kunmetis tiun dosieron pri la nebelaĵoj, pri kiuj kulpas lia kara direktoro. Antaŭvidema ulo, ĉu ne? Kaj tiu gazetdirektoro ne aperas tre purmana, laŭ la tono de tiu letero.”

“Ĉio ĉi estas ege interesa. Nu, via laboro estas kvazaŭ jam planita per tiuj trovaĵoj. Vi devos viziti s-ron Kolombét, kaj tiun CIA-agenton. Pri ĉi-lastata, ni devos ekrilati kun la kontraŭspiona servo denove, ili volos havi la leteron pri Legantula Plezuro. Kaj vi devos informiĝi ankaŭ pri

la pentristo. Eble li tamen vidis ion, aŭ scias, kion nia ĉantaĝisto faris en tiu sovaĝejo.”

“Jes, mi vidos ĉiun el ili.”

“Ĉu oni scias, kiu estas la lasta, kiu vidis Ospacin, antaŭ ol oni trovis lin mortan?”

“Jes. Estas... Imagu, tio ne simpligas la aferon! Estas tiu f-ino Veronika Munzo, pri kiu la kontraŭspiona servo ankaŭ interesiĝas ekde kiam infanoj trovis ŝian monkaŝejon. Post la lasta publika parolado de Rik Ospaci, ŝi akompanis lin hejmen. Neniu vidis la viktimon poste.”

“La solvo”, pensis Stefano, “estas ŝanĝi mian aspekton.” Joĉjo ja ne povis dediĉi sian tutan tempon por kontroli la movojn de Veronika, kaj nek la polico, nek la kontraŭspiona servo nun disponis sufiĉan personaron por povi plenumi taskon tiel gravan, se konsideri, ke ŝi, jam strange implikita en la afero, ankaŭ estis la lasta homo, kiu vidis Ospacin vivantan.

Stefano sporade partoprenis la agadon de amatorteatra trupo, kaj li posedis kelkajn aspektoŝanĝajn akcesoraĵojn. El tiuj li prenis nur lipharon kaj okulvitrojn, plus paron da ŝuoj kun dikaj plandumoj kaj diskrete altaj kalkanumoj, kiuj igis lin aspekti pli altkreska ol li efektive estas. Li kombis sin alimaniere ol kutime, kaj metis harfiksitan substancon por teni la harojn en neordinara pozicio, kontraŭ kiu ili nature ribelis. Kaj li kompletigis la ŝanĝon surmetante sian hongkongan kostumon.

Tiun hongkongan kostumon li foje aĉetis ĉe brokanta vestvendisto, kiu ricevis ĝin tute novan el la heredaĵo de viro mortinta akcidente la morgaŭon de sia reveno el Ekstremoriento. Tiu kostumo estis tajlita laŭ modo ege malsimila ol la nia, kaj ĝi komplete ŝanĝis la figuron de l' junulo: kun ĝi Stefano aspektis pli maldika kaj mallarĝa ol reale.

La knabo kontente rigardis en la grandan ŝrankan spegulon. En tia varma kaj sennuba tago, kiam ĉiu eliras senmantele, la kunmeto de altigitaj ŝuoj kaj de vesto mallarĝiga mirinde aliigis lin. Pro la severaj okulvitroj kaj la haroj alikombitaj de poezio al prozo, la ĝenerale petola vizaĝo cedis lokon al serioza. Eĉ sen la lipharoj li taksis sin nereconebla, almenaŭ por persono, kiu ne vidis lin pli ol dufoje, sed ili aldonis al la tuta transformado specon de arta fintoŝo, kiun estus domaĝe malhavi.

La strikta jako kaj la nekutimaj ŝuoj devigis la junulon ŝanĝi sian paŝmanieron, kaj li sentis sin aliulo, kiam li atingis la administran konstruaĵon, kie Veronika laboris.

Oficistoj jam eliradis, kaj Stefano esperis, ke li ne miskalkulis la tempon. Fakte estis la malo: li intuis tiel ĝuste, ke li ne devis atendi pli ol kvin minutojn, antaŭ ol Veronika aperis sur la sojlo. Ŝi paŝis en lia direkto kaj lia koro batis, sed ŝi eĉ ne ĵetis rigardon al li. Ŝi tenis tekono kaj havis esprimon de persono profundiĝinta en severajn pensojn. Li vidis alian junulon atendi, kaj eĉ pli bone komprenis ŝian neintereson pri li. Ĉe tia bela vetero, juna viro atendanta antaŭ la pordego de fraŭlinriĉa konstruaĵo neniel impresis surprize.

Li lasis ŝin iom antaŭiri kaj eksekvis. Kiam ŝi eniris aŭtobuson, li devis kuri por trafi la saman, sed pri tio neniu miris, kaj ŝi sendube rimarkis nenion. Ŝi eliris, kiel multaj, ĉe la haltejo “Parka Restoracio” kaj li decidis, por ne tiri al si ŝian atenton, ke li eliros nur je la posta laŭpeta haltejo, fakte tute proksima. Ĉar li kapablas marŝi tre rapide, li tute certe facile retrovos ŝin.

Svarmis homoj, eble ĉar la tago imitis someron, dum en ĉies memoro vintro ankoraŭ freŝis, sed li senpene revidis ŝin. Ŝi staris, iom hezite, inter la liberaera kafejo, la lageto kaj la infanludejo, kie bunta kriado akompanis la toboganadon aŭ sablokonstruadon de multopa etularo.

Pasante preter la kafejo, Stefano kvazaŭ sensis fiksan rigardon al li de iu kafrinkulo. Mire li rimarkis, ke tiu “admiranto” estas la altkreska atleto, kiu forportis la originalan dokumenton fotokopiatan de Veronika, kiam ŝi svenis! Tiu sidis apud dikventrulo kun roza, prospera vizaĝo kaj nete kombitaj, bele blankaj haroj. Kiam Stefano pasis, li gratis al si la nazon, sed lia gesto, same kiel lia fiksa rigardo al Stefano, aspektis pure aŭtomata. Cetere, kiel li povus rekoni la junulon? Ĉi-lastata turnis sian atenton al Veronika, kiu nun babilis kun trio da infanoj proksimume dekjaraj.

Benko prezentiĝis tute taŭga por observi la junan virinon, kaj li tie eksidis. Evidente, ŝi lin ne rekonis, kiam li preterpasis ŝin.

Stefano ĵus diris al si, ke li verŝajne devos ekzerci sin al pacienco, ĉar nenio okazos antaŭ longe, se entute tia sekvado havos utilan rezulton, kiam li vidis unu el la knaboj preni el la mano de Veronika ties tekono. La du aliaj tiam ekkuris unu post la alia al la liberaera kafejo, dum la tria paŝis malantaŭe en la sama direkto. Subite la knabo, kiu postkuris, trafis sian persekutaton, kaj donis al li tian fortan puŝon, ke tiu renversis la tablon, sur kiun la bato lin ĵetis, kun brua frakaso de glasoj kaj tasoj. Ĉies okuloj turniĝis al la kolizia loko, sed ne la stefanoj: la junulo gape vidis la trian knabon profiti de la ĝenerala konfuzo por nerimarkite interŝanĝi la tekono de Veronika kun tiu de la nazgratema sinjoro. Same nerimarkate li revenis alporti la kaptitan tekono al la sekretariino, kiu iris al la ludeja mureto por tie sidi kun li.

Stefano konstatis, ke la priŝtelito nenion perceptis. Por pli bone sekvi la postajn okazaĵojn, li ŝanĝis sian observlokon. Pasis iom da tempo, kaj la du tablorenversintoj venis al Veronika, kiu donis monon al la tri, post kio ŝi per malrapidaj, promenguaj paŝoj eliris el la parko tenante la rabitan tekono.

La nevo de Karal decidis, ke estus riske sekvi ŝin plu: ŝi eble fine rimarkus la konstantan apudan ĉeeston de tiu liphara junulo. Dum li ekiris la vojon al la hejmo de la geonkloj, lin regis admiro al la simpla kaj efika tekniko, kiun Veronika uzis. Li antaŭĝuis ĝin rakonti al Karal.

*

Veronika Munzo eniris sian apartamenton dancapaŝe, fajfante al si gajan melodion. La plano sukcese plenumiĝis. Se ŝi estas bonŝanca, la teko enhavas la duondokumenton, kiun Sulavi forŝtelis de ŝi. Ŝi neniam tre ŝatis KGB-ordonojn, sed ĉi-foje, kiam la ĉefoj komisiis ŝin iri al la parko kaj aranĝi la kaptano de teko, kiun havos la longnazulo, espero ŝin plenigis.

Kun vigle batanta koro la tekono ŝi malfermis kaj eliris la paperojn. Uf! Kia senpeziĝo! Estis efektive ĝi. Impulse, ŝi kisis la faskon da folioj. Jen ŝi rehavis finfine la tutan dokumenton. Baletistine ŝi aliris ŝranketon, el kiu ŝi prenis glason, kaj botelon da portovino, al kiu ŝi ĉiam havis specialan korinklinon.

Ŝi trinkis korvarmigan gluton kaj ridetis al si. Kia bonŝanco, ke KGB antaŭ nelonge malkovris la CIA-anecon de tiu rozhaŭta blankhara dikulo, ke ĝi sekvis lin, spionis lin por eltrovi liajn kontaktojn, kaj – dank’ al mikrofono lerte instalita en la aliurba hotelĉambro, de kie li telefonis al Sulavi – eksciis, malgraŭ la kodaj formuloj uzataj en la konversacio, la detalojn de l’ parka rendevuo, kiam grava dokumento transdoniĝos! Ŝi ameme rigardis paĝon post paĝo, plu zumante al si la kanzoneton. Fine ŝi leviĝis kaj iris preni la alian parton de la dokumento, tiun, kiun redonis Stefano, por rekunmeti la tuton, post kio ŝi iris al la tablo kaj komparis la paĝnumerojn. Ja necesis remeti la foliojn bonorde.

Sed kiam ŝi foliumis la redonitajn paĝojn, ŝia koro misbatis. La malforta c de la originalo forestis: ĉiuj c ĉi tie estis stampitaj kun la sama forto. Ŝi komparis kun la folioj, kiujn ŝi ĵus ruze rehavigis al si. Ne estis dubo: sur ĉi-lastaj ĉiu c estis iom pli pala.

Eblis nur unu klarigo: la paĝoj, kiujn la junulo redonis al ŝi, estis retajpaĝo, sed kial oni retajpus, se ne por enŝovi erarojn? Necesas kontroli tuj. Ŝi memoris kelkajn partojn. Kaj jen la serĉata pruvo: en la indikoj pri iu Huberto Falĉiles, oni aldonis unu ne, kiu diametre ŝanĝis la sencon de la paragrafo.

“Hundoj, hundoj, hundoj, hundoj! Hundaĉoj!” ŝi ekkriis. Kaj furiozaj larmoj eksplode eksaltis el ŝiaj okuloj, dum malespero invadis nigranube la ĵus lazuran lumon en ŝia animo.

“Sed por kiu do laboras tiu muknazulo?” ŝi diris, nekomprene memorante la honestan vizaĝon de Stefano, kiu tiom plaĉis al ŝi.

Ke la ŝanĝoj rezultis el decido de la kontraŭspiona servo, konsidere al ŝtatekureco, ŝi tute ne povis diveni.

La pri-inajn gustojn de Joĉjo Stefano neniam komprenis. Kaj ankaŭ vi, amiko leganto, observante nun la filon de Karleto alkineji kun Lizabeta, verŝajne starigus al vi demandojn. Kelkaj homoj, ekvidante ilin paŝi sur la trotuaro, ne povis subpremi rideton: tiu dumetra knabo, kun senorda hararo kaj maldika korpo betultrunka, aspektis groteske kun sia longega brako ĉirkaŭ la ŝultro de virino dik-osta kaj videble fortmuskola, kies kvadrata kapo kaj masiva figuro neniel sukcesis elvoki tiujn sveltajn stelulinojn, kiujn oni kutime asocias kun la seksaj revoj de dudekjara viro. Sed nin interesas ĉi tie ne tiom la ekstera aspekto de la du, kiom ilia ekstertera prizorgado.

“Kelkfoje mi ilin preskaŭ diigas, kelkfoje mi timegas ilin”, ŝi konfesis.

“Sed pri ilia ekzisto vi ne havas dubojn, ĉu?” Joĉjo demandis.

“Absolute ne. Kiel mi povus? Mi songas pri ili – feliĉe ne tre ofte – tiel strangajn songojn, el kiuj pluraj anoncis eventojn, kiuj poste realiĝis... Mi estas certa, ke iel tiuj eksterteranoj pense rilatas kun mi.”

“Hm!” diris ŝia akompananto.

“Tial mi emas ilin diigi. Se ili havas tiom da povo, ke ili distance influas la bildojn en la menso de negrava notaria sekretariino, tio signifas, ke ili estas ege potencaj, ĉu ne?, potencaj kiel dioj.”

“Efektive”, Joĉjo vortis ĝentile, ne sciante, kion pensi pri ŝiaj mirigaj konsideroj.

“...kaj se ili atingis tian gradon da potenco, tio implicas, ke ili estas alte civilizitaj, kaj do bonintencaj. Civilizita homo ne deziras malbonon al sia proksimulo, ĉu?”

“Nu...” li diris dubeme.

“Kaj ĝuste tio min teruras. Mi sentas, ke ankaŭ vi ne trovas mian rezonon senmanka. Se ili uzas tian potencon por subpremi aliajn, malpli fortajn estaĵojn, tiam estas plej angorige, ĉu ne?”

“Se ili rilatas al ni teranoj, kiel ni blankuloj rilatis kun la homoj, kiujn ni nomis primitivaj... Efektive... Estas kaŭzo por timi... La sklavvendistoj siatempe ne rigardis nigrajn afrikanojn membroj de la homa raso. Tial ili senhonte ilin kaptadis, kaj komercis per ili. Se vi pravus, kaj ni por loĝantoj de fora planedo estus nur speco de ekspluatabla besto...”

“Joĉjo, Joĉjo, mi petegas vin, ne parolu tiel. Diru al mi, ke tio ne povas esti vera, ke se ili estas pli inteligentaj ol ni, ili havas sufiĉe da saĝo por nin respekti...”

“Jes, fakte tion mi persone kredas,” li respondis per afabla, kvietiga voĉo, “mi ne kapablas vidi ilin aĉuloj, kiel vi ĵus diris. Estas vi, kiu metis al mi tiujn ideojn en la kapon. Nun ne plendu, se mi ilin nur disvolvas.”

“Mi ne plendas. Nur tion mi diras, ke kelkfoje min kaptas ĉegorĝe terura angoro. Ĉefe ekde kiam Ospaci mortis. Mi ne povas liberiĝi de la penso, ke eble lin faligis *tiuj*...”

8

“Devas esti Joĉjo”, Stefano pensis, kiam tintis la porda sonorilo.

Lin do ege surprizis stari naz-al-naze kun altkreska viro, sporteme vestita, kies vizaĝo belus harmonie kun la atleta korpo, se ĝin ne komplete fuŝus tro emfazita nazo: tiel, ambicia preĝejturo povas detruiri la belon de pentrinda vilaĝo.

“Bonvolu eniri”, diris la junulo, dum senorde kirliĝis en li ondoj el scivolo, plezuro, miro kaj, se ĉion konfesi, timo. Li ja tuj rekonis la faman ŝtelinton kaj priŝteliton de l’ mistera dokumento.

“Knabo mia,” la grandulo komencis, “mi ne intencas perdi al vi vian tempon. Redonu ĝin tuj, kaj mi estos kontenta.”

“Ĉu vi unue ne sidiĝu?” Stefano proponis, provante tiel havigi al si kelkajn sekundojn por pripensi, kaj ĝoje konstatante, ke la komenca timo jam transformiĝas en memfidan defiejon. Li eligis larĝan rideton aldonante:

“Kaj, due precizigu kiu vi estas, kial vi venas al mi, unuvorte pri kio vi parolas.” Ankaŭ la alia ridetis, kaj al Stefano ŝajnis, ke neniam antaŭe li vidis tiom da tiel blankaj dentoj. Samtempe li pensis: rideto tigra! Aŭ ĉu jaguara?

“Mi facile respondos. Kiu mi estas, tion vi scias perfekte. Kial mi venas al vi? Ĉar vi nun posedas la tutan dokumenton. Pri kio mi parolas? Pri la dokumento, el kiu vi enmanigis al vi duonon ĉe la fotokopia maŝino de Alta Turo, antaŭ ol ŝteli de mi la duonon antaŭhieraŭ en la parka kafejo.”

Stefano indignis.

“Ĉu mi? Kiel diable vi aŭdacas akuzi min pri ŝtelo?”

La longnazulo ridis.

“Mi uzas la vorton ŝteli slange. En nia profesio,” li okulumis, “ŝtelado ne ekzistas, ĉu? Sed ne serĉu elturniĝon. Vi vidis min en Alta Turo, kaj mi ne malpli vidis vin.”

“Mi efektive prenis paperojn tie, kiam tiu kompatinda fraŭlino svenis, sed mi ilin redonis al ŝi.”

“Ne, knabo mia; fabelu al iu ajn, sed ne al sperta vulpo kiel mi. Konservu viajn fabelojn por la buboj, kiujn vi uzas por forlogi la atenton... Kaj permesu, ke mi gratulu vin. Eĉ ĉe spertulo kiel mi via artifiko sukcesis.”

“Mi ne scias pri kio vi parolas. Mi ne estis tie”, Stefano mensogis per bela sincera tono.

“Nu, nu, ĉu plia feinfabél?” la alia komentis kun pantera rideto. “Se vi volas trompi min, serĉu ion alian. Ne uzu okulvitrojn kaj liphararon, kies falseco sentiĝas je cent paŝoj for, kaj lernu, ke vera maskito ne altiras ĉies atenton per kostumo tiel mistaŭga, tiel streĉita, ke ĉiuj rigardas, por ne maltrafi la momenton de l’ disŝiro.”

Al Stefano impresis, kvazaŭ ponardo pikus lian koron. Li pretis toleri multajn turmentojn, sed ne ke lia maskarangô montriĝis vana.

“Eĉ se mi estus tie, tio ne signifas, ke mi ŝtelis ion ajn de vi.”

“Ne ion ajn vi ŝtelis, sed ion tre precizan. Pardonu min, sed mi estas logika. Kiam mi vidas unu kaj pliafoje unu, mi deduktas: du. Kiam mi propraokule vidas vin ŝteli la unuan parton de dokumento rigardante min preni la duan, kaj poste mi vidas vin kaŝita (fuŝe, mi konsentas) sub neĝustaj vestoj kaj ŝanĝita hararo, precize en la loko kie mia duono malaperas, mi ne bezonas, ke oni faru al mi diagramon. Mi komprenas tuj. Kaj mi postulas redonon.”

“Mi komprenas vian rezonon, sinjoro, sed sciu, ke mis-unu plus mis-unu egalas mis-du. Mi efektive prenis la unuan parton de tiu dokumento (nur nun mi ekscias, ke estis du partoj, parenteze), kaj mi ĝin redonis al la fraŭlino. Kaj pri la dua vi komplete mistrafas. Sed mi ne vidas, kial mi donus klarigojn al persono, kiu venas arogante kaj eligas postulojn eĉ antaŭ ol sin prezenti.”

“Amiketo, amiketo, ne koleru”, li okulumis, antaŭ ol daŭrigi kun larĝa rideto ne tre difinebla (ĉu eble leoparda?):

“Mi ne bezonas prezenti min, ĉar vi scias tute bone, kiu mi estas. Kaj mi bone komprenas, ke vi respondis, kion vi ĵus respondis, ĉar vi ne povus diri ion alian.” Li metis la manon al sia nazo, kaj ektiklis ĝin, post kio li denove okulumis ridetante – estis io vulpa en ĉi tiu rideto: “Nu, en nia profesio – aŭ kromprofesio, se vi preferas – ekzistas aliaj argumentoj, ĉu ne?, kaj tiuj pli forte interesas vin, kompreneble. Mi vin ne mallaŭdas...”

“Aliaj argumentoj?” interrompis Stefano provante ne tro montri siajn konfuzajn sentojn.

La alia frotis al si la dikan fingron sur la montra laŭ la gesto de iu nombranta monbiletojn, dum li plian fojon okulumis.

“Kiom vi postulas?” li fine demandis.

Stefano tutvizaĝe esprimis senreviĝon.

“Kiom ajn vi proponus, mi ne havus ŝancon ricevi eĉ centonon el ĝi, bedaŭrinde, ĉar vi eraras: mi ne havas vian dokumenton. Kaj mi cetere ne praktikas vian duban kromprofesion,

kio ajn ĝi estas.”

La kunparolanto ĝemspiris, kiel laca patro antaŭ bubo tro obstina.

“Domaĝe, ke vi elektas tiun taktikon. Mi trovis vin simpa. Sed mi ne povas perdi pli da tempo kun vi. Se dolĉaj rimedoj ne efikas, vi devigas min uzi pli premajn.” Kaj li ridetis duonŝakalan duonleonan rideton.

“Miaj dungantoj ne ŝercas pri tiaj aferoj”, li daŭrigis. “Ili volas tiun dokumenton, kaj ili ricevos ĝin. Jen kion vi faros. Mi donas al vi skatolon” – li eligis el sia teko plastan skatolon – “vi metos la dokumenton en ĝin kaj enŝovos la tiel plenigitan skatolon en la rubujon kun n-ro 6 de Palac-Hotelo postmorgaŭ vespere. Estas apud la malantaŭa enirejo, sur Koŝmastrato. Troviĝas malgranda pordo tie. Tuj kiam oni eniras, dekstre staras tuta aro da rubujoj; ĉiu surhavas numeron. Ne forgesu: n-ro 6.”

“Sed kiel mi povus ludi vian felietonaĵon? Mi ne havas la dokumenton”, la junulo diris per kompatiga voĉo.

“Se vi ne havas ĝin, vi scias, al kiu vi ĝin donis. Mi lasas al vi du tagojn por ĝin rekapti. Kaj bonvolu ne informi la policon aŭ viajn amikojn. Se iu observadas tiun rubujon, vi submetiĝos al treege seriozaj riskoj. Miaj dungantoj estas tre postulemaj kaj ne ridas pri tiaj aferoj. Ili havas rimedojn, pri kiuj via plej fantazia imago ne kapablas revii, rimedojn bazitajn sur superteraj scioj. Se vi ne plenumos ĉi tiun ordonon, vi suferos. Memoru pri Rik Ospaci!”

Kaj prononcinte tiujn vortojn, li foriris.

*

Strange, kiel oni faras al si antaŭbildon pri persono, kiun oni ankoraŭ ne vidis. Kiam Stefano eksciis, ke la ĵus raportita konversacio estos la temo de renkontiĝo kun Jano Karal kaj iu el la kontraŭspiona servo, li image atribuis al ĉi-lastata la fizikan aspekton de olimpia ĉampiono.

Kiam li eniris la ejon, li sekve bezonis kelkajn sekundojn por sin adapti al la realo: tiu maljuna, malaltkreska vireto, kies kapo formas renversitan triangulon, kaj al kiu eksmodaj okulvitroj donas vizaĝon de emerita profesoro, tiu facile rompebla korpeto efektive estas la kontraŭspiona ulo.

“S-ro Karal klarigis al mi la aferon, sed mi ŝatus aŭdi vin ĝin rakonti per viaj propraj vortoj”, li diris per metala voĉo kun neta, preskaŭ malnature neta artikado.

Stefano rerakontis.

“La aludoj al eksterteranoj kompreneble estas pura fantaziaĵo,” li diris, “sed laŭ mi ni devas preni tre serioze la minacojn. Tiuj homoj ne ŝercas.”

“Kion vi proponas?” Karal demandis.

“Plej saĝe estos, ke ni sendu vian nevon al iu trankvila loko, kie li restos kaŝita ĝis ni juĝos revenon ĉi tien ree sekura por li. Tio estas unu punkto. Sed mi pensas, ke ni devas obei la ricevitan ordonon, jene: ni metos la falsan dokumenton en la platan skatolon, kaj Stefano iros ŝovi ĝin en tiun rubujon kun n-ro 6. Unu aŭ du el niaj knaboj restos tie kaj provos fotografi kaj sekvi la personon, kiu venos preni ĝin.”

“Ĉu viaj kunlaborantoj ne riskos ion?”

“Ili kutimas je tiaj riskoj kaj scias kaŝi sin. Tiuj detaletoj estas nia ĉiutaga vivo.”

“Via plano plaĉas al mi,” Karal diris, “sed ni bezonos esti informataj pri viaj eltrovoj. Ĉar ni ne scias, kiamaniere tiu afero estas ligita al la morto de Rik Ospaci, kaj dum ni ne scias pli pri ĉi-lasto, ni ne povas lasi la enketon nur al vi, kvazaŭ temus pri spiona murdo. Povus esti sinmortigo aŭ akcidento, aŭ murdo pro nepolitika kaŭzo, ĉu ne?”

“Kompreneble, ni plu laboros man-en-mane, kiel ni faris ĝis nun. Do, mi dankas pri via aprobo, kaj mi gratulas vin, knabo, pri la maniero, laŭ kiu vi agis.”

*

Tiel estis aranĝite. Stefano metis la dokumenton en la skatolon, kaj la skatolon en la difinitan rubujon. Li tiam kviete foriris, dum du viroj el la kontraŭspiona servo alvenis surloke, prepare al longa pacienca atendo.

La atendo efektive estis longa. Kaj senfrukta.

Ĉirkaŭ la 3-a nokte alvenis ses aŭ sep junuloj zumbicikle. Ili ariĝis, kun kapo klinita, ĉirkaŭ la koncerna rubujo. Antaŭ ol iliaj observantoj povis kompreni, kio okazas, ĉiu havis en la mano identan skatolon, kiun li tenis tre videble, kaj ili brubrue forrajdis al plej diversaj direktoj.

Estis absolute neeble scii, kiu el ili havas la skatolon metitan de Stefano. Kaj sekvi du el ili elektitajn hazarde ne havus pli da senco. Tion tamen konsciencie faris la du agentoj, senrezulte.

Krome ili faris fotojn, kvankam ili sciis, ke tiuj estos neuzeblaj. La junuloj ja estis tute same vestitaj per bluĝinso kaj nigra pseŭdoleda jako, ili havis zumbiciklojn kaj ilia vizaĝo estis kaŝita per motorciklista kasko kaj koltuko metita ĝis la okuloj.

La observado estis kompleta fiasko.

Aŭto staris apud la lignodomo. Jano Karal rigardis la pneŭmatikojn. Li ne bezonis ilin longe observi por scii, ke tiuj ne respondas al la spuroj, kiujn li vidis, kiam li esploris la regionon antaŭafoje.

El la du aŭtoj, kiuj lasis spurojn, unu jam estis identigita: estis la veturilo de Ospaci. Oni trovis ĝin apud Malpaz, kie ĝi estis forlasita; bedaŭrinde, plej zorga traserĉo ne liveris eĉ minimuman signifan postsignon. Pri la alia oni sciis nenion. Karal, kiu faris mem la muldaĵon, sufiĉe bone memoris ties ĝeneralajn karakterizojn por tuj rimarki, ke la koncernajn spurojn ne faris la pneŭmatikoj, kiujn li nun ekzamenis.

Li aliris la domon kaj frapis al la pordo. Aŭdiĝis iom da bruo interne, kaj la pordo malfermiĝis.

“Kio estas?” diris raŭka voĉo. Antaŭ la policano staris grandega, dikega viro, kun vastega grasa vizaĝo plurtage ne razita, hartufoj kreskantaj dis kaj mis, malpura ĉemizo nur duone butonita, senforma pantalono, kiu ŝajnis tuj falonta, ĉar ĝin surrajdis ampleksa elstaranta ventro, kaj nur mirakle la zono povis ĝin teni, kaj kun la ĝenerala fortimiga sinteno de sovaĝulo.

“Mi apartenas al la polico,” Jano Karal sin prezentis, “kaj mi ŝatus ricevi respondon al kelkaj demandoj pri la viro, kiu mortis falante de sur la Rafunja-teraso.”

La alia rigardis Janon per malgrandaj dubemaj okuloj. Dum li intense rigardis, li balanciĝis, portigante la gigantan pezon de sia korpo jen al unu kruro, jen al la alia, tiel ke en la menso de Karal priskribe formiĝis la vorto “urso”.

“Envenu”, la urso fine diris.

Ili eniris ĉambron, en kiu regis neordinara malordo. Estis iom da ĉio ĉie. La tablo estis kovrita de paperoj, gazetoj, manĝrestaĵoj kun multaj paneroj, tondilo, malpura tuko, kies destino tute ne klaris, kaj multaj aliaj aferoj. Sur unu el la brakseĝoj kuŝis malnova ĉifita bluĝinso. En angulo troviĝis stablo kun pentraĵo apenaŭ komencita.

“Sidu kie vi volas, se vi volas, kiam vi volas”, la raŭka baso prononcis. “Ĉi tie estas la domo de l’ libér.”

Jano forprenis de sur seĝo stakon da libroj, vane serĉis por ili lokon sur la tablo, kaj ilin fine lokis sur la plankon. Li tiel povis sidiĝi. Lia gastiganto jam sidis en brakseĝo.

“Via nomo estas Gido Verstrata, ĉu ne?” Karal demandis. “Ĉu vi loĝas ĉi tie?”

“Al la unua demando mi respondas jes, al la dua jes kaj ne”, la pentristo raspvoĉis. “Mi venas ĉi tien por kelkaj semajnoj jare, kelkfoje monatoj. Nur ĉi tie mi povas pentri. Se mi sentas inspiron, mi restas. Se ne, mi foriras. Kiam inspiro revenas, mi revenas.”

“Estas stranga loko por konstrui domon”, komentis Karal.

“Ĉu stranga?” La urso rigardis la policanon kun ega malestimo. “Tiu vorto signifas nenion. La loko plaĉas al mi. Eĉ se nur ĉar neniu promenas ĉirkaŭe.”

“Via domo estas ekipita per ĉio necesa por komforte vivi: flua akvo, elektro...”

“Kompreneble. Mi estas riĉa. Kiam mi konstruis ĝin, mi estis senhava. Dum jaroj mi pentradis laŭ la sama stilo, ĝi estis senvalora. Nun arabaj petrolreĝoj, japanaj industriistoj, usonaj aktorinoj konkuras kun ambasadorfiloj el la proleta ruĝa mondo por akiri miajn ĉefverkojn, kaj la sumojn, kiujn ili proponas, vi ne imagus. Mi do konservis la karan malnovan domon, sed ĝin igis pli komforta. Sed ĉu por paroli pri mia domo vi venis, aŭ pri la morta plongo?”

“Efektive, pardonu min. Ĉu vi scias ion pri tiu morto?”

“Ne. Kiel mi povus scii? Mi ne estis ĉi tie, kiam ĝi okazis. Kaj fakte, rigardu...” Li direktis la kapon al la fenestro. “Eĉ se mi estus hejme mi nenion sciis. Oni ne vidas la lokon, de kie li falis, nek la lokon, kie li alteriĝis... aŭ verŝajne estus pli ĝuste diri: almortiĝis.”

“Kie vi estis, kiam okazis la afero?”

“Ĉu vi suspektas min?”

“Mi suspektas ĉiun kaj neniun. Mi kolektas informojn. Ĉu malplaĉas al vi respondi?”

“Jes, mi ne ŝatas, ĉar mi alte taksas liberecon, kaj al mi ne plaĉas diri al la polico, kie mi estis, kial, kun kiu, ktp. Mi sentas tion entrudiĝo en mian privatan vivon...”

“Sed vi estas sufiĉe prudenta”, Karal interrompis, “por scii, ke kiam temas pri morto, kiu povas esti murdo, via intereso estas kiel eble plej bone kunlabori kun la polico, eĉ se nur por ke ĝi ne tro ofte invadu vian privatecon.”

“Verŝajne jes. Mi do respondos: dum tiu tuta monato mi estis en Hotelo Eden en Akvoviva, preskaŭ 300 kilometrojn for de ĉi tie.”

“Ĉu vi konis la viron, kiu mortis? Li nomiĝis Rikardo Ospaci.”

“Persone ne. Sed mi vidis lin plurfoje ĉi tie.”

“Kie ekzakte? Ĉu li venis al ĉi tiu domo?”

“Ne. Mi volas diri: ĉi-regione, ĉi-proksime.”

“Kion li faris?”

“Mi ne scias. Foje mi promene alvenis al la Rafunja-belvedero – de kie li falis – kaj mi vidis lin kiel frenezulo, kun la brakoj etenditaj antaŭen: ‘Jen mi, jen mi alvenas, ne koleru, jen mi estas!’”

“Ĉu vi vidis al kiu li parolas?”

“Ne. El la loko, kie mi staris, mi ne povus vidi, sed mi estas preskaŭ certa, ke estis neniu. Mia impresio estis nete, ke jen frenezulo havas halucinon. Kiam mi eksciis pri lia morto, mi memoris tiun scenon kaj mi pensis: se li estis sub la influo de iu drogo kiel LSD, li eble halucine vidis ponton neekzistantan kaj volante kuri sur ĝi, ekfalas.”

“Neeble,” Karal respondis, “ĉar ni scias, ke li tre timis drogojn. Li ne fumis, ne drinkis, estis vegetarano... Drogan halucinon ni devas ekskludi, sed ne necese skizofrenian. Pri tio mi bezonas konsulti psikiatron. Via raporto pri tiu sperto tre interesas min. Vi scias, ĉu ne?, pri la partio, kiun li fondis, kaj kiu pretendas ricevi siajn instrukciojn de venantoj el alia stelsistemo.”

“Jes. Kompreneble, mi scias. Sed kiam mi vidis lin freneze agi ĉi-zone, mi ne konis lian nomon. Nur kiam mi vidis lian foton en la gazetoj, mi pensis: ‘Jen mia frenezulo nun ĵetas sin en la politikan ĝangalon!’ Plia konfirmo, ke li frenezas, ĉu ne? Mi ankaŭ pensis, ke la loko, pri kiu li parolis, neniam konsentante riveli ĝian situon, fakte estas Rafunja.”

“Vi loĝas ĉi tie parton de la jaro, kion vi opinias pri tiu eksterterana afero?”

Verstrata hezitis antaŭ ol respondi. Li rigardis Janon takse. De sur la tablo li prenis pipon kaj ĝin plenigis per tabako, kiun li ekbruligis kun ega malrapido.

“Eble mi opinias nenion, eble mi ne scias, kion mi opinias, eble mi opinias aferojn, kiuj kontraŭdiras unu la alian”, li fine respondis.

Jano pensis, ke plej bone estas atendi, ĝis la pentristo mem disvolvos sian penson, kaj li ne faris demandon. Efektive, Verstrata, post longa minuto, dum kiu li brue suĉis sian pipon, parolis pli klare:

“Kelkfoje mi diras al mi, ke estas sensencaĵo. Aliffoje mi pensas: kial ne? Ke ekzistas inteligentaj estaĵoj en alia planetsistemo, tio estas statistike probabla. Ke kelkaj el ili atingis sufiĉan gradon de civilizo por kapabli viziti nin, tio ne estas mallogika. Kaj krome estas fakto, ke mi vidis...” Li abrupte interrompis sin.

“Ĉu vi vidis neidentigitan flugantan objekton?” nekredeme demandis Karal.

“Ne. Neniam. Sed mi fojfoje vidis strangan intensan lumon tie malsupre.”

“Ĉu proksime al via domo?”

“Nu, mi dirus, ke la fonto de la lumo troviĝis malsupre, sur la rafunja ebenaĵo.”

“Ĉu vi ne scivolis kaj iris vidi?”

“Jes ja mi scivolis, sed mi ne iris vidi.”

“Kial?”

La pentristo rekomencis ludi per alumeto, ĉar la pipo estis estingita.

“Pro timo”, li diris malkaŝe.

Jano estis impresita. Silento kelkminute okupis la ĉambron. Kiam Jano reparaolis, lia voĉo preskaŭ reduktiĝis al flustro.

“Ĝuste kion vi timis?”

La alia suĉis sian pipon.

“Eksterteranojn, kompreneble. Tia lumo estis nehoma, ne normala, ne natura. Mi estus izolita, povus voki nenies helpon. Se ili volus preni homan specimeno niaplanedan por siaj laboratorioj...” Li ekskuiĝis tremete, kaj tuj poste ekhavis humuran brilon en la okuloj. “Des pli,” li aldonis, “ke mi estas ampleksa specimeno, kiu povus liveri pecetojn de karno al tre multaj laboratorioj.”

Karal ridetis, sed baldaŭ demandis, serioziĝe:

“Ĉu vi ne pensas, ke se ili estas sufiĉe civilizitaj por povi veturi tra miloj da lumjaroj, ili nepre devas esti ankaŭ bonkoraj?”

“Vi ne parolas sincere, ĉu? Vi ne povus esti tia naivulo. Ĉu vi iam ajn vidis, ke progreson sciencan aŭ teknikan akompanas progreso en la mildeco de la koroj, en homa toleremo? Eble ili estas mildakoraj, sed eble ne. La risko estas tro granda.”

“Kaj alifoje vi dubas eĉ pri ilia ekzisto, ĉu ne?”

“Jes. Tiam mi pensas, ke la lumo estis nur sonĝo. Aŭ ke ĝi estas reala, sed havas ian racian klarigon, ekzemple ke nia armeo novan armilon tie eksperimentas...”

10

Laŭ interkonsento kun la kontraŭspiona servo kaj leŭtenanto Remon estis decidite, ke Karal je la unua vizito ne mencios al Veronika Munzo la diversajn strangajn aferojn, kiujn oni notis pri ŝi: pri la monkaŝejo aŭ la tek-interŝanĝo nenio diriĝos ĉi-stadie. Pri tio Karal pensis, dum li lifte supreniris al la apartamento de la juna virino.

“Ĉu vi scias, ke vi estas la lasta persono, kiu vidis Ospacin vivan?” la policano demandis kelkajn minutojn poste, kiam ambaŭ sidis en ŝia vasta salono.

“Ne,” ŝi respondis, “mi tion eĉ ne imagis.”

“Kiaj estis viaj rilatoj kun Rikardo Ospaci?”

Ŝi ekprenis buklon el la haroj kaj komencis ĝin malrapide volvi ĉirkaŭ sia montra fingro. Ŝi rigardis Janon, kvazaŭ provante legi el lia vizaĝo, kigrade li riskas esti danĝera por ŝi.

“Ĵusaj”, ŝi respondis post momento. “Mi volas diri, ke mi apenaŭ konatiĝis kun li, kiam li mortis.”

“Vi tamen havis kun li personajn rilatojn, ĉu ne?”

“Nomu ilin personaj, se vi volas, sed mi apenaŭ konas lin. Ni vidis unu la alian solaj tri fojojn maksimume.”

“Ĉu vi ŝatis lin?”

“Ŝatis? Li interesis min, sed mi ne dirus, ke mi lin ŝatis.”

“Kiel vi ekkonis lin?”

“Plej simple: mi iris aŭskulti unu el liaj paroladoj, kaj poste diskutis kun li.”

“Pri kio?”

“Pri lia sperto kun la homoj el la kosmo. Jen homo, kiu publike asertas, ke li renkontis homojn el ekstertera mondo, kaj ili komisiis lin agi politike ĉi tie. Tio valoras, ke oni iru rigardi, ĉu ne?”

“Kaj kion vi opinias pri liaj asertoj?”

“Komence mi ne kredis. Mi pensis: kia stulta naivaĵo! Sed kiam mi parolis kun li, faris al li multajn demandojn, prezentis al li defiajn argumentojn, kaj aŭdis liajn respondojn, mia opinio

ŝanĝiĝis. Nun mi ne plu dubas, ke li estis sincera.”

“Vi do kredas, ke li renkontis homojn el alia planedo?”

“Jes. Kaj mi opinias, ke tiuj renkontiĝoj okazis en Rafunja.”

“Ĉu li tion diris al vi?”

“Ne, sed mi igis lin doni multajn detalojn pri la loko, kaj ĉiuj liaj priskriboj perfekte taŭgas pri Rafunja.”

“Kiel vi klarigas lian morton?”

“Povus esti multaj klarigoj. Mi min demandis, ĉu povas esti akcidento. Sed li tre bone konis la lokon, se ĝi estas tiu de la kosmaj rendezuoj. Ĉu iu puŝis lin? Laŭ la gazetaj priskriboj, ŝajnas esti ideala loko tiurilate. Neniu tie promenas. Nek tage, nek nokte. Plej bona pruvo estas, ke, se la gazetoj ne mensogas, lia korpo kuŝis tie tri aŭ kvar tagojn antaŭ ol oni ĝin malkovris. La murdonto do sciis, ke oni ne vidos lin, ke estas neeble eskapi el morto ĉe tia falo sur rokojn. La nura problemo estis aliri lin senbrue. Se iu eksciis, ke li regule vizitas la Rafunja-terason, tiu povis lin sekvi kaj puŝi en la profundaĵon.”

“Ĉu li havis malamikojn?”

“Mi ne povus diri. Mi konis lin tro malmulte. Sed tamen, li estis ĵurnalisto antaŭ ol provi ĵeti sin en politikon, kaj kiam li estis ĵurnalisto, li estis konata pro sia emo publike nudigi malhonestajojn, misuzojn, ktp. El tiu tempo li certe konservis malamikojn. Krome...” Ŝi subite haltis.

“Krome?” eĥis Jano.

“Ĉu mi povas diri suspektojn eĉ plej fantaziajn, aŭ ĉu tio estus misfamigo?” ŝi demandis kvazaŭ singarde.

“Diru ĉion, kio pasas tra via kapo”, Karal konsilis. “Ĉi tiu estas pure konfidenca interparolo. Ĉiu el ni faras strangajn supozojn, kaj estas utile al la polico disponi kiel eble plej multe da hipotezoj.”

“Bone. Do mi pensis, ke lia nova politika partio eble ne plaĉas al ĉiuj. Dank’ al lia ĉarmo kaj kapablo elokventi, li altiris al si multajn personojn. Eble anoj de iu partio opiniis, ke tio perdigos al ili voĉojn nepre necesajn por sukcesi...”

“Ĉu laŭ via sento oni murdus por tio?”

“Mi ne scias. Estis nur ideo, kiu trafis min. Sed la politika deziro sukcesi povas esti pasia,

preskaŭ freneza ĉe kelkaj.”

“Mi ne pensis antaŭe pri tio: vidu, vi vere helpas nin, jen hipotezo, kiun ni devos kontroli. Kaj mi ŝatus aŭdi vian opinion pri alia fantazia hipotezo, kiun multaj personoj faras nun...”

“Ke lin murdis la eksterteranoj?” ŝi interrompis. “Tio estas la plej stulta supozo, kiun oni povas fari.”

“Kial?”

“Kial eksterteranoj senigus sin je komisiito, kiu agas tre sukcese laŭ iliaj deziroj? Ne devas esti tiel facile trovi homon, kiu konsentas agi por ili. Multaj fanfaronas, sed mi ne dubas, ke la granda plimulto el la homoj, kun kiuj ili provis ekrilati, tremegis time, kiam tiuj strangaj estaĵoj ilin alparolis, kaj ke ili volis neniam plu ilin renkonti. Rik Ospaci ne timis. Li akceptis la kontakton. Li poste akceptis la laboron, kaj li faris ĝin kun bonega sukceso. Estus stulte lin likvidi.”

Por Karal, ĉi tio estis nur unua kontakto. Li ne volis esplori vere profunde la situacion de Veronika Munzo.

Nur unu pluan demandon li bezonis fari:

“Kie vi estis dum la nokto de la 19-a ĝis la 20-a, tio estas la lundmarda nokto?”

Ŝi tute ne emociiĝis, sed la sulko sur ŝia frunto iom profundiĝis.

“Pasintan semajnon, ĉu ne? London vespere... Atendu... Mi estis ĉe s-ino Bufa, en la apartamento tuj ĉi-sube. Ni rigardis la televidon kaj plu babilis...”

“Ĝis la kioma?”

“Proksimume noktomezo.”

“Kaj poste?”

“Nu,” ŝi respondis, elmetante sian dolĉan rideton, “mi revenis ĉi tien, kaj enlitiĝis kun libro. La lumon mi estingis ĉirkaŭ la unua matene.”

Karal adiaŭis ŝin, kaj tuj vizitis s-inon Bufan, kiu konfirmis la dirojn de Veronika. Kompreneble. Sed, aŭtomobile, oni apenaŭ veturas pli ol unu horon por atingi Rafunjan de Valĉefa. Kaj plej probable estis, ke ankaŭ la vivon de Rik iu “estingis ĉirkaŭ la unua matene”.

*

“Mi volas montri al vi foton”, Jano Karal diris al sia nevo malfermante la pordon. “Eniru.”

Ĉar per la ruzo kun la zumbiciklaj junuloj la dokumentpreninto sukcesis ne esti sekvata, la kontraŭspiona servo opiniis, ke Stefano fakte riskas nenion, kaj la knabo plezure rekomencis partopreni en la enketo. De sur sia skribtablo Karal prenis dosieron kaj tiris foton el ĝi.

“Jen”, li simple prononcis.

Stefano ne hezitis.

“Estas la ulo, kiu volis la liston, kiu rabis la fotokopiojn, kies tekono la virino ŝtelis!” li ekkriis. “Do vi finfine malkovris, kiu li estas?”

“Ĉu vi ne divenas, kiu?”

“Ne.”

“Estas la viro, al kiu Rik Ospaci sendis sian ĉantaĝan leteron pri Legantula Plezuro.”

“La viro el CIA?”

“Jes, supozeble, la viro, kiu laboras por CIA.”

“Kiel li nomiĝas?”

“Roberto Sulavi, kaj li laboras ĉe la radio. Li partoprenas i.a. en la programado de la elsendoj. Bonega posteno por iu, kiu volas influi la publikopinion.”

“Kaj pri la virino, kiu ŝtelis liajn dokumentojn kaj ricevas monon en murfendo, ĉu vi eksciis ion?”

“Via amikino Veronika, ĉu? Nenion valoran. Mi vizitis ŝin, sed la intervjuo ne liveris interesajn detalojn, ne pli ol via. La kontraŭspiona servo verŝajne baldaŭ scios pli. Ŝi metis mesaĝon en la kaŝejon, kaj la fotsistemo estas instalita. La persono, kiu prenos la mesaĝon, estos fotata. Ni esperu, ke ne estos tro malfacile identigi lin.”

Ne estis malfacile.

“Oni tre bone vidas lin sur la fotoj. Estas iu Igor Kaplev, KGB-aganto, komerca ataŝeo de la ambasadorejo”, metale sonis la voĉo de la vireto el la servo kontraŭspiona.

“Ŝi do laboras por KGB!” prononcis Karal.

“Ne estas ia dubo.”

“Interese. Nun almenaŭ ni progresas: ni scias la politikan koloron de du el la ĉefaj roluloj en nia komplika afero.”

Bob Sulavi konsideris sin realisto. Eĉ troviĝis – almenaŭ ĝis tiu tago – cinika trajto en lia personeco, kaj la bildo, kiun li havis pri si, estis tiu de aŭtenta partoprenanto en danĝera politika ludo tutmonda. ‘Hardita,’ li ofte pensis pri si, ‘hardita mi estas’, kaj li memplaĉe ridetis pri la karaktero, kiun la propra fantazio atribuis al li: forta, silentema hardito.

Fakte, la vivo – almenaŭ ĝis tiu tago – ne metis sur lian vojon multon penigan. Li karieris ĉe la radio senprobleme, kaj lia kunlaborado kun CIA neniam entenis veran danĝeron. Pli ol io alia, ĝi estis por li sporto.

Al ĉio – almenaŭ ĝis tiu tago – li rilatis sportiste. Kiam aperis problemo, li aliris ĝin kiel pilkon en matĉo, kun la fona certeco, ke li solvos ĝin, aŭ ke li sportiste, ridete agnoskos sian fiaskon, sen lasi tion vere fuŝi lian egan plezuron vivi. Zorgoj en li pezis pli plume ol plumbe. Almenaŭ ĝis tiu tago.

La tago estis belega. Sennuba ĉielo, komfortiga suno, varma, sed ne tro, birdetoj ĉie ĉirpantaj: estis unu el tiuj tagoj, kiam naturo lanĉas kun ĉiuj ŝancoj sukcesi sian “ĉarm”-ofensivon.

Bob Sulavi promenis apud parka lageto, sin demandante, ĉu li luos boaton por la plezuro remi. La vojo, sur kiu li malrapide paŝis, estis kovrita per ŝtonplatoj, pli malpli triangulaj, aranĝitaj por plej plaĉa efekto. La aranĝo plaĉis al la okuloj, sed ĝi havis tiun malavantaĝon, ke inter tiuj platoj jen kaj jen troviĝis interspaco. Malavantaĝon, verdire, nur por la personoj, kiuj tie promenis kun maldikaj altaj kalkanumoj. Kiel la virineto nun paŝanta en la direkto renkonta al Bob.

“Ups!” ŝi ekkriis, kaj falis en liajn brakojn. Ŝia kalkanumo ĵus fiksiĝis en truon inter du ŝtonplatoj, kaj restis tie firme tenata, tiel ke ŝia piedo, reflekse daŭrigante la antaŭeniron, ŝiris la tro malfortikan ŝu-materialon, kaŭzante perdon de ekvilibro, kaj ŝin stumble faligante ĝuste kiam Bob Sulavi troviĝis apud ŝi. Tiel trueto parkvoja ŝanĝis la vivon de CIA-kunlaboranto.

Se raportoj postulas tempon, la okazoj mem fulme disvolviĝis. Dum malpli ol sekundo Bob rigardis ŝian vizaĝon, dum malpli ol sekundo li perceptis ŝian voĉon, sed tiuj etaj sekunderoj sufiĉis: jen eksplodis en li mil samtempaj orkestroj, kiuj tondris, psalmis, himnis plej laŭde, dum gongoj sonis kaj respondis sonoriloj, tertremo skuis liajn pulmojn, vulkano erupciis ie ĉe la brusto, kaj lia koro subite decidis maratoni, ĝis ĉiuj internaj organaj forsvenis por cedi lokon al belega fontano, kiu ŝprucigis orajn lumerojn en pejzaĝo el senkompara tenero, kun fona akompano de citraj arpeĝoj kaj de ĥoro anĝela. Li amis.

Senti submane ŝian delikate varman korpon estis la sperto plej agrabla, kiun li travivis ekde sia naskiĝo, kaj li emis ĝin daŭrigi kiel eble plej longe. Sed virineta voĉo lin refaligis de

paradizo teren.

“Sinjoro!” ŝi diris, kaj ŝia voĉo havis samtempe la klaran puron de hobojo kaj la harmonan riĉon de anĝela violonaro.

Li ellasis ŝin kaj direktis al ŝi okulojn de adora sklavo. Li konstatis, ke ŝi estas miloble pli bela ol li konsciis el la unua tro mallonga rigardo.

Ŝi ridis. Li pensis: ‘Ĉu tian melodian ridon homoj povus eligi? Ne. Nur anĝeloj.’ Al tiu penso la interna koboldeto aldonis duan: ‘Du specoj de eksterteranoj ekzistas: tiuj, kiuj venas kosmoŝipe, kaj simplaj paradizaj anĝeloj kiel tiu ĉi’, kaj tiu penso igis lin ridi, tiel ke ambaŭ dum momento kunridis rigardante unu la alian kun kreskanta korkuniĝo.

“Mia ŝuo!” ŝi diris, montrante al la plantita kalkanumo kaj al la ruino de tio, kio iam estis eleganta piedornamo.

Li sentis samtempe deziron ion komuniki, emon eksplodi per rido, kaj specon de paralizo, eble ŝuldata al la fakto, ke lia koro plu maratonis, dum la sango tiklis lin laŭ la tuta arteria vojaĝo.

“Mm... fdl... blmps...” sonis lia voĉo, dum li provis ordigi la pensojn, kaj li ree ekridis. Ŝi tenis sin strange malekvilibre, tial ke nur la ŝu-hava piedo plene tuŝis la grundon, dum la alia tiun tanĝis sen sin apogi. Li rigardis ŝin adore. Nekapabla paroli, li decidis agi, kaj ekkaŭris por malplanti la ŝuon.

“Via ŝuo estas komplete difektita,” li rimarkigis retrovinte la kapablon sin esprimi vorte, “vi ne povas iri tiel.”

“La trinkejo estas ne tre malproksime”, ŝi diris. “Mi pensas, ke mi lamos tien kaj trinkos ieton. Tio helpos pripensi, kiel mi reiros hejmen.”

“Mi havas veturilon kaj estas tute libera: mi volonte kondukos vin, kien vi volas, sed via sugesto estas bonega. Ni iru unue trinki.” Kaj kelkajn minutojn poste, observanto povus vidi, ĉe simpatia tablo, paron kiu, iom embarasita, ne sciis, kiel komenci konversacion. La altkreska sportul-aspekta viro gratis al si la nazon, dum la virineto volvis unu el siaj bukloj ĉirkaŭ la montra fingro, laŭ gesto iom infaneca.

Ĉar la juna virino, kiu kaŭzis en la CIA-agento la amoŝtormon ĵus priskribitan, estis neniu alia ol Veronika Munzo.

*

Ĉi-stadie en nia raporto, estus saĝe precizigi kelkajn punktojn, pri kiuj la leganto povus havi neĝustan komprenon.

Eble ni ne sufiĉe klare indikis, rakontante, kio okazis en la ĉiovendejo, ke pure hazarde Bob Sulavi sekvis Stefanon, kaj ke li ne vidis Veronikan Munzon, dum ŝi fotokopiis. Oni memoru, ke troviĝis tiam en la supermagazeno ekstreme densa homamaso, kaj ke Veronika svenis tuj, kiam ŝi ekvidis la altan figuron de la CIA-agento. Ne estis reciprokeco en ilia konado: ŝi lin konis, sed li ne ŝin, kaj kiam li alvenis apud la fotokopian maŝinon ŝi kuŝis kun la kapo turnita kaj kun tiom da homoj ĉirkaŭe, ke li ne vidis ŝian vizaĝon. Starante tie, li instinkte, laŭ tipa reflekso inform-agenta, rigardis la fotokopiatan dokumenton. Unu ekrigardo sufiĉis, por ke li komprenu ties gravecon, kaj li decidis kapti ĝin. Li samtempe rimarkis, ke Stefano prenas la jam faritajn kopiojn, kaj ties vizaĝo gravuriĝis liamense. Veronikan, kontraŭe, li ne sukcesis vidi klare. Kiam ĵus ekflamis en li amo, li do tute ne sciis, ke ŝi estas, mondpolitike, lia rivalo.

Kial, vi eble demandos, tiufoje svenis la juna virino? Pro kuniĝo de diversaj faktoroj. Unue, estis tre varme, kun tro malmulte da aero, kaj kun io prema en la maniero, laŭ kiu la homoj puŝis sin reciproke pasante preter la kopimaŝino. Due, Veronika sentis sin kulpa: la dokumenton, kiun ŝi kopiis, ŝi mem ŝtelis antaŭe. Ŝi decidis fotokopii ĝin en la anonimeco de ĉiovendejo por eviti la eventualan enmiksiĝon de kolego, ĉiam eblan en la oficejo, sed la fakto manipuli ŝtelitan dokumenton en publika loko efikis streĉe kaj turmente.

Sekve, kiam ŝi levis la okulojn, pro tiu stranga, preskaŭ tuŝa sento, kiun ni havas, kiam iu nin rigardas fikse, kaj vidis nekonatan junulon – Stefanon – gapi al ŝi kvazaŭ rekone (Stefano ja ĵus identigis ŝin kiel la virinon kaŝfotitan dum ŝi prenis la monon el murfendo), la esprimo de l' junulo kvazaŭ densigis la impreson, ke ŝi estas tuj kaptota ĉe la freŝa faro.

La kunan influon de l' varmo, de la kulposento kaj de la stefana rigardo ŝi eble povus elteni, sed kiam ŝi vidis post la knabo Roberton Sulavin, kiun ŝi konis kiel CIA-agenton, la streĉo fariĝis netolerebla, kaj ŝi perdis la konscion.

Kaj nun, tagojn post tiu incidento, ŝi ne plu sciis, kion pensi. Ŝia koro kaj instinkto diris, ke Bob ne scias pri ŝia KGB-rola, kaj ŝi sentis sin fizike allogata al tiu granda sportulo kun la rimarkinda nazo. Sed ŝia kapo rebatis, ke esti aŭtente amata de li supozigus tian hazardon, ke plej verŝajne temas pri ruzo kun ia politika intenco.

Unu parto de ŝi deziris esti tre singarda pri liaj eventualaj provoj uzi ŝin, dume konsciante, ke KGB povus ege profiti de la utileco rekte rilati kun li en plej naturaj cirkonstancoj. Kaj alia parto diris: 'Ne timu, ne necesas protekti vin kontraŭ neekzistanta ruzo: liaj ŝafidaj okuloj rakontas malkaŝe pri lia amsincér.'

*

Ekde kiam ŝi stumblis en la parko, pensoj ne ĉesis turniĝi tumulte en ŝia kompatinda cerbo, kaj ŝi ne pli proksimis al trankvilo nun, en lia ĉambro subtegmeta, ol antaŭe ĉe la parka lageto.

La vivo ne estas facila. Ĉiam dubi, dubi! Kiel lacige por la nervoj! Ĉiam kontroli sin, observi sin, kaj ĉion atenti por ne kolerigi la KGB-monstrojn. Ĉu ŝi longe eltenos tian vivon? Ĉu la fakto, ke ŝi svenis ĉe la fotokopia maŝino ne estus averto de organismo tro streĉita? Ŝi ĝemspiris.

“Vi ĝemspiras, mia bela?” Bob diris kare kun vizaĝo preta zorgi.

Ili sidis kune sur la sofo de lia loĝejo, kaj li jam longan tempon rakontadis seninterese pri la belecoj de radioprogramado. Ŝi decidis riski ion por devigi lin sin malkaŝi. Ŝi metis la manon al la koro kaj diris:

“Vi sciu, kelkfoje mi min demandas, ĉu mi ne devus konsulti kuraciston, mi sentas min iom streĉita. Antaŭ ne tre longe mi eĉ svenis en supermagazeno.”

“Ĉu vere? Kiel okazis?”

“Ho, mi estis fotokopianta dokumenton. Estis multaj homoj, kaj subite mi falis, perdinte la konscion. Tre malplaĉa sperto.”

Ŝi tre akre memoris la scenon. Ŝi sciis, ke li ne rigardis ŝiadirekte, dum ŝi fotokopiis. Ŝi rezonis jene: se lia amo estas sincera – kaj tio implicas, ke li nenion supozas pri ŝia aparteno al KGB: CIA-ano ne sincere ekamus KoGoBulinon – li nepre mencios sian ĉeeston en la ĉiovendejo; se lia amo ne estas sincera, li ĝin prisilentos.

“Kiam tio okazis?” li demandis.

“Eksterordinare”, li diris aŭdinte ŝian respondon. “Mi estis tie tute apude. Mi alvenis al la fotokopia maŝino tuj post kiam iu svenis. Se mi estus imaginta, ke estas vi! Sed mi ne vidis vin. Estis tiom da homoj. Oni tuj portis vin for.” Faris al Bob strangan impreson, malkovri, ke la hazarde trovitan gravan dokumenton kopiis la virino, kiun li amas. ‘Ŝi okupiĝas pri politiko!? Eble ni povos kunlabori!’ li diris al si.

“La domaĝa afero estas, ke mia dokumento malaperis”, ŝi diris plende.

Tiu frazo trafis Sulavin kiel sago. Lia unua impulso estis ĉion klarigi al ŝi. Sed lia sana prudento revekiĝis, eble pro la granda risko, kiun enhavus tia konfido kaj pro la multfoja ripetado fare de liaj ĉefoj, kiam li akceptis fariĝi CIA-kunlaboranto, ke absoluta prisilento necesas. Unuafoje en lia vivo lin suferigis tiu devo kaŝi la veron.

“Estis junulo tie, kiu prenis la paperojn”, li diris, kun nebula sento, malagrabla, ke lia universo pretas komplete disfali. ‘Se ŝi iel divenus, ke ankaŭ mi kaptis parton...’ li amare pensis.

“Ha!” ŝi respondis, ĝojante pri tio, ke li senĝene rakontis almenaŭ pri sia ĉeesto, sed

samtempe observante, ke li mordetas al si la lipon, kaj la nazon ekgratas. Sopro estis amata fariĝis pli kaj pli forta en ŝi, pli ol la prudenta malfidemo. ‘Eble lia amo estas sincera,’ ŝi pensis, ‘sed li ne povas konfesi sian apartenon al CIA. Se li tion farus, mi ne povus esti lin. Ĉu eblas esti perfidanto? Kaj se la afero estus nur ruzo, li simple ne menciis sian ĉeeston en la magazeno. Mi do ne veku liajn suspektojn kaj ne fuŝu ĉion dirante, ke mi perfekte scias, ke li prenis la dokumenton, kaj ke per ruza tek-interŝanĝo mi ĝin rehavigis al mi.’

Silento ŝvebis, dum ŝiaj pensoj disvolviĝis tiuvoje. Dume, ankaŭ en li la psikaj fortoj mobiliziĝis por rekonkeri taŭgan ekvilibron kaj la plaĉan senton povi ami senprobleme. La silenton li fine rompis:

“Mi apenaŭ povas kredi,” li diris, “ke mi estis tie apude, kiam vi svenis, ke mi eĉ sciis, ke ĵus svenis virino, sed ke...” Li paŭzis.

“Ĉu tio ne pruvas, ke la destino jam volis, ke ni renkontiĝu?” li daŭrigis. “Se antaŭe mi ne stulte hezitus pri ŝtrumpetoj, mi estus starinta apud vi, kiam la malfeliĉo okazis. Mi estus forportinta vin en miaj brakoj, konsolinta vin... Kiel stulta mi estis perdante tempon pri ŝtrumpet-problemo, dum la destino puŝis min al vi!”

Tiuj vortoj kaŭzis en ambaŭ bonvenan malstreĉiĝon. Ŝi ridis.

“Vi vere estas lirika, kvankam iom ĝenas la emfazo pri ŝtrumpetaj problemoj en via lirikaĵo.”

Ili ridis kune.

“Mi volas respekti viajn sekretojn,” li diris abrupte per alia, preskaŭ solena tono, kaj ŝi sin demandis, al kio li celas, “sed mi estas scivola: ĉu estas maldiskrete demandi, kio estis tiu dokumento, kiun tiu junulo ŝtelis for?”

‘Li jam konas la respondon’, ŝi pensis. ‘Ĉu li diras tion, ĉar estus strange ne demandi? Aŭ ĉu li testas min, kiel mi lin ĵus testis?’ Ŝi decidis diri la veron, aŭ parton de la vero.

“Estas grava politika dokumento, kiun mi pruntis de mia frato. Se esti sincera, mi diru, ke mi pruntis ĝin sen lia scio.”

“De via frato?”

“Jes. Li estas grava ano de la faŝisma movado Ordo kaj Disciplin. Tiuj homoj preparas sin por la tago, kiam okazos ŝtatrenverso ĉi tie. Ili kolektas ĉiaspecajn informojn utilajn en tia cirkonstanco. Mi decidis fotokopii tiun dokumenton kaj ĝin havigi al la leĝaj aŭtoritatoj. Mia frato furiozus, se li tion scius, sed ne ĉar li estas mia frato mi povas aprobi tiun danĝeran faŝisman aktivecon. Tamen mi sentis min kulpa pri mia ŝtelo, kaj eble tial mi svenis, kiam

ekŝajnis al mi, ke jen alvenas membro de ilia hontinda movado.”

“Kompatindulineto!” li tenere muzikvoĉis.

Ŝi rigardis la horloĝon kaj ĝemspiris.

“Mi devas iri oficejen. La ĉefo min atendas”, ŝi diris.

“Ĉu vere ni jam devas disiĝi”, li prononcis dube. Sed li ja sciis, ke aliel ne eblus, kaj ili ĝisrevidis.

Li refermis la pordon kun miksitaj sentoj. Lin deprimis la fakto, ke ŝi jam foriras, kaj ke li troviĝas en tiel stranga situacio pro la fotokopiita dokumento. Aliflanke, ili pasigis kune longan tempon ĉi-foje, ili fiksis baldaŭan rendevuon, kaj estis videble, ke ŝi pozitive respondas, kvankam pli rezerve, al lia ama sento. Ĉe tiaj favoraj cirkonstancoj, plendi estus insulto la sorton.

Li repensis pri ŝi. Kia fajna vizaĝo! Kiaj belaj kruroj! Kia admirinda talio! Kune kun rafinitaj pensoj kaj kulturita parolmaniero, tamen simpla, ne-snoba, aŭtenta! Kaj ŝiaj manoj! Ŝiaj etaj fotindaj, kisindaj manetoj, kiel tenerige ili iras al la haroj, kiel am-veke ili taŭzas la senkomparajn buklojn! Ami tian homan juvelon estas honoro, kaj li ricevis ĝin tute simple, senmerite, kiel donacon ĉielan! Li ne plendu: li estas la plej feliĉa el la homoj.

Ju pli li pensis pri ŝi, des pli li entuziasmiĝis, kaj li estis tute ekzaltita, kiam oni sonorigis ĉe la pordo.

“Sinjoro Sulavi, ĉu ne?” diris la viro, kiu staris tie. “Jano Karal, el la polico, ĉu mi povus babili momenton kun vi?”

*

Karal eniris. Estis tipe fraŭleca loĝejo. Multaj revuoj kaj gazetoj kuŝis stake sur la tablo kaj sur du malgrandaj tabletoj. La vitroj ne estis tre puraj. Tamen tute ne estis kompleta ĥaoso kiel en la lignodomo de la pentristo ĉe Rafunja, nur sentebla manko de regula ordigado. Cetere la simple meblita loko havis ĉarman varman etoson, al kiu ne malmulte kontribuis la situo tuj subtegmenta, kun kliniĝanta plafono.

“Fizike simpatia”, diris al si Karal, dum li unurigarde mensnotis la malfermitan skotdesegnan ĉemizon kaj la grizan perfekte gladitan pantalonon, sub kiuj atleta korpo diveniĝis.

Estas vizaĝoj, kiuj prezentas sin kiel maskon de tragedio. Ne tiel ĉe Roberto Sulavi. Persono kelke sagaca vidanta lin unufoje tuj divenis, ke li estis la amata ido de amantaj gepatroj, kaj, informite pri lia infaneco, ne miris pri la fakto, ke reklamagentejo siatempe vidis en li tian

perfektan tipon de beba bonfarto, ke ĝi volis foti lin por afiŝo pri pulvora lakto, senkonsidere pri tio, ke lin malavare nutris natura lakto patrina. Bob efektive travivis infanecon en etoso de varma familia harmonio, kio establis lian personecan disvolviĝon sur la fundamento de plena psika sekureco; ĉar la hejmo tamen spertis sufiĉe da baldaŭ solvitaj konfliktoj, li sciis ankaŭ, ke alfrontiĝoj prezentas per si normalan aspekton de la vivo, kaj li neniam hezitis lukti, se necese.

Tiel formiĝis sentima, eĉ maltima karaktero. Bob ŝatis aventurojn, kaj la ideo, ke risko povus esti evitinda, neniam trafis lin. Kiel maltima, tiel malavara li estis. Liaj amikoj alte taksis lian senrezervan donemon. Fakte se io mankis al tiu cetere tre ŝatinda viro, tio verŝajne estis, ke vivo tro facila ankoraŭ ne havigis al li tiun animan profundecon, kiun nur sufero povas naski.

Li invitis la policanon sidi en brakŝego, iom tiklis sian nazon, kaj, sulkante la frunton, prononcis:

“Vi igas min ege scivola. Per kio mi povas helpi al la polico?”

“Mi enketas pri la morto de Rik Ospaci...”

“Mi lin tute ne konis”, interrompis Sulavi.

“Sed vi eble scias, kion oni diris pri la radio liarilate.”

“Ne. Kiel la radio povus rilati kun li? Ni intervjuis lin unufoje. Aranĝis mi la aferon. Sed krom tio...”

“Nu, oni plendis, ke la radio ne estas simpatia, kaj ne donas al lia politika kampanjo tiom da spaco, kiom al la tradiciaj partioj.”

“Ĉu vere tion oni diras? Pardonu, mi ne sciis. Mi konfesu, ke mi fariĝis iom cinika koncerne la komentojn pri radioprogramado. Kion ajn mi faru, homoj malkontentas. Mi delonge rezignis la ideon plaĉi al la tuta publiko. Mi provas plaĉi al la plimulto, kaj eĉ ne la tutan tempon. Mia devo ankaŭ estas eduki, ĉu ne? Kaj tiu afero pri eksterteranoj ne ŝajnis al mi sufiĉe serioza, por ke mi dediĉu pli da spaco al ĝi. Fortigi la neraciajn sopirojn de la amasoj ne respondas al mia maniero koncepti mian profesion devon.”

Diskutinda afero, taksis Karal, kiu demandis al Sulavi, kie li troviĝis, kiam Ospaci mortis. Bob Sulavi montris miran esprimon, kiu tuj transformiĝis al rideto.

“Ĉu vi min suspektas?” li demandis. “Estas mia unua kontakto kun polico sed ĝiaj metodoj min ege mirigas. Ĉu vi iras kiel fiŝkaptisto por fiŝi, prezentante la hokon ie hazarde kun la espero, ke foje unu fiŝo kaptiĝos? Kial vi min suspektas?”

“Kaj kial vi ne respondas al mia demando?” Jano rebatis.

“Pro surpriziĝo, sinjoro, pure-nure pro surpriziĝo. Atendu, ke mi nun memoru. En la nokto de la 19-a al la 20-a, vi diris. Nu, dum la tago mi estis en Valĉefa kaj laboris kiel ĉiutage en la radio.”

“Kaj vespere?”

“Vespere? Mi revenis hejmen, faris al mi manĝon, iom rigardis la televidon. Sed mi ne ŝatas televidon. Ili neniam sukcesas fari tiel bonajn programojn kiel ni ĉe la radio. Poste mi legis.”

“Ĉu iu povus tion konfirmi?”

“Certe ne. Aŭ ĉu eble la loĝantoj de la ĉi-suba etaĝo? Eble ili aŭdis min aŭ vidis min reveni...”

“Dankon, mi kontrolos, se fariĝos necese.”

“Sed vi ne parolas serioze, ĉu? Permesu, ke mi redemandu. Kial vi suspektus min?”

“Pro ĉi tio”, la policano diris, tirante el la poŝo fotokopion de la ĉantaĝa letero trovita ĉe Ospaci, kaj streĉe rigardante sian kunparolanton. Sed ĉi ties vizaĝo nenion esprimis.

“Vi havus motivon, ĉu ne?” Karal aldonis.

La alia ridis.

“Mi havus motivon, se tiu letero min koncernus. Sed tiel ne estas. Mi efektive ricevis ĝin, sed mi ĝin ne komprenis. Se iu volas publikigi, ke Legantula Plezuro estas CIA-eldonaĵo, al mi estas egale, li faru laŭplaĉe. Kial tio rilatus kun mi? La tuta afero estas frenezaĵo, kio konfirmis al mi, ke Rik Ospaci ne estas mense sana. Li verŝajne konfuzis min kun iu alia. Supozeble, li agis surbaze de iu onidiro sen rilato kun la vér.”

“Efektive, efektive,” Karal prononcis kun trankviliga tono, “mi ne diras, ke la polico opinias vin kulpa. Ni nur informiĝas, kiel estas nia devo, ĉu ne? Sed unu plia demando min tiklas: kial vi ne plendis ĉe la polico?”

“Ĉar tiu letero estis senbaza”, li respondis. “Se oni devus plendi pri ĉia freneza letero, kiun oni ricevas... Ni, ĉe la radio...”

“Ne, ne pri tio mi parolas. Pri la ŝtelo.”

“Ŝtelo? Kiu ŝtelo?”

“Ĉu vere vi ne komprenas? La dokumenton...”

“Kiun dokumenton?”

“Estas nekonsilinde mensogi, sinjoro. Se vi diras la veron pri tiu punkto, kiun ni konas, nu, bone. Se ne, ni emos suspekti vin pri ĉio. Oni ŝtelis de vi dokumenton, kaj vi akuzis pri la ŝtelo junulon, kiun vi minacis...”

“...kaj kiu redonis, kio pruvas, ke li ŝtelis, ĉu ne? Jes, pardonu. Ial, kiam vi parolis pri ŝtelo, mi pensis pri mono, objekto, io simila. Mi tute forgesis pri tiu dokumento. Efektive, oni prenis de mi tiujn paperojn en la parka restoracio. Mi tie vidis junulon, kiu iom amatore estis provinta ŝanĝi sian aspekton, kaj kiu antaŭe kaptis alian parton de la sama dokumento. Mi provis scii, kiu li estas. Bona hazardo helpis: mi foje vidis lin surstrate, kaj lin sekvis al lia hejmo.”

“Vi ne diras, ke ankaŭ vi komence ŝtelis tiun foliaron ĉe la fotokopia maŝino de...”

“Ŝtelis? Tute ne estis ŝtelo. Ĝin fotokopiis mia amikino Veronika Munzo. Ŝi tie svenis, kaj mi provis savi la paperojn por ŝi.”

“Ĉu f-ino Munzo estas amikino via?” Karal demandis kun evidenta dubo.

“Ho jes, ŝi estis ĉi tie antaŭ nur kelkaj minutoj. Ĉu vi ne vidis ŝin alvenante? Belega knabino, kun delikata vizaĝeto, perfekta korpo, rideto anĝela, kaj harbukloj, bukloj, bukloj...” Li paŭzis. “Bukloj, kiuj defias vortan esprimon.”

Li aspektis tiel naiva, tiel infana en sia lirikeco, ke Karal konfuziĝis. Estis malfacile dubi lian sinceron, aŭ oni devis atribui al li neoftan aktoran talenton. Sed se li sinceris, lia ĵusa diro kaŭzis perturbon en reto de rilatoj relative klaraj, laŭ kiuj Veronika estis politika malamikino de Bob.

Ĉi-lastata, kiu atente observis Janon, sentis, ke estas oportune ekspluati sian nunan avantaĝon:

“Ŝi konfirmos tion al vi, se vi ĉiam bezonas konfirmojn”, li diris. “Hieraŭ mi vespermanĝis kun ŝi en la restoracio Ĉe Aldo. Hodiaŭ ni tagmanĝis kune ĉe La Kuko kun Suko.”

“Kio estis tiu dokumento?”

“Mi supozas, ke mi rajtus rifuzi respondi al tia nediskreta demando, kiu neniel rilatas kun enketo pri akcidenta morto, sed mi povas diri al vi, ke estas politika dokumento, kiun mi opinias tre grava, kaj kiun tiu junulo ne rajtis forpreni.”

“Sed ĉu estis prave direkti al li minacojn por ĝin reakiri?”

“Nu, nu, ni ne troigu. Mi provis persvadi lin per normalaj argumentoj, kaj tio ne sukcesis. Tiam mi pensis: nun mi agos per la junula ŝato al eksterteranoj kaj al spionromana atmosfero.”

Finfine ĝi efikis. Bedaŭrinde, mi neniam scios, kial tiu junulo interesiĝis pri tiuj paperoj. Ĉu komunisto, eble? Jes, povus esti komunisto. Sed mia timigo efikis!”

Li ridis belan blankdentan ridon.

“Vi ne respondis mian demandon: kial vi ne plendis al la polico?”

“Pro tre simpla kaŭzo: mi pensis, ke la polico ne kredos min.”

“Lertulo!” Jano pensis. Li aspektas naive, sed rapide trovas manieron elturniĝi el ĉiu tikla demando, kaj lia vizaĝo neniam montras esprimŝanĝon.

Nesciante, kion plu demandi, li adiaŭis la radioprogramiston, ne tre kontenta pri si. La rivelado pri amikeco inter Bob Sulavi kaj Veronika Munzo konfuzis la tutan ĝistiaman faktaron. Li sin demandis, kion la homoj el la kontraŭspiona servo pri tio opinios.

Jano havis la impreson troviĝi en abelujo atakata de bando da maŝinpafistoj. Abelujo, ĉar homoj rapidis ĉiudirekte, ne sencele – la tuta agitado aperis racia, sed laŭ movreguloj, kiujn penetri fremdulo ne povus. Maŝinpafe atakata, ĉar la taktaktak de skribmaŝinoj kreis konstantan fonon de takta klaka bruo. Tie produktiĝis la fama Vespera Folio.

La pompa grandulo, kiu staris antaŭ li, prenis la telefonon.

“Georgo?” li bojis, kaj post kelkaj sonoj nekompreneblaj al Karal, li aldonis: “Mi foriras por urĝa afero. Kluben. Se estas ia farenada decido, faru ĝin laŭ via plej bona juĝo.” Li turnis sin al la policano.

“Jen, la afero estas aranĝita. Mi veturigos vin, se vi konsentas. Ĉi tie oni konstante interrompus, kaj hejme...” Li signife levis la ŝultrojn, kvazaŭ Karal nepre devus scii, kial ili ne estus trankvilaj liadome.

Li estis eĉ pli altkreska ol Sulavi, sed laŭ tute alia tipo. Lia grandeco staris ĉe la limo de normaleco, fakte. Impresis, kvazaŭ io patologia okazis en lia hormona sistemo, kaj li apenaŭ ne fariĝis giganto cirke montrinda. La korpo de Sulavi sugestis efikecon: oni sentis ĝin fleksebla, rapidmova, kapabla fulmsendi pugnon al celata makzelo, dum la figuro de Oskaro Kolombét elvokis al Jano monstran idon de buldozo kaj buldogino preta sen multaj skrupuloj surtreti vin plata. Sed en liaj etaj okuloj inteligento brilis.

Fakte, la plej rimarkinda kvalito de Kolombét estis lia inteligenteco. Tiu restis viva kaj vigla, post kiam multaj el liaj plej ŝatindaj trajtoj iom post iom malakutiĝis. Li komencis en la kariero ĵurnalista kun la entuziasmo de juna idealisto; tiutempe li taksis plej alte ol ion ajn honestecon kaj sincerecon, kiuj ĉe li ofte manifestiĝis sub iom tro kruda formo. Sed li ne toleris malaltan lokon en hierarkio, nek mizeran salajron, kaj li baldaŭ komprenis, ke tiuj ambicioj ne kongruas kun akra verdiremo. Tiel venis unua kompromiso kun liaj principoj, poste dua, sekvata de tria, ĝis iutage li morale demisiis. Li pli malpli komplete rezignis siajn idealojn, kaj fariĝis cinika. Li emis limigi siajn strebojn al ĝuado, jen de la bonaj ofertaĵoj de l' vivo – kaj same frandemo kiel seksaj plezuroj invadis pli kaj pli la terenon de liaj priokupoj – jen de la sento regi: estri sian dungitaron estis por li fonto de preskaŭ fizika ĝuo, kaj ankaŭ el la manipulado de la publikopinio li ĉerpis la volupton de bongusta potenco. Ne ofte li profundiĝis en si, sed kiam tio de tempo al tempo okazis, li trovis en tiu memrigardo nur motivojn naŭzi sin. Kio finfine pruvis, ke la funda idealismo ne tiel komplete forputris, kiel li mem inklinus pensi.

Ili veturis senvorte. La gazetestro stiris rapide kaj bone. Ili laŭiris Tjazon direkte al Valmu tra kamparo okulkaresa, ĝis ili turnis al flanka mallarĝa vojo kaj atingis konstruaĵon impone starantan meze de arte aranĝita parko. Post kelkaj minutoj, ili sidis en plaĉa, ne tre granda,

saloneto sendube ĝenerale uzata por kunsidoj de eta komitato.

“Pri Rik Ospaci vi volas babili, ĉu ne?” Kolombét demandis per voĉo, kiu pensigis Janon pri la mallaŭta ronko de leono. La detektivo nur kapjesis.

“Kion mi diru?” la alia prononcis preskaŭ grumble, kaj li faris geston kvazaŭ por forpeli neekzistantan muŝon. “Li metis min en neelteneblan pozicion, kaj tion mi ne ŝatis.” Li paŭzis kaj ĝemspiris, kvazaŭ la tuta afero lin ege ĝenus.

“Mi ne estas timema homo,” li diris plu, “sed mi preskaŭ timas, kion mi devas diri al vi. Ne estas en mia intereso kaŝi ĝin, tamen oni povus vidi en ĝi perfektan motivon por krimo.”

Jano streĉis la atenton, sed restis silenta.

“Rik Ospaci estis unu el miaj plej bonaj ĵurnalistoj, kiel vi certe scias. Li faris tre interesajn enketojn. Li aperis al la publiko kiel justulo, speco de heroo, kiu ne hezitas diri la veron pri potenculoj, riveli maljustaĵojn, agi sociame. Por li, ĵurnalismo estis grava socia respondeco, kiun li prenis tre serioze. Ĉu vi konsentas?”

“Jes. Mi memoras kelkajn el liaj artikolserioj, ekz-e pri la malliberejoj, aŭ pri psikiatrio. Ili estis tre interesaj, sed certe al multaj ne plaĉis.”

“Prave. Li estis valoro por la gazeto. Ni ŝuldas al li kreskon de la eldonnombro. Tial estas domaĝe...” Li eksilentis, kaj liaj grasaj vizaĝmuskoloj streĉiĝis kaj malstreĉiĝis buldoge.

“...ke vi devis lin maldungi”, Karal frazfinis.

“Jes. Se vi memoras, la unua enketo pri eksterteranoj estis simpla sintezo de tio, kion multaj homoj asertis. Li prezentis la opinion de parto el la loĝantaro kun faktoj pensostimulaj. Oni sentis, ke li simpatias al tiuj ideoj, sed nenion pli. Poste, kiam li presigis la raporton pri sia propra sperto, la malfacilaĵoj komenciĝis.”

“Kiu malfacilaĵoj?”

“Kun mia administra konsilantaro. Tiuj homoj furiozis. Ili diris, ke Ospaci ekspluatas sian popularecon por igi sin eĉ pli fama kaj semi en la mensojn danĝerajn ideojn. Ili petis min ne plu allasi artikolojn pri la persona ‘sperto’ de s-ro Ospaci. Kiam ĉi-lastata verkis plian tekston pri ĝi, mi postulis redukton, forstrekon de multaj diraĵoj, kaj kompletan ellason de ĉio, kio odoris je ‘persona atesto’. Estis lia vico furiozi.”

“Kion vi faris?”

“Kion mi povis fari? Mi provis pledi ĉe la administra konsilantaro, sed ties membroj ekscitiĝis kaj incitiĝis, kaj ne volis cedi. Mi diris al ili, ke se ili insistas, nia eldonnombro

falos, ke la publiko subtenos Ospacin, ke se li volus fondi rivalan gazeton, ĝi prenis de ni grandan parton de nia legantaro. Neniu argumento trafis. Ili diris: ‘Aŭ s-ro Ospaci ĉesos aperigi siajn artikolojn pri eksterteranoj, aŭ vi maldungos lin.’ Ili volis, ke la gazeto restu prestiĝa kaj bone konsiderata ankaŭ en sciencaj, intelektaj medioj. Mi provis montri al ili, ke Ospaci estis ĉiam tre rigora en sia argumentado, sed ili ne konsentis. Ili preskaŭ eksigis min, ĉar mi lin tro varme defendis.”

“Kial vi defendis lin tiel varme?” Karal demandis, pensante pri la ĉantaĝdosiero, kiun Ospaci kompilis pri sia estro.

“Mi jam diris al vi: li estis unu el niaj plej bonaj. Ne. Li estis la plej bona el nia tuta opo.”

“Kaj kiel li reagis, kiam vi klarigis al li la decidojn de via konsilantaro?”

Refoje Oskaro Kolombét faris per la makzelo maĉajn movojn, kiuj kuntiris liajn trajtojn kun plej stranga efekto.

“Li estis treege malkontenta. Li min minacis. Li diris, ke kadre de liaj laboroj por nia gazeto, li havis la okazon kolekti multajn informojn pri multaj personoj, inkluzive de mi, informojn, kiujn li povus diskonigi, se mi montriĝus malagraba.”

“Ĉu vi lin kredis?”

“Ho jes. Mi konis la ulon. Tio ne mirigis min. Mi komence diris al li, ke li blufas, nur por vidi, ĉu li parolas serioze. Sed li diris al mi kelkajn aferojn, kiuj efektive ege malutilus al mi, se ili iĝus konataj.”

“Mi komprenas.”

“Kion mi povis fari? La dilemo esti jena: se mi ne maldungos lin, mi perdos mian direktoran postenon, kaj mi ne povus riski trovi min senlabora ĝuste nun, miaaĝe; aliflanke, se mi eksigos lin, li rivelos pri mi aferojn, kiuj ĉiaokaze devigos min demisii... Mi konfesas, ke lia morto estis por mi nekredeble bonvena.”

“Mi dankas kaj gratulas pri via sincereco.”

“Estas laŭ mia intereso, kiel mi jam diris. Certe Rik havis dosieron pri mi, kaj vi nepre trovos ĝin. Vi facile scios la faktojn pri lia maldungo pridemandante la gazetan personaron. Ni gajnas tempon, se mi jam ĉion rakontas al vi.”

“Tamen mi dankas. Vi faciligas mian laboron. Diru: kie vi estis en la nokto de la 19-a al la 20-a de aprilo?”

Oskaro Kolombét faris grimacon.

“Ne estas agrable senti sin efektive suspektata, eĉ se racie oni komprenas la aferon, kaj antaŭvidis, ke tia demando necesos.” Li foliumis agendon.

“Mi faris nenion specialan”, li plu diris. “Mi laboris en la gazeta domo. La 19-an mi iris al teatro kun mia edzino – Peer Gynt. Je noktomezo mi estis hejme. Mi ludis iom violonĉelon, sed mi sentis min laca, kaj baldaŭ enlitiĝis. Mia edzino povos konfirmi, se vi nomas tion konfirmo. Mia kazo ne aperas tre brile favora al mi, ĉu?”

“Se vi faris nenion neleĝan, vi nenion riskas. Ni ne akuzas senpruve. Ĉi-stadie ni nur kolektas informojn, sen antaŭjuĝo.” Karal diris tion per neŭtra voĉo ne-sinengaĝa, sed li interne pensis: ‘Kaj krome via amdonantino enamiĝis al Rik Ospaci, se la informo de Joĉjo estas korekta. Duoblan motivon vi do havas.’ Sed tiun fakton li decidis ne mencii.

“Ĝoja! Vi! Dum jarcentoj mi ne vidis vin!”

“Monika! Kia surprizo! Kio fariĝas el vi?”

La edzino de Jano Karal kaj ŝia kunstudinto obstrukcis la kruvojn meze de la superbazaro, kie multaj homoj – ĉefe virinoj – puŝadis sian ĉareton de sekcio al sekcio, haltante tie kaj ĉi tie, farante jen kaj jen hezitan dancon, kvazaŭ abeloj flugantaj de floro al floro por elekti la plej taŭgan nektaron.

“Venu flanken,” la amikino diris, “ni ĝenas la pason”, kaj ambaŭ stiris sian ĉareton al pli trankvila angulo.

“Kiel fartas la revuo?” Ĝoja demandis.

“Bone, dankon, kvankam estus pli plaĉe, se vi kelkfoje sendus al ni artikolon.”

“Artikolon, artikolon... Jam de post la universitato mi neniam plu faris esploron. Pri kio mi povus verki?”

“Multbuŝa famo rakontis al mi, ke vi sekvas de proksime plej diversajn krim-aferojn, kun via edzo. Kial ne pri tio?”

“Ne, ne. Mi ne ŝatas verki, kaj mi ne sentas min kompetenta. Krome, via revuo malofte pritraktas krimologion.”

“Efektive. Sed renkonti vin donas al mi ideon: mi proponos tiun temon al la venonta redakta komitato.”

“Ĉu baldaŭ aperos unu el la unutemaj numeroj? Tiujn mi tre ŝatas. Mi trovas ilin tre stimulaĵoj por la menso.”

“Jes, ni pretigas numeron pri la psikologio de arto. Arta kreado, ktp. Sed ni ankoraŭ ne sukcesis rikolti sufiĉe da materialo por plenumi tutan numeron. Ĉu vi ne havas kaŝitan artistan talenton, kiun mi povus analizi? Aŭ ĉu la arto solvi krimajn misterojn... Ne, tion ni konservu por la sekvanta unutema numero. Sed se vi konas iun, kiu povus kontribui, memoru min!”

“Mi ne forgesos, sed ne kalkulu je ĝi, ĉar kun artismaj medioj mi tute ne rilatas.”

“Aŭskultu, Ĝoja, mi bedaŭrinde ne havas tempon nun, sed ni nepre devas revidi unu la alian. Mi telefonos al vi. Ĉu vi promesas, ke vi vizitos min?” Kaj ŝi ekstiris la ĉareton for.

Nur post kiam ŝi malaperis Ĝoja havis la ideon.

*

“Izabela?”

“Jes”, respondis la agrabla voĉo en la telefonon.

“Parolas Ĝoja Karal. Ne diru al mia edzo.”

“Konsentite. Kial la mistero?”

“Nu, mi havas ideon, sed mi preferus, ke estu kompleta surprizo por li.”

“Kiel mi povas helpi?” demandis la referencistino/dokumentistino de la valĉefa ĉefpolicejo.

“Mi ĵus ricevis taŭgan pretekston por enketi pri tiu pentristo, kiu havas izolitan dometon ĉe Rafunja. Mi ne scias, ĉu li gravas por la enketo, sed nun, kiam mi havas pretekston, estus stulte ne uzi ĝin, ĉu ne? Sed mi ne scias, kiun aliri por informiĝi pri li. Eble mi vizitos lin mem, sed unue mi ŝatus kolekti sciojn pri li ĉe iu alia. Kiun vi sugestus?”

“Lasu min serĉi. Mi revokos vin post kelka tempo. Ĉu bone?”

“Kompreneble, dankon, Izabela. Kaj, mi petas vin, mutu pri tio al Jano!”

*

“Ĝoja? Izabela ĉi tie. Ne estas ia ebleco heziti. Ŝi nomiĝas Laŭra Pergame. Pentra recenzistino. Estas ŝi, kiu konigis al la mondo la valoron de la verkoj de via pentristo Gido Verstrata. Ŝi verkis libron pri li. Videble ŝi estas unu el liaj malmultaj intimaj amikinoj. Ŝi...”

“Ne diru plu, sufiĉas, mi kuras intervjui ŝin. Dankegon, Izabela!”

“Ej! Ne forkuru sen scii la adreson. Ĉu vi havas ion por noti?”

*

‘Kiam mi estis dudekjara, tia sinteno min impresus’, Ĝoja pensis eksidante en la luksa salono de s-ino Pergame.

Tiu bela, altkreska virino kun la rigidaj nigraj haroj kaj la bluaj okuloj sin tenis reĝine. Ŝi rigardis, kvazaŭ ŝia kunparolantino estus mizera insekto, kaj al ŝia tono, kiam ŝi parolis, komplete mankis spontaneco. La okulojn Ĝoja trovis kalkulemaj, inteligentaj, sed ponarde malvarmaj. Ŝi surhavis blu-grizan tajlorkostumon ekstreme, sed diskrete, elegantan, kies

koston viro ne imagus, sed kiun Ĝoja tuj klasis inter la plej altprezajn.

“Mi intencas viziti s-ron Verstratan,” Ĝoja klarigis, “sed antaŭe mi tre ŝatus babili pri li kun vi. Vi ja konigis al la mondo lian arton, kaj...”

“Babili ne ŝajnas al mi tre taŭga vorto”, la alia diris malestime. “Granda artisto ne estas temo kiel la veterprognozo aŭ la lasta filmo multimiliondolara.”

“Nu, kiel vi volas. Helpu min lin koni, lin kompreni, se vi bonvolos. Mi estus tre danka”, Ĝoja diris senemocie.

“Lin kompreni! Kaj vi verkas por psikologia revuo? Oni vere dungas iun ajn niaepoke, por ia ajn laboro. Lin kompreni! Artiston oni ne povas kompreni, sinjorino, nur ami aŭ malami, adori aŭ abomeni... Kiel oni povus pretendi kompreni personecon tiel kompleksan?”

“Vi tamen povas helpi min iom scii, kiel li vivas, kiel li konsideras la pentroarton, ĉu estas aŭ ne konstanteco en lia inspiro...”

“Hm! Eventuale.”

“Ĉu li ĉiam vivas en tiu stranga kabano surmonte?”

“Ne. Li pasigas tie nur kelkajn monatojn ĉiujare. Tio efektive estas, kiam li havas inspiron. Li povas pentri nur tie. Se li sentas inspiron, li iras al sia kabano kaj pentras. Tie li estas certa, ke neniu ĝenos lin, interrompos lian laboron.” Ŝi rigardis Ĝojan serpente. “Aŭ venos lin intervjui.”

“Kaj kie li vivas la reston de la tempo?”

“Tie kaj tie ĉi. Li havas domon en Kastelomara, kie li ofte restadas. Sed ofte ankaŭ li iras al hotelo. Ekzemple, feliĉe por li, kiam okazis tiu tuta skandalo, ĉar iu havis la strangan ideon mortfali tie supre, li estis en Akvoviva. Mi scias, ĉar ankaŭ mi tie lin renkontis hazarde. Feliĉe, ke li ne havis inspiron tiutempe, ĉar se li estus en Rafunja, ĉu vi imagas? Ĵurnalistoj, policianoj, scivoluloj... Neniu lasus lin labori trankvile.”

“Li devas esti riĉa por havi domon en Kastelomara kaj restadi en Akvoviva hotele, ĉu ne?”

“Jes, li estas riĉa. Kompreneble li estas riĉa. Lia arto alportas al li multe da mono. Oni ŝatas liajn pentraĵojn kaj proponas sumegojn por ili. Bedaŭrinde!”

“Kial bedaŭrinde?”

Ŝi refoje rigardis Ĝojan kvazaŭ malbonodoran bestaĉon.

“Ĉar tiuj, kiuj aĉetas liajn ĉefverkojn, ilin ne ĝuas,” ŝi respondis, “ili ne komprenas ilin, ili aĉetas nur investe. Ne ĉiuj, feliĉe, sed mi timas, ke plimulto.”

“Ĉu vere?”

“Ho jes. Eble estas mia kulpo. Estas mi, kiu konigis lin al la publiko.”

“Efektive, vi estas tre fama, admirata kaj estimata artfakulino, kaj viaj artikoloj pri li signis por li komencon de nova epoko, ĉu ne?”

Ĝoja amuziĝis konstatante, kiom videble la flataj vortoj plezurigis ŝian kunparolantinon. Kiel infanaj plenkreskuloj ofte estas!

“Jes, li estis tute nekonata. Mi antaŭlonge konigis lin al la artaj medioj, sed ĉi tie en Sanktavallo neniu interesiĝis pri li. Nur antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi verkis indignan artikolon, en kiu mi diris, ke neniu respektas tiun grandan artiston ĉi tie, kaj jen la emiro de Ajn-Muĥra dediĉas duonmilionon al unu el liaj komponaĵoj, verŝajne por ĝin meti en sian kelon, ĉar lin interesas nur la investo, ne la arta aspekto, subite multaj sanktavalanoj malkovris, ke meritas atenton tiu loka pentristo, kiun ili ĝis tiam ignoris!”

“Tiu epoko li aranĝis ekspozicion, ĉu ne?”

“Jes, tiun iniciatis mi.”

“Kaj nun li famiĝis en Sanktavallo. Dank’ al vi.”

Ŝi ridetis memplaĉe.

“Jes, dank’ al mi. Li iĝis fama en Sanktavallo, kiel ankaŭ dank’ al mi li iĝis fama en la tuta mondo. Mi verkis multajn artikolojn pri li en multaj lingvoj por multaj fakaj revuoj. Sed bedaŭrinde tiu famiĝo kaŭzis altigon de la prezoj. Kiam li foje eksciis, ke pentraĵon, kiun li vendis je minimuma prezo, iu revendis eksterlande je prezo centobla – ĉu vi aŭdas min? centobla – tiam li furiozis kaj mem ekvendis je similaj prezoj.”

“Terure!”

“Jes. Komence, mi tre ĝojis. Mi pensis, ke finfine oni rekonas la valoron de lia talento. Kiom mi eraris! Kelkaj artkonantoj efektive komprenis tiun valoron, sed ili ne povis aĉeti. La aliaj vidis nur, ke de jaro al jaro la prezoj de liaj verkoj altiĝas, kaj ili aĉetis investe! Kia dekadenca epoko!”

“Naŭze!”

Ŝi kontemplantis Ĝojan minuteton kvazaŭ mirante, ke tia mizera insekto kapablas havi

civilizitajn sentojn. “Naŭze,” ŝi eĥis, “naŭze estas, efektive.”

Ĝoja sentis, ke ŝi ŝtupis iom supren sur la estimskalo de la eleganta snobulino. Necesis profiti de tiu taŭga pozicio, verŝajne ne daŭranta.

“Ĉu vi opinias, ke li konsentus akcepti min kaj respondi al kelkaj demandoj por nia revuo?” ŝi prononcis, kaj bum!, tuj evidentis al ŝi, ke ŝi refalis sub nulon.

“Mia kara,” la alia respondis kun ege afekta elparolo, “kiam li estas en sia kabano, li laboras. Li pentras. Li verkas. Ĉu decus interrompi artiston, dum la krea febro lin tenas? Ne, ne. Vi havas eĉ ne ŝanceton. Li forpelas kolere ĉian vizitanton.” Kaj ŝi aldonis post paŭzo, kvazaŭ lastan ŝtonon por forkurigi la hundaĉon pli rapide: “Eĉ psikoĵurnalistojn.”

Antaŭ momento Ĝoja faris demandon, ĉar ŝi havis la impreson, ke la artfakulino ŝin iom pli akceptas; nun ŝi prezentis demandon pro mala kaŭzo: ŝi sentis sin tiel neniigita en la juĝo de la alia, ke ŝi povis diri plej strangajn aferojn, Laŭra Pergame ne plu miros.

“Kion li opinias pri tiuj eksterteranoj?” ŝi demandis.

Kontraŭ ĉia probableco, la virino prenis la demandon tute serioze:

“Fakte, li firme kredas, ke ili alteriĝas sur la rafunja ebenaĵo. Mi scias, ĉar li pentris unu el iliaj kosmoŝipoj. Mi foje miris pri pentraĵo, kiun mi vidis ĉe li, kaj kiu tute malsimilis lian kutiman manieron. Li diris al mi: ‘En tia maŝino ili traflugas la spacon’, kaj mi tiam eksciis, ke li ilin vidis. Mia opinio ŝanĝiĝis tiutage. Antaŭe mi trovis tion freneza, sed kiam mi vidis, ke tia geniulo, kiu kun mi ĉiam sinceras (li konsideras, ke li havas grandan dankŝuldon al mi, ĉar pro mi li iĝis riĉa)... ke tia geniulo ne havas dubon pri ilia alveno, mi sciis, ke mi eraris antaŭe.”

“Sed ĉu artisto ne havas precize tian rigardon al la mondo, ke pli ol iu alia li kapablas kredi je fantaziaĵoj?”

Ŝi direktis al Ĝoja la ponardon de siaj okuloj, sed videble ŝi kaŝe koleris pri tio, ke ŝiaj jupiteraj rigardoj Ĝojan tute ne impresas.

“Ĉar por vi, kiu volas verki artikolojn pri la psikologio de arta kreado, artisto estas frenezulo, ĉu ne? Haluciniĝas, plej certe?” Ŝia voĉo sarkasme acidis. Ŝi aldonis, sible:

“Mi pensas, ke ne valoras daŭrigi ĉi tiun konversacion, sinjorino, mi ne havas tempon por perdi kun personoj, kiuj videble nenion komprenas pri arto.” Kaj ŝi stariĝis rigide, kun superula rigardo al Ĝoja.

Pro la nura plezuro montri, ke tia sinteno ne imponas al ŝi, Ĝoja restis side dum minuteto, kvankam ŝia gastigantino – se oni povas uzi tian vorton – okule ordonis al ŝi levi sin. Kiam

Ĝoja fine ekstaris, ŝi turnis al Laŭra Pergame radian rideton, kiu konstateble ne plaĉis.

“Havu bonan tagon”, ŝi diris. “Mi tre dankas pri via afabla kaj informa akcepto.” Kaj kun reĝina digno ŝi eliris.

‘Al patrokuzidoj povas manki takto’, pensis Joĉjo, furioza, ke Stefano ne foriras, kaj sopiranta al plaĉa ge-soleco.

‘Al patrokuzidoj povas manki gusto’, pensis Stefano, rigardante la kompaktan virinon, kiu vekas en la joĉja koro tiom da fervor kaj favoro.

‘Al junuloj povas manki takto...’ pensis Lizabeta, kiu ne ŝatis la videblan deziron de Stefano elpumpi el ŝi ĉion eĉ plej privatan pri ŝia antaŭa rilato kun Rik.

‘...kaj gusto’, ŝi plu pensis, sin demandante, kial afabla kaj kara junulo kiel Joĉjo asociiĝis kun tia sentaŭgulo kiel ĉi tiu knabo, kiu opinias sin pravigita ludi esplorjuĝiston.

“Kiel vi konatiĝis kun Ospaci?” demandis Stefano, kiu decidis tiri el ŝi kiom eble plej multe da sciindaj detaloj (el homo, kiu persone konis la viktimon, oni elpremu la tutan informan sukcon, ĉu ne?).

“Mi aŭdis lin ĉe la radio, foje,” ŝi respondis, “kaj ŝajnis al mi, ke la intervjuanto ne estas justa. Tiu parolis kun aŭdebla malestimo. Mi ne ŝatas homojn kun antaŭjuĝoj, kiel tiu radioparolanto. Kiel li povus scii, ĉu eksterteranoj venis aŭ ne? Kontraste, Rik aperis al mi sincera.”

“Multaj homoj aperas sinceraj, kiam ili mensogas”, diris Stefano incite.

“Ne al mi”, ŝi emfaze prononcis. “Mia tuta sekretaria kariero...” Ŝi paŭzis, rimarkante la maljunigan efikon de tiu esprimo. “...kvankam vere ne tre longa, tamen komplete disvolviĝis en jurista medio. Antaŭ ol ĉe la nuna notario mi oficis ĉe advokato. En similaj oficejoj oni vidas multajn mensogantojn, kaj lernas ilin distingi. Sed ke Rik estas sincera, mi ne konkludis tuj. Tiun unuan impreson mi volis kontroli. Mi do iris al unu el liaj prelegoj...” Ŝi haltis denove.

“Kaj tie vi vin demandis, ĉu li ne estas simple bonega aktoro, ĉu ne?, mia kara”, Joĉjo intervenis.

“Tute ĝuste, karulo, tute ĝuste”, ŝi aprobis direktante al li mielajn okulojn. “Tiu penso min trafis, kaj mi decidis, ke por fari al mi fidindan opinion, mi devas paroli kun li vizaĝ-al-vizaĝe. Sekve, post unu el liaj paroladoj, mi iris diskuti kun li. Tiel ni konatiĝis.”

“Kaj ĉu via opinio ŝanĝiĝis?” scivolis Stefano.

“Ne. Ju pli mi konis lin, des pli sincera mi lin trovis.”

“Devis esti por vi ega ŝoko, kiam vi eksciis pri lia morto!”

“Kompreneble, kvankam, ial, ĝi ne tute surprizis min. Ekde kiam mi ekkonis Rikon, mi sentis ion neordinaran en li, ion, kio povus voki krimon. Estas malfacile precizigi. Eble li estis tro kuraĝa. Ĉu vi memoras, kiam li estis ĵurnalisto, kiom da veraĵoj li publikigis, kiuj ne plaĉis al la koncernatoj? Kaj ankaŭ rilate al la elkosmanoj li montris la saman kuraĝon, la saman kapablon riski la vivon, por ke la socio fartu pli bone.”

“Ĉu vi trovis lin aŭdaca en siaj rilatoj kun tiuj... kun tiuj estaĵoj?”

“Jes. Miaopinie li ne sufiĉe atentis la riskojn. Mi tion diris al li. Li rigardis tiujn estaĵojn nepre bonaj. Mi neniam sentis la saman konfidon. Kelkaj aferoj, kiujn li rakontis pri ili, al mi efikis terure.”

“Ĉu vere?”

“Jes. Ekzemple, ilia povo penetri nian vivon estas multe pli granda ol ni imagas...”

“Kion vi volas diri?” Joĉjo demandis.

“Mi ne povus rakonti, ĉar kiam Rik klarigis al mi, li uzis fakajn vortojn super mia klerecnivelo. Sed li klarigis al mi ilian sistemon informiĝi tre precize pri unu el ni. Li ricevis de ili tre interesajn informojn pri tiu s-ro Kolombet, kiu estris la gazeton, kie li laboris. Rik trovis tion amuza, sed al mi ĝi aspektis horore.”

Joĉjo okulis al la horloĝo, kaj direktis al Stefano rigardon signifoplenan, sed ne komprenatan de la juna kvazaŭ-detektivo. Lizabeta siaflanke komprenis.

“Ho, kiel malfrue jam estas!” ŝi ekkriis. “Pardonu min, mi nun devas foriri.” Ŝi stariĝis kaj okulumis al Joĉjo. Stefano sentis, ke estus senutile longigi la kunsidon. Ankaŭ li adiaŭis kaj foriris, sin demandante, kion onklo Karal opinios pri tiuj novaj detaloj. Tamen, io igis lin sin senti nekomforte. Funde de la cerbo kaŝludis kun li la ideo, ke ial Lizabeta moke, ruze, prifriponis lin.

*

“Jen. Mi rakontis al vi ĉion”, Jano diris al Ĝoja kaj Stefano, dum ili finis la bongustan vespermanĝon.

“Mi iras fari kafon,” Ĝoja anoncis, aldonante: “kaj poste mi faros mian raporton.”

“Pri kio?” la nevo demandis.

“Pri la gepatroj”, sonis ŝia voĉo el la tuj-apuda kuirejo.

Multajn altrangulojn en la polico tia kunveno surprizus, sed ĝi estis preskaŭ rutinaĵo en la

enketoj de Jano Karal. La viro, kiu staris tuj super Jano en la polica hierarkio – leŭtenanto Remon – sciis, ke Karal ĉiam raportas pri sia laboro al la edzino, kaj, kvankam tia familia interkonsiliĝo kontraŭas la regularon, li aprobis ĝin pro la simpla fakto, ke ĝi plej ofte montriĝis mirige efika. Ĝoja ja, kun psikologia trejniĝo, kiu – maloftaĵo – ne detruis ŝian naturan pripsikan intuon, sed ĝin akrigis, sciis kvazaŭ facilanime paroligi la homojn kaj milde konduki ilin al senpeziga transdono de siaj sekretoj. Krome, oni povis fidi, ke ŝi neniam perfidos polican konfidencan. Iom post iom, ankaŭ Stefano aldoniĝis al la paro. Pri tio Remon estis iom pli duba (kaj Karal neniam konfesis, kiagrade la nevo lin helpis en tiu aŭ alia enketo), sed li trovis la junulon tiel ŝatinda, ke li tamen preferis ne starigi al si demandojn pri lia kunlaboro: tiel li ne riskis atingi malplaĉajn respondojn.

“Jen la kafo!” alvenante ekkriis la edzino/onklino per la ĝoja voĉo, kiu vere pravigis ŝian nomon.

“Pri la gepatroj de Rik vi nun raportos, ĉu ne?” demandis Stefano.

“Jes. Eble tiuj informoj utilos al nenio”, ŝi respondis. “Tamen ĉiam estas bone scii kiel eble plej multe pri la viktimo, ĉu ne? Mi do vizitis la gepatrojn. Ili prezentas ne tre simpatian paron. La patro estas submastro en paperfabriko, viro preskaŭ 60-jara. Li aperas ĉiam grumbla. Ŝajnas, ke lia opinie lia filo estas monstro, kiun li neniam komprenis nek akceptis, kvazaŭ li dirus: ‘estas nekredeble, ke tian strangan idon produktis mi’. Li diris, ke ekde la naskiĝo lia filo aperis al li eksternormala, kio al li tute ne plaĉis.”

“Kaj kio pri la patrino?”

“La patrino montriĝis al mi obeema virino, inklina ĉiam submeti sin. Ŝi parolis pri la filo kun tremo en la voĉo. Ŝi rigardis lin plej inteligenta, brila, bona knabo. Mi pensas, ke tiu malsimila sinteno de la gepatroj koncerne la filon signas profundan malakordon inter ili. Sed ŝi vere amis kaj admiris sian filon. Por ŝi, li estis antaŭ ĉio la kuraĝa ĵurnalisto, kiu ne hezitis ataki komojn potencajn, se lia konscienco tion diktis.”

“Ĉu ili kredas je la eksterteranoj?”

“La patro ne, la patrino jes. Por li estas unu plua frenezaĵo, por ŝi pruvo pri tio, ke eĉ malproksime en la steloj oni agnoskis lian valoron.”

“Ĉu li havis gefratojn?”

“Ne. Li estis ilia sola infano.”

“Bone. Dankon, Ĝoja”, Karal diris kun la tono de prezidanto. “Nun mi ŝatus, ke ni revuu ĉiujn sciaĵojn, kiuj povas helpi nin meti ordon en ĉi tiun misteran enigmon.”

“Mistera enigmo! Kiajn belajn esprimojn vi trovas, Kara-Karal! Kvankam iuj sendube preferus: enigma mistero”, amikmoke komentis la nevo. Sed tuj li serioziĝis. “Kiujn materiajn trovaĵojn ni havas?” li demandis.

Karal ĝemspiris respondante:

“Bedaŭrinde preskaŭ nenium. Estas la aŭtospuroj, kiujn mi trovis tie supre. Sed ni havas nenium rimedon scii, kiam ili tie stampiĝis. La vetero estis seka dum tuta semajno. La veturiloj iris tien post la forta pluvo de la 17-a, ne tuj, ĉar se jes, la pneŭmatikaj spuroj estus iom malsamaj, videble la koto jam komencis sekiĝeti, sed mi ne povas diri kiam. Unu el la veturiloj estis la aŭto de Rik Ospaci, kiun ni retrovis malsupre, en Malpaz. Pri la alia ni scias nenion, krom ke ĝi iris tien post la 17-a de aprilo. Al kiu ĝi apartenas, ni ankoraŭ ne trovis. Ni komparis la muldaĵojn kun la pneŭmatikoj de la aŭtoj de ĉiuj personoj, kiujn ni konsideris ĝis nun, sed senrezulte.”

“Ĉu vi havas esperon trovi?” Ĝoja demandis.

“Honeste, ne. Estas tute ordinara pneŭmatiko – unu el la Firestone-serioj – kaj miloj da similaj ekzistas. La muldaĵo kompreneble rivelas trajtojn, kiuj ebligas identigon, sed kie serĉi? Ni provis pridemandi la loĝantojn plej proksimajn al la loko, de kie la vojo supreniras al Rafunja, sed ili ne estis atentintaj. De tempo al tempo aŭtomobiloj pasas, sed se ne estas io speciala por altiri ilian atenton, kial ili zorgus?”

“Tamen la polico nun certe scias, kiam Rik mortis, ĉu ne?” Stefano diris.

“Espereble jes, kvankam niaj ideoj ne estas tute firmaj. La polica kuracisto, kiu faris la nekropsion, taksas, ke la morto okazis la 19-an aŭ la 20-an de aprilo, plej verŝajne en la nokto lundmarda, sed pli precize li ne povas diri. La stomako de Rik estis malplena, sed ĉar ni ne scias, kiam okazis lia lasta manĝo, tio eĉ ne helpas elimini iun tempospacon. Juĝi laŭ la stato de la korpo ne estas facile post kelkaj tagoj, des pli ĉar ni tute ne scias, kia estis la aera temperaturo tie supre dum la koncerna periodo. Mikroklimato tre varias tiuloke, kaj kvankam oni povas taksi laŭ la aliaj meteorologiaj donitaĵoj, tamen restas divenado sen la vera certeco, kiun ni bezonus.”

“Ĉu vere vi ne havas pli precizajn metodojn?” miris la nevo.

“Ne”, la policano respondis. “Eble en Usono aŭ aliloke ili havas, sed ne ni. Feliĉe, komparante tiujn konkludojn kun la horloĝ-indikoj, ni atingas ion relative probablan. La brakhorloĝo de Rik kompreneble frakasiĝis, kiam li fale battrafis la rokojn. Ĝi montris kiel daton la 20-an kaj kiel horon la 01:49. Ni esperu, ke ĝi estis sufiĉe akurata, kaj ke neniu intence fuŝis ĝin.”

“Mi supozas,” Ĝoja intervenis, “ke en ĉi tia elektada periodo, la estro de nova partio havis

tutan programon: li certe devis prelegi, rendevui, kunveni...”

“Ankaŭ ĉi-rilate ni estas malfeliĉaj”, Karal plendis. “Post la kunveno de la 19-a, kiun ni ĉiuj ĉeestis, kaj post kiu vi, Stefano, iris al kafejo kun grupeto, kiu inkluzivis Ospacin, li antaŭvidis tri tagojn da ripozo, ĉar li sentis sin treege laca pro la streĉa vivo de la antaŭaj semajnoj. Estis proksimume meze de la politika kampanjo, ĉu ne? Li diris al siaj kunlaborantoj, ke li havas rendevuon kun la kosmanoj, kaj ke dum tri tagoj oni ne ĝenu lin: li volas ripozi, kaj ankaŭ en plena trankvileco verki la tekston de nova broŝuro. Tio kaŭzis, ke oni trovis lin tiel malfrue. Neniu zorgis pri lia malapero.”

“Kiu lin trovis?” demandis la edzino.

“Arbargardisto, aŭ pli ĝuste lia hundo. Se ne okazus, ke li vizitis ĝuste tiun lokon, Rik Ospaci povus kuŝi tie multe pli longe, kvankam ni sendube komencus lin serĉi jam en la sekvantaj tagoj.”

“Ĉu vi ricevis konfirmon de la alibioj?”

“Jes, aŭ ne. Ni havas kelkajn konfirmojn pri la vespero. Sed ĉiu el la suspektablaj povis veturi Rafunjan kaj reveni hejmen. Ĉiu el ili estis ĉi tie en Valĉefa tiutempe kaj ĉiu dormis siadome dum la koncerna nokto.”

“Unu ne estis en Valĉefa”, Ĝoja rimarkigis. “La pentristo Gido Verstrata feris en Akvoviva tiuperiode.”

“Prave, sed tio eliminis nur unu personon.”

“Restas do kiuj?” Stefano demandis. “Ni listigu ilin.”

“Bedaŭrinde,” diris Karal, “ni povas listigi nur tiujn, kiujn ni konas.”

“Onklo, onklo,” la junulo ekkriis, “kia genia rimarko! Vi meritis katedron en universitato pro tiu profunda penso!”

“Ĉesu sarkasmi, idioto...”

“La idioto ne estas mi.”

“Sufiĉe, mi petas. Mi volas diri ion vere gravan. Ni scias, ke Rik Ospaci ĉantaĝis, sed ni ne scias kiaamplekse. Ni trovis en lia apartamento fingrospurojn, kies posedantojn ni serĉas, sed ne trovis. Eble ili signifas nenion, ĉar tiajn fingropremojn oni ne povas dati. Sed eble la murdinto iris al la apartamento kaj forprenis akuzajn ĉantaĝ-uzablajn paperojn. Krome, eble Rik havis ie dokumentojn, kiujn ni ankoraŭ ne trovis, kiel li asertas en sia letero al Kolombét. Se li ĉantaĝis multajn personojn, li havas multajn malamikojn, kiuj certe dezirus lin sendi

inferen. El tiuj nur du estas al ni konataj: Roberto Sulavi kaj Oskaro Kolombét.”

“Ĉu estas verŝajne, ke li ĉantaĝis multajn?” prononcis la nevo.

“Kial ne? Ne forgesu, ke dum jaroj li estis ĵurnalisto, kiu indigne rivelis ĉiaspecajn nebelaĵojn el la vivo nialanda. Li havis apartan talenton kaj inklinon por eltrovi kaŝitajn krimojn.”

“Nu, ni esperas, ke ni fine trovos kompletan liston de viktimoj de lia ĉantaĝo. Aŭ eble ia cirkonstanco helpos. Sed ne faru al vi iluziojn. Ne ĉiujn krimulojn ni trovas. Kaj ĉi tiu morto havas multajn karakterizojn de la nesolveblaj.”

“Finfine, ni eĉ ne scias, ĉu entute estas krimo”, Ĝoja diris trankvile.

“Prave. Povas esti akcidento, eble kaŭzita de halucino, aŭ io simila.”

“Ĉu sinmortigo?” Stefano hipotezis.

“Tion oni ne povas ekskludi, kvankam tiu metodo ŝajnas aparte kruela. La ĉefa argumento kontraŭ memmortigo estas, ke li ne bezonis iri tiel malproksimen por salti de alte morten. Tion li povis fari en la urbo mem aŭ en tuja proksimaĵo. Tamen eble estus eraro atribui al li tre racian konduton.”

“Mi ne konsentas”, sonis la voĉo de Ĝoja. “Li estas multrilate tre racia persono. Por ĉantaĝi, necesas agi racie, kaj ial ŝajnas al mi, ke ĉantaĝisto ne taŭgas en la rolo de sinmortiganto.”

“Fakte,” Jano opiniis, “mi sentas same. Mi diris tion nur por kompleteco. Ke ni frontas al krimo, ŝajnas al mi pli probable. Sed kiun ni rigardu plej verŝajna krimulo, se ni akceptas la ‘murd’-hipotezon?”

“Oskaron Kolombét”, Stefano respondis. “Li havas duoblan motivon: Rik Ospaci lin ĉantaĝis, kaj samtempe forprenis de li la amatinon.”

“Ekzakte,” Ĝoja kapjesis, “kaj tiu ĉantaĝo estis speciale terura. Rik povis frakasi la karieron de Kolombét, kaj nek la aĝo nek la epoko estas oportunaj por rekomenci novan vivon. La minacoj de Ospaci certe povus kaŭzi panikon ĉe homo kiel tiu.”

“Ni do havas taŭgan motivon”, Karal aprobis. “Kion pri fizika ebleco?”

“Ne stariĝas armila problemo ĉi-afere”, diris Stefano. “Puŝi iun de sur la rafunja teraso malsupren ne estas aparte malfacile.”

“Nur necesas rendevui kun li en tia stranga loko”, Ĝoja komentis. “Sed tiu problemo prezentiĝas por iu ajn. Kiamaniere oni povis tien venigi Ospacin?”

“Renversu vian frazon kaj la solvo iĝas facila”, Karal diris. “Se Ospaci diris al iu: ‘Venu, mi pruvos al vi, ke eksterteranoj nin vizitas. Mi rendevuas kun ili ĉe Rafunja’, certe diversaj personoj akceptus iri vidi.”

“Jes, sen ia dubo”, respondis lia edzino. “Ĉu vi havis konfirmon pri la alibio de Kolombét?”

“La vorto alibio ne havas signifon en ĉi tiu enketo. Oskaro Kolombét havis la eblecon veturi al Rafunja, se la morto okazis mardon en la fruaj horoj. Li iris spekti Peer Gynt, kaj tiu prezentado finiĝis je la 11-a kaj duono. Oni bezonas maksimume unu horon kaj duono por aŭti de Valĉefa al Rafunja, kaj kolego Izidoro pridemandis s-inon Kolombét: ŝi ofte malbone dormas kaj kuracisto preskribis al ŝi dormigilon. Ŝi glutis ĝin tiun lundon, kaj tuj ekdormis. Krome, s-ro kaj s-ino Kolombét kuŝas ĉiu en aparta ĉambro. Li do povis rekonduki la edzinon hejmen post la teatro kaj rapidi al rendevuo kun Ospaci.”

Stefano ĝojvoĉis:

“Ni havas do materian eblecon kaj fortan motivon. Kion ni nun bezonas?”

“Pruvon,” la detektivo diris serioze, “pruvon, ke li ĝin faris, kaj pruvon, ke alia kun taŭga motivo kaj similaj eblecoj ne povas kulpi pri la murdo.”

“Kaj tion ni tute ne havas, male”, daŭrigis lia edzino. “Roberto Sulavi havis tiom da eblecoj: li ne povas pruvi, ke li estis hejme. Kaj li certe havas motivon.”

“Ĉu tiu motivo estas vere valida?” dube prononcis la junulo. “Se riveligis, ke Legantula Plezúr estas CIA-eldonaĵo, tio eble ne plaĉus al Sulavi, sed ne atingus lin persone. Ne estus lia kulpo, se Rik tion eksciis. Kaj ĉi-lasto ne ĉantaĝis pri io alia, ĉu?”

“Kiom ni scias, ne”, diris Karal. “Sed tiu revelo atencus gravajn interesojn de CIA, ĉar Legantula Plezuro havas eldonojn en pli ol 25 lingvoj, estas legata en la tuta mondo, kaj ofte montriĝis bonega maniero orienti aŭ manipuli la publikopinion. Ĉu la koncerna Agentejo vere hezitus antaŭ ol mortigi tiaokaze, mi ne scias. Krome, se Ospaci eksciis tion, li eble malkovris ankaŭ aliajn sekretojn, kies publikigon CIA abomenus.”

“Ni do ne povas ekskludi Sulavin aŭ eĉ alian CIA-agenton”, Stefano emfazis kun io bedaŭra en la voĉo. “Ĉu ni povas ekskludi lian rivalinon, la virinon kun la murfenda mono?”

“Eblecon ŝi havis,” respondis Ĝoja, “sed mi min demandas, ĉu ŝi estas fizike sufiĉe forta por puŝi Ospacin.”

“Estas malfacile diri”, parolis Karal. “Fakte, Ospaci estis malgranda. Kaj la misproporcio inter la brusto kaj la malfortikaj kruroj eble helpis ŝanceli lin.”

“Sed kiun motivon ŝi havas?” Stefano rimarkigis. “Laŭ la politikaj komentoj, kiuj aperas

gazetare, la voĉoj favoraj al Rik malfortigos nur la porokcidentan koalicion. Rik do agas favore al KGB, eĉ se tio ne estas lia intenco.”

“Jes”, la policano diris. “Sed ni scias, ke ŝi plurfoje parolis kun Ospaci. Fantazia hipotezo fojfoje min logas: imagu, ke krei la kosmanan partion decidis KGB, ĝuste por malfortigi siajn politikajn malamikojn. Imagu, ke la traktado okazis pere de Veronika Munzo. Se ŝi aŭ ŝiaj mastroj ne pensis, ke li estas ĉantaĝema, ili prenis sur sin egan riskon. Imagu, ke Ospaci postulis monon, minacante ke, se oni ĝin ne donos, li rakontos ĉion pri sia partio kaj Veronika al la kontraŭspiona servo...”

“Efektive,” Stefano diris post profunda spiro, “pro tiuj mondpolitikaj kaŝagadoj, ĉio estas fuŝita, ni ne plu povas rezoni kiel ĉe kutima enketo, ĉar ili disponas multe pli da materiaj rimedoj kaj eble havas malpli da skrupuloj ol ordinara individuo. Estas senesperige. Se al tio vi aldonus, ke Rik Ospaci havis komplikan aman aŭ seksan vivon...”

“Sed feliĉe tiel ne estas,” respondis Ĝoja, “li verŝajne estis unu el tiuj abstinemuloj ĉiufankaj: li ne trinkis alkoholaĵojn, ne fumis, ne manĝis viandon kaj ne havis seksan vivon.”

“Ĉu vere?” Al la junulo tio ŝajnis malfacile kredebla.

“Almenaŭ tion diris la gepatroj, kaj, konsentite, neniu pli blindas pri la seksa vivo de juna homo ol ties gepatroj”, Ĝoja klarigis. “Tamen, laŭ ili li neniam havis amatinon, ne interesiĝas pri la virinoj, ktp. Lia patrino substrekis tion al mi fiere, kvazaŭ ŝi dirus: ‘Admiru, kiel virta mia eta Rik estas’, kaj la patro diris la samon kun tute alia interpreto, kvazaŭ jene: ‘Vidu, kian nenormalan idon naskis mia edzino. Tridekjara, kaj kompleta ĉastulo!’ Tio lin evidente naŭzis.”

“Sed”, Stefano kritikis, “kiel vi ĵus diris, kion kredas la gepatroj, tio signifas nenion. Krome, li povus esti samseksemulo.”

“Ne”, Karal intervenis. “La polico kompreneble enketis pri tiuj aspektoj de lia vivo. Kiam iu mortis en suspektaj cirkonstancoj, ni sisteme informiĝas pri la amaferoj. Ni ricevis multajn konfirmojn de tio, kion Ĝoja ĵus diris. Li neniam havis amatinon, kaj preskaŭ tute certe ne estis samseksema, almenaŭ ne praktikanta. Se li havis sentimentalan aŭ seksan vivon, ĝi estis tute kaŝa, sed plej verŝajne estis nenio. Kamarado lia el la lernejoj jaroj eĉ diris, ke la tutan energion, kiun ordinarulo investas en tiun kampon, li dediĉis antaŭe al sia ĵurnalista agado, nun al la politika.”

“Dankon, dankon”, Stefano diris kun tono esprimanta senpeziĝon. “Tio almenaŭ simpligas la kazon. Sed kiu scias, ĉu li ne fariĝis la am-objekto de inoj el la kosmo, rivalaj inter si...”

“Mankis nur tio”, Karal ŝajnis koleron. “Se en nian komplikan suspektaron vi nun enŝovas etajn verdajn estaĵojn el alia mondo, mi perdos la malmulton da prudento, kiu restas al mi.”

“Kaj tamen ili estas faktoro, kiun multaj en la publiko prenas serioze”, Stefano rebatis. “Ekzemple, la barelforma homino, kiun via kuzido Joĉjo amkonkeris, kaj kiu rilatis persone kun Ospaci, rigardas ilin kapablaj je murdo. Se ni volas esti science objektivaj, ni ne rajtas preterlasi tiujn ulojn. Plie, ne forgesu, ke la sola persono, kiu loĝas en tiu malbenita Rafunja-regiono – la pentristo Gido Minesciaskiu – firme kredas je ilia ekzisto.”

“Kredas kaj ne kredas”, Jano respondis. “Li tute ne estas certa. Tion li diris al mi persone.”

“Sed s-ino Pergame, kiu, laŭŝajne, bone konas lin, parolis al mi pri tute firma konvinko”, asertis Ĝoja.

“Mi tre bedaŭrus, se kulpus eksterteranoj”, Stefano komentis. “Mi havas antaŭjuĝon favoran al ili. Estas simpatie, ĉu ne?, komisi teranon organizi la pacon ĉi-monde. Estus domaĝe, se simpatiaj estaĵoj respondecus pri murda apika faligo.”

“Se malsimpatieco devas esti la kriterio por ricevi la krimulan rolon en ĉi tiu afero, mi scias, kiun mi esperas kulpa”, Ĝoja sible vortis.

“Ĉu vere?”, “Kiun?” sonis samtempe du voĉoj.

“Tiun s-inon Pergamen, la artfakulinon. Mi provis resti egalanima kaj supraĵe sukcesis, sed fundfunde ŝi vekis miajn plej sovaĝajn vengĝ-instinktojn: mi plezure kolektus pri ŝi akuzan faktaron, en kiu ŝi kaptiĝus kiel muŝo en araneaj.” Kaj Ĝoja elmontris mienon tiel komike kruelan, ke ŝiaj edzo kaj nevo nur povis ridegi.

Bob Sulavi gratis al si la nazon. Li ne ŝatis kodi. Tamen kun multaj ĝemspiroj kaj naztuŝado li finfine sukcesis enkodigi jenan mesaĝon:

“La listo, pri kiu mi parolis, venas rekte el Ordo kaj Disciplín. Mi konatiĝis kun la junulino, kiu havas ĝin kaj verŝajne sukcesos akiri la ankoraŭ mankantan parton. Ŝi estas...”

Li ekhaltis, gratis al si la nazon, rigardis trafenestre al la pasantaj nuboj kaj direktis al ili beatan rideton, kiun ili ne meritis. Sed priskribi anĝelon neniuj kodo povas. Li forstrekis la vortojn “ŝi estas” kaj reverkis la tuton laŭ pli telegrafa stilo.

*

Kun harbuklo volvita ĉirkaŭ la maldekstra montrofinĝro, Veronika Munzo kodis:

“La CIA-agento Roberto Sulavi enamiĝis al mi. Mi estas certa, ke li estas perfekte sincera, kaj ke li ne imagas, ke mi laboras samkampe, sed malsamtendare. Li estas tiel naiva, ke sendube prezentiĝos okazoj ekspluati la situacion...”

Ŝi ne dubis, ke ŝi ricevos pozitivan reagon, sed la efektiva respondo de KGB ŝin tamen surprizis, tiom ĝi similis la konsilojn de la “korrubriko” en sentimentala bildperiodaĵo: “Flegu la rilaton, sed ne cedu tro rapide, por taŭge pliflamigi lin.”

*

“Sidiĝu, aŭskultu, kaj ĝuu la novaĵon”, basis leŭtenanto Remon.

Karal, miranta, eksidis.

“Vi plendis,” Remon daŭrigis, “ke via enketo pri Ospaci ne progresas. Ĝus okazis io, kio povus helpi.”

Jano streĉis la atenton, dum la leŭtenanto klarigis:

“Ĝu amiko de Rik Ospaci ĝus elmetis formalan plendon al la polico pri tio, ke oni ŝtelis ĉe li kofron, kiu apartenis al la viktimo, kaj kiu estis plena je dokumentoj.”

“Diable!” ekkriis Karal.

“Do plej saĝe estas, ke vi tuj iru tien. La amiko estas stranga ulo, nigrulo el la kariba insularo. Li ne loĝas ĝenerale en Valĉefa, sed ofte venas ĉi tien. Ĉambro estas daŭre rezervita por li en malnova domo eksterurbe. La kofro estis tie...”

La domo tuj plaĉis al Jano. Malnova domo, kun dikaj ŝtonmuroj, el la 17-a, parte eĉ eble el la 16-a jarcento. Ĝi staris meze de ĝardeno minimume prilaborata, kie naturo libervole sovaĝis.

La polica detektivo tiris la malnovstilan tirilon, kiu drate skuis, ie interne, etan sonorilon longe reeĥantan. Post ioma atendo la pordo malfermiĝis. Sur la sojlo aperis svelta virino eble tridekjara kun longaj haroj nepuraj, strikta eksblanka torstrikaĵo kaj bluĝinso lavita ĝis senkoloriĝo. La nebelan, sed iel simpatian, vizaĝon ornamis grandaj rondaj okulvitroj.

“Sinjoro...?” ŝi diris, kaj ŝia voĉo tintis agrable.

“Jano Karal, el la polico; mi venas rilate al la plendo de s-ro Pitizazo.”

“Ha jes! Maks estas ene, li tuj venos. Se vi bonvolos sekvi min...”

Li ŝin postpaŝis al sidĉambro ne tre bonstata. Sur tableto kuŝis ludiletoj, sur sofo gitaro, kaj aspektis, kvazaŭ neniu el la seĝoj havus kvar vere stabilajn piedojn. Laŭ ŝia invita gesto li eksidis en apogseĝon, en kiu li tiom profundiĝis, ke li timis baldaŭ tuŝi la plankon. Ŝi lasis la pordon malfermita kaj kriegis, laŭ melodio ne malsimila al la fama krio de Johnny Weissmuller en la Tarzan-filmserio: “Ma-aa-aa-aaks!”

Aŭdiĝis paŝoj ŝtupare, kaj sursojle montriĝis bela nigrahaŭta viro kun rektangula kapo, rektangulaj ŝultroj, iom ruĝaj okuloj kaj larĝa rideto, en kiu riveliĝis esprimo plej petola. La malhelgrizan, preskaŭ nigran pantalonon superis multefekte luma ĉemizo riĉe oranĝkolora. Karal gimnastikis stariĝe kun la malagrabra impresio, ke la brakseĝo disrompiĝos sub li.

“Polica detektivo Jano Karal”, li sin prezentis, dum la alia premis lian manon.

“Maks Pitizazo. Vi venas pro la ŝtelo, ĉu? Sidiĝu, mi petas.”

La policano tre singarde eksidis. La apogseĝo, li konstatis senpeziĝe, restis kunmetita. La gastiganto iom puŝis la gitaron por fari sidlokon sur la sofo. Li tiris al si la virinon, kiu eksidis sur lia femuro, dum li tenis ŝin ĉe-talie.

“Rakontu al mi, kio okazis”, Karal petis amikavoĉe.

“Nu, iu ŝtelis de mi kofron, kiu fakte apartenis al Rik.”

“Kia kofro estis?”

“Eble kofro ne estas la ĝusta vorto. Estas metala, sufiĉe fortika skatolo, ujo, afero...”

“Kiel granda?”

“Eble 35 x 30 x 30 centimetrojn, ĉu ne, Sonja?”

Ŝi kapjesis.

“Ĉiaokaze, temas pri metala ruĝkolora kofreto plena je dokumentoj. Rik lasis ĝin ĉi tie, ĉar li timis, ke iu foje enŝteliĝos en lian loĝejon kaj ĝin forprenos. Estis dokumentoj, kiujn li kolektis, dum li estis ĵurnalisto, konfidencaj aferoj pri multaj konataj personoj, li diris al mi. Li ne volis ilin detrui, sed ankaŭ ne volis riski, ke iu iam vidu ilin liahejme.”

“Ĉu la kofreto estis ŝlosita?”

“Jes, sed ankaŭ difektita, tiel ke ĝi facile malfermiĝis.” Ial, Jano havis la impreson, ke Maks Pitizazo mem ĝin difektis malfermita.

“Kial li konfidis ĝin al vi?”

“Verŝajne ĉar li pensis, ke neniuj scias, ke ni konas unu la alian. Krome, ne estus facile al rabisto enŝteliĝi en ĉi tiun domon.”

“Vi ne konstante loĝas en Valĉefa, ĉu? Ĉu vi ofte venas ĉi tien?”

“Dependas. Kelkfoje ofte, kelkfoje malofte. Ne sufiĉe ofte por vi, ĉu?, mia kara”, li diris al la kunulino ŝin kisante. Ambaŭ ridis.

“Kion vi faras profesie?”

“Mi estas muzikisto, ankaŭ kantisto.”

“Kaj vi loĝas kutime en...”

“Diversaj lokoj. Mi havas ses loĝlokojn: en Montekarlo, Londono, Los Angeles...”

“Kaj ses feliĉajn edzinojn”, interrompis la sveltulino kun tenera kareso.

“Ses edzinojn!” Karal ripetis mire. “Sed leĝe...”

“Ne leĝajn edzinojn”, la nigrulo klarigis. “Mi malkonsilas al vi leĝe edziĝi. Tio nur kaŭzas problemojn. Se vi volas foriri, vi devas pagi al eksedzino alimenton. Ne, ne. Mi estas kiel maristo: unu virin en ĉiu havén.”

“Li havas 10 infanojn”, la longharulino diris kun videbla, iom adora, fiero.

“Bela familio, ĉu ne?, mia kara”, li diris, kaj rekisis ŝin.

“Bonega familio, kiu bonege ĝuis la bonegan feston”, ŝi entuziasmis.

“Feston?” scivolis la policano.

“Mia naskiĝtaga festo, olda frato,” – kaj la anglaĵo, neniam uzata en Sanktavallo, impresis strange al Karal – “la ses kunedzinoj ĉeestis (permesu, ke mi nomu ilin edzinoj, por mi tio ili estas), kaj la dek infanoj. Ni vere bone amuziĝis.”

“Pardonu, se mi estas nediskreta, aŭ parolas ekster mia enketo, sed vi tiklas mian scideziron. Ĉu viaj... e... virinoj ne ĵaluzas inter si?”

“Tute ne, olda frato, tute ne. Ili estas bonaj amikinoj, ĉu ne, kara?”

“Jes”, la karulino diris. “Eble, se ni vivus kune, ni disputus, sed tiel... Ni ĉiuj egale kaj ege amas nian etan birdon, sed nia amo ne estas poseda.”

“Eta birdo”, klarigis Pitizazo, al kiu tiu priskribo absolute ne taŭgis, ĉar lia densa, fortika figuro elvokis pli virbovon ol birdon, eĉ grandan, “estas la signifo de mia nomo en la gepatra dialekto.”

“Ha!” diris Jano, kiu penis bildigi al si, kiel tiu domo aspektis dum la naskiĝtaga festo, kun tiu bela nigrulo ĉirkaŭata de ses malsamaj blankulinoj, ĉiu pli adorea ol la alia, kaj kun svarmo da infanoj kurantaj ĉialoken.

“Kiam vi konstatis, ke la kofro estas for?” li demandis.

“Hodiaŭ, nur hodiaŭ”, la karibano respondis. “Mi neniam speciale atentis ĝin.”

“Kaj kiam vi vidis ĝin lastfoje?”

“La tagon, kiam mi alvenis, t.e. du tagojn antaŭ la festo.”

“Ĉu vi estas certa?”

“Jes, ĉar mi tiam rimarkis, ke la kofreto malfermiĝas facile, kaj mi forprenis kelkajn aferojn el ĝi. Nun, kiam Rik estas morta, li ne plu povus pri tio furiozi, ĉu? Tial mi prenis faskon hazarde por vidi, el kio konsistas liaj laŭdire eksplodemaj arĥivoj.”

“Ĉu oni ŝtelis ankaŭ la dokumentojn, kiujn vi estis eltirinta?”

“Ne, la ŝtelinto certe ne rimarkis, ke mi forprenis ion. Mi ilin plu havas. Ĉu vi ilin deziras, olda frato mia?”

“Jes,” Karal respondis, “ili povos helpi al nia enketo.”

La eta birdo ekflugis el la ĉambro. Estis io tiel korsimpla, korvarma en la sinteno de tiu multedzina viro, ke Karal sentis, kvazaŭ ebrieco trafus lin. Li sidis eĉ ne dek du kilometrojn for de Valĉefa, sed ŝajnis al li, ke li troviĝas sur alia planedo. La valoroj kutime akceptitaj aliloke ne validis ĉi tie, kaj la detektivo ekpensis, ke ankaŭ la kripla brakseĝo estas plia humura detalo en la ĝenerala gaja atmosfero.

La bonhumora nigrulo baldaŭ revenis kaj transdonis al Karal dokumentujon plenan je paperoj kaj fotoj.

“Kiom da tempo viaj edzinoj kaj infanoj restis?”

“Mi pensas, ke ili restis meznombre tri tagojn, sed kelkaj eble restis kvar aŭ kvin.”

“Mi bezonos liston de viaj edzinoj kun la adresoj kaj la datoj de alveno kaj foriro”, Karal diris.

“Suspektaj, ĉiuj, ĉu ne, olda frato? Nu, nu, kia vivo! Sonja, mia kara, ĉu vi povas prepari tion por nia gasto?” la muzikisto demandis. Ŝi ekstaris, prenis paperon, kaj komencis skribi per krajono, kiun ŝi de tempo al tempo lekis, dum ŝi levis la kapon kaj ŝia rigardo perdiĝis en ian mensan vakuon.

“Ĉu vi ankaŭ deziras la profesion, aĝon, talimezuron, brustomezuron?” Maks aldonis ekridante. “Vi vidus, kian perfektan ĉielarkon da virinoj mi ĝuas”, kaj li ridegante frapis al si la femuron tiel forte, ke la sofo grince ekĝemis.

“Ne, dankon,” Karal respondis, rezistante la ridkontaĝon, “sed diru: kiu povis preni la kofron? Ĉu vi havas ideon? Ĉu eksteraj gastoj venis por la festo?”

“Ne, venis nur la edzinoj kaj la infanoj.” Li dum momento forlasis la gajan esprimon kaj aspektis pli serioza. “Fakte povas esti nur unu el ili,” li diris post paŭzeto, “neniu ja envenis en la domon.”

“Se estas tiu el Los Angeles, la serĉado riskas esti iom komplika”, Jano murmuris kun nefeliĉa mieno.

“Ej, olda frato, ne lasu vian humoron griziĝi pro tiu eta perdo. Mia scivolemo tamen savis por vi belan dikon da dokumentoj, ĉu ne?”

“Ĉu vi havas suspekton pri la ŝtelintino?”

“Tute ne, ĉu vi havas, Sonja?”

Ŝia respondo konsistis el simpla kapneo, post kiu ŝi transdonis la liston al Karal, dirante:

“Cetere, mi ne komprenas, kial unu el ni ĝin prenis for.”

“Ankaŭ por mi tio eble estas la plej mistera punkto”, diris Pitizazo, senpense elpinĉante kelkajn agordojn el la gitaro.

“En kiu loko precize troviĝis la kofro?” la policano demandis.

“Ĉu vi volas vidi?” prononcis la alia. Ambaŭ viroj ekstaris. Ili iris al dormĉambro tute senorda. Vestoj kuŝis disĵetitaj sur la lito, sur seĝo, sur tablo.

“Ĝi estis tie, apud la ŝranko”, la nigrulo diris montrante lokon inter alta ŝranko kaj la murangulo. “Iu ajn povis forŝteli ĝin kaj ĝin meti en aŭton.”

“Certe ne ĉiuj havis aŭton ĉi tie, ĉu? Ne tiu el Los Angeles.”

“Ho jes, ŝi venis Eŭropon unuafoje kaj decidis vaste vojaĝi. Ŝi ĵus ricevis refreŝigan heredaĵon, kaj ŝi aĉetis unu el tiuj dormveturiloj tuj kiam ŝi metis la piedon sur la grundon eŭropan. El la aliaj, tri havas po aŭtomobilon, inkluzive de Sonja. Sed dum la restado, ĉiu lasis la ŝlosilojn samloke, tiel ke ĉiu povu pruntepreni unu el la aŭtoj, se ŝi ĝin bezonis. Ĉiu ja scipovas stiri.”

“Sed ĉu vi ne opinias, ke la aliaj vidus tiun, kiu prenis la kofron?”

“Dependas de la horo. Sed estis tiom da iroj kaj foriroj, venoj kaj malvenoj ĉi-dome dum tiu periodo, ke neniu atentis, kion faras la aliaj. Mi eĉ vetus, ke se unu el ili petus la grandajn infanojn porti tiun kofreton al iu aŭto, neniu rimarkus ĝin. Infanoj konstante kuradis tien kaj ĉi tien kaj for. Sed pli simple sendube estis enaŭtigi la kofron nokte kaj tuj veturi al taŭga loko en Valĉefa.”

“Kial, viaopinie, oni ŝtelis la kofron?”

“Mi jam diris: tio ege mirigas min. Rik diris, ke estas multe da eksploda dokumenta materialo en ĝi. Eble edzino sciis pri dosiero rilata al persono, kiun ŝi konas...”

“Sed kiel oni povus scii, ke tiu kofro apartenas al Rik Ospaci? Unuavide estis bonega ideo ĝin lasi ĉe vi. Estus neeble suspekta, ke ĝi ne estas via.”

“Vi pravas”, la nigrulo diris, sidiĝante sur la lito. “Rik estis tre inteligenta. Tial li elektis min kiel kofrogardiston. Neniu sciis, ke ni konas unu la alian. Krome, mi ofte venas al Valĉefa, sed ne konstante loĝas ĉi tie. Rik havis facilan, nesuspekteman aliron al siaj dokumentoj. Li havis ŝlosilon de la domo, kaj Sonja, kiu sciis pri la afero, devis lasi lin eniri.”

“Ĉu Sonja eble rakontis la aferon?”

“Eble jes. Sed kiam ni konstatis la malaperon de la kofro, ŝi asertis, ke mi iutage malkaŝis la sekreton, estante ebria, dum amika akcepto. Oj, olda frato, mi ne fieras pri tio. Eble estas mia kulpo, se la afero diskoniĝis.”

“Kiel vi amikiĝis kun Rik Ospaci?”

“Ĉe kongreso de birdfotantoj. Mi pasiiĝis pri fotado iuepoke, kaj, kiel Rik, pasigis horojn kaŝita en veprejo por foti sovaĝajn bestojn, ĉefe birdojn. Poste mia entuziasmo por tiu nekomforta okupo senfajriĝis, dum Rik restis – kiom mi scias – fanatike fotema.”

“Sinjoro Pitizazo, ŝajnas al mi, ke la ŝancoj trovi la kofron estas formike malgrandaj. Feliĉe, mi almenaŭ havas la liston de viaj... e... kunulinoj kaj...”

“Sed vi ne scias, kie ili troviĝas”, interrompis la alia. “Irena, la edzino el Los Angeles, veturas tra la tuta Eŭropo kaj pro sia dormaŭto ŝi eĉ ne bezonas tranokti hotele. Estos des pli malfacile trovi ŝin. Kaj ŝi foriris kun unu el la boedzinoj.”

“Boedzino? Ha jes! Kun kiu?”

“Kun Doris, la londona.”

Ambaŭ viroj eliris el la ĉambro. Karal reprenis la dokumentojn hazarde savitajn de la nigra muzikisto, kaj, akompanate de ĉi-lasta, paŝis eksteren, zorgmiena.

“Espereble tiuj helpos nin”, li diris, montrante la dokumentojn.

“Ĉu vi pensas, ke estis krimo?” Pitizazo demandis.

“Ni ankoraŭ ne scias. Kion opinias vi?”

“Povus esti io ajn. Mi ne ekskludus krimon, olda frato, mi ne ekskludus.”

“Kial?”

“Kiel ĵurnalisto, Rik tro enmiksiĝis sin en privatajn aferojn, li ŝategis elfosi sekretojn, danĝerajn sekretojn. Pripensu, kiom da sensaciaj riveloj li faris en Vespera Folio! Kaj li publikigis nur centonon el tio, kion li malkovris. Homo, kiu agas tiel, alvokas murdon al si, ĉu ne, olda frato?”

Reveturante urben, Karal meditis pri la malfacileco trovi la kofron. Domaĝe! Apenaŭ leviĝis espero fine ricevi utilajn indikaĵojn, kaj jam ĝi dissolviĝis tuj. Dio benu la scivolemon de tiu muzikisto. Dank’ al ĝi ne ĉio perdiĝis!

*

En sia oficejo Karal tuj studis la dokumentojn. La unua reago estis senreviĝa: li komencis per grandformata koverto, kiu entenis malnovajn fotojn. Kial tiuj enŝoviĝis kaŝloken estis ne tre kompreneble, se la kofro devis enteni la plej ‘eksplozajn’ dokumentojn. Estis ja belaj fotoj pri bestoj, inter kiuj multaj cervoj kaj cervinoj. Alia serio montris du virojn, kiuj paŝis sur vojeto montara. Unu el ili havis strangajn vestojn kaj larĝrandan ĉapelon. Li drinkis rekte el botelo kaj aperis komplete ebria. Pluraj aliaj fotoj montris la samajn du virojn, ĉiam kun botelo enmane kaj festulaj esprimoj. Sekvis denove bestfotoj, ĉefe birdaj.

Troviĝis ankaŭ tuta dosiero pri bankoficisto. La koncernaj dokumentoj perfekte taŭgus por ĉantaĝo, ĉar ili pruvis la kulpecon de la ulo pri diversaj grandsumaj malhonestajoj.

Poste Karal kontemplis pli strangan dokumenton. Temas pri foto montranta sovaĝan rokan lokon (‘povus esti en la rafunja regiono’, li pensis), sur kiu kruco kaj tombo estis desegnitaj. Sur la foto estis gluita paperbendeto diranta: “Jen la loko. Tiu foto certe interesus la policon, ĉu ne?”

Finis la serion du fotoj, kiuj eĉ pli surprizis Janon. La unua montris, kvazaŭ ombre, la rafunjajn klifojn, rekoneblajn, sed apenaŭ videblajn, ĉeflanke. La resto de la foto estis komplete okupita de blankega lumo, kiu fuŝis ĉion. La dua estis la sola kolorfoto el la dokumentoj. Sur ĝi vidiĝis eta estaĵo staranta apud la aŭto de Ospaci. Laŭ la grandeco de la veturilo oni povis taksu la altecon de la estaĵo je 1,5 metro. Li, aŭ ŝi, aŭ ĝi, estis vestita per verda supertuto kaj la haŭto de lia (ŝia? ĝia?) vizaĝo estis verdeca. Ne estis klare, ĉu la afero sur la kapo estis speco de ĉapelo aŭ simple strangaj haroj. La esprimo estis rideta, sed... Karal ne povis vortigi al si sian impreson... Ĉio aspektis plej embarase strange. La detektivo sentis, kvazaŭ io, en lia stomako, subite nodiĝis malagrabla.

*

Certiĝinte, ke Pitizazo estas for, Karal foje iris viziti Sonjan, kun kiu li longe babilis. Sed la konversacio estis malesperige senrezulta. Ŝi ripetis, kion jam diris ŝia edzo, kaj Jano ne vidis, kiamaniere li povus akiri per ŝi iom pli da informoj.

La enketo pri la kvin aliaj edzinoj, kiuj ne loĝis en Valĉefa, montriĝus same seniluziiga, se Karal havus iluziojn. Fakte, li atendis nenion el tiu esploro farata grandparte de eksterlandaj policistoj pere de la internaciaj aranĝoj, kiujn uzi Jano neniam ŝatis.

Tri virinoj estis hejme, sed ilia pridemandado restis senfrukta.

La du aliajn oni plu serĉis.

*

“Malgaja, ĉu?” Ĝoja diris al la edzo, kaj ŝi karesis lin per gesto tiel tenera, ke lia koro fandiĝis. Li ĝemspiris.

“Nu, vi scias, ĉu ne?” li respondis, kontenta povi dividi siajn zorgojn kun iu plej fidinda. “Espero ŝveligas, kaj kiam ĝi montriĝas trompo, oni malŝveligas. Mi sentas min kiel truita pneŭmatiko.”

“Ĉu la tuta revo krevis?”

“Komplete. Kiam Remon parolis pri tiu ŝtelo, mi pensis: ‘Jen finfine situacio informgraveda’, sed ni troviĝas antaŭ kompleta manko de spuroj. Per kia miraklo ni povus retrovi tiun kofron, eĉ la diablo verŝajne ne scias.”

“Sed via multedzina ulo tamen lasis al vi kelkajn dokumentojn. Ĉu ili produktis nenion?”

“Nenion. La ĉantaĝa dosiero temas pri bankoficisto, kiu mortis kancere antaŭ tri jaroj. La fotoj pri bestoj kaj pri la drinkemaj gajuloj ne povas havi ĉantaĝan signifon kaj kondukas nin al neniu spuraro. Kaj la desegnita tombo...”

“Jes, ĉu almenaŭ tiu ne estas ŝlosila... mi diru... vojmontrilo?”

“Eble jes. Mi estas certa, ke ĝi utilis al ĉantaĝo, verŝajne pri murdo, kiu eble formas la bazon de nia tuta afero. Sed ĝi povis utili nur kun precizaj indikoj pri la loko. Povas esti ie ajn. Povas esti en Kolorado aŭ Ĉinio, kiom ni scias.”

“Sed vi diris al mi, ke multaj laboras super tiu serĉado!”

“Efektive. Kiam la polico serĉis kaj kvinfoje en kvin malsamaj landopartoj firme kredis, ke jen ĝi trovis la lokon, kaj fosis, fosis, fosis, sen malkovri ion ajn, ni petis helpon de la armeo. Tiu havas topografian servon kaj fakulojn pri la studo de fotoj, kiuj kunagis kun la ĉefurbaj policaj specialistoj. Soldatoj fosis, fosis, fosis refoje. Kaj refoje vane. Similan aranĝon de rokoj oni trovis almenaŭ 25-foje en la lando. Fakte tiu foto estas ege malpreciza. Ĝi povis impresi krimulon pro la timiga efiko sur homon kun kulpa sento, sed por eksterulo ĝi enhavas nenion informon. Kie serĉi tiun hazardan naturaranĝon de rokoj? Ne nur tio, sed oni ankaŭ devas rigardi ĝin ekzakte el la sama vidpunkto kiel tiu, kiu faris la foton; aliel, la perspektivo ŝanĝiĝas, kaj vi ne rekonos la lokon eĉ se vi staros apud ĝi. Eble tio okazis al ni, eble eĉ al mi, kiam mi komence partoprenis en la esploroj.”

“Mi komprenas vian senkuraĝiĝon. Kompatindulo! Vi tiom esperis!”

“Sed mi kondutas stulte. Mi edziĝis al la plej bela virino en la tuta Sanktavallo, kaj zorgas pri nesolvebla krimo – aŭ eĉ nekrimo – dum la policaj arĥivoj jam plenplenas per nesolvitaj misteroj. Kial mi tion prenas tiel serioze? Finfine, kiam ni klasos la dosieron kun la stampo

“nesolvita”, ni plu vivos, kaj ne malfeliĉe, ĉu?”

“Janĉjo! Vi provas konsoli vin filozofie, kaj vi pravas, kaj mi admiras vin. Sed ne mensogu al vi mem. Vi ne kontentos tiel facile. Vi bezonas scii, ĉu ne? Vi ne toleras misteron, kaj vi ne ripozos vere ĝis la momento, kiam vi estos certa, ke vi faris ĉion eblan..”

“Prave. Krome, la publo, kiel vi diras en Sanktavallo, la publiko plendas. En voĉdona periodo, lasi nesolvita la misteran morton de viro, kiu ĵus fondis novan, strangan, kaj surprize sukcesan partion estas nepardoneble.”

“Efektive, la gazetaro ne disĵetas laŭdojn malavare al la polico.”

“Ba, la gazetoj...”

“Diru: kial Pitizazo venis al Valĉefa, ĉu nur por la naskiĝtaga festo?”

“Ne. Li havas unumonatan kontrakton kun la radio-orkestro, kaj poste li partoprenos en popolkanta spektaklo, kiu rondiros tra la tuta lando. Tion mi eksciis per Sonja.”

“Interese, kion vi ĵus diris!”

“Interese? Kial? Kio?”

“Roberto Sulavi laboras ĉe la radio, ĉu ne? Li eĉ havas respondecon pri parto de la programado. Ĉu ne estus ia ligilo inter Pitizazo kaj li?”

“Admiru!” diris Bob Sulavi.

“Mirinde!” Veronika Munzo ekstaziĝis.

Ili sidis supre de la monteto, kiu superstaras ĉe Valmu, ĉarma urbeto je kvardeko da kilometroj for de Valĉefa. La kunfluejo de Tjazo kaj Mikva, la pontoj, la malnovstilaj domoj vere aspektis juvele, kaj la montfono emfazis ilian belecon.

“Imagu al vi! Mi loĝas de jaroj vere proksime, kaj neniam venis ĉi tien!” ŝi diris.

Li ne respondis. Li ne povus. Vidi tian unikan junulinon ĉe tia unika pejzaĝo havis kvazaŭ paralizan efikon. Li komencis kompreni, kion la vorto paradizo signifas.

Por scii ĝin pli komplete, li ŝin ekkisis. Longa Hollywooda kiso. Li premis ŝin al si tiel forte, ke ŝi preskaŭ sufokiĝis. ‘Strange’, ŝi pensis, ‘kiel vora aperas amema viro al virino!’ Kaj ŝi aldonis al si: ‘Kaj eĉ pli strange, ke mi ŝatas esti vorata de li.’ Ju pli ŝi lin konis, des pli ŝi ŝatis lian... kiel difini? Estis io pura, naiva, tre juna, tre senkomplika en li. Kaj tion ŝi ege ŝatis. Ŝi sentis lin kiel fidelan hundon, kiel bonan sanan beston kun tre lojala koro. Estis apenaŭ penseble, ke tiu amema simplanimulo laboras por CIA!

“Ĉu vi permesus, ke mi spiru minuteton?” ŝi diris petole, liberigante sin. Ili ridis.

“La restoracio estas tute proksima”, li diris, montrante la vojon.

Dum ili paŝis tien silente, Bob sin demandis, per kiom da centimetroj li grandiĝis, aŭ ĉu simple li ne kreskis, nur liaj piedoj forlasis la grundon kaj li nun flugas? Kvankam verdire, koncerne la bruston, ne povas esti dubo: ĝi ŝvelas. Strange, kiel amo efikas al homo!

“Jen!” ŝi diris eksidante en la restoracio. Sed ŝi tuj denove ekstaris.

“Mi devas iri al la tualetejo, vi komplete fuŝis mian hararanĝon”, ŝi ridetis anĝele. “Ĉu ne, fripono?” ŝi aldonis, kaj ŝi pinĉis al li la longan pinĉotentan nazon.

Sur la seĝo apud li ŝi lasis sian mantelon. Kial, eble diros la leganto, noti tiun banalan detalon? Nu, ĉar el tiu banala gesto fontis gravaj konsekvencoj, pri kiuj, eble, neridemaj planantoj el la sekretaj servoj ankoraŭ nun babilas malantaŭ siaj kirasaj pordoj en Moskvo kaj Vaŝington.

Bob amis. Amante ŝin, li amis ŝiajn aĵojn. Kaj ĉar li amis ŝian mantelon, li prenis ĝin respekte por ĝin aranĝi iom pli bonorde, ke ĝi ne, pro rapidĵeta gesto, akiru aĉan faldon. Tion farante, li ion sentis, kio tiklis lian scivolon. Scivola li ja estis, kiel ni jam rimarkigis pri la

fotokopiado, kaj al lia natura jam potenca sci-avido aldoniĝis la “ĉiam-ĉion-atentu”-reflekso de la trejniĝo por CIA.

Li rigardis. Estis eta zipo lerte kaŝita sub la randaĵo de pseŭdo-subŝtofo. Li ĝin malfermis. Enestis papereto. Al Bob ĝi efikis kiel ŝnureto horizontale streĉita inter du muroj ĉe la unua ŝtupo de malsupren kondukanta ŝtuparo, tiel ke oni ĉe ĝi stumblas kaj ostarompe falas kelen. El paradizo, la sorto lin falpuŝis en inferon da turmentaj duboj, kontraŭdiroj kaj senespero. Tiu folieto ja enhavis unuflanke la ciferojn 66.01.62 (241) kaj dorsflanke serion da indikoj kun, ŝajne, datoj kaj numeroj, kvazaŭ temus pri bibliografiaj referencoj, kune kun du aŭ tri aliaj cifere-aranĝoj, kiuj povus aperi kiel fakturnumeroj aŭ io simila.

Iu alia estus trovinta ĉion ĉi plej normala, sed Bob estis sekreta agento. Kaj antaŭ nelonge, unu el liaj “kontaktoj”, kiel oni diras spionĵargone, parolis al li pri nova kodo de la ĉefa malamiko, laŭ kiu la persono, al kiu mesaĝo estas destinita, enkodiĝas kiel parenteza numero sekvanta la ciferojn 66.01.62 (tiel ke la tuta afero aspektu kiel telefonnumero), kaj la teksto mem de la mesaĝo maskiĝas en kodo, kiu prezentiĝas kiel serio da referencoj. Ne povis esti dubo. Veronika, en kaŝita mantelpoŝo, havis mesaĝon de aŭ al KGB.

*

“Rigardu tiujn du, ĉu ne komike?” prononcis Melania Georgido, tiu kara grandaĝa sinjorino, kiu, antaŭ ne tre longe, kaŭzis ĥaosajn sentojn en la publikopinio, ĉar, en tiu sama tago, kiam riveligis la morto de Rik Ospaci, ŝi konfuzis kun la realo plej fikcian programon de iu fora televida elsendejo. Ŝi ĵus enŝovis en la buŝon dikan pecon de sia kremkuketo, kaj iom de la abunda kremo estis fiksiĝinta sur la lipoj, kio devigis ŝin turni la kapon fenestren por ĝin diskrete forlangi.

Adela Gregor direktis la rigardon al la strato.

“Efektive”, ŝi diris ridetante. De la etaĝa tetrinkejo, kie la du maljunaj virinoj frandis siajn teon kaj kukojn, oni bone vidis la aŭtobushaltejon, kaj tie staris la komika duopo. Ĝi konsistis el longakrura longbrakulo, kiu tenis sin iom kline, kvazaŭ li sopirus esti pli eta ol naturo lin programis, kaj el plaĉvizaĝa mezkreskulo, kiu neniel altirus la atenton, se li ne reliefigus la troajn alton kaj maldikon de la alia junulo, apud kiu li staris. Dum la unua gestis plej nerve, la dua restis trankvile senmova. Apenaŭ perceptebla li levis la ŝultrojn.

Ke Joĉjo gestis ekscitite, estis tute nature, se konsideri la faktojn. Kaj ke Stefano ne respondis aliel ol per ŝultrolevo, ne estis malpli nature, ĉar li ne sciis, kion respondi.

“Ŝi furiozas,” Joĉjo diris, “sed mi tamen ne rezignos pro ŝi!”

“Ho, via Lizabeta...” Stefano iom lace komencis, kaj li dankis la ĉielon, ke ĝuste tiumomente alvenis la buso, tiel ke li ne devis trovi finon al la frazo tujtuj.

Ambaŭ knaboj enbusiĝis.

“Kio pri Lizabeta?” Joĉjo demandis kun tono preskaŭ defia.

“Nu...” Stefano diris ŝanceliĝe. La sentimentaj problemoj de Joĉjo neniam estis simplaj, kaj lia kunulo ne sciis, kiamaniere elturniĝi. Li ŝatis Joĉjon kaj ne deziris ofendi lin, sed sentis sin devigata ion diri. Li aŭdis sin paroli iom pli krude kaj sincere ol li volis:

“Aŭ vi vere amas ŝin, ne povas vivi sen ŝi, kaj restos en Valĉefa, aŭ vi preferas vojaĝi, kaj foriros, sen zorgi pri ŝia grumblado, kiukaze vi verŝajne ne tiom amas ŝin.”

“Ho jes, mi amas ŝin!” Joĉjo respondis kun fervoro, kiu igis Stefanon pensi: ‘Jen li ree teatras al si.’

“Do ne estas problemo. Se vi ŝin amas, vi deziras plezurigi ŝin kaj esti apud ŝi. Ambaŭ aferoj signifas: rezigni la vojaĝon.”

“Sed, Stefano, imagu al vi: senpaga krozado sur la Kariba Már! Vizito de insulo post insulo! Trinidado, Barbados, Martiniko, ĉu tiuj nomoj ne kantas al vi tra la tuta animo?”

“Ho jes, ili min allogas. Tiagrade, ke mi emus proponi alian solvon: vi restas ĉi tie por ne suferigi vian karan kaj sportaman Lizabetan, kaj donacas al mi vian vojaĝbileton.”

“Perfida mezetúl! Vi profitema senkorulo! Vi ne hezitus forlasi enketon, en kiun vi vin engaĝis, por ekspluati la fruktojn de mia gajno! Kiu gajnis la konkurson, ĉu vi aŭ mi? Kiu estas tiel talenta elektronike, ke li trovis al la problemo la plej bonan solvon el la tuta kontinento, ĉu vi aŭ mi? Estus tro facile. Vi eĉ ne abonas la revuon, nek sciis pri la konkurso. Kaj nun, kiam mi faris la tutan laboron propraŝvite, jen vi alvenas, kaj grandsinjore pretas helpi min forrabante mian premion. Fi, vi min naŭzas, vi senmorala moruo!”

Stefano ĝemspiris.

“Mi volis nur helpi”, li preskaŭ balbutis, eksciinte, ke lia humuro ne estis ĉi-kaze el la plej delikata speco.

“Se mi rezignos, la krozadon ĝuos tiu, kiu alvenis dua sur la gajnolisto”, Joĉjo plende prononcis.

“Tiel ke jen ni staras ree antaŭ la sama dilemo.”

“Jes. Se ŝi nur konsentus forlasi sian oficejon, mi pagus por ŝi kunvojaĝon.”

“Ĉu tiom da mono vi havas?”

“Mi pruntus”, Joĉjo diris iom dube.

“Vi scias,” Stefano vortis kun tono filozofa, “kiam oni hezitas inter du decidoj, kaj sentas sin tirata samforte ambaŭflanken, la plej bona sistemo estas ŝanci je kapo aŭ dorso. Ĉu vi havas moneron?”

“Moneron?” la maldika junulo ripetis kvazaŭ sonĝe. “Ĉu vere vi...?”

“Jen!” Stefano tiris el la poŝo moneron. “Kapo: Valĉefa; dorso: la insuloj. La moneron ĵetu vi.”

“Ĉu saĝe...?” Joĉjo mollipe direktis, kaj kvazaŭ en stato hipnota li supren ĵetis la moneron. Ĝi falis sub la seĝon.

“Kio estas?” Stefano demandis, dum lia kunulo kurbiĝis por ĝin serĉi.

“Kapo: mi foriros!” li diris triumfe.

“Kaj kio pri Lizabeta?” la alia demandis.

“Ŝi grumblu!” Joĉjo respondis, kaj sentiĝis, ke lin plenigas tute freŝa kuraĝo.

Stefano taksis pli saĝa ne rimarkigi, ke la decido estis “kapo: li restos en Valĉefa”. Joĉjo evidente preferis la krosadon. Sed io Stefanon tamen tiklis:

“Kaj la enketo?” li scivolis.

“Mi revenos”, Joĉjo profetis, kaj li eliris el la buso.

“Ho, Jano! Rigardu!”

“Jes,” distriĝe respondis la polica detektivo plu ĝuante la bildostrion Asteriks kaj Kleopatra, “kio estas?”

“Vidu!” Ĝoja leviĝis kaj venis apud lin.

Ŝi metis sub liajn okulojn malnovan numeron de revuo pentrarta. Ŝia fingro montris portreton.

“Diable!” li ekkriis. “Li multe similas la ulon sur la foto. Kiu li estas?”

“Gido Verstrata, la pentristo, kiu posedas la lignodomon ĉe Rafunja. Sur ĉi tiu portreto, li estas 25 jarojn pli juna.”

“Dudek kvin jaroj ŝanĝas figuron! Nun li havas ventron de ĉefkuiristo. Mi ne estus rekoninta lin. De kie vi ricevis tiun revuon?”

“Mi prunteprenis ĝin el la biblioteko. Mi plu konservis la ideon provi verki intervjuon kun tiu artisto malgraŭ la admono de s-ino Pergame.”

“Efektive estas la ulo de la foto pri la du drinkemuloj, kiun ni posedas dank’ al Pitizazo. Sed kiun signifon povus havi tiu foto? Ĝi ne povus esti ĉantaĝa: ili faras nenion kondamnindan, nur drinkis gaje kaj zigzaxis sur arbara vojeto.”

“Ni ne komprenas nun la signifon, sed signifo certe estas. Almenaŭ nun ni scias, ke estis ia intereso de Ospaci al li. Se ne, li ne konservus tiujn fotojn.”

“Ej! La tuta artikolo estas pri li!”

“Jes, mi prenis ĝin precize por prepari min al diskuto kun li, ke mi ne eraru pri gravaĵoj.”

“Ĉu la artikolo estas interesa?”

“Mi apenaŭ komencis legi. Oni rakontas, ke li naskiĝis en Sanktavallo, studis en la Valĉefa Arta Lernejo, ktp ktp.”

“Ĉi tie en Valĉefa li studis, ĉu? Tio donas al mi ideon. Morgaŭ mi iros al la Arta Lernejo kun la fotoj...”

*

“S-ro Kirilenko?”

“Estas mi. Kiel mi povas al vi servi?”

S-ro Kirilenko, 63-jara, havis flavan pergamenecan haŭton kun multegaj sulketoj, kio aperigis lin pli aĝa. Li estis tre malgrasa, kaj Karal havis la malagrablan impreson paroli al skeleto, kiu, konsidere al deco, vestis siajn ostojn per haŭto. Li verŝajne estis ne tre sana. Izabela, la polica referencistino, rekomendis al Karal sin turni al s-ro Kirilenko, ĉar li estis fama pro sia bona memoro kaj sekretariis en la belarta lernejo jam kvardekon da jaroj.

Karal prezentis sin kaj montris la fotojn ricevitajn de Pitizazo.

“Mi bone rekonas ilin”, tuj diris s-ro Kirilenko. “Amuza foto, ĉi tiu, kie li enbuŝigas la botelon. Ho jes, li estis tia, kaj ĉiam vestis sin per simila stranga jako kaj larĝgranda ĉapelo. Li probable volis aspekti artiste. Li estis gajulo. Kaj talenta homo. Mi min demandas, ĉu li konservis sian gajecon, nun kiam li iĝis fama kaj riĉa. Tiutempe neniu ŝatis lian stilon, kaj nun ĉiu juna sentalenta pentremulo volas lin imiti. Stranga mondo, ĉu ne?”

“Ĉu li kelkfoje revenas saluti vin?”

“Neniam, sinjoro, kaj mi tion bedaŭras. Ofte estas tiel. Kiam homo vivas en mizero, li estas bonulo. Gido tiutempe ne havis monon, sed estis ege helpema kaj malavara. Nun kiam li fariĝis fama, ni por li ne plu ekzistas.”

“Kaj ĉu ankaŭ la alian viron vi konas? Tiun kun la tute ordinaraj vestoj.”

“Ho jes, certe. Estas Ronaldo.”

“Ronaldo?”

“Ronaldo Verostrata, la kuzo de Gido.”

“Ĉu Verostrata?”

“Jes, laŭdire okazis misskribo de iu naskiĝakta oficisto, tiel ke unu parto de la familio fariĝis Verstrata kaj la alia Verostrata.”

“Kiel vi konas lin?”

“Ankaŭ li studis ĉi tie. Sed talenton li ne havis, kaj li forlasis pentradon.”

“Por kio?”

“Tion, sinjoro, mi tute ne scias. Li neniam revenis ĉi tien, kaj mi neniam aŭdis pri li, kiel

fakte pri la plimulto el tiuj, kiuj pasas ĉi-lerneje. Malofte iu famiĝas kiel Gido Verstrata.”

*

La malvarmaj okuloj de Laŭra Pergame fiksiĝis sur Jano.

“Kion vi deziras?” ŝi demandis, kaj estis io acida en ŝia voĉo.

Jano decidis ŝin flati. Li bombaste emfazis ŝian famon de pentrarta fakulino, speciale sperta pri moderna arto kaj pri talentuloj kiel Gido Verstrata. Li akcentis ŝian erudicion. Li substrekis, ke sendube nur ŝi povos helpi la policon kompreni la signifon de la misteraj fotoj. Ŝajnis al li, ke la flato efikas.

“Ho!” ŝi diris enmanigante la fotojn. “Ĉi tiujn ni neniam vidis.” Kaj ŝia frazo sonis kvazaŭ la sorto agis ofende al ŝi konservante dum jaroj similajn fotojn for de ŝia vido.

“De kie vi ricevis ĝin?” ŝi demandis kvazaŭ akuze.

“Ni trovis ĝin dum la esploroj, kiujn ni faras kadre de la enketo”, Karal respondis neresponde. “Ĉu vi konas tiujn sinjorojn?”

“Tiu estas Majstro Verstrata, la fama pentristo, kiam li estis junulo”, ŝi diris. “La alia...” Ŝi hezitis. Jano rigardis ŝin per akraj okuloj.

“Ĉu vi povas diri al mi, kiun rolon tiu foto ludas en via enketo? Mi vere ne komprenas, kaj estas tre scivola. Ĉio, kio koncernas Majstron Verstratan, min ege interesas.”

“Mi bedaŭras, sed mi ne rajtas diri. La postuloj de enketo... Ĉu vi rekonas lin?”

“Ne. Estas strange, mi havas la impreson, ke mi jam vidis lin ie, sed ne persone, nur sur foto. Ĉu li eble famiĝis sur kampo, kiun mi ne konas? Aŭ ĉu mi vidis foton de li ĉe iu, kiun mi vizitis? Ne, ne. Mi estas stulta. Verŝajne mi neniam vidis lin. Li estas finfine banalaspekta viro. Da tiaj homoj oni vidas milojn sur la familiaj fotoj el tiu epoko.”

Nenion pli Jano tiris el ŝi. ‘Tiuj artifikaj virinoj ne helpas enketiston’, li pensis elirante al la strato. Kaj kiel bubo aĉhumora, li piedfrapis plastan botelon, kiu estis falinta el rubujo, kaj kiu ruliĝis malproksime sur la trotuaro.

*

Alvenante ĉe la lignodomo, Karal plian fojon miris pri la stranga ideo konstrui domon tiuloke. Sed – kiel diris Laŭra Pergame – kompreni artiston simpla homo ne povas, kaj ne por trovi respondon al tiu demando la polica detektivo supreniris.

Gido Verstrata lin akceptis ne tre gastame. Li havis antaŭtukon kovritan de bunta makularo, kaj la nekombitaj hirtaj haroj, la kreskanta barbo kaj la truitaj sandaloj kvazaŭ proklamis postulon vivi ekster la socio. Tiel aspektante, li tuj memorigis Janon pri la sur-fota viro trinkanta elbotele.

“Kion vi volas?” li urse grumblis.

“Mi ne ĝenos vin longe”, respondis la policano enirante sen atendi lian inviton, kiu povus neniam veni. Li montris la fotojn.

La pentristo esprimis egan surprizon.

“De kie vi havas tiujn fotojn?”

“Tio estas polica sekreto”, Jano respondis.

“Estas strange vidi foton de si, kiun oni ne konas mem. Ĝenerale, se homo fotas en simila etoso, li havigas al la koncernato ekzempleron, sed ĉi tiun foton mi neniam vidis.”

“Ĉu estas vi?”

“Ho jes, ne estas dubo. Ĉu vi ne rekonas min?”

“Vi estis multe pli juna tiam, sed efektive estas simileco.”

Sur unu el la fotoj, la pentristo tenis en unu mano la larĝrandan ĉapelon. Tiel vidiĝis liaj haroj, kiuj estis tiam same senordaj kiel nun, sed la fotita junulo esprimis ĉiutrajte gajecon, kio ege kontrastis kun la grumblema urso de hodiaŭ.

“Kie estis farita tiu foto?”

“Kiel diable mi sciis? Ĉu vi ne vidas, ke tiumomente mi estis komplete ebria? Mi neniel povus memori la okazaĵon.”

“Ĉu vi scias, kiu estas la viro, kiu akompanas vin?”

Li ne hezitis.

“Ho jes. Estas Ronaldo, mia kuzo. Li studis kun mi en la Arta Lernejo.”

“Ĉu vi povus doni al mi lian nunan adreson?”

“Mi povas doni al vi du malprecizajn adresojn, la detalan vi serĉu mem, li estas ĉe unu el la du, escepte se li troviĝas en tute alia loko, kio estas ĉiam ebla.”

“Mi ne postulas, ke vi estu perfekte preciza kaj ekzakta, sed ĉia informo helpos.”

“Bone. Unu adreso estas: Amazonio, Sudameriko, kaj la dua: infero.”

“Kion tio signifas?”

“Tio signifas, ke Ronaldo foriris antaŭ dudek jaroj al Sudameriko por vivi kun la sovaĝuloj de Amazonio. Li trovis la civilizitojn neelporteblaj. Estis unu el tiuj naivaj idealistoj, kiuj kredas, ke ju pli sovaĝa la homo, des pli bona li estas. Mi supozas, ke lin trafis sago mortige. Eble oni nun honoras lian reduktitan kapon. Aŭ ĉu li nun estas riĉa financisto en São Paulo aŭ Asunción kun dikventra edzino kaj svarmo da infanoj...?”

*

“Kiel scii?” sin demandis Jano forirante. Nu, la polico havas rimedojn. Helpos la konsulejoj en Sudameriko, la pasporta servo ĉi tie, la transportaj kompanioj, la fiska administracio, ktp. Izabela kompleze entreprenos la necesajn esplorojn.

Efektive, kun sia kutima efikeco, Izabela agis kaj ricevis la respondojn. En 1954 Ronaldo Verostrata petis vizon por Brazilo, tien ŝipiris, kontaktis pro iu malagrabra afero nian konsulejon en Rio de Janeiro, kaj foriris al amazona sovaĝejo, kie li senspure kaj definitive malaperis.

Jano registris tiujn faktojn sen granda surprizo. Li pri tio interesiĝis nur pro kompleteco, aŭ pro tio, ke police enketi estas funde esplori sinsekvon da sakstratoj. Kaj tamen, dum li hejmen revenis tiuvespere, lin invadis, kvazaŭ obsede, stranga fantazia bildo: jen Ronaldo el Amazonio flugtelere atingas Rafunjan.

“Pluen, pluen, pluen!” kriis la koro veronika, kaj speco de ebrio ŝin kaptis.

“Pluen, pluen, pluen!” kriis la koro roberta, kaj ankaŭ li sin sentis ebria.

“Mi ne plu pensu pri tiu aĉa KGB,” ŝi decidis, “mi ĝuu pure la momenton.”

“For, fia CIA!” li pensis, “tempon benitan kial fuŝi?”

Kaj ambaŭ fordonis sin komplete al la ĝuo.

Ĝuinda la rajdo montriĝis trans ĉia atendebla. Nuboj ĉiele vagadis, sed nur orname: forestis ĉia minaco. Frumateno, kaj sporade ili trarajdis bulojn da nebulo. Malproksima hundo bojis. La kampoj ne povus pli sereni.

Ankaŭ la ĉevaloj ŝajnis kaptitaj de rapid-ebrieco. Ili nun galopis kun perceptebla plezuro, kaj ambaŭ rajdantoj sentis, kvazaŭ intima komunikiĝo ilin ligus al sia respektiva besto.

La vojo iris supren, kaj la ĉevaloj malakcelis la kadencon. Kiam ili atingis la supron, ambaŭ rajdantoj haltis admire, tiel delikate la arĝentaj apartigitaj nebulzonoj substrekis la reliefon de ĉiu sinsekva plano. Malrapide ili direktis la ĉevalojn al la apuda arbaro. La temperaturŝanĝo ilin surprizis: tie estis malvarmete. Sed la ĝenerala malheleco, la ne facile interpreteblaj bruoj, ĉiam pli malpli sufokataj, kaj la muska odoro kreis misteran etoson, kiun ĝui valoris iom da malvarmiĝo.

La senrapida iro kaj la neluma atmosfero instigis la rajdantojn pensadi, kaj ambaŭ mense ripetis al si, kiel ĝojige estas malkovri, ke ili sentas la saman amegon al ĉevaloj. Post kio ambaŭ, sen imagi, ke ankaŭ ĉe la alia la pensoj ĉeniĝas simile, meditis pri la eksterordinara sameco de iliaj gustoj: rajdado, naĝado, boato; popolmuziko; monta migrado; rozkolora vino kaj ĉampano; detektivromanoj; kaj multaj aliaj ne indaj je mencio ĉi tie, kiel ekzemple la sanktavalala dialektologio.

Ĉu tiu paralela iro de la pensoĉenoj ŝuldiĝas al logika sinsekvo, al simila mensostrukturo aŭ al fenomeno telepatia, la leganto mem decidu. Por nia rakonto gravas nur, ke mense revuante la komunajn interesojn, ambaŭ rajdantoj alvenis laste – kvazaŭ malvole – al la kulminoto: ‘plus sama implikiĝo en mondpolitikan lukton’. Tiupunkte, simetria zorgoj nigranubis en tiuj du cerboj ĝis tiam banataj en lazuro de feliĉigaj pensoj.

Veronika ĵus diris al si, ke tiel servi fremdan grandpotencan sekretan organizon estas vere riska ludo, kiam el ia forgesa nebulo eliĝis iama parolo de Rik Ospaci: “Roberto Sulavi? Mi havas eblecon sentigi al li premon nerezisteblan. Se mi rivelus... Mi povas fari el li tion, kion mi volas, same kiel el vi, etulino, ĉu ne? Vi pagos kompleze, por ke mi ne sciigu al interesatoj,

ke vi laboras por KGB...”

Kia horora viro li estis! Nun, memorante pri li, Veronika sentis ondon de malamo tiel intensan, ke ŝiaj makzeloj premiĝis unu al la alia, ke ŝiaj okuloj malgrandiĝis malice, kaj ke ŝiajn manojn ektiklis kvazaŭa emo strangoli. Terurite ŝi konstatis, ke ju pli ŝi malamas la mortintan Ospacin, des pli ŝi amas la vivan Sulavin, la oficialan malamikon, tiun naivan, bonan, karan Bob. ‘Vivanta,’ ŝi pensis pri ĉi-lasta, ‘jes, vivanta.’ Kaj kvazaŭ impresata de la taŭgeco de tiu vorto por li, ŝi murmure ripetis al si, pastičante Ŝekspiron: ‘Vivanta en vivanta kór vi sidas.’

Sammomente, Bob estis kvazaŭ superplenigata per ondo de fortega tenero al tiu mirinda anĝelo Veronika. Sed baldaŭ la ŝvelige ama sento cedis lokon al fibruna-figriza angoro, kiu invadis lian animon, kiel kelkfoje en kelkaj minutoj nubaĉoj senigas la ĉielon je ties senmakula bluo. Ŝi laboras por KGB, kaj do estas al li, politike, malamika. Ne nur tio. Rik Ospaci sendube konis tiun ŝian funkcion, kiel li konis lian en la CIA-organizo. Tiu aĉa turmentisto miloble meritis la morton, kiun li ricevis. Kaj dum Bob Sulavi tion pensis, lia vizaĝo tordiĝis al esprimo de infera abomeno, en kiun tuj enŝoviĝis la satana plezuro pensi ĝue pri tiu morto, dank’ al kiu la fi-laboro de l’ ĉantaĝisto ĉesis.

Tiam okazis la incidento.

Veronika ĉirkaŭkole havis koltukon, kiu pro la konstanta saltado surĉevala pli kaj pli malstreĉiĝis, ĝis ĝi fine teniĝis nur per eta angulo. Subita ventblovo ĝin levis for, kaj ĝi malbonŝance falis sur la okulojn de la sulavia ĉevalo. Blindigite, la besto ekpanikis, henis kaj per instinkta movo ekstreme energia sendis sian rajdanton alten en aero. Falante, Bob trafis per la kapo branĉon, kaj sinkis, nekonscia.

Kiam ŝi aŭdis la henon, Veronika tuj haltis kaj rigardis malantaŭen. Unu rigardo sufiĉis por ke ŝi komprenu. Unu kompreno sufiĉis por ke ŝi paliĝu al mort-aspekta blanko. La ĉevalo de Bob, seniĝinta je la tuko, haltis kaj rigardis la rajdinton kun stulta senpenso.

“Bob, Bob, Bob!” ŝi kriis laŭ kreskanta skalo.

Li palpebrumis, ĝemis, malfermis la okulojn, fermis ilin, frotis al si la dorson prononcante profundgorĝan “Oj”, remalfermis la okulojn, gratis al si la nazon, kaj ridetis al Veronika. La kortuŝo, kiun li legis en ŝiaj okuloj, ne povis esti komedio.

“Kio okazis?” li demandis, ĉar la okazaĵoj disvolviĝis tiel rapide, ke li ne havis la tempon ekvidi. Ŝi rakontis.

Li palpis doloran lokon sur la kranio.

“Oj”, li ripetis, kaj aldonis: “Mi havas belan ŝvelon. Sed serioza ĝi ne aspektas. Mi aperas

vivanta.”

“Vivanta!” ŝi ekflustris, dum ŝia rigardo karesis lian tutan korpon. “Ho Bob!”

Li malrapide, zorge restariĝis. “Ŝajnas, ke mi estas kompleta, kaj ke ĉio funkcias”, li diris, palpante la dorson kaj ripojn, post kio li faris marionetan gimnastikon per la membroj. Kaj knaba fiereco lumis survizaĝe dum li diris:

“Ĉio en ordo; mi ne estas facile rompebla. Sed la kapo doloras, kaj mi ne ĵurus, ke mi ne perdis unu aŭ du vertebrojn, ĉar tamen io grumblas ĉe la lumbo.”

Lia humura rigardo igis ŝin ridi.

“Bob! Mi tiom timis!” ŝi kriis, kaj ĵetis sin sur lian bruston. Liaj brakoj tenere fermiĝis ĉirkaŭ ŝi, kvankam la gesto dolorigis ion en la spino.

Kiel multaj, Stefano emis trovi Lizabetan kompatinda. Ŝia naiveco, io mallerta en ŝiaj movoj kaj sinteno, ŝia kortuŝa bezono admiri viron – egale ĉu Joĉjon aŭ Ospacin – igis lin percepti en ŝi personecon, al kiu baza sekureco mankis. Li ne povis scii, ke tiu ĝusta intuo rilatis al vivo stampita per serio da malfeliĉoj, inter kiuj bankroto de la patro kaj frua forpaso de la patrino estis nur la plej profunde vundaj al la psiko. Konstanta impresio, forta sed erara, ke ŝi ne estas ameblo, malfaciligis al Lizabeta la homajn rilatojn, precipe se iom intimaj, tiel ke ŝi emis rifuĝi en solecon: kiel sekretariino, ŝi toleris nur postenojn, en kiuj ŝi disponis propran oficejon kaj povis grandparte organizi mem sian laboron; kiel sportemulino, ŝia prefero iris al longaj solecaj montekskursoj, al skiado kaj al naĝado en lokoj senhomaj. Ĉar ŝi tamen sopiris al homa komprenemo, ŝi vizitadis klubojn pli malpli strangulajn, kie ŝi neniam trovis la profundajn amikecojn, kiujn ŝi deziris havi, sed kiuj ŝin ankaŭ timigis. Ŝia bezono esti amata igis ŝin fari por la aliaj, kaj ankaŭ por la societoj, en kies vivo ŝi partoprenis, la plej malagrablajn taskojn, kiujn ŝi plenumis kun pedanta perfekteco. Sed tio altiris al ŝi pli da kompatado ol da amo, kio malfeliĉigis ŝin. La neatenditan amon de Joĉjo ŝi ne komprenis. Ŝi akceptis ĝin kiel dian donacon, sen vere kredi – ĉar al ŝia naiveco kombiniĝis sufiĉe da sana prudento – ke ĝi havas seriozajn ŝancojn daŭri. Kaj tamen en Lizabeta multo estis aminda.

Eble pro la ĉi-supre menciita sento de kompatado Stefano akceptis pasigi vesperon kun la fortika specimeno, kiel li emis enmense nomi ŝin. Sed nun li furiozis. Li paŝis apud ŝi sur la trotuaro, kaj plenis, rilate al ŝia amato, je sento plej amara.

“Vian Joĉjon mi memoros!” li prononcis acide. “‘Kulturu vian menson’, li diris; ‘Ekkonu personon, kiun vi devus koni’, li diris; ‘Plenigu per iom da substanco la vakuon de viaj pripentraĵoj’, li diris, ĉu ne? Tiajn vortojn li uzis en la mesaĝo, kiun vi transdonis al mi. Kaj nun...” Li ne sciis, kiel fini la frazon, kaj cetere tute ne zorgis pri tio, ĉu la frazo estos finita aŭ ne.

“Kaj nun li lacertas sub la kariba suno, dum vi furiozas pri la fiasko ĉi-vespera, kaj mi pro lia foriro”, Lizabeta diris, ne aspektante pli kontenta.

“Mi jam imagas, kion li diros, kiam li ekscios: ‘La sorto ĉiam metas barilon inter vi kaj kulturo’ aŭ ion similan.”

“Mi nur transdonis la bileton, kiun li petis min pri”, Lizabeta mildvoĉis, iom timante, ke la kolero de Stefano ekdirektiĝus al ŝi.

“Mi volis iri al Odeon. Ili prezentis Spioni en Hongkongo”, li grumblis.

“Tion vi spektos morgaŭ”, ŝi provis konsoli.

“Hodiaŭ estis la lasta tago”, Stefano plendis. “Se li ne estus tiom insistinta... Kultura

vespero! Prelego pri pentrarto! Oj! Mi memoros liajn sugestojn!”

“Ankaŭ mi malkontentas. Atendi, kaj plu atendi, kaj atendadi, tio igas min treege nerva...”

“Mi efektive rimarkis. Mi eĉ min demandis, ĉu vi ne havas febron...”

“Ne, ne. Estas nur tio, ke atendadi vane tiel longe forrabas mian nervan ekvilibron. Tamen...”

“Tamen, se Joĉjo ne estus havinta tiun stultan ideon, mi estus vidinta filmon plenan je streĉaj aventuroj.”

“Kaj mi estus restinta tute sola dum la tuta vespero, ĉu ne?”

“Vi estus povinta veni kun mi al la kinejo.”

“Ne. Mi ne ŝatas tiajn filmojn. Sed mi konfesas, ke ni estus povintaj fari ion pli agrablan ol atendi kune personon, kiu ne venas. Verdire, mi ne komprenas ŝin. Ŝi estas konata kiel tre akurata, ĝenerale. Ŝi estas tiel orgojla, ke ne facilanime ŝi submetiĝas al kritiko ne plenumante sindevontigon.”

“Parolante pri akurataj personoj, vi memorigas min pri mia onklino. Mi promesis viziti ŝin tuj post la prelego. Se vi permesas, mi iros tuj al ŝi. Estas pli saĝe, ke mia kolero trafu ŝin, ol vin, eĉ se nur pro tio, ke ŝi havas psikologan trejniĝon, kiu supozeble inkluzivas la arton elporti la furiozon de plej diversaj frustritoj, inkluzive de nevoj galhumoraj.”

Kaj kun tre abrupta ĝisrevido li forlasis Lizabetan.

*

“Saluton, Stefano!” Karal diris amike, malferminte la pordon. “Al kio mi ŝuldas la plezuron de tia surpriza vizito?”

“Al Joĉjo”, la nevo akraŭvoĉe prononcis.

“Envenu kaj rakontu.”

“Mi volis iri al Odeon por spekti Spioni en Hongkongo...” komencis la junulo.

“...kaj videble vi ne iris”, daŭrigis la onklo. “Kial?”

“Ĉar jen la amatino de Joĉjo, unu el tiuj fortikaj specimenoj, kun kiuj ne estas fierige promeni – la amatino, ne Joĉjo; Joĉjo estas ĉio ajn, sed ne fortika – trenis min al prelego pri arto...”

“Kial do vi lasis tiun virinon submeti vin? Ĉu vi ŝin konas?”

“Apenaŭ. Ŝi transdonis bileton, kiun Joĉjo krajonaĉis la tagon antaŭ ol foriri. En ĝi li petis, ke mi invitu ŝin al prelego de Laŭra Pergame, kies subtitolo povus esti, liaopinie, ‘Ĉu eksterteranoj influis la arton de Gido Verstrata?’ ...Nu, mi bedaŭras la “Hongkongan Spionadon”...”

“Kio okazis?” demandis la polica detektivo, sed Stefano ne aŭdis kaj parolis plu pri sia temo:

“Mi diris al mi: ‘jen, mi vidos la virinon, kiu sukcesis vekti malamon en mia onklino Ĝoja’. Tion mi trovis vere vidinda. Iu, kiu sukcesis kolerigi – eĉ se malvarme – la personon plej tolereman el la tuta universo! Kaj kiu gravas kadre de la enketo...”

“Kaj videble ŝi vin ne kontentigis”, la policano konstatis.

“Ŝi ne venis. La publiko komence atendis pacience, sed la pacienco pli kaj pli dissolviĝis, kaj fine transformiĝis al vera ribelo. La organizantoj repagis la biletojn. Ili diris, ke ili komprenas nenion. Laŭra Pergame ĝenerale estas plej akurata, kaj, kiam ŝi ne povas veni, ŝi telefonas. Ĉar ŝi nenion diris, ili ne dubis, ke ŝi venos. Ili telefonis al ŝia apartamento, sed neniu respondis. Unuflanke mi furiozas, ĉar mi maltrafis la filmon de Odeon...”

“...kaj ĉar tiu Joĉjo-hurio vin incitas, ĉu ne?” Jano interrompis kun rideto.

“Eble jes, sed aliflanke mi trovas interesa la fakton, ke tiu ĉiam akurata persono ne venis fari prelegon, por kiu la salono estis pli ol plenplena. Parenteze mi suspektas, ke tiu estas bonega komercistino, laboranta por Verstrata. En la anonco pri ŝia prelego estis dirite, ke ŝi parolos pri la eksterteranoj, kaj oni diskrete menciis, ke Gido Verstrata ĉiam iras al sia kabano apud Rafunja por pentri. Rafunja + Eksterteranoj = la Krime al Ospaci, ĉu ne?”

“Vi pravas”, la policano diris. “Neniam, normale, priarta prelego altirus tiom da homoj. Sed ĉi-foje ĝi odoris je sango, kaj la amasoj eksentis urĝon altigi sian kulturan nivelon.”

“Ĉiaokaze, estis bonega reklamado, eĉ se ŝi ne venis. Eble la pentraĵoj de Verstrata vendiĝos pli altpreze. Interese, ĉu ne?”

Pli ol interesa ĝi estis.

Jam tiuvespere, petite de Karal, la kvartala polico iris viziti la apartamenton, dank’ al la ŝlosilo, kiun ĝi ricevis de la maljuna purigistino. La apartamento estis en ordo, kaj senhoma, kun neniu suspekta spuro.

La sekvantan matenon, Karal veturis al Rafunja, pensante, ke eble la pentristo havos ideon pri tio, kio okazis al la persono prelegonta pri li.

Du aŭtoj staris apud la lignodomo. Sed kiom ajn Karal tamburis sur la pordo, la muroj, la fenestroj, kiom ajn li kriis kaj vokis, la domo restis silenta. Li konstatis, ke la pordo eĉ ne estas ŝlosita. Li eniris. Endome estis neniu.

La kontraŭkutima neveno de Laŭra Pergame ĉe promesita prelego kaj la ĉeesto de du aŭtoj apud malplena domo kondukis al malplaĉa antaŭsento. Perturbita, Karal desupris al la loko nomata ‘Rafunja Teraso’. De la vojeto klif-randa, kiun li bone konis nun, li rigardis en la profundaĵon. Streĉante la okulojn, li kuntiris la brovojn, kaj decidis desupri rapidege.

*

La tuta gazetaro bolis per indigno. “Kion faras la polico?”, “La skandalo de l’ nesolvitaj krimoj”, “Al kiu nun la vico?” la titoloj kriaĉis, dum la artikoloj konsilis al ĉiu persono iomete fama eviti la riskan Rafunjan: fama ĵurnalisto/politikulo mortis tie, kaj nun fama pentristo kaj fama verkistino pri arto.

Ne estis dube, ke la du lastaj, kiel la unua, falis de la supra natura teraso. Sed same kiel pri la morto de Rik komplete mankis spuroj aŭ indikaĵoj, kiuj povus helpi scii pli.

La horloĝeto de Gido Verstrata – luksa ora objekto – frakasiĝis kiam la montriloj indikis 11:03 kaj la datfenestreto la ciferon “6”. Tion Karal ĝoje raportis al leŭtenanto Remon:

“Mi vizitis Verstratan la 6-an posttagmeze”, li klarigis. “Se lia horloĝeto estis ĝusta, li mortis samtage je la 23-a.”

Remon grimacis:

“Murdantoj niaepoke ne forgesas aranĝi la horloĝajn atestojn laŭ sia intereso. Ni esperu, ke la nekropsio informos nin.”

“Tamen, ĉi-foje ne estas kiel en la kazo de Rik Ospaci”, Karal rimarkigis. “Mi vizitis Laŭran Pergamen ĵaŭdon, t.e. la 6-an matene, kaj la pentriston la saman tagon posttagmeze. Ŝi ne faris sian prelegon vendrede vespere. Kaj mi malkovris la korpojn en la mateno de la 8-a, t.e. sabaton. Ili do mortis inter ĵaŭdo posttagmeze kaj sabato matene, kaj plej probable antaŭ la vendreda vespero.”

Fakte, kelnerino el restoracio en Malpaz, kie la vojo al Rafunja forlasas la valan vojon, rekonis la portreton de s-ino Pergame en la gazetoj kaj sciigis al la polico, ke la pripentra verkistino vespermanĝis en ŝia restoracio tiun ĵaŭdon kun pli juna virino.

La kelnerino priskribis la menuon, kiun Laŭra mendis, kaj la nekropsio konfirmis ŝian ateston. Kalkulante laŭ la horo de la manĝo, oni deduktis nedubinde, ke Laŭra Pergame mortis ĵaŭdon inter la 22-a kaj la 24-a.

Kaj jen Tribún publikigis artikolon, kiu pravigis konsiderindan kreskon de la eldonnombro. “Kial akuzi la policon?” ĝi titoliĝis. La bazan ideon ĝi esprimis jene: “Estas tute kompreneble, ke la polico povis fari nenion pri tiuj krimoj, ĉar ĝi frontas malamikon neatakeblan per normalaj rimedoj: estaĵojn el la kosmo”, kaj la gazeto menciis plurajn personojn loĝantajn pli malpli proksime al la rafunja regiono, kiuj asertis, ke en tiuj tagoj ili vidis “telerforman flugantan objekton” aŭ simple “tre luman aferon en la ĉielo”.

La artikolo faris plurajn hipotezojn por klarigi la morton de la pentristo Verstrata kaj de Laŭra Pergame. Unu estis, ke la eksterteranoj mortigis ilin – kiel, laŭ tiu teorio, Rikardon Ospacin – pro ties tro granda scivolemo: la teranoj proksimiĝis, kiam okazis ia eksperimento, kiu nepre devis resti sekreta. Alia estis, ke ili mortigis Ospacin, ĉar tiu ne akceptis unu (aŭ plurajn) el iliaj instrukcioj pri la politika kampanjo, kaj la du aliaj estis likviditaj, ĉar ili malkovris ion, kio povus helpi kompreni la forpason de la juna ĵurnalisto/politikulo.

Ideo, simila al ĉi-lastata, jam de kelka tempo turniĝis en la menso de Karal: ke tiuj, kiuj respondecas pri la duobla murdo – eĉ se ili ne estas eksterteranoj – povus esti agintaj pro la motivo, ke tiuj du ion eksciis pri la faligo de Rik.

Kiam li legis la artikolon en Tribún, Karal malbonhumoris. Li ne kredis je tiu alimonda hipotezo. Kaj tamen, ĝi ĝenis lin, kvazaŭ iu parto de li, ne agnoskata “oficiale” en lia menso, timus kontraŭ ĉia prudento, ke troviĝus io vera en tiu fantazia supozo. Kaj finfine, ĉu vere estus kontraŭprudente tion pensi?

Li meditis pri tio, ĵus leginte la gazeton en sia oficejo, kiam oni telefonis el la akceptejo, ke juna virino deziras paroli kun li pri la Ospaci-afero. Tiu junulino, svelta, eleganta, kun ridemaj okuloj, ne restis longe, kaj ŝia informo alportis nenion vere novan. Tamen ĝi intensigis la malbonhumoron de Jano. Ŝi klarigis, ke ŝi laboras ĉe Vespera Folio, kaj ke, troviĝante en loko, kie ŝi devus ne esti, ŝi neintence aŭdis kverelon inter Oskaro Kolombét, la gazetdirektoro, kaj lia amdonantino Elga Misuro: ĉi-lastata postulis altiĝon en la gazeta hierarkio; se Kolombét ne konsentas, ŝi minacis riveli al persono, kiun amikino ŝia konas en la administra konsilantaro, ke Rik Ospaci kolektis ĉantaĝan dosieron pri Kolombét, provis uzi ĝin por efektiviigi premojn sur la direktoro, kaj tiel altiris sur sin murdon fare de ĉi-lastata...

“La amdonantino do kredas lin kulpa,” Jano ripetis al si, “sed tio ne signifas, ke ŝi pravas. Kaj eĉ se jes, kiel pruvi la aferon?” Li ekiris hejmen grumblante.

*

“Trezorejo! Vera trezorejo!” ekkriis la malgranda dikulo admirante la pentraĵojn. Karal, kiu esploris kun li la subtegmentejon de la pentrista domo, lin rigardis ridetante. La eta sfereca specialisto pri artaĵoj kaj antikvaĵoj, kiu laŭbezone helpis la policon, ĉiam amuzis lin, kun siaj luneca vizaĝo kaj krispaj mallongaj haroj, kiuj similigis lin al karikaturato.

La ejo plenis je pentraĵoj, ĉiuj kun la tiel karakteriza stilo de Gido Verstrata.

“Nekredeble! Estas simple nekredeble!” entuziasmis la pufa estuleto.

“Kio estas tiel malfacile kredebla?” Karal demandis.

“Ke li havas tiom! Vi staras antaŭ riĉego, kara amiko mia, riĉego! Verstrata estas konata kiel pentristo, kiu faras maksimume du pentraĵojn jare, kaj ili nun atingis tian prezon, ke tio ebligas al li tute komforte vivi. Ĉiu el ĉi tiuj estas facile vendebla. Kun tia jam preparita stoko, li povus vivi ankoraŭ dudek jarojn... aŭ pli ĝuste liaj heredantoj povos...”

“Li estis ne nur bona pentristo, sed ankaŭ lerta negocisto, ŝajnas al mi”, respondis Jano. “Li sciis, ke se li vendos siajn verkojn tro rapide, ilia valoro malaltiĝos.”

“Rigardu!” admirvoĉis la arta spertulo. “Ĉi tiu estas belega!”

Pri pentrado la polica detektivo estis tute neklera, sed li ŝatis la verkojn de Verstrata, ĉar ili ne estis abstraktaj. Realismaj ili ankaŭ ne estis, sed almenaŭ la temo tuj kompreniĝis, kiom ajn simbolo ĝi estis prezentita. Plaĉis al Karal la elekto de la koloroj kaj io tre fajna en la konturoj, pro kio la pentraĵo iel similis al simpla desegno.

“Bela ĝi certe estas,” li diris, “sed ĉu la astronomiaj ciferoj, kiujn la milionuloj pagas por tiaĵoj, estas vere pravigeblaj?”

Kelkmomente, la fakulo taŭzis sian mentonon, dum liaj lipoj elstaris iom paŭte kaj lia tuta vizaĝo esprimis pripensadon.

“Nu,” li fine diris levante la ŝultrojn, “kion signifas prezo de pentraĵo? Kompare kun multaj aliaj, kiujn vi povos aĉeti malmultekoste, ĉi tiu ne estas eksterordinare pli bela.”

“Finfine decidu nur modo, ĉu ne?”

“Jes, sed la modon decidu la recenzistoj. Tiu, kiu sukcesis akceptigi sin kiel taŭgan juĝanton, havas grandegan povon.”

“Sed kio igas iun akceptita recenzisto?”

“Flarkapablo, mi opinias, speco de intuo. Estis tipe en la kazo de Verstrata. Li alvenis je la ĝusta momento, kiam la snoboj komencis laciĝi de la kutima stilo. La subtilan ŝanĝon de gusto Laŭra Pergame sentis, kaj ŝi tuj agis. Ŝi verkis artikolojn per vigla, veka, vunda stilo, kiuj ŝokis multajn konservemulojn, sed kiuj altiris al Verstrata tiujn, kiuj sopiris al io nova. Ŝi sukcesis famigi sin kaj Verstratan samtempe.”

“Ĉu laŭ vi Verstrata ne meritas sian famon?”

“Jes kaj ne. Li certe estas tre bona pentristo, kaj lia farmaniero estas nekontesteble originala. Tiusence li do meritas sian famon. Sed aliflanke ekzistas multaj aliaj pentristoj, kiuj ankaŭ havas perfektan teknikon kaj originalan procedmanieron, plus aŭtentan inspiron, sed kiuj estas absolute nekonataj, kaj eble vivas en senespera mizér. Tiuj ne havis la bonan ŝancon disponi la servojn de iu Laŭra Pergame...”

Li ĵetis rigardon al sia horloĝo.

“Hej, mi devas for!” li ekkriis. “Sinjoro detektivo, mi konsilas al vi ŝlosi kun plej granda zorgo ĉi tiun ejon. Ĝia enhavo valoras milionojn, multajn milionojn.”

Li faris malprecizan, iom ridindan geston ĝisrevidan, kaj ŝtuparis malsupren.

Karal penseme rigardis lin foriri.

Estis unu el tiuj belaj tagoj, kiam la ĉielo lazuras sennube, la birdoj trilas tutgorĝe kaj ia malpezeco de la aero igas la homojn imagi, ke la zorgoj definitive migris for. En la tuta Sanktavallo la homoj ridetis al si reciproke, kaj la harmonia etoso estis tiel palpebla, ke al fremduloj atingantaj la stacidomon de Valĉefa tuj evidentiĝis, ke ili ĵus trafis paradizon.

Tamen, kiel, ho ve!, ofte okazas sur ĉi tiu nia tero, la edena atmosfero estis pure supraĵa, kaj serioza esploranto ne devis longe serĉi antaŭ ol renkonti gravajn signojn de streĉiĝo. Fakte, specialan streĉiĝan punkton prezentis per si la nun fama Rafunja.

“Ĉu ili interbatalos?” ĝendarmo Garvala demandis al kolego Polonez.

“Eble jes, eble ne”, respondis ĉi-lastata, kiu ne ŝatis erari.

“Kelkaj ŝajnas pli ol iom ekscititaj”, la unua taksis.

“Ĝis nun ili ĉefe vortas”, komentis la kolego, preferante faktojn al impresoj.

Efektive, “ili” vortis, vortadis, fojfoje eĉ vortaĉis. Kaj “ili” rigardis unuj la aliajn per nigraj rigardoj gravedaj je minaco.

“Ili” estis du grupoj. Ĉe unu flanko de la ebenaĵo staris la Raciula Societo, ĉe la alia la Klubo por Esploro pri Ne Identigitaj Flugantaj Objektoj.

“Senkonsidere al la postuloj de plej elementa racio, abomene ekspluatante ian mistikan bezonon, kiu kaŭras en la primitivaj tavoloj de la homa psiko ĉe individuoj ne evoluintaj...” sonis el unu flanko parolado.

“Nome de iu t.n. scienco, kiu uzurpas eksterajn kampojn kaj rifuzas humile agnoski la limojn de la homa scio, t.n. scienco, kiu pretendas juĝi eĉ tion, kion ĝi ne esploris...” eĥis el la alia flanko.

Tiun strangan ceremonion okazigis la fama artikolo en Tribún, kiu atribuis la morton de Verstrata kaj Pergame al eksterteranoj. La Raciula Societo bombaste anoncis, ke ĝi organizos kunvenon surloke, por ke ĝiaj membroj kaj ĉiuj ceteraj interesatoj povu mem vidi, ke pri la ĉeesto de kosmoŝipanoj troviĝas eĉ ne unu minimuma spuro.

Tuj la Klubo por Esploro pri NIFOj deklaris, ke ĝi piknikos en Rafunja, eĉ se nur por certigi, ke la “Raciuloj” ne forprenos indikaĵojn, kiuj povus ilin ĝeni. Kaj nun...

“Jen ili komencas,” ekkriis Polonez, “iu ĵetis ŝtonon.”

“Ne ŝtonon,” Garvala korektis, “ovon, ŝajnas al mi.” Ambaŭ ekkuris. La loko, kie naskiĝis la incidento, estis relative malproksima de la ĝendarmoj. Kiam ili alvenis, la batalo jam ŝtormis viglege. Ĉar ambaŭ partioj kunprenis piknikojn, ĵetaĵoj ne mankis. Legomoj, ovoj, fruktoj trafis la aeron de unu grupo al la alia. Verŝajne, la junuloj ambaŭgrupe kalkulis kun probabla alfrontiĝo kaj organizis sian piknikon konsekvence. Sed multaj aliaj aĵoj estis uzataj, ekzemple gazetfolioj buligitaj aŭ lignopecoj antaŭe kolektitaj por prepari fajron. Iuj boksis, kelkaj piedfrapis, multaj aĵjetis, ĉiuj kriaĉis, jen insulte al la “malamiko”, jen ordone al la propraj trupoj, kiujn kvietigi la ĉefoj provis sensukcese. Ankaŭ al la ĝendarmoj ne prosperis aŭdigi sin.

Kaj jen subite tri aferoj okazis samtempe. Putra pomo trafis al ĝendarmo Garvala rekte sur la frunton, botelo atingis la kranion de viro, kiu fotis la scenon, kio igis lin fali, kaj ĝendarmo Polonez pafis ĉielen per sia pistolo.

La pafado agis mirige. Post unu sekundo, ĉiuj gapis mire al la ĝendarmo, silentaj, kvazaŭ paralizite. Polonez profitis la silenton por krii per voĉo densa je aŭtoritato:

“Sufiĉe! Ĉesu! Kaj bonvolu konduki kiel civilizitoj!”

Post nova silenta sekundo, ĝenerala zumado leviĝis, kaj jen iu knabo piedfrapis al alia, kiu rebate pugnigis la makzelon de la unua.

Sed la etoso ne plu estis sama. Fortulo altkreska kun gigantaj manoj kaptis la brakon de la ĵus boksinta kaj diris “Haltu!” per tia impona voĉo, ke ĉiuj resilentis. Kaj en tiu senbruo lia impresa estra voĉo sonis: “Ĉesu! Ni jam sufiĉe amuziĝis!” Tiu rimarko estis tiel neatendita, ke la homamaso eksplodis per ekridado. Da streĉiĝo restis neniom.

“Sinjorino Karal!”

Ĝoja, kiu ĉeestis la kunvenon de la raciuloj kaj serĉis Stefanon, kiu sekvis la alian, abrupte turnis sin. Ŝin vokinta estis ĵurnalisto, kiun ŝi iom konis. Viro kuŝis apud li.

“Mia kolego ricevis botelon sur la kapon kaj svenis,” klarigis la ĵurnalisto, “li nun rekonsciiĝas, kaj verŝajne ne estas tre serioze, sed mi tamen ŝatus resti kun li. Ĉu vi baldaŭ malsupreniros?”

Ĝoja hezitis; ŝi intencis resti ĝis la fino.

“Vi povus fari al mi servon”, la gazetisto daŭrigis. “Ne plu okazos io ajn, vidu, venas fulmotondro, kaj multaj jam foriras.”

Ŝi rigardis al la ĉielo, kie du etaj nuboj montriĝis senminacaj, kaj al la ebenaĵo, kie grupoj diskutis kaj ne ŝajnis speciale pretaj formigri.

“Kiun servon?” ŝi demandis.

“Se vi bonvolus iri al la gazeta oficejo, transdoni ĉi tiujn filmojn, por ke ili rivelu la fotojn kiel eble plej rapide, kaj anonci, ke mi plej baldaŭ telefonos mian raporton, mi vere estus ege danka.”

“Konsentite,” diris malantaŭ ŝi voĉo junula, “sed nur kondiĉe, ke ni ricevu kompanse ekzempleron de ĉiu foto. Ni ne volus malhavi eĉ momenteton de l’ ĵus travivita epopé, kaj la gazetoj ne publikigos pli ol po unu foton.”

“Stefano!” admonis Ĝoja riproĉe. “Ĉu vi ne kapablas plenumi servon senkompanse? Mi hontas pri vi.”

La ĵurnalisto ridis.

“Ne severu, sinjorino Karal, li fakte tute pravas. Petro ĉi tie abunde fotis kaj malmulto el tio trafos la publikon. Estas promesite, knabo, vi ricevos la tuton.”

*

“Kio estas al vi, Kara-Karal? Ĉu via koro haltis?”

La policano ne reagis, tiel absorbita li estis. Stefano, Ĝoja kaj li jam kelkajn minutojn rigardis sinsekve la fotojn de la rafunja batalo, ilin transpasigante de unu al alia. La junulo stariĝis kaj iris malantaŭ la onklon.

“Ĉu ne estas ĝi?” ĉi-lasta demandis, perceptinte la movon de la nevo.

La junulo streĉis la okulojn. “Ĝi?” li ripetis kun demanda tono, sed li ne bezonis respondon. La foto, kiun Karal kontemplis, estis farita ekzakte de la sama loko kaj sub la sama lumo kiel la ‘ĉantaĝa’ foto trovita en la kolekto de Maks Pitizazo, kiu foto devigis la policon kaj armeon al tiom da vana serĉa fosado.

*

La ĵurnala fotisto klarigis tre precize, kie li staris, kiam li faris la koncernan foton. Ĉe la loko indikita sur la ĉantaĝa foto, policistoj fosis. Ĉi-foje, ili trovis.

*

“Ne, ne. Mi ne povas paroli tiel precize, almenaŭ ne tuj”, la nekropsia doktoro diris en la telefonon. “Kion mi diru? Estas viro, kaj li mortis antaŭ 15 aŭ 20 jaroj, aŭ 25, aŭ 30.”

Konstantas la milito inter la policanoj, kiuj bezonas precizan daton, eĉ horon, kaj la

medicinistoj, kiuj timas, ke advokato ilin ridindigos tribunale, montrante, ke ili pretendis al troa precizeco.

“Tamen vin interesos grava detalo”, la nekropsianto aldonis. “Mankas falangeto ĉe la ringa fingro maldekstra. Saluton!”

“La liston, la liston, la liston! Mi kraĉas sur ilian liston!” Veronika kriis kolere, malkodante la mesaĝon. Laŭ temperamento, ŝi estis milda kaj kvieta, sed ŝiaj rilatoj kun la spionmastroj iom post iom incitis ŝin al nervaj eksplodoj, kiuj tute ne konformis kun ŝia profunda estmaniero.

“Plian monon en la kutima mura kaŝejo!” ŝi diris plu malkodante. Ŝi malŝatis tiun manieron komuniki. Ŝi sciis, ke KGB uzas similajn “poŝtkestojn” tutmonde, sed, kvankam oni klarigis al ŝi, ke statistike ĝi estas la plej sekura sistemo, ĉar ege malofte okazas, ke iu trovas la kaŝejon kaj komprenas ĝian signifon, tamen ŝi neniam sentis sin senzorga, kiam ŝi aliris la fendon en la muro. La antaŭan fojon, kiam ŝi tie prenis la monon destinitan al Rik kiel helpon al lia politika agado, ŝi havis malagrablan senton, ke iu observas ŝin.

Ŝi estis nun sola en sia apartamento, kaj de kelka tempo ŝi laŭgrade kutimiĝis laŭtvoĉi siajn zorgojn, ne tre konvene, eble, por spiono (kiu scias, ĉu ne troviĝas mikrofono?), sed, nu, home. Kiel elporti silente tian ŝarĝon?

“Mi kraĉas sur ilian liston”, ŝi ripetis. “Kaj propagandi favore al la partio de Rik! Nur tion! Ne postulemaj, la kamaradoj! Estas vere simple! Agiti, kiel ili diras, agiti favore al la gastoj elkosmaj! Kiel mi povus fari? Kiel mi povus fari tute sola?”

Ŝi metis la kapon sur la manojn, kun la brakoj apogitaj sur la tablo, kaj amare plorsingultis. Sur la maldekstra flanko buklo izolite elstaris, kvazaŭ orfa.

*

“La liston, tiun damnindan liston refoje”, grumblis Bob Sulavi, gratante al si la longan pintan nazon. “Kaj aperigi artikolojn pri tio, ke Rik estis abomena ĉantaĝisto, kaj ke rezulte lian partion oni ne povas preni serioze... Nu, tio estas pli komprenebla: ke voĉoj ne perdiĝu en tiun senfutan partion. Tio estus por mi verŝajne eĉ facila. Kial do mi havas tian naŭzosenton?”

Kaj kun profunda ĝemspiro li stariĝis, prenis la ĵus malkoditan mesaĝon, kaj ĝin bruligis, laŭ la instrukcioj.

Dum la flamoj voris la paperon, kaj li rigardis ilin fikse, preskaŭ hipnote, nekutimaj sentoj lin invadis. Ĉu tiel vivi valoras la penon? Ĉu io valoras la penon vivi, entute? Al tiuj demandoj la respondo formiĝis pli kaj pli klare, dum li kontemplis senvide la folion cindrigatan: sen Veronika ne valoras vivi. Kaj la pensoĉeno vole nevole kondukis al konkludo, kiun multaj trovas stulte romantika, sed kiu estis por li pura evidentaĵo: aŭ Veronikan, aŭ mortin.

La entrudo de la mortkoncepto ne estis akademia. Ĉar vivi kun Veronika implicis forlasi la laboron por CIA. Aliel, li devus mensogi la tutan vivon. Ke ekde la tago, kiam li konsentis al

CIA-dungiĝo, li necese vivis en konstanta mensogado, tute ne frapis lin. Sin kaŝi, komedii, trompi por politikaj celoj, tio estis sporto. Sed trompi Veronikan, tiun senkulpan ŝafidinon, tiun puran lilion, tiun diafanan kajton, ne, kajto estas iom tro proza, tiun luman sunradion, ĉu trompi ŝin vi postulus? Ne. Neeble. Ami Veronikan – kaj kion alian oni povas fari, kiam oni renkontis ŝin? – tio signifas lasi ŝin penetri en la tutan propran vivon, dividi ĉiujn sekretojn, partopreni en ĉio ajn...

Ke ŝi laboras por KGB komplikas la problemon, jes ja, sed komplikaj problemoj estas kiel glavoj: longa vunda parto, eble, sed ankaŭ tenilo. Nur necesas trovi la tenilon.

Kaj kio se ili ne akceptos? Aŭ se ankaŭ ŝi, ĉion eksciinte, ne akceptos?

Tiukaze, li mortos. Finfine estas tute simple. Li mortigos sin, kaj ĉio estos finita. Per firma volo li decidis tion fari, kaj la ĝojo tuj revenis tute. Nura vireca decido, kaj ŝajne sensolva dilemo forvaporigis, jen la vera fundfunda simpleco de la vivo. Per unu ago de sia forta volo, Roberto Sulavi sukcese eliminis ĉian solvon alian ol vivon kun Veronika, vivon plene kaj sincere dividatan, eĉ pri la plej hontindaj aspektoj de lia ĝisnuna kromokupo.

Kiam li ekstaris, lia nazo pintis pli firme, lia makzelo aperis pli kvadrata, liaj okuloj rigardis pli rekte antaŭen. Planite, decidite. Kun esprimo de potenca animforto, li paŝis al la fridujo kaj elprenis ŝinkon kaj fromaĝon. Ial lin plenigis nerezistebla emo vori dikegan sandviĉon. Lokita antaŭ la perspektivo vivi kun la amata aŭ morti, ĉiu sporta bravulo unue malsatas.

“Arnoldo Kastrita, ĉu vere?” demandis Ĝoja. “Kia amuza nomo!”

“Ho, vi scias, en sonĝoj...” la edzo komentis dubeme.

“Kio alia estis? Ĉu vi memoras?”

“Ne. Nur ke temis pri la armeo, pri la demando, ĉu viro nomata “Kastrita” povas soldatiĝi, se konsideri, ke la armeo akceptas nur virojn. Estis apenaŭ sonĝo, nur sonĝa demando, sed ĝin akompanis tiu sento, kiun mi fojfoje spertas, ke jen mi sonĝas ion gravan.”

“Ŝajnas, ke via subkonscio vortigis dubojn pri via vireco. Estas eksterordinare, kiel vi viroj ĉiam timas iutage malkovri, ke vi perdis la viran identecon.”

“Tio estas via interpreto. Mia opinio, temas pri mia enketo, kvankam mi tute ne vidas, kiel la armeo povus rilati al ĝi.”

“Estas neniu Arnoldo inter la roluloj, ĉu?”

“Ne. Sed, strange, la nomo tamen ŝajnas elvoki ion...”

“Kaj Kastrita, pri kio tio pensigas vin?”

“Atendu, mi ekhavis kvazaŭ-ideon, sed... ve!... ĝi forflugis tuj kaj mi ne plu memoras. Incita afero. Kastrita? Ĉu tio aludus al Rik Ospaci? Ĉu subkonscie mi rigardus lin neviro, ĉar li estis ĉiurilate, ankaŭ sekse, abstinema?”

“Aŭ ĉu eble temas pri virino, kiu volus soldatiĝi? Simbole, tio signifus: virino, kiu volas agi vire.”

“La ino Pergame, ĉu? Laŭ la ekstera aspekto ŝi estas tre virina, sed mi imagas, ke en paro ŝi ludus superregan rolon. Estas io ordonema en ŝi. Ĉu eble tio povus esti simbolita per la nocio ‘armeo’?” Karal sonis dubema. “Se tiel estas, la sonĝo tute ne helpas min.”

“Ni serĉu alian direkton. Kion farus la armeo rilate al kastrita viro?”

“La armeo? Ĝi registrus la fakton ĉe la unua prisana ekzameno...”

Karal subite retenis la spiron.

“Jen mi havas ĝin”, li diris post kelksekunda silento. “En mia sonĝo la vorto ‘kastrita’ simbolas la perdon de fingroparteto.”

“La enterigiton de Rafunja vi aludas, ĉu ne?”

“Jes, la homon, kiun iu enterigis antaŭ multaj jaroj en la rafunja ebenaĵo, kaj al kiu mankas parto de fingrosto.”

“La tombo de la ĉantaĝa foto! Ĉu vi opinias, ke Verstrata tiun murdis, kaj ke Rik pro tio ĉantaĝis lin?”

“Kial ne?”

“Estus eble. Sed kiu estus la murdito?”

“Estas evidente, ĉu ne? Mi tuj kontrolos.”

*

Kiam li revenis hejmen tiuvespere, la respondo estis klara:

“Kiam la juna Gido Verstrata prezentiĝis al la unua kontrolo medicina de la rekrutekzameno, estis notite, ke falangeto de la maldekstra ringa fingro mankas al li.”

“Kaj kio pri la pentristo, kiu falis pasintan semajnon de la Rafunja-teraso, ĉu al li io mankis?” Ĝoja demandis, kvankam ŝi jam ne dubis pri la respondo.

“Ne. La viro, kiun mi trovis mortintan sur la rafunja ebenaĵo apud la korpo de Laŭra Pergame, havis tute normalan manon. Sekve, ne estis la vera Gido Verstrata.”

“Alivorte, la ulo, kiu iĝis milionulo vendante pentraĵojn, tiujn fakte ne faris mem, ĉu?”

“Plej certe. La tre talenta Gido Verstrata, kies originala stilo jam montriĝis en la belarta lernejo, mortis antaŭ du jardekoj kaj estis neleĝe enterigita en Rafunja. Li havis famon de homo kun giganta laborforto. Li verŝajne pentris kaj pentradis grandkvante. Kaj iun tagon, iu lin eliminis, prenis lian lokon kaj profitis de tiu abundega produktado.”

“Kiu?”

“Se mia sonĝo pravas, devas esti la kuzo. Songante mi intermiksas la literojn – Arnoldo anstataŭ Ronaldo – kaj ankaŭ la virojn, ĉar ne al Ronaldo mankis parteto de fingro.”

Ĝoja lin rigardis kun aprobo, tamen ne senrezerva.

“Via teorio estas tute kohera”, ŝi diris. “Ronaldo ĵaluzis Gidon, kaj lin mortigis, li enterigis la korpon en la rafunja ebenaĵo, foriris al Sudameriko sub la propra nomo “Ronaldo”, tie aranĝis taŭgan malaperon, kaj reaperis ĉi tie sub la nomo “Gido”. Bedaŭrinde prezentiĝas

serioza argumento kontraŭ tiu hipotezo: kial preni sur sin tiom da riskoj, se konsideri, ke tiuepoke, ja, Gido Verstrata estis nur eta pentristo tute nekonata?”

*

“Estas la kofro de Rik Ospaci!” ekkriis Jano Karal al la policisto, kiu akompanis lin. Ili traserĉis la apartamenton de Laŭra Pergame – rutina faro polica en simila kazo – kaj, kvankam ili esperis trovi interesajn lasaĵojn, ili ne antaŭvidis ion tiel gravan por la enketo.

“Mi tuj telefonos al Remon, ke li sendu iun por daŭrigi la serĉadon kun vi, kaj mi reiros al la oficejo por studi ĉi tiujn”, Karal diris montrante la dokumentojn en la kofro.

Legi ilin postulos multajn horojn, sed rapida trarigardo jam montris, ke tio ne estos tempo perdita. El tiuj paperoj kaj fotoj Rik aperis kiel majstra ĉantaĝisto. La tuta dosiero pri Kolombét troviĝis ĉi tie, kaj ĝi estis reputacimurda por la gazetdirektoro, kiu laŭ tiuj dokumentoj neniam hezitis akcepti monon por manipuli la informadon favore al tiu aŭ alia industriisto, aferisto aŭ politikulo.

Ne restis dubo ankaŭ pri tio, ke Rik Ospaci havigis al si belajn sumojn ĉantaĝante Gidon Verstratan. Kiel komenciĝis tiu profitdona afero, tion klarigis jena letero, skribita per mano imprese tremanta:

Estimata Sinjoro Ospaci,

Vi ne konas min, eble ŝajnos strange al vi ricevi leteron de nekonato. Mi estas baldaŭ mortonta. La malsano, kiu trafis min, ne plu lasos al mi, post kelkaj horoj, sufiĉan forton por plu skribi. Kaj tamen mi ne volas forlasi ĉi tiun mondon sen konfesi mian hontindaĵon, kaj tiun de aliulo, kies kulpecon mi profite ekspluatis. Mi konfidas tion al vi, ĉar vi estas konata kiel honesta ĵurnalisto, kaj ankaŭ ĉar vi estas fama kiel fotoamatoro speciale ŝatanta foti bestojn.

Ankaŭ mi dum mia tuta vivo estis ege entuziasma fotemulo, kaj mia plej ŝatata temo estis, kiel ĉe vi, sovaĝaj bestoj. Tiucele mi, la 27-an de julio 1954, kaŭris kun mia fotoaparato inter la pinarboj, kiuj troviĝas apud la vojo kondukanta al la t.n. rafunja teraso (vidu la ĉi-kunan skizon, kiu indikas, kiel oni atingas tiun lokon deirante de Malpáz), kiam alvenis du viroj al mi nekonataj, kiuj videble jam drinkis multege.

Unu, iom ridinde vestita, kun stranga malnovmoda ĉapelo kaj larĝega kravato pentrista, havis la manon sur la ŝultro de sia kunulo, kaj ambaŭ zigzakis sur la vojeto raŭke kantante obscenaĵojn. Ili formis tiel ridigan bildon, ke mi ne rezistis la plezuron fari pri ili kelkajn fotojn, kiujn mi sendas al vi ĉi-kune. Mi tiucele ilin sekvis, nevidate.

Ve! La komika marŝado finiĝis tragike: la ĉapelulo atingis la randon de la teraso,

stumblis ĉe ŝtono kaj falis. Tiumomente li ne plu tenis la alian, kiu restis longe ĉe la apikaĵo, gapante. Mi estis tute proksima kaj povas certigi, ke li ne puŝis sian kunulon.

Mi pensis: “Ni devas rapide desupri, ĉar, kvankam estas multegaj ŝancoj, ke la falinto mortis, se pro mirakla hazardo li plu vivas, ni devas tuj aranĝi la flegadon.”

Ŝajnas, ke la tragika falo malebriigis la alian, kaj ke tiu sampensis kiel mi, ĉar li tuj ekiris malsuprenvojeton pri kies ekzisto mi antaŭe ne sciis. Li iris multe pli rapide ol mi, ĉar videble li perfekte konis la regionon, male al mi. Mi misvojis, perdis tempon, kaj kiam mi fine atingis la malsupran ebenaĵon, li jam kaŭris apud la korpo.

Mi intencis kribi: “Jen mi alvenas helpi”, sed kion li faris, tio estis tiel neatendita, ke mi restis apude kaj kvazaŭ instinkte – mi nun ne bone komprenas kial – komencis fotadi lin, kvankam mi devis scii, ke tiam estis tro malhele por ricevi bonan rezulton. La pentriste vestito tute certe estis morta, kaj la alia komplete senvestigis lin, surmetis liajn vestojn, kaj vestis per siaj la forpasinton.

Tiumomente mi komprenis, ke tio estas unika okazo por ĉantaĝi. La viro foriris, sed ne laŭ la vojo malsupren. Tiam mi memoris, ke en la lignodomo supre de la Rafunja-teraso vivas kaj laboras pentristo. Dum la viro estis for, mi traserĉis la poŝojn de la falinto, aŭ pli ĝuste de la alia, ĉar nun la vestoj estis interŝanĝitaj, kaj prenis liajn paperujon kaj notlibreton. Tiel mi eksciis, ke mia baldaŭa ĉantaĝa viktimo nomiĝas Ronaldo Verostrata.

Mi atendis por kontroli, ĉu tiu sinjoro revenos. Kaj tio efektive okazis: li revenis kun pioĉo kaj ŝpato. Tute certe li ilin prenis el la menciita lignodomo. Li ekfosis.

Kiam la kavaĵo estis finita, la viro ŝovis en ĝin sian kunulon, reŝtopis la truon, kaj foriris. Eble mi devas menci, ke ambaŭ viroj multe – preskaŭ frate – similis unu la alian. Ambaŭ estis kolosoj. Ne mi povus porti korpon tiel facile. Kiam mi estis certa, ke li estis for, mi faris fulmfotojn de la loko kaj notis retrovsignojn. Tiam, strange, mi konfesas, por homo decidinta ĉantaĝi, mi iris al la improvizita tombo, kiun li estis tre lerte maskinta per ŝtonoj kaj taŭge aranĝita tero, kaj mi preĝis. Ial, ŝajnis al mi nedece, ke tiu forlasu nian mondon sen ia ajn ceremonio.

Mi ne tuj entreprenis la ĉantaĝon. Mi unue faris enketeton por ekscii kiel eble plej multe da faktoj pri la falinta pentristo kaj pri la alia. Tiel mi estis informita, ke Gido Verstrata ĵus heredis astronomian sumon de riĉegulo, kiu jam aĉetis de li plurajn pentraĵojn kaj trovis lin ege talenta. La drinkado okazis por festi tiun tute neatenditan heredon. Mi eksciis krome, ke la alia estas lia kuzo, kiu ankaŭ havis pentristajn ambiciojn, sed al kiu talento (aŭ ĉu pli ĝuste laboremo?) grandparte mankis.

Kiam la falsa Gido Verstrata revenis el vojaĝo, kiun li tiuepoke faris, mi vizitis lin

kaj prezentis al li miajn fotojn. Ekde tiam, mia financa situacio komplete aliiĝis...

Tiu dokumento igis Janon revadi. “Kia ironio”, li pensis, “ke la unua ĉantaĝisto de la falsa Gido elektis por siaj riveloj homon faman pro sia honesteco kaj anima pureco, dum fakte tiu estis ne malpli aĉe profitema!”

Li ne plu dubis, ke la morton de Ospaci kaŭzis ĉantaĝviktimo, sed el ĉiuj koncernatoj, kiu puŝis lin abismen?

“Notario Viljemín”, anoncis la voĉo en la interna telefono, “deziras paroli kun vi senprokraste. Urĝa afero koncerne la akcidenton de Rafunja.”

Tiu notario estis plej bonfama en la tuta Valo de Tjazo, konata kiel ekstreme honesta, skrupula, fidinda rigorulo. Rigardante lin eniri, la detektivo rapide mensnotis la orrandajn okulvitrojn, oran horloĝeton, oran kravatpinglon kaj la insignon de Rotari-klubo. “Oro kaj prospero”, li diris al si, resumante la ĝeneralan impreson, kiun al li faris tiu sesdekkvinjarulo. La notario klinis sin iom ceremonie, kaj, ĉe invita gesto de Jano, eksidis trans la skribotablo.

“Mi estis for, tial ne venis pli frue”, li komencis. “Multmilionulo, kiu estas kliento mia, venigis min al sia vilao ĉe-oceana por redakti novan testamenton. Gravega afero. Mi ne povis ne iri.”

Ĉu li sentas sin kulpa? Karal sin demandis. Kaj se jes, pri kio vere?

“Dum mi estis tie, li havis korkrizon, ne ege gravan, sed tamen... Mi ne sciis, kion fari. Li estas tre bona kliento, pli ol tre bona kliento... Mi do devis resti. La afero finiĝis kontentige.”

‘Ĉu li mortis kaj testamentis ĉion al vi?’ la detektivo preskaŭ demandis, sed li tamen regis sin.

“Li nun bone fartas, kaj feliĉe, la afero estas finfarita.”

“Sed ne por paroli pri tio vi petis renkonti min, ĉu?” Jano demandis.

“Ne. Pardonu. Mi venis pro tre konfidenca komisiono.” La notario serĉis en sia teko, kaj fine eltiris sigelitan koverton. “S-ro Verstrata petis min doni ĉi tion propramane post lia morto, ĉu al la poliestro, ĉu al la polica funkciulo, kiu okupiĝos pri lia morto, se iu devas okupiĝi pri ĝi. Li tiom insistis, ke mi persone iru kaj transdonu propramane, ke kiam mi eksciis pri la dramo, mi eĉ ne konsideris la eblecon telefoni al vi.”

“Dankon, mi komprenas”, Karal afable respondis. “Kaj vi sendube deziras ricevateston, ĉu ne?”

“Se vi tiom kompleksus... Jes, dankon”, li diris, dum Jano rapidskribis noteton. “Sed ne estas ĉio.”

“Kio alia?” Karal demandis surprizite.

La notario denove palpis en la teko.

“Tute simila transdonajo de s-ino Pergame”, li anoncis kun esprimo de magiisto, kiu ĵus eltiris vivantan kuniklon el ĉapelo, kaj li enmanigis al Karal duan sigelitan koverton.

“Ĉu vi scias, pri kio temas?” la detektivo demandis.

“Tute ne. Mi estas nur fidela gardanto kaj peranto. Ili ne konfidencis al mi. Mi plenumis mian komision, kaj nun devas retiriĝi.” Li adiaŭis, kaj estis tuj for. Ŝajnis al Karal, ke li forkuras de tiuj leteroj, kvazaŭ ili entenus dinamiton.

*

“Kaj kion enhavas tiuj leteroj?” Ĝoja demandis.

“Tiu de Gido Verstrata (ni plu nomu lin tiel, se vi konsentas, por ne konfuziĝi, kvankam verdire li estas Ronaldo) komenciĝas imprese, jene: ‘Polica Moŝto, se vi legas ĉi tiun leteron, tio signifas, ke mi mortis. Mi salutas vin el transtombe.’ Kiam mi legis tion, ŝajnis al mi, ke ia glacia sensaco laŭiras mian spinon.”

“Sed kial li skribas el transtombe? Ĉu por konfesi?” scivolis Stefano.

“Unue por peti nin fari plej zorgan nekropsian ekzamenon de lia korpo.”

“Ĉu li suspektis, ke oni lin mortigos?”

“Jes. Li estis certa, ke Laŭra Pergame volas meti finon al lia vivo. Fakte, li kredis, ke ŝi intencas veneni lin.”

“Pro kio?”

“Estas iom komplike. Mi ne memoras, ĉu mi diris al vi, Stefano, ke ili estis geedzoj.”

La nevo gapis.

“Geedzoj? Gido Verstrata kaj Laŭra Pergame, ĉu? Ne, vi neniam diris.”

“Ni eksciis tion nur, post kiam ili mortis, pro la necesaj formalajtoj.”

“Ĉu antaŭ longe ili geedziĝis?”

“Jes, verŝajne ŝi dekomence partoprenis en la trompo pri la pentraĵoj. En la letero li diras, ke, se juĝi laŭ diversaj signoj, ŝi ne plu elportas la vivon kun li. Lia teksto estas tre kruda. Li diras ekzemple: ‘Ŝi ne plu volas submetiĝi al kelkaj kapricoj de la malbela maljuna malpura malĉastulo kiu mi, ŝia opinie, estas’, kaj tio estas tre milda loko, se kompari kun multaj aliaj. Nu, li pensas, ke ŝi deziras trovi sian sendependecon, sed konservi la milionojn, kiujn li

posedas, kio signifas: seniĝi je li.”

“Sed se ili jam longe vivas geedze, kial nur nun ŝi volus lin likvidi?” Stefano rezonis.

“Eble ŝi antaŭe lin ankoraŭ sufiĉe amis, aŭ ŝi atendis, ke la stoko de pentraĵoj sufiĉe malkresku. Lia reputacio pentri malmulte ne ebligus vendi la tutan antaŭan stokon”, supozis Ĝoja.

“Jes, tio estas verŝajna”, la nevo aprobis. “Kaj nun pri Laŭra Pergame. Kion ŝi diras en sia letero?”

“Plej strange, ĝi similas tiun de la edzo. La celo estas la sama: ke, se ŝi mortos kiel unua, la polico aranĝu nekropsion.”

“Ĉu vere?”

“Jes. Ŝi asertas, ke Verstrata konvinkiĝis pri ŝia deziro lin murdi por ĝui lian riĉegon sen submetiĝi al la malplaĉaj aspektoj de kunvivado, kaj ke li minacis likvidi ŝin antaŭ ol ŝi sukcesos.”

“Ĉarme!” taksis Stefano. “Ĉarma paro, vere! Kiel harmoniaj rilatoj! Kiel agrable devas esti vivi kune en tiaj kondiĉoj!”

“Mi trovas tion terura,” Ĝoja samopiniis, “du geedzoj, kiuj tiel malfidas sin reciproke, ke ambaŭ kredas la alian kapabla murdi lin aŭ ŝin!”

“Eble tio efektive okazis”, Stefano diris. “Eble Gido irigis Laŭran al la Rafunja-teraso por ŝin falmortigi, kaj ŝi facile akceptis, ĉar ŝi opiniis, ke ŝi profitos la okazon por lin puŝi malsupren. Eble ambaŭ luktis provante puŝi la alian, kaj tiel ambaŭ falis mortiĝe.”

“Tio estas tute probabla”, la detektivo jesis. “Sed mi bedaŭras, ke en via diraĵo estas tiom da ‘eble’; mi ŝatus pruvi la aferon. Kvankam verdire tiom da policaj konkludoj fakte estas nepruveblaj...”

“Ĉu vi plu serĉos, nun kiam vi havas tiun duoblan reciprokan akuzon?” Ĝoja demandis.

“Mi klarigos la aferon al la prokurorejo, kaj ni vidos. Mi konfesas – eble ĉar mi estas laca – ke mi nun ne scias, kie serĉi plu.”

“Kiu heredas tiun gigantan riĉon?” Ĝoja demandis.

“Fakte, mi volis demandi pri tio la notarion – verŝajne li scias, se al li ili konfidis la leterojn – sed li foriris tiel urĝe, ke ne prosperis al mi. Mi dubas, ke estas io trovinda tiurilate. Oni diris al mi en la komenca enketo, ke ambaŭ estas senparencaj. Sed mi kompreneble devos

kontroli... Ej! Telefono! Mi iras respondi.”

Dek minutojn daŭris la telefona konversacio.

“Kiu estis?” scivolis Ĝoja, kiam ŝia edzo revenis.

“Izidoro, mia kolego. Li nun deĵoras en la policejo, kaj Pitizazo ĵus iris tien.”

“La nigra muzikisto, ĉu vere? Kion li volis? Ĉu anonci sepan edzinon?” ironiis Stefano.

“Ne. Li petis, ke ni senvalidigu lian plendon pri kofroŝtelo. Lia ‘edzino’ Sonja – la valĉefa – sin deklaris kulpa al li. Kiam ŝi eksciis pri la morto de Laŭra Pergame, la ideo esti implikita en murdoafero ŝin ektimigis. Ŝajnas, ke Laŭra informiĝis pri Pitizazo pere de privata detektiva agentejo, tiel eksciis multon pri la ses edzinoj, kaj i.a. malkovris, ke Sonja havas gravajn financajn zorgojn. Ŝi tiam aliris ĉi-lastan kaj promesis al ŝi altan sumon, se ŝi – Sonja – havigos al ŝi – Laŭra – la kofreton. Estis tre facile, kaj Sonja ne hezitis. Se mi bone komprenas, Pitizazo tute ne prenas la aferon serioze, kaj pardonis tuj.”

“Kion tiu informo signifas por ni?” sonis la voĉo de Ĝoja.

“Ĝi instruas al ni ion gravan: ke Laŭra Pergame sciis, ke la kofro estas ĉe Pitizazo. Kiel do ŝi povis ekscii tiel bone garditan sekreton?”

“Pere de unu el la edzinoj”, Stefano hipotezis.

“Neeble, ŝi ekkonis la ekziston de la edzinoj nur pro tio, ke ŝi esploris pri Pitizazo, alivorte nur post kiam ŝi jam sciis, kie troviĝas la kofro, kaj jam komencis serĉi metodon por ĝin ŝteli. Kiamaniere ŝi akiris tiun informon? Trovi respondon al tio certe ege helpus.”

“Domaĝe, ke pro tiu damninda rafunja falo, vi ne plu povas demandi ŝin”, la junulo diris.

“Almenaŭ estos facile trovi la koncernan detektivan agentejon”, Jano konsoliĝis. “Ne estas multaj en Valĉefa. Ni demandos ĉiun, ĝis ni trafos la ĝustan. Eble tiel ni sukcesos...”

*

Karal ne sukcesis. Li trovis la privatan detektivan oficejon, sed tiu nenion sciis pri la kazo. S-ino Pergame eĉ ne menciis la kofron. Ŝi nur petis kiel eble plej multe da informoj pri Pitizazo kaj pri la domo, kie li loĝas en Valĉefa. Kiam ŝi eksciis pri la ‘edzinoj’, ŝi petis kiel eble plej multe da informoj pri ili. Ŝi proponis tiel altan pagon, ke la detektiva agentejo treege diligentis, sen demandi pri ŝiaj motivoj.

“Plia espero trompita!” konkludis Ĝoja.

“Jes, plia sakstrato. Enketo ĉiam konsistas el la sama procezo: oni malkovras vojon, ĝin eniras espere, kaj subite troviĝas antaŭ muro. Ne strato estis, nur sako, kaj eĉ sentrua.”

“Kion vi nun faros?”

“Mi komencos per la heredo-afero, kvankam mi ne multe kredas je ĝi. Tamen, ili estis riĉegaj, ili mortis. Kiu profitos? Tion ni ne povas neglekti.”

*

“Se vi bonvolos eniri”, susuris la forta, ne tre virina, ino, kiu oficis kiel sekretariino. Ĉio tie ĉi elvokis komforton kaj silenton. La pordo de la notaria kabineto estis duobla, kun lede tegita remburo destinita sufoki la transpason de la sonoj. Karal sidiĝis en profundan, komfortan brakseĝon.

Li neniam diris al Viljemín, ke la riĉego de l’ falsa pentristo kaj de ties edzino ne transpasos al iliaj eventualaj parencoj, sed al la heredantoj de la vera Gido, se tiaj heredantoj ekzistas. Ne de ŝtelinto oni ja heredas, sed de la laŭleĝa posedinto. Tamen la afero estis esplorinda, ĉar la murdinto de la paro – se li murdis por heredi – probable ne konis la devenon de ties riĉego.

“Mi serĉas, sed ankoraŭ nenion trovis”, flustravoĉe diris notario Viljemín kun eta gesto senkulpiĝa. “Mi tamen povas diri al vi tute certe, ke s-ro Verstrata ne plu havas vivantajn parencojn. Ke ekzistas testamento nek de li, nek de ŝi, ankaŭ tion ni povas tute certe diri nun, des pli, ĉar la polico tre zorge traserĉis iliajn havaĵojn, ĉu ne?” Karal silente kapjesis. “Pri s-ino (Verstrata-)Pergame mi metis anoncon en la notaria serĉa bulteno. Ŝi havis fratinton, sed ni ne scias, kien tiu malaperis. Ŝi forlasis la landon kaj establiĝis en Brita Kolombio antaŭ longe. Jurista firmao tie serĉas por ni. Tamen estas tre tikla problemo...” Li subite haltis.

Karal elmontris mienon senvorte demandan. La notario reparolis:

“Eĉ se hipotezi, ke tiu fratino aŭ infanoj ŝiaj nun vivas, ili heredos nur, se heredis s-ino Pergame, aŭ, se vi preferas, s-ino Verstrata, sed por pruvi, ke ŝi heredis, necesus pruvi, ke ŝi mortis post sia edzo. Kaj laŭ tio, kion al mi diris la nekropsiinto, tio estas nepruvebla. Juĝisto devos findecidi tiun punkton, sed kiamaniere li faros, mi vere demandas min.”

“Ĉu vi ne pridiskutis la testamentan aferon, kiam ili donis al vi la leterojn destinitajn al la polico?”

“Tute ne. Cetere, nur s-ro Verstrata venis. Li klarigis al mi, ke mi devos propramane doni la koverton al la polico, se li mortos antaŭ sia edzino. Li tre insistis, por ke mi agu persone.”

“Kaj kio pri Laŭra Pergame?”

“S-ino Pergame ne venis persone. Ŝi sendis sian koverton en pli granda koverto per

registrita poŝto. Fakte, ŝi ne postulis, ke mi ĝin donu al vi propramane.”

“Ambaŭ kontaktis vin tiurilate en la sama periodo, ĉu ne?”

“Jes. Apenaŭ unu semajnon antaŭ ol ili mortis. La letero de s-ino Verstrata-Pergame alvenis kelkajn tagojn post tiu de la pentristo.”

“Bone. Mi tre dankas vin, sinjoro notario. Espereble vi baldaŭ ekscios ion pri tiu fratino!”

“Mi forte esperas, ke jes”, la notario diris kun rideto samtempe duba kaj larĝa.

Nur tiam Karal rimarkis, ke oron s-ro Viljemín havas abunde ankaŭ en la dentaro.

La sekvantan tagon, je la kvina posttagmeze, dum Karal, ĵus reveninta al la policejo, eklegis leteron ricevitan de la notario – ĝi skribe konfirmis la informojn donitajn en la notaria kabineto: s-ro Viljemín estis tre ordema persono, kiu ĉiam konfirmis letere la enhavon de konversacioj, se ne estis speciala kaŭzo tion eviti – en tiu preciza momento, en alia parto de la urbo, virino preskaŭ ŝtelmove eniris preĝejon.

Ŝi ne estis speciale fervora piulino, multe mankis ĝis tio, sed ŝi nepre bezonis paroli kun iu, kaj tiu sopiro al vera konfidenculo revekis memorojn el ŝia katolika infaneco: kio estas dirita ĉe la konfesa sakramento, oni al ŝi tiam diris, tion la pastro ne perfidos, eĉ sub torturo aŭ sub minaco de morto. Ŝi do unue telefonis al la paroĥo Sankta Monika por certiĝi, ĉu pastro Varga povos aŭskulti ŝian konfeson, kaj tiu jesis. Pastro Varga estis fama en la tuta Valĉefa kiel samtempe bonkora, indulgema kaj ĝisfunde fidinda homo.

“Patro,” ŝi murmuris, volvante bukilon ĉirkaŭ fingro de la maldekstra mano, “mi faris..., mi..., estas terure..., mi ne plu povas elporti...” Kaj ŝi kompatige ekploris.

*

Ekstreme malofte Karal havis okazon rilati kun la eklezia hierarkio, kaj kiam la telefono anoncis, ke la sekretario de la episkopo urĝe deziras vidi lin, li sentis sin pikita de forta scivolemo.

La sekretario estis altkreska homo kun sulkita vizaĝo kaj okuloj rivelaj pri profunda laceco. ‘Jen homo, kiu ne sufiĉe dormas’, Karal pensis rigardante lin eniri.

“Sinjoro Karal,” la viro komencis per resona voĉo, “mi venas komisie de lia episkopa moŝto.”

Jano nur silente kapjesis.

“Temas pri la morto de s-ro Verstrata kaj de s-ino Pergame...”

“Ĉu?” Karal diris surpriziĝe. “Kiel do nia episkopa moŝto rilatas al ĉi tiu afero?” li demandis.

“Temas pri la konfessakramento. Vi scias, ke la konfesa sekreto estas absoluta, ĉu ne?”

Karal denove kapjesis senvorte.

“Nu, kion mi estas petita diri al vi, tion ni eksciis per konfeso. La persono, pri kiu temas, longe diskutis kun la konfesprenanta pastro. Li aŭ ŝi volas, ke vi sciu ion, sed ne kiu li aŭ ŝi

estas. Laŭ la konfespreninto, tio estas pravigebla ĉi-kaze.”

‘Mankis nur tio,’ pensis Jano, ‘ni scios ĉiujn detalojn pri la krimo, escepte de la ĉefa: kiu kulpas?’

“La pastro estis tre embarasita kaj konsultis la episkopon, kompreneble sen malkaŝi la nomon de la koncerna persono. Monsinjoro Gabriel decidis, ke vi ricevos la aluditan informon, sed nenion alian. Cetere, nek li nek mi scias, pri kiu temas, kaj ankaŭ la konfespreninta pastro ne konas la personon, kiu konfesis al li.”

‘Pli kaj pli helpe’, la policano pensis, kaj li ĝemspiris, kio vekis rideton sur la aliula vizaĝo.

“Mi komprenas, ke ne estas agrable aŭdi tian antaŭparolon,” la episkopa sekretario diris bonhumore, “sed jen la fakto, kies signifon mi cetere tute ne komprenas. Mi estis instrukiita diri al vi nur tion, ke... Mi legos al vi la ekzaktan frazon, kia mi ĝin notis”, kaj li tiris el sia poŝo notlibreton, kiun li rapide foliumis. “Jen. La konfesanta persono diris: Mi solene atestas, ke okazis daŭro, dum kiu nur s-ro Verstrata kuŝis morta funde de Rafunja. La mesaĝo, kiu estas tre grava por vi do estas: dum iu periodo, s-ro Verstrata estis sola – mortinta – piede de la klifeca rokmuro. Kaj nun, sinjoro Karal, mi petas vian pardonon, sed mi devas foriri. Mi mem scias nenion pli, kaj la mesaĝo surprizas min ne malpli ol vin, bonvolu min kredi.”

*

“Stranga historio, ĉu ne, Ĝoja?”

“Efektive,” ŝi murmuris, “uzi religiaĵon por defendi ĉe la polico siajn hered-interesojn ne estas ofta procedo.”

Ili estis preskaŭ solaj en la naĝeja trinkejo, kie ili sidis babilante, ĝuante la plaĉan fizikan lacon, kiun kaŭzas ĵusa korpa ekzercado.

“Mi devos pripensi, kion ĝi implicas. Sed vin certe interesos alia afero, kiun mi ekkonis dank’ al policaj raportoj el Kastelomara kaj Akvoviva, kaj ankaŭ al esploroj faritaj de Izidoro en Malpaz.”

“Ĉu fine klariĝas la aŭtopuroj, kiujn vi trovis proksime al la Rafunja-teraso?” ŝi demandis, prenlevante bantukon, kiu estis glite falinta sub la seĝon de la edzo.

“Ne. Tiuj spuroj kondukas nin nenien. Unu speco atribuiĝas sen ebla eraro al la aŭto de Rik, kiun ni retrovis en Malpaz, kaj la alia rilatas al neniu suspektato.”

“Eĉ ne Laŭra Pergame, ĉu vere?” Ĝoja prononcis kun preskaŭ malica esprimo.

“Ne. Eĉ ne ŝi. Verŝajne tiuj spuroj neniel koncernas la Ospaci-aferon.”

“Se ne pri la spuroj, pri kio do temas viaj policaj raportoj?”

“Pri Verstrata. Aŭ, pli ĝuste, pli lia duobleco. Li organizis sian vivon laŭ du personecoj. Kiam li estis en sia lignodomo, en Valĉefa, en Malpaz, li aranĝis sin al la fama aspekto de la fama pentristo: malpuraj vestoj, haroj senordaj, kreskanta barbo, pantalono ĉiam preta fali de sub la dika ventro, ktp. Vera originalulo, kiun neniu povus pretervidi. Sed kiam li estis en Kastelomara, en Akvoviva aŭ en alia loko, kie li ĝuis sian riĉon kaj ne bezonis komedii je pentristo, li aspektis tute aliel. Li surhavis kompleton da vestoj fasonitan por aperigi lin pli maldika, li estis freŝe razita, kaj kombita kiel civilizulo, li ornamis sin per bela ĉemizo kaj sobra kravato, li havis okulvitrojn... La alivestado tiagrade ŝanĝis lin, ke neniu povis diveni, ke tiu distingita elitulo kaj la sovaĝaspekta urso estas unu kaj sama persono!”

“Interese. Kion tio ŝanĝas en la enketo?”

“Estas tro frue por diri. Mi provos mediti pri la implicaĵoj. Sed ni ne havu iluziojn. Eble tiu novaĵo montriĝos senutila.”

“Tamen, ĝi estas interesa...”

Ĝoja sin interrompis, dum juna kvaropo bankostuma pasis preter ili. Ŝi ĝin rigardis, kun ia envio al la beleco de tiuj junaj korpoj – la du knabinoj eĉ ne havis unu unkon da graso – kaj ŝi ne rimarkis la amuziĝan rigardon, kiun Jano ĵetis al ŝi.

“Dum ni parolas pri policaj raportoj,” ŝi rekomencis post tiu estetike taksa paŭzo, “ĉu vi havas tiun de la fotografo pri la foto kun eksterterán?”

“Ha jes! Mi forĝesis ĝin mencii al vi. Estis du fotoj, ĉu ne? Unu simple estas fuŝita kliŝo, kiu hazarde povus elvoki tre intensan blue blankan lumon meze de Rafunja. La alia, kiu montris strangan estaĵeton, estis farita verŝajne kun la helpo de infano aŭ de nano, plus ia optika truko. Ni supozas, ke Rik foje konsideris uzi ilin en sia propagando, kaj poste rezignis, ĉar ne sufiĉe konvinkaj. Li estis bonega fotisto, kaj sendube lin amuzis provi krei specialajn efektojn per sia fotoaparato.”

“Jes, tio ne mirigas min, mi atendis similan konkludon.”

Kelkajn metrojn for, la naĝemula kvaropo ial eksplodis per bruega rido. Ĝoja al ĝi ridetis, kvankam neniu el la grupo ŝin atentis.

“Kaj kion vi opinias pri la strangaj lumoj, kiujn multaj vidis, laŭdire?” demandis ŝia edzo.

“Mi ne prenas ilin serioze. Miskomprenataj naturaj fenomenoj, tute certe. Multaj eksperimentoj pruvis, ke oni perceptas grandparte laŭ tio, kion oni atendas, aŭ esperas, aŭ timas. Krome, personoj rakontas tiajn aferojn por senti sin interesaj, gravaj. Kelkaj sukcesas

sin trompi mem, aliaj konscias pri la mensogo.”

Refoje la kvar junaj homoj ekridis. El la konfuza bruo aŭdiĝis la esprimo “etaĵ verdaj estaĵoj”, sekvata de nova ridego. Nur Ĝoja turnis la okulojn al ili dum Karal komentis serioze:

“Vi pravas. Stefano probable min trovos neallaseble skeptika, sed mi kredos je eksterteranoj nur, kiam mi frontos unu vizaĝ-al-vizaĝe...”

La kajojn laŭlonge de Tjazo, kie Stefano nun paŝis kun la manoj enpoŝe, pentris rozaj la okcidenta suno, kaj la beleco de la Granda Ponto antaŭ li estis reliefigata de tiu milda lumo sunsubira kvazaŭ fare de magia artisto.

La junulo fajfis. Li estis plene feliĉa. La vespero belegis, li rapidis al unu el tiuj bonegaj manĝoj, kiujn nur onklino Ĝoja kapablas kuiri, kaj li havis kun si dokumenton, kiun Kara-Karal nur povos ĝui avide.

“Hm! Kia aromo!” li diris enirante. Kaj li tuj iris kuirejen.

“Estu bonkora,” onklino Ĝoja flustris, “ne torturu lin! Vi sukcesis voĉi tiel mistere ĉe la telefono, ke via onklo fariĝis neelporteble nerva. Kaj li...”

“Ha, Stefano!” Jano interrompis envenante. “Ĉu vi refoje blufis por aspekti impona?”

“Via detektiva moŝto, mi ne permesus al mi”, ironiis la junulo.

“Ĉio estas preta”, Ĝoja intervenis. “Ni tuj ĉetabliĝu kaj vi rakontos al ni dum la manĝo, ĉu konsentite?”

“Bone, bone, mi ne torture senpacienigos vian karulon”, Stefano diris kun tono de favordonanto. “Mi opiniis, ke por fariĝi policano, necesas havi ŝtalajn nervojn kaj neelĉerpeblan stokon da pacienco, sed mi videble eraris.”

“Grrr!” moke sovaĝis la onklo.

“Ne nur senpaciencajn, eĉ agresemajn oni elektas! Nu, nu, nu. Kia dekadenco! Kiam mi estis juna, policanoj sciis regi sin. ‘Eĉ ne unu muskoleto sur lia vizaĝo moviĝis’, oni diris pri ili epopeante iliajn heroaĵojn. Nu, nu, nu, nu. La socio ne plu estas, kia ĝi iam estis. La gardantoj de l’ publika bonordo – pardonu, detektiva moŝto, mian sanktavalajon, mi volis diri ‘publika bonordo’ – perdis la animan forton, kiu igis ilin famaj tra la mond.”

La triopo sidiĝis ĉetable.

“Ĉu vi aŭdis tiun muknazulon blufi pri sia aĝo?” Karal demandis la edzinon. “Ĉu vi aŭdis lin diri: ‘kiam mi estis juna’? Tute certe li simile blufas pri la gravega informo, kiun li anoncis al ni.”

“Tute ne, Kara-Karal,” la junulo rebatis, “kaj mi havas ĉi tie la dokumenton.” Li tiris paperon el poŝo.

“Kio estas?” Karal demandis serioziĝe.

“Letero de Joĉjo.”

“Ha! Kiel li fartas?” Ĝoja diris. “Ĉu plu sur la kariba maro?”

“Jes, li ŝipas riĉule de insulo al insúl, kun ĝusta ĝua ĝój.”

“Kion li faras en la Antiloj?” Karal scivolis.

“Onklo! Vi polico ĉiam mirigos min. Kian procedon vi uzas por ĉiam sukcesi esti tiel perfekte neinformitaj? Vi vere havas specialan talenton por eviti, ke la plej famaj famoj trafu vin!”

Jano ridis, sed ne tute ride.

“La tuta urbo scias, ke Joĉjo gajnis la unuan premion ĉe internacia konkurso pri elektroniko. Necesis solvi delikatan teknikan problemon, kaj prosperis al li.”

“Kaj la premio estis antila krozado”, klarigis Ĝoja.

“Ni policanoj estas eĉ pli stultaj ol vi imagas,” Jano diris, kaj ŝajnis, kvazaŭ vera humilo trasorbigus lian frazon, “ĉar mi tute ne komprenas, kiamaniere kariba Joĉjo povas sendi informojn utilajn al ni ĉi tie.”

“Sendube vi tro laboris lastatempe”, lia nevo respondis. “Mi ne rekonas vian kutiman viglan menson kun ties fama fulma komprenemo. Fakte, estas tute simple, li rakontas aferon, kiu okazis antaŭ lia foriro.”

“Kion?” streĉe unuvortis la onklo.

“Jen”, Stefano diris, kaj la unuan fojon lia voĉo plene seriozis. “Joĉjo aŭtomobilis per la veturilo de sia patro en Malpaz la 6-an de majo ĉirkaŭ la 8-a vespere...”

“Tio estas la tago, kiam mortis Verstrata kaj Pergame!” ekkriis la detektivo.

Stefano paŭzis kun la evidenta deziro intensigi la scisoifon.

“Feliĉe”, li fine daŭrigis, “la placo estas tre bone prilumata. Mi parolas pri la Platana Placo, kie li pasis. Kaj jen li vidis nenion alian ol...”

Li denove sin interrompis, pli kaj pli incite.

“Diru rekte, korpo de porko!” Karal preskaŭ koleris.

“...la aŭton de Bob Sulavi.”

“Ĉu li estas certa?”

“Jes, vi tuj vidos. Cetere, ĉu vi ne memoras, ke la kontraŭspiona ulo donis al ni precizan priskribon pri la aŭto kune kun ties platnumero?”

“Efektive. Kaj poste?”

“La veturilo estis haltigita, sed Sulavi sidis ĉe la stirrado. Joĉjo trovis tion stranga kaj decidis observi, kio okazos. Bedaŭrinde, li ne povis trovi lokon por restigi sian aŭton. Li rondiris la placon, serĉe al libera loko, kaj kiam li revenis tien, kie antaŭe staris la veturilo de Sulavi, ĉi-lastaj estis for. Joĉjo akcelis kaj tuj vidis la aŭtomobilon. Li decidis sekvi ĝin.”

“Kien li iris?”

“Al Rafunja.”

Ŝvebis momenta silento.

“Kien?” Jano ripetis, kvazaŭ li estus aŭdinta malbone.

“Al Rafunja. Bedaŭrinde estis nokto. Tie Sulavi perdiĝis en la naturo, t.e. Joĉjo ne sukcesis lin sekvi.”

“Domaĝe, sed tamen tio estas tre grava. Kioma horo estis?”

“Li skribis, ke estis la 20:47, kiam li eliris el la aŭto tie supre. La precizan horon li notis, kiel detektivo/spiono tute konscienca.”

“Ĉu li scias, kiom da tempo Sulavi tie restis?”

“Ne, ĉar Joĉjo devis reiri hejmen. Li devis prepari siajn pakaĵojn, ĉar jam la sekvantan matenon li forflugis al Trinidado, kaj li timis, ke liaj gepatroj maltrankviliĝos pro lia foresto. Li ne havis tempon telefoni, ke li sekvas Sulavin, kaj tie supre kompreneble ne troviĝas telefonbudoj. Li do decidis reveni Valĉefan. Sed tio ne estas ĉio.”

“Kio pli?”

“Li estis veturanta senlume por ne tiri al si la atenton de Sulavi. Estis sufiĉe luma nokto. Alvenante supre, li vidis de malproksime, ke Sulavi haltas kaj mem lasas la aŭton ĉe la enirejo de vojeto iranta en la pinarbaron. Nu, post kiam li vane serĉis Sulavin, revenante al sia aŭto, li ekvidis iun alian.”

“Kiun? Ĉu iun konatan?”

“Jes, Veronikan.”

“Diable! Sed ĉu li estas certa?”

“Jes, li bone rekonis ŝin. Li siatempe funde studis la foton ĉe la enmura monkaŝejo, kaj Veronika Munzo tie sub la brila luno faris ekzakte la saman geston volvante buklojn ĉirkaŭfingre.”

“Ankaŭ ŝi do tie estis! Ĉu kun Sulavi?”

“Ne. Ili ne estis kune, kiam li ŝin vidis. Cetere, estas ŝia malamiko ĉu ne?”

“Ĉu ili vidis Joĉjon?”

“Li estas certa, ke ne. Li zorgis, ke ili ne konsciis pri lia ĉeesto, kaj Joĉjo tiom legis da spionromanoj, tiom ludis indianojn, ke li kapablas sekvi iun laŭspure kaj tute ne perfidi sin. Eble pro troa singardo li ne sukcesis sekvi Sulavin. Domaĝe, ke li devis forveturi, ĉu ne?”

“Kaj kion Joĉjo opinias pri la morto de la pentristo kaj de ties edzino?” la onklino demandis streĉe.

“Joĉjo? Nenion. Li ne scias, ke ili mortis.”

“Kiel...?” ŝi komencis demandi, sed ŝi tuj komprenis.

“Efektive,” ŝi plu diris, “se li foriris la morgaŭon, li ne povus scii. La karibaj gazetoj certe ne raportis tiun afereton. Aŭ ĉu Verstrata estis tiel universale konata?”

“Mi ne scias, sed mi konas Joĉjon sufiĉe por diri al vi, ke li verŝajne tute ne legas gazetojn tie. Krome, mi ne skribis al li, ankaŭ ne liaj gepatroj, ĉar ni ne scias lian adreson. Li ŝanĝas la lokon ĉiutage, kaj li forveturis tiel kurege, ke li forgesis lasi al ili eĉ sian vojaĝplanon.”

“Feliĉe, ke li jam rakontis al vi ĉion letere.”

“Jes, li opiniis la aferon grava, ĉar Rik falis de la Rafunja-teraso, kaj estis ia rilato inter li, Sulavi kaj Veronika Munzo. Tial li nepre volis enmeti en la leteron kiel eble plej multe da akurataj detaloj.”

“Interesege, interesege!” Jano varmvoĉis. “Ni do nun scias, ke proksimume je la tempo, kiam Gido Verstrata kaj Laŭra Pergame mortis en Rafunja, surloke troviĝis niaj du spionoj! Tiu informo estas ekstreme valora, sed bedaŭrinde ne helpas! Al kiu nova vojo ĝi kondukos nin?”

“Al la solvo, eble”, optimismis Stefano.

“Eble jes”, Karal diris penseme.

*

Bob Sulavi gratis al si la nazon, gratis al si la harojn ĉe la nuko, rigardis siajn ungojn kun dubema esprimo, kaj fine levis la okulojn al Karal.

“Mi sekvis iun”, li simple diris.

“Kiun?” la detektivo demandis, kun tiu sia amik-ama tono, kiu stimulas konfidencecojn.

“Ekterordinaran virinon.”

“...kies nomo estas...”

Li regratis sin ĉe-nuke.

“Veronika Munzo”, li fine diris levante la ŝultrojn.

“Kial vi ŝin sekvis?”

“Ĉar mi amas ŝin. Mi pasis tra Malpaz kaj vidis ŝian aŭton restigitan ĉe Platanplaco. Feliĉe troviĝis libera loko, kie mi povis meti mian, kaj observi. Mi hezitis, ĉu mi alparolos ŝin, kiam ŝi revenos al ĝi, aŭ simple ŝin sekvos... Mi decidis sekvi ŝin, ĉar... tio... Kiel bela ŝi estas!” li abrupte diris anstataŭ daŭrigi la frazon, kaj li profunde ĝemspiris.

“Ĉu longe vi atendis?”

“Mi ne scias. Ĉu jarcentojn? Ĉu sekundojn? Mi revis pri ŝi. Mi estis senpacienca, kaj mi estis ege pacienca. Mi farus ion ajn... Nu, jen ŝi elvenis el flanka strato kaj eniĝis en la aŭton. Mi veturis post ŝi.”

“Kaj kien vi iris?”

“Al Rafunja.”

“Kion vi faris tie?”

“Mi provis sekvi ŝin, sed ŝi elektis vojeton ne tre videblan... Estis hela nokto kun bela luno, sed ankaŭ multaj nuboj. Kiam nubeto pasis antaŭ la luno, subite fariĝis mallume. Tio okazis ĝuste, kiam ŝi ekiris la vojeton kaj mi ŝin perdis.”

“Kaj kio poste?”

“Poste mi vagadis serĉe al ŝi, sed ŝin ne trovis. Mi do revenis hejmen.”

“Post kiom da tempo?”

“Mi ne scias. Mi ne rigardis mian horloĝon. Mi travivis tion kvazaŭ sonĝe. Mi enlitiĝis kvazaŭ sonĝe. Kelkfoje mi preskaŭ min demandas, ĉu ne estis entute sonĝo. Ĉio estis tiel nereala! Mi estis en stranga stato, revema, kvazaŭ hipnota...”

“Kial vi ne informis nin, kiam vi eksciis, ke du personoj mortis teruran morton tie je proksimume la sama tempo?”

“Mi ne scias. Mi ne rigardis mian horloĝon. Mi travivis tion kvazaŭ sonĝe. Mi enlitiĝis kvazaŭ sonĝe. Kelkfoje mi preskaŭ min demandas, ĉu ne estis entute sonĝo. Ĉio estis tiel nereala! Mi estis en stranga stato, revema, kvazaŭ hipnota...”

“Kial vi ne informis nin, kiam vi eksciis, ke du personoj mortis teruran morton tie je proksimume la sama tempo?”

“Kiel mi povus scii pri la tempo? La gazetoj neniam diris, je kiu horo nek je kiu tago ili mortis: tio estas polica sekreto, aŭ polica nescio. Ĉu vere ili mortis tiunokte? Brrr... tio igas min frosttremi!”

“Kaj vi ne volus suspekti vian Veronikan, ĉu?”

“Prave, prave, sinjoro. Mi havis pri ŝia ĉeesto tie plej terurajn ideojn...”

“Kion vi suspektis?”

“Jes”, la alia respondis penseme kaj sence, dum Karal miris pri la stranga lumo, kiu tiumomente briligis al li la okulojn. Kaj pli mallaŭte, kvazaŭ timante aŭdi la propran frazon, Bob aldonis:

“Rendevuon kun kosmoŝipanoj”.

*

Veronika Munzo montriĝis singarda.

“Verŝajne policanoj estas t.n. realismuloj. Vi do ne komprenos min”, ŝi diris.

“Ni havas menson eble pli malfermitan ol vi imagas”, rebatis Jano. “Klarigu do.”

“Fakte, estas simple”, ŝi ridetis. “Anino el la NIFO-Klubo anoncis, ke elkosma veturilo alteriĝos en Rafunja, mi volis iri kaj vidi mem.”

“Kiel ŝi sciis?”

“Ŝi ricevas mesaĝojn el la kosmo. Ŝi estis bona amikino de Rik.”

“Kiamaniere ŝi ricevas la mesaĝojn?”

“Telepatie.”

“Kiel ŝi nomiĝas?”

“La familian nomon mi ne konas. Ni nomas ŝin Lizabeta.”

“Ĉu vi vidis ion en Rafunja tiunokte, la 6-an de majo?”

“Ne. Mi vidis strangan lumon, sed kosmoŝipon ne vidis.”

“Kian lumon?”

“Mi estis en la pinarbaro, ŝajnis, ke ie tre proksime estas nekutima lumo, sed eble mi misperceptis.”

“Je kioma horo vi estis tie?”

“Mi alvenis inter la oka kaj duono kaj la naŭa.”

“Kaj kiom longe vi restis?”

“Tri kvaronhorojn. Mi intencis resti pli longe, sed mi stulte ne antaŭvidis, kiom malvarmos tie supre. Mi frostis kaj revenis hejmen. Eble la kosmoŝipo tamen venis pli poste. Mi ne scias.”

“Kie precize vi estis?”

“Mi momente perdiĝis inter la pinarboj, kaj tiam mi vere timis, ĉar misorientiĝi nokte en arbaro estas sperto tre angora. Sed bonŝance mi retrovis la vojon. Mi ĉefe estis sur la vojo de la t.n. teraso. Mi konsideris la ideon desupri al la ebenaĵo, kie laŭdire la kosmoŝipoj alteriĝas, sed mi ne kuraĝis iri tiun vojon dumnokte, ĉar estis al mi tre malvarme, mi do reveturis hejmen.”

“Ĉu vi vidis aŭ aŭdis ion, kio povus helpi al nia enketo pri la duobla morto?”

“Ne. Se jes, mi estus informinta vin. Okazis nenio speciala, dum mi estis tie supre.”

“Kial vi ne opiniis saĝa tamen sciigi al la polico, ke vi estis tie proksimume kiam tiuj du mortoj okazis?”

“Mi ne scias, kiam la mortoj okazis. Ĉu vi konas la ĝustan tempon?”

Karal ne respondis.

“Mi vidis nenion, aŭdis nenion, mi ne povus kontribui ion ajn al via esploro. Mi bedaŭras...”

Li forlasis ŝin.

‘Eksterordinare,’ li pensis survoje al la centra policejo, ‘fermitaj kiel ostroj ili estas. Eble ili diris la veron. Sed ankaŭ eblas ke...’

Eĉ kun la montoŝuoj ŝi sukcesas beli, Bob pensis, dum li paŝis malantaŭ Veronika laŭ kruta arbara vojeto. Alia persono, rigardanta de malantaŭe la junan virinon kun ŝiaj dorsosako, kruda pantalono kaj dikaj ŝuoj iom altakolaj, preskaŭ certe ne konsentus, kaj vidus en tia opinio plian pruvon, ke pasio blindigas. Sed amo estas amo, kaj ĝi ofte vidigas realan belon, kiu al neamantoj restas plene kaŝita.

“Via vico!” ŝi diris, direktinte okulon al sia horloĝeto, kaj ŝi deprenis la sakon. Bob surdorsigis ĝin.

“Ĉu ne laca?” li demandis.

“Tute ne. Sed la nuboj min zorgigas.”

Li turnis la kapon ĉielen. La tago, kiu komenciĝis senmakula, ŝajnis rapidi al fulmotondro.

“Danne!” li sakris. “Ĉu estas saĝe plu alsupri?”

“Mi dubas,” ŝi respondis, “sed alvali ne estus pli prudente. Ĉu vi konas la rifuĝkabanon de Grizalúp? Devas esti pli malpli je ĉi tiu alteco, sed kiel ĝin atingi mi ne scias.”

“Mi tuj rigardos, ni haltu momenton”, li diris prenante el sakpoŝo mapon kaj kompason.

Post unu horo ili ekvidis la lignan primitivan ŝirmejon. Komencis pluveti.

“Ni estas relative bonŝancaj, ke ne pluvis ĝis nun, sed ni tamen ne atingos la rifuĝejon antaŭ dek minutoj”, Bob komentis, dum li elsakigis la faldeblajn pluvbluzojn.

“Ĉu ni kuru?” ŝi proponis, sin kapuĉante.

Ili kuris. La pluvo fariĝis densa kaj peza, kaj apenaŭ ili puŝis la pordon de l’ kabano, jam tondro vibrigis la tutan montaron.

“Ĝustatempe!” ŝi vortis, kun tiu dolĉa rideto, kiu ĉiufoje fandis al li la koron.

Dum ili forprenis la pluvbluzojn, Bob pensis: Jen venis la momento. Li estis sugestinta tiun montan ekskurson kun la intenco krei favorajn kondiĉojn por konfesi al ŝi sian apartenon al CIA, demandi pri ŝia KGB-aneco, kaj decidi pri ilia estonteco. La decido estis firma en li, sed nun, kiam la tempo ĝin plenumi alvenis, speco de ŝtopa bulo formiĝis engorĝe, kaj li sentis sin senhelpa.

“Kial vi gapas al mi kiel vendota fiŝo?” ŝi demandis, kaj la humuraj okuloj pardonigis la

ofendan frazon.

“Mi... flms... blk... e... e...” li balbutis.

“Ha jes! Mi komprenas, vi volas diri, ke vi amas min, ĉu ne?” ŝi interpretis, ĉerpante scion el precedencoj. Sed li energie kapneis.

“Kion? Ĉu vi ne amas min?” ŝi demandis duonpetole duonzorge.

“Jes, sed... gblks... umf...” La gorĝo ne malstreĉiĝis.

“Vi amas min, sed ne tion vi volas diri?”

Li ĵetis al ŝi rigardon de bonvola, sed senkonsila hundo. Fulmo sekunde lumigis la ejon, kaj ektondris.

“Se vi estas kvazaŭ paralizita laringe, tio signifas, ke vi volas komuniki al mi ion gravan, ĉu ne?” ŝi sugestis.

“Grv...” li respondis danke kaj kapjese. Li volis diri “grava”, sed nur “grv” eliĝis, kvazaŭ li parolus per hebrea aŭ araba skribo, senvokale.

“La grava afero pri vi kaj mi estas ke vi min amas kaj mi vin, sed ne tion vi klopodas pritrakti.” Ŝi paŭzis, dum rebruegis tondro.

“Do,” ŝi daŭrigis, “temas pri la dua grava afero rilata al ni, nome, ke vi estas kunlaboranto de CIA.” Ŝi diris tion, kvazaŭ temus pri la plej banala natura fenomeno, kvazaŭ ŝi dirus ‘strange, fulmotondro ĉi-sezone’, sed al li efikis tiel ŝoke, ke li ne sciis, ĉu li aŭdis ĝuste, aŭ ĉu fulmo ĵus trafis la kabanon. Tamen la ŝoko iom sanigis lian voĉparalizon.

“Ki... ki... kiel vi...?” li balbutis.

“Kian mienon vi faras! Ĉu la ĉielo falis al vi sur la kapon?” Ŝi ridis plengorĝe mirindan, arĝentan ridon.

“Kogobokogobo”, li elgargaris, sed li sentis, ke la povo paroli revenas. “Ĉu kadre de viaj KGB-funkcioj vi eksciis?”

Li atendis miron, eksalton, akran surpriziĝan komenton, eble eĉ furiozan aŭ humiliĝan reagon, sed ŝi nur ĵetis al li karesan, teneran rigardon, dum ŝi ameme murmuris: “Bob!”

Fulmo falis tiel proksime, ke skuiĝis la pordo, kaj ambaŭ retenis dum sekundo la spiron. Kiam ili reparolis, du voĉoj sonis samtempe.

“Vi do sciis!” la ina krietis.

“Ĉu mi faru kafon?” la vira proponis, kaj Sulavi komencis aranĝi lignon en la kameno.

Post nelonge ili ĝuis varmegan kafon kaj dikajn sandviĉojn. Similaj cirkonstancoj ĉiam akrigis la apetiton de Bob, kaj vidi lin manĝi efikis al ŝi imite.

La enkamena fajro, la pluvego ekstere, la plaĉa konsumo de l' resto de l' pikniko tagmeza kunformis etoson aparte taŭgan por konfidencoj, kaj tute nature, sen plua ĝeno, ili komencis rakonti unu al la alia sian spionan vivon. Al la sento de kor-ĉe-kora intimeco laŭgrade miksiĝis komforta senpeziĝo, kiu por ambaŭ valoris pli ol la plej riĉa diamantejo.

“Ĉu vi scias de longe, ke mi laboras por CIA?” li demandis.

“Jes. Unu el miaj ‘kontaktoj’ tion sciigis al mi. Kaj vi, de kiam vi konas mian kromlaboron?”

“Ekde tiu tago en Valmu. Mi vidis mesaĝon en via mantelo. Mi tuj rekonis la kodon.”

Maĉ, maĉ, maĉ, sonis la makzeloj, dum ambaŭ pripensis.

“Kion ni faru, viaopinie?” diris Veronika.

“Ni devas eliĝi, aŭ la vivo estos por ni nevidebla. Kial ne ĉion konfesi al la kontraŭspiona servo? Niaj scioj valoras, se ne monon, almenaŭ senpunecon. Mi estas certa, ke ili ĝin havigos al ni.”

“Sed ĉu niaj dungintoj ne volos nin likvidi?”

“Tion mi antaŭe opiniis, sed pripensu, kial ili farus tion?”

“Por instigi aliajn kunlaborantojn gardi sin kontraŭ simila perfido.”

“Ne estus tiel facile. Se ni konfesos, la kontraŭspiona servo tuj atentus pri eventuala akcidento aŭ malapero de unu el ni. Ĝi faros taŭgan enketon, kiu povus esti nur ĝena por la grandaj potencoj, kiuj varbis nin. Tiuj preferos akcepti, ke ili perdis du agentojn, kaj ili rapidos reorganizi siajn retojn por korekti niajn maldiskretaĵojn. Ne estus laŭ ilia intereso malaperigi nin. Se ni estus gravuloj, eble, sed fakte ni ambaŭ estis tre subaj kunlaborantoj. Ni ne scias ion vere danĝeran.” Kaj kvazaŭ por emfazi lian frazon, tondro longeĥe tamburis.

Veronika metis manon sur lian genuon kaj turnis al li vizaĝon kvazaŭ lumigitan per senfino da dolĉeco.

“Bob,” ŝi diris mildavoĉe, “kiel agrable estas vin aŭskulti! De jaroj kaj jaroj mi sopiras aŭdi ion similan.”

“Ne plaĉis al vi via laboro por KGB, ĉu?”

“Ne, absolute ne.”

“Kial vi ĝin faris?”

“Mi ne havis elekton. Foje, mi stulte kuŝis kun bela oficiro el ilia lando. Lia intereso al mi min flatis, fierigis. Mi sentis min supera al miaj kamaradinoj pro tiu am-aventuro kun gravulo el iom ekzotika potencego. Fakte, ĉio – inkluzive de lia “amo” al mi – estis antaŭplanita, pro la simpla fakto, ke mia patro estas staboficiro kaj mia frato altrangulo en Ordo kaj Disciplín, la movado plej bone informata pri ĉio ĉi-landa, ĉu ne? Fotisto troviĝis kaŝita en apuda ĉambro kaj ĉion fotis tra iu truo. Ne daŭris longe antaŭ ol iu vizitis min, montris la fotojn, kaj minacis vidigi ilin al mia patro, se mi rifuzos kunlabori. La unua tasko estis tiel simpla, ke mi tuj akceptis. Ne estis proporcio inter la facila komisiono kaj la risko, ke mia patro vidus... Rigardi min sur tiuj fotoj estis terura sperto por mi. La oficiro intence prenis kaj prenigis al mi pozojn plej obscenajn. Mi sentis min reduktita al la nivelo de besto. Mi aspektis putine. Neniam mi tiom hontis en mia vivo. La ideo, ke mia patro povus vidi... La fotoj fizike naŭzis min... Mi pretis fari ion ajn por tion eviti.”

“Kompatinda!” Bob diris tenere, plu metante kelkajn pecojn da ligno en la fajron.

“Post tiu unua tasko venis dua, kaj tria, kaj kvara, ktp, ĉiam pli kaj pli nelegaj. Mi sentis min kaptita. Mi akceptus, ke ili montru la fotojn al miaj patro kaj frato, se tio povus liberigi min, sed tiam ili minacus denunci miajn nelegajn agojn...”

“Kaj nun, ĉu vi ne plu timas?”

“Ne plu. Pro vi, verŝajne. Estas tute neracia reago, mi konscias. Sed ial mi fidas vin. Mia instinkto diras, ke vi estas fidinda, eĉ se mia racio konsilas singardon.”

Pli ol iam ajn antaŭe Bob sentis sin portita al kulmino de feliĉo. Neniam li estus imaginta, ke homa voĉo povus regali lin per tiom da profunda anima plenkontento. Li ne vidis la fulmojn, li ne aŭdis la tondron, la pluvo ne plu ekzistis; post longa naĝado en ŝtorma oceano, jen li trafis florplenan insulon; post longa vagado en dezerto, multfontana oazo lin akceptis. Kara, kara, kara ŝi estas. Li ŝin kisis.

“Kion vi faros, se ili rakontos al via patro?” li demandis, dum ŝi provis reakiri spiron.

“Mi klarigos la veron. Mia patro eble ne komprenos, ĉar li estas maljuna oficiro, iom patrujame rigida, sed tio estos lia problemo, ne mia. Kaj eble li tamen komprenos. Eble mi imagas lin malpli homa ol li efektive estas. Sed eĉ se li furiozos, kiel kompari tiun malagrablajn kun tuta vivo sen vi, kun tuta vivo krome direktata de fremda lando al riskaj entreprenoj?”

“Jes. Vi pravas. Tial ankaŭ mi decidis konfesi.”

“Ĉu ankaŭ vin ili varbis ĉantaĝe?”

“Ne. Mi... Estas malfacile diri. Mi estis speco de naiva idealisto, kiam mi komencis. Tiuepoke, por mi, la mondo estis dividita en du homspecoj, la bonaj kaj la aĉaj. Mi volis helpi la bonajn. Fakte, miamense, tiu agado estis pli sporto ol io ajn. Mankis spico en mia vivo. Labori por CIA enmetis en ĝin elementon de risko, de intereso, de aventuro...”

“Kiu estis viaj taskoj?”

“Ĉefe manipuli la informadon, sed ankaŭ aliajn mi havis: serĉi dokumentojn – cetere, ofte laŭleĝe haveblajn; ili uzis min, ĉar estis pli facile pere de mi ol alimetode – aŭ elpumpi informojn de tiu aŭ alia ulo. Eble pli laŭleĝaj agoj ol viaj, sed etike ne pli bonodoraj. Strange, la moralan flankon mi neniam atentis, antaŭ ol renkonti vin, kvankam mi ne povas klarigi al mi kial...”

Same subite, kiel ĝi estis alveninta, la fulmotondro malaperis. La nigraj nuboj fuĝis for, la komence timema peceto da bluo ĉiela kreskis kaj kreskis, kaj la du ekskursantoj eliris el la rifuĝkabano.

“Ho! Via sulko!” Sulavi ekkriis, mire rigardante la amatan.

“Kion? Pri kio vi parolas?” ŝi demandis nekomprene.

“Sur via frunto, la sulko, la eterna sulko malaperis!”

“Ĉu vere?”

“Tion ni devas festi!” li diris. Kaj, kiel granda frato, li kisis ŝian frunton.

Izabela, la polica referencistino, slipkolektantino, ĉiotrovistino, ĉi-foje ne sukcesis. Ŝi telefonis, telefonis, telefonis al ĉiuj eblaj informantoj. Ŝi traserĉis dokumentojn, leterojn, slipojn, dosierojn. Vane. Neniu povis doni tiel minimuman informon, kiel la familian nomon de la junulino, kiu anoncis al Veronika Munzo la alteriĝon de la kosmoŝipo. Lizabeta estis Lizabeta, kaj nenio pli.

La sorto fojfoje ironias. Se Izabela – aŭ Karal – demandus Stefanon, ili tuj ricevus la tiel malfacile troveblan respondon. Sed kiel ili povus scii, ke li scias? Stefano ja plurfoje menciis la serĉatan virinon, sed neniam laŭnome – li uzis esprimojn kiel “la amatino de Joĉjo”, “la barelforma ino, al kiu Joĉjo enamiĝis” aŭ “la fortika specimeno, kiu...” – kaj li neniam parolis pri ŝiaj songaj mesaĝoj. Krome, ĉar la ferioj nun jam finiĝis, la juna studento disponis multe malpli da tempo, tiel ke li ne havis okazon paroli kun sia onklo post kiam ĉi tiu pridemandis Veronikan kaj decidis informiĝi pri Lizabeta. Ankaŭ li do ne imagis, ke la onklo ne scias, kaj ke vane serĉas Izabela...

“Oj! Tiuj junuloj!” Izabela grumblis. Sed eĉ en ŝia propra familio estas geknaboj, kiuj tre amike rilatas al tiu aŭ tiu ĉi, sed scias pri li nenion alian ol la individuan nomon. Ili retroviĝas en kafejoj aŭ klubejoj, aŭ eĉ ĉe manifestacioj, aŭ ankaŭ sur tereno sporta; ili diskutas, kunludas aŭ amindumas, sed neniam scias pli ol tion, ke la alia nomiĝas Paŭlo aŭ Berta, Ivano aŭ Johán, kaj ke li aŭ ŝi estas simpaj, kiel ili diras, ĉar diri “simpatia” plenvorte estus tro lacige por tiu mallaborema generacio.

“Oj! Junuloj!” ŝi ripetis. Tiu vivmaniero ege komplikas la laboron de polica referencistino. Se ili almenaŭ scius la adreson, aŭ laborlokon, aŭ profesion! Estus tro bele. Berto, Paŭla, Johana, Iván, ili estas simpaj, necesas nenio pli.

Veronika Munzo konis nur la individuajn nomojn de la membroj el la tuta grupo, kiujn ŝi tamen pli malpli ofte renkontis. Feliĉe, dank’ al diversaj paciencaj esploroj, Izabela sukcesis trovi kelkajn identigajn detalojn pri du anoj el la rondo, en kies babilado Lizabeta abunde partoprenis. Karal iris ilin viziti.

La unua estis skelete maldika junulo alta eble 1,75 metron. Li aspektis kvazaŭ li neniam manĝus, kaj liaj bukaj haroj ŝajne ne ofte perceptis la kontakton kun ŝampo. Kun malalta frunto, profunde lokitaj okuloj, nemulte da retiriĝanta mentono, torso preskaŭ diafana, li impresis, kvazaŭ li facile rompiĝus.

Tamen, en la rigardo brilis lumo tre arda, kies intenseco preskaŭ ĝenis. ‘Se mi havus filon kiel li, ni travivus teruran konflikton generacian’, Karal pensis. Kaj li aldonis enmense: ‘kaj mi certe estus maljusta’. Ĉiam malplaĉis al li, kiam li frontis al propra antaŭjuĝo.

“Lizabeta?” la junulo ripetis per kaverneca voĉo surprize basa. “Ho jes, mi bone konas ŝin.” En Karal ekvibris espero.

“Bone, vi do povos diri al mi, kiel ŝi nomiĝas, kie ŝi laboras aŭ studas, kaj kie estas ŝia loĝejo”, li diris optimisme.

Lia atendo estis tuj trompita.

“Ho ne, mi vidas ŝin ofte, sed tiujn aferojn mi ne scias. Tamen mi povas priskribi ŝin al vi, kaj mi opinias, ke ŝi estas stenotajpistino ie. Ŝi estas sportema, iom tro bicepsa por mi. Ĉevalrajda tipo. Ĉu vi komprenas?”

“Ĉu ŝi efektive rajdas?”

“Ne. Aŭ jes. Mi ne scias. Sed ŝi estas tia tipo. Ŝi verŝajne faras longajn ekskursojn en la naturo, sur la montoj. Ŝi povus esti flegistino”, li aldonis, ne tre kompreneble. Ial Jano ekpensis, ke tiu junulo fumadas haŝiŝon.

“Ĉu vi ofte renkontas ŝin?”

“Ho, ofte, neofte. Eble ĉiusemajne? Ni renkontiĝas en kafejo Garagán, sur Urbodoma Placo. La malnovaj amikoj de Rik.”

“Mi aŭdis, ke ŝi ricevas mesaĝojn de eksterteranoj? Ĉu estas vere?”

“Ĉu vi kredus tian fabelon?” La junulo rigardis Janon ironie. “Ne. Ŝi estas kara estaĵo. Melankolia. Sed ŝi estas iom tro revema por mia gusto.”

“Vi do ne kredas je ŝiaj mesaĝoj, ĉu?”

“Ne. Mi firme kredas je eksterteranoj. Mi estas certa, ke nia planedo estis ofte vizitata. Mi kredas je tio, kion la publiko nomas flugantaj teleroj. Se oni studas la dosieron, ne estas eble eviti tion kredi. Fakte, tio ĉiam frapis min, ke la kontraŭuloj ne konsideras la faktojn, ili eliminis ilin, pretervaporigas.”

Karal sentis, ke lia komenca antaŭjuĝo pli kaj pli forfalas. Li pensis, ke tiu diro pri faktoj validus ankaŭ pri multaj policaj enketoj.

“Do, laŭ vi, la faktoj estas nedubeblaj, ĉu?” li prononcis, por instigi la alian paroli plu.

“Jes. Kaj la plej impresa fakto estas la rifuzo konsideri la faktojn fare de la t.n. scienculoj aŭ realistoj. Mi do kredas je la ekzisto de tiuj aliplanedanoj, kaj eble estas vere, ke Rik havis kontakton kun ili. Kial ne? Pluraj personoj vidis strangajn flugaĵojn aŭ lumojn en la najbareco de Rafunja. Kaj tio estus ideala loko por eksterteraj estaĵoj, ĉu ne? Tute izolita, krom la

dometo de l' pentristo, tiel ke ili povas tute trankvile alteriĝi.”

“Kiel Lizabeta ricevas la mesaĝojn?”

“Songe. Kaj pro tio mi ne kredas ilin. Ŝi asertas, ke temas pri telepatia transsendo. Sed tion mi ne povas akcepti. Se eksterteranoj volus komuniki kun ni, ili ne elektus personon tiel stultan.”

“Ĉu vi trovas ŝin stulta?”

“Eble estas iom troige uzi tian vorton, sed ŝi estas malsaĝa, ne tre inteligenta knabino. Ne matura, malgraŭ siaj tridek aŭ kvardek jaroj da vivo. Ŝi asertis, ke Rik vizitis ŝin dumsonĝe, diris, ke ekzistas vivo transmorta, ke li troviĝas en eksterordinara loko, ke la ‘eksterteranoj’ estas tute alia afero ol ni imagas, ke ili venas ne de ie en la spaco sed de ie en la tempo, kaj ke kelkaj el ili venos al Rafunja tiun difinitan nokton.”

“Ĉu ŝi diris tion al la grupo?”

“Jes, ĉe Garagán. Mi pretas kredi, ke ŝi tion songis, ŝi estas tute kapabla songigi al si ion similan. Sed mi rifuzas konfuzi tion kun aŭtenta mesaĝo. Tial mi ne iris.”

“Ĉu iuj diris, ke ili vizitos Rafunjan tiunokte?”

“Ho jes, estas kelkaj fanatikuloj kiel ŝi. Tri aŭ kvar diris, ke ili iros, sed mi dubas, ĉu ili havis la kuraĝon. Fari tiun longan vojon nokte...”

“Kiu ili estis?”

“Mi ne memoras ekzakte. Verŝajne Ksandro, Lina kaj Samuel. Eble ankaŭ Veronika kaj Delja. Mi ne memoras.”

“Ĉu vi konas iliajn familiajn nomojn kaj adresojn?”

“Tute ne, sed mi scias, ke Ksandro laboras en la vojaĝagentejo Transvetúr.”

“Do estas Aleksandro Gavin”, Jano diris konsultante la notojn preparitajn de Izabela.

“Povas esti”, la nur-ostulo respondis.

“Kion vi opiniis, kiam vi eksciis, ke en tiu sama nokto okazis la falo de Gido Verstrata kaj Laŭra Pergame?”

“Ĉu ĝi okazis en tiu nokto? Mi ne sciis. Des pli kontenta mi estas, ke mi ne iris, kaj mi kompatas la amikojn, kiuj eble iris tien! Vi ilin suspektos!”

“Ĉu vi scias, ĉu iu efektive iris?”

“Ne. Neniu menciis tion antaŭ mi, kaj mi ne demandis.”

“Ĉu vi ne trovas stranga, ke Lizabeta dufoje anoncis aferojn, kiuj montriĝis veraj?”

“Ĉu veraj? Mi ne komprenas vin.”

“Mi min malbone esprimis. Mi volas diri nur, ke dufoje ŝi atentigis pri Rafunja. Unuafoje okazis la morto de Rik, duafoje tiu de la artista paro. Ĉu ne strange?”

“Mi ne scias, kiu informis vin,” la knabo respondis kun ia perceptebla malestimo, “sed tiu ne respektis la faktojn. Lizabeta foje diris tute malprecize, ke iam eksterteranoj faligos iun en Rafunja. Iom poste Rik falmortis. Jes. Sed ne estas iu pruvero, ke kulpas eksterteranoj, kaj ŝi neniam donis veran precizigon, kiel daton, ekzemple. Antaŭvidi, ke iu tie falos, ne estas malfacile. Ĉiu, kiu vidis tiun vojeton laŭrande de la klifo scias, ke de tempo al tempo iu tie falas. Ne povus esti aliel, ĉu? Estas skandalo, ke la aŭtoritatoj faris nenion por protekti la vizitantojn!”

“La kaŭzo simple estas, ke ne estas vizitantoj”, Karal respondis, sed la junulo ne aŭskultis lin.

“La duan fojon ŝi ne anoncis morton, nur viziton de uloj el alia mondo. Pri tia vizito neniu scias ion ajn. La faktoj do ne kongruas. Sed plej grave estas, ke ŝi anoncis tiom da aferoj, ke kelkfoje necese io realiĝas. Ŝi anoncis ankaŭ, ke okazos ŝtormoj, militoj, granda politika manifestacio, altiĝo de la dolaro kaj similaj aferoj, kiuj tute ne okazis. Fakte ŝi eĉ anoncis, ke Rik faros brilan politikan karieron! Homoj kiel Lina aŭ Samuel forgesas ĉiujn ŝiajn malĝustajn prognozojn, reliefigas la du malprecizajn, kiuj pli malpli ekrilatis kun io vera, kaj admire konkludas: ‘Tamen, Lizabeta ricevas mesaĝojn el alia mondo, kiuj realiĝas.’ Sensenculoj! Ili tute ne havas prudentan aliron al la faktoj!”

Karal adiaŭis la malgrasan junulon, promesante al si, ke li petos Stefanon venontsemajne viziti tiun rondon ĉe Garagán, kaj ke dume li kontaktos (Ale)Ksandron.

Tiun li trovis ĉe la turisma agentejo.

Ksandro altis preskaŭ same, kiel la ĵus vidita, sed li aspektis tute aliel. Li havis largajn ŝultrojn, largan kapon. Li donis entute impreson de denseco, kvazaŭ multe da energio, efike uzebla, ekloĝis koncentrite en lia korpo. Ankaŭ ĉe ĉi tiu la okuloj rigardis intense, kun nuanco de verdo malofte vidata.

Bedaŭrinde, la pridemandado ne estis pli frukta ol ĉe lia antaŭulo. Ksandro komence intencis iri al Rafunja, sed ju pli li pripensis, des malpli li fidis la seriozecon de Lizabeta. Finfine, li

decidis ne iri, kaj tion ne bedaŭris. Li ne sciis, ĉu iu alia el la grupo tien alsupris.

Pri Lizabeta, li povis nenion diri, nur ke ŝi venas regule al la rondo ĉe Garagan, kaj regule vizitis la kunvenojn, kiam Rik ankoraŭ vivis. Li konsideras ŝin iom malsaĝa: ŝia intereso pri eksterteranoj estas pli superstiĉa ol ĉe la plimulto, kvankam ŝi tute ne estas sola tiurilate. Delja kaj Samuel, ekzemple, vidis misterajn signojn en tre prozaj okazaĵoj. Li ne sciis, kie ŝi laboras, nek kio estas ŝia familia nomo aŭ ŝia adreso. Same pri Delja, Samuel, Lina kaj la aliaj. Nur kafejaj renkontatoj ili estas. Ke tiuj junuloj ne intencas kaŝi ion ajn al la polico povis konkludiĝi el la fakto, ke Ksandro proponis al Karal veni mem al la venonta kunveno ĉe Garagán...

Jano Karal longe diskutis la lastajn malkovrojn kun leŭtenanto Remon, kaj poste kun sia edzino Ĝoja. El tio rezultis, la sekvantan tagon, telefon Alvoko al la episkopejo.

Okazis pluraj telefonaj komunikoj inter la policejo kaj la episkopa sekretario, kaj inter ĉi-lasta kaj pastro Varga el Sankta Monika.

La morgaŭon aperis en ĉiuj gazetoj de Valĉefa kaj eĉ en kelkaj tutlandaj jena stranga anonco: “Se la nomo de la persono, kiu parolis kun pastro Varga, en la preĝejo Sankta Monika la 15-an de majo je la 17-a, komenciĝas per la literoj RS aŭ VM, tiu persono estas urĝe kaj insiste petata rekontakti la saman pastron.”

*

“Ĉi tie parolas pastro Varga, el Sankta Monika,” diris varma voĉo en la telefonon, “via rezono estis ĝusta, kaj ŝi konsentas vidi vin.”

Remetante la telefonan aŭdparolilon, Karal ridetis plezure. Nun li vere ekscios ion klarigan.

*

“Mi estis viktima al ĉantaĝprovo”, diris Veronika Munzo. “Mi konsideris la ideon paroli al policano, al vi fakte, ĉar mi trovas vin simpa, sed mi timis, ke vi ne kredos min, ial la sento pri ĉantaĝo teruris min, kaj mi pensis, ke plej bona sistemo estas konfesi al pastro.”

“Kiu provis ĉantaĝi?” Jano prononcis kun sia konfidinspira mieno.

“Mi ne scias,” ŝi respondis, “la afero okazis telefone. Voĉo diris al mi... Sed verŝajne pli plaĉos al vi aŭdi la bendon.”

Ŝi rigardis al Karal kun ega fiero, kvazaŭ ŝi atendus gratulon, sed la policano nur okulumis kun amuziĝa rideto:

“Jes, por spionino, estas saĝe surbendigi ĉiun telefonan interparolon.”

Se fulmo trafus ŝin, Veronika ne aspektus pli idiotigita. Ŝi gapis kun la esprimo de iu, kiu sin demandas, ĉu li sonĝas aŭ ne.

“Mi, spiono? De kie vi prenis tiun fantazian akuzon?” ŝi fine akre demandis.

Karal plu ridetis.

“Ni scias”, li diris simple.

“Mi spiono!” ŝi ripetis kun strange miksitaj sentoj. Kiam ŝi rekomencis paroli, ŝia voĉo estis pli paca. “Unuflanke min humiligas, ke vi malkovris, mi kredis min pli lerta, sed aliflanke mi ĝojas tion scii. Mi intencis eliĝi el tiu aktiveco, kaj via scio eĉ pli stimulos min konfesi la veron. Sed al kiu mi turnu min tiurilate? Ĉu nun tuj al vi?”

“Ne. Tio koncernas ne la valĉefan policon, nur la landan servon de kontraŭspionado.” Li skribis nomon kaj telefonnumeron sur slipo, kiun li pasigis al ŝi. “Kontaktu tiun sinjoron sed nun ni revenu al nia temo kaj aŭdu vian bendon.”

“Dankon”, ŝi diris, kaj ŝi transdonis kasedon, kiun la policano tuj metis sur la magnetofonon.

“F-ino Munzo,” sonis la registrita voĉo, kiu aŭdeble penis fariĝi nerekonebla (eble la parolant(in)o pinĉis al si la nazon), “mi scias, ke vi estis en Rafunja la 6-an de majo nokte. Mi ĝis nun ne informis la policon, sed mi tion nepre faros, kaj ĝin tre interesos aŭdi pri via agado tiuloke, se vi ne obeos je miaj instrukcioj. Elektu mem la rimedon, sed, kio ajn ĝi estos, necesas, ke la polico eksciu kaj firme kredu, ke Laŭra Pergame mortis post Gido Verstrata. Rakontu kion vi volas, sed estas nepre necese, ke la juĝistoj sciu, ke Gido Verstrata jam mortis, kiam falis Laŭra Pergame. Ĉi vi bone komprenis? Mi ripetas...” La mesaĝo estis ripetita, kaj poste abrupte finiĝis.

“Kion tio signifas?” ŝi demandis.

“Ne policon oni demandas, sed polico onin”, sentencis Karal, kiu tuj aldonis: “Kion vi fakte faris tie supre? Ĉu vi deziras ŝanĝi la deklaron, kiun vi faris al mi kiam mi vin vizitis por pridemandi vin tiurilate?”

Veronika lin rigardis plorepete, kaj subite eklarmis.

Karal stariĝis, rondiris ĉirkaŭ sia skribtablo, iris al ŝi, kaj metis konsolan manon sur ŝian ŝultron.

“Ĉu viaj KGB-mastroj instrukciis vin fari ion tie?”

Ŝi kapjesis, kaj tuj poste kapneis.

“Ne. Ne precize. Ili petis, ke mi agu kiel eble plej lerte por igi la publikon favora al la Afero de la eksterteranoj. Kiam Lizabeta parolis pri la alteriĝo de kosma vojaĝilo, kiel mi rakontis al vi lastfoje, mi pensis, ke tio estos bona preteksto por iri esplori la terenon kaj eble eĉ elpensi renkontiĝon kun eksterteranoj aŭ ion similan, kion mi povus publikigi, plaĉe por miaj mastroj. Mia ideo estis profiti la ‘mesaĝon’ de Lizabeta por serĉi, kiamaniere aranĝi aferojn en Rafunja tiel, ke oni vere kredu mian elpensajon. Ju pli da homoj vidos min veturi tien, mi pensis, des

pli konfirmiĝos mia atestado. Konkrete mi ne sukcesis trovi eĉ etan helpan ideon, nek aranĝi ‘pruvan’ spureton. Kiel mi diris al vi, mi tiel malvarmis, ke mi eĉ ne kuraĝis resti tutan horon.”

“Dankon, fraŭlino, mi pli facile kredas tion ol vian unuan klarigon. Sed ĉu vere vi scias nenion pri la du mortoj? Ĉu vi ne aŭdis disputajn voĉojn aŭ iajn rivelajn bruojn, dum vi restis en Rafunja?”

“Ne. Tute ne”, ŝi respondis, kaj ĉi-foje ŝi aperis tute sincera. “Mi ĵuras al vi. Dum mi estis tie, nenio nenormala okazis.”

Kaj ŝi aldonis kun iom malĝoja rideto:

“Eĉ ne alteriĝis fluganta telero.”

*

“Tiu klopodo ĉantaĝe premi Veronikan Munzon estas ago de iu, kiu senesperigas, ĉu ne?” Karal prononcis.

“Sen ia dubo”, respondis Ĝoja, dum tintis ŝiaj trikiloj.

Karal plu paŝis en la ĉambro tien kaj reen, tien kaj reen, lerte funkciigante ludbobenon. Kvazaŭ fascinate, Ĝoja rigardis la bobenon ritme malsupren malbobeniĝi, ĝis la ŝnureto estis komplete streĉita kaj ĝi rebobeniĝis ĝis la mano de Jano, por tuj rekomenci sian seneraran dancon.

“Vi estas infano”, ŝi diris tenere.

“Ĉu ne ni ĉiuj?” li respondis. “Estu kiel ajn, ludbobeno ege helpas min pensi.” Kaj li plu marŝis bobenludante, videble streĉe pensanta.

“Jes,” li ripetis, “estis senespera ago de persono, kiu riskas ĉion, por ĉion ne perdi. Ĉiaokaze, tio signifas, ke iu volas nepre ne forlasi la heredaĵon. Do estas parenco de Laŭra. Sed, ke tiu persono provas ricevi la heredaĵon, ne signifas, ke li aŭ ŝi mortigis. Nur ke li aŭ ŝi eksciis pri la morto, kaj la riĉegon ne volas perdi.”

“Prave. Kaj tamen...” Ĝoja interrompis sin, enpensiĝante.

“Tamen...” la edzo milde eĥis.

“Tamen, tiu persono sciis, ke Veronika Munzo troviĝis sur Rafunja. Kiel li povis scii, se li ne ĉeestis mem? Kaj kion li faris tie, se ne murdon, kun tia ekstrema intereso en la morto de tiuj du...”

“Vi pravas, vi tute pravas. Ĉu povus esti Bob Sulavi?”

“Ĉu li povus ŝanĝi sian voĉon al tiu de la bendo?”

“Kial ne? La voĉo estis naza, nenatura, pli ina ol vira, laŭŝajne, sed viro kun iom da aktora talento certe povus produkti tian voĉon, des pli, ĉar ne daŭris longe la mesaĝo.”

“Vi do devos kontroli, ĉu Bob Sulavi iel povus parenci al Laŭra.”

“Jes, mi tion kontrolos”, Jano diris koncentriĝe, dum la ludbobeno daŭrigis sian regulan dancon.

Kaj jen subite li haltis kaj turnis al Ĝoja zorgoplenan vizaĝon. Ankaŭ la trikiroj haltis. Ĝoja direktis al li scivolajn okulojn.

“Ĉu vi scias, kial ĉiu enketo min suferigas?” li demandis.

“Ĉar vi tro deziras solvi. Sed ĝuste tial vi estas bonega enketisto.”

“Mi estas bonega enketisto, ĉar mi facile elpensas multajn hipotezojn rilate al serio da faktoj...”

“Efektive”, intervenis la edzino. “Tion Remon ofte diris. Ofte kaj prave.”

“Sed tio estas la kaŭzo de mia senfina turmento. Jen mi estis certa, ke tiu ĉantaĝo al Veronika Munzo malŝtopis nian vojon, kaj ĵus mia tortura koboldo inspiris al mi du hipotezojn, kiuj forrabas la tutan ĝojon fine troviĝi en iom da klareco.”

Ĝoja sentis simpatian.

“Jano! Ĉu vere? Kiujn?” ŝi demandis kun sufer-partoprena voĉo.

“Hipotezo n-ro unu: imagu, ke la krimo havas politikan, spionan aŭ alian kaŭzon, ĉu ne estus bonega ideo, por ke la suspektoj misdirektiĝu for, elpensi sistemon, kiu tuj pensigos, ke la krimmotivo estas heredi? La ĉantaĝo al Veronika povus servi tiun celon kaj havi nenium seriozan bazon.”

“Interesa ideo, efektive.”

“Hipotezo n-ro du: Veronika Munzo elpensis mem la tutan ĉantaĝan aferon, kaj mem surbendigis pseŭdan telefonalkvokon, ĉar ŝi imagas, ke la suspektoj iom tro proksimiĝas al ŝi, kaj aperi kiel viktimo igos la policon serĉi alivoje.”

“Sed kial ŝi prenis sur sin la riskon konigi al la polico, pere de pastro, ke ŝi estis en

Rafunja?”

“Eble ŝi vidis Joĉjon aŭ iun alian en Rafunja, kaj pensis, ke ni jam scias, ke ŝi troviĝis tie supre. Kiam mi iris pridemandi ŝin post la letero de Joĉjo, tio fariĝis certeco por ŝi; ŝi ektimis, kaj eĉ multe pli kiam la gazetoj aperigis anoncon kun la komencliteroj de ŝia nomo, kio pruvis al ŝi – laŭ tiu maniero interpreti nian agon – ke la polico vere suspektas ŝin. Eble nur tiam ŝi elpensis la ĉantaĝan telefon-alvokon...”

“Grrr!” reagis Ĝoja, preskaŭ kolere. “Ankaŭ mi havas murdajn ideojn. Mi ŝatus murdi la aĉan koboldon, kiu inspiras al vi tiel ĝenajn hipotezojn. Ni estis tute kontentaj, ke la enketo progresas, kaj jen ĉio refariĝas komplika! Ĉu vere ni neniam trankvilos?” Kaj per la dekstra trikilo ŝi agrese pikis senkulpan kusenon.

“Jen ĝi denove okazis”, Jano diris kun mieno iom kulpa, buterante al si pantranĉon.

“Kio?” la edzino mire demandis, sed, tiuhore, ŝi tuj intuis la aferon: “Ha! Vi songis!” kaj ŝi replenigis lian kaftason.

“Tute mallonga songo”, li diris. “Mi memoras nur leteron, tajpitan leteron pure sanktavalan. Ne. Pli ol sanktavalan. Vi loĝantoj de la Sankta Valo de Tjazo nepre metas kelkajn eliziojn en ĉiun leteron, ĉar tio plaĉas al via estetika gusto, sed ne multajn, kelkfoje eĉ nur unu. En mia songo, ĉiu substantivo estis eliziita: Sinjór Notarí, Estas plezúr vidi el via letér ke nia interparól de lasta juní... aŭ io simila. Ej! Mi scias! Mi ne bezonas vian helpon! Mi iros tuj kontroli!” Kaj li subite leviĝis.

“Ho ne,” ŝi plendis, “ne foriru tuj, ĝi povas atendi kvin minutojn, vi matenmanĝu trankvile, vi malbone digestos! Kaj estas neĝentile lasi min en nescio...”

Sed tia plendo, rita en ilia para vivo, ne povis venki lian labor-avidon, kaj longa kutimo tion jam instruis al ŝi.

“Mi telefonos”, li diris. “Promesite”.

*

Efektive, post duonhoro, li telefonis. Lia voĉo sonis tre feliĉa.

“Ĝoja! Mi pravis!”

“Diru, Jano, mi febras pro scivolo.”

“Estas la sama skribmaŝino! La sama!”

“Kio? Kiu skribmaŝino?”

“La letero, kiun la notario sendis por resumi sian konversacion pri la heredo kaj la letero de Laŭra Pergame estis tajpitaj per la sama skribmaŝino. Estas io nenormala en la kliniĝo kaj pozicio de la supersignoj. Tion mi duonkonscie mense registris, kiam mi legis la leteron de la notario, sed nur ĉi-nokte la pripensado igis min per songo serioze atenti la aferon.”

“Kaj kion vi konkludas? Ĉu tio signifas ke...?”

“Mi kuras al la skribfakulo. Mil kisojn, kara. La enketo proksimiĝas al la fino.”

Jano unue petis la polican skribfakulon kompari la subskribon “Laŭra Pergame” sur diversaj dokumentoj, kiujn li prenis el la dosiero. Inter tiuj troviĝis la letero akuzanta ŝian edzon pri murdointencoj.

“Mi rigardos unue per lupeo, poste mikroskope,” la fakulo diris, “sed eĉ per nudaj okuloj mi jam estas preskaŭ konvinkita. Ĉi tiu”, kaj li tuŝis la akuzan leteron adresitan al la polico pere de la notario, “ne estis skribita de la sama persono. Ĝi aperas al mi falsa.”

Li rigardis atente per lupeo.

“Jes, ĉi tiun ne subskribis la sama persono. Tion mi povas garantii. Mi kontrolos mikroskope antaŭ ol doni definitivajn juĝon, sed kredis min, ĉi tiu estas falsaĵo, kaj eĉ ne tre bona.”

La detektivo nun transdonis al li faskon da paperoj skribitaj de la pseŭda Gido Verstrata, inter kiuj troviĝis la letero siatempe konfidita al notario Viljemín. Ankaŭ ĉi-kaze la fakulo ne longe hezitis.

“Ĉi tiu estas falsa”, li diris, elektante la koncernan leteron, kaj li ekprenis sian lupeon por ĝin pli bone ekzameni.

“Ŝajnas al mi...” li komencis, sed anstataŭ fini la frazon, li prononcis: “Pli bone tuj uzi mikroskopon.”

Post kelka tempo, Karal sciis la respondon: la sama persono subskribis “Laŭra Pergame” sur unu el la leteroj transdonitaj de la notario al Jano, kaj manskribis mem tute la alian leteron, subskribitan – laŭŝajne – de la “pentristo”.

Kun koro vigle batanta, Karal rapidis al la notario.

“Kiu tajpis ĉi tiun leteron?” li demandis tuj, kiam li troviĝis sola kun Viljemín, montrante la resumon senditan de ĉi-lastaj pri la heredproblemo.

La alia lin rigardis nekomprene.

“Kia stranga demando!” li fine diris mildvoĉe. “Mia sekretariino, kompreneble.”

El la apuda ĉambro perceptiĝis brueto apenaŭ aŭdebla pro la remburita pordo. Karal fulmrapide ekstaris antaŭ la mirplenaj okuloj de la notario, ŝokata per tia nenormala, neĝentila konduto; li malfermis la pordon kaj kriis:

“Restu ĉi tie! Kien vi iras?”

La sekretariino, ĵus komencinta malfermi la alian pordon, kiu kondukis al la koridoro kaj de tie eksteren, haltis heziteme. Mastro Viljemín, sekvinta Janon, parolis kun ega surprizo:

“Elizabeta! Ĉu io estas ne en ordo? Kien vi iras?” Kaj li direktis al Karal milde riproĉan rigardon, kvazaŭ tiu respondecus pri la perturbo, maloftaĵo ofenda por la digno de ĉi tiu konstante paca oficejo.

“Mi... mi...” la sekretariino balbutis kun la esprimo de besto trafinta en kaptilon, “mi havas fortan kapdoloron kaj iris al la apoteko por...”

“Sed”, la notario interrompis per sia malrapida, trankvila tono, kies mildecon, ŝajne, eĉ la plej perturbaj cirkonstancoj ne povis modifi, “estis aranĝite, ke vi ne rajtas forlasi la oficejon sen informi min... Se okazus telefon Alvoko aŭ vizito, mi devas povi kalkuli je vi!”

“Efektive, sinjoro, efektive, vi... vi... vi tute pravas,” ŝi panikvoĉis, “nur estas tiel dolore, ke mi iom perdas la kapon.”

“Se vi permesas...” Karal diris rigardante la notarion, kiu eĉ antaŭ ol scii, pri kio temos, jam kapgestis jese, “mi ŝatus peti ion de f-ino aŭ s-ino Elizabeta.”

“F-ino”, ŝi diris glacitone, kaj ŝi rigardis lin kun videbla peno kaŝi sian angoron.

“Prenu pecon da papero kaj vian kutiman skribilon”, la detektivo instrukiis. Ŝi sidiĝis ĉe sia tablo kaj atendis kun globkrajono enmane, kvazaŭ bildo de perfekta sekretariino.

“Bonvolu skribi la nomon Laŭra Pergame.”

Ŝia korpo faris etan kvazaŭsaltan ekmovon, tuj regitan, sed ŝi skribis diligente, tro diligente.

“Trifoje, mi petas”, ordonis la policano. Ŝi obeis kaj transdonis al li la paperon.

“Nun”, plu parolis Karal, “mi bezonus tekston, kiun vi skribis antaŭe. Ne gravas la temo.”

“Mi ne havas”, ŝi diris. “Aŭ mi tajpas, aŭ mi skribas stenografie. Fakte mi eĉ uzas tre malmulte stenografion, ekde kiam ni havas diktokasedan maŝinon.”

La notario ŝin rigardis kvazaŭ lia universo disrompiĝus. Post embarase longa silento, li diris:

“Ho jes vi havas, vi havas liston de adresoj el la tuta mondo, kiun ni kompilis hieraŭ. Vi ne stenografiis ĝin, ĉar estis ĉialingvaj nomoj, kaj vi estis en mia kabineto, kie vi ne povus tajpi. Vi diris, ke vi ne havos tempon tajpi ĝin antaŭ hodiaŭ posttagmeze. Nu, rigardu, jen ĝi estas sur via skribtablo.” Kaj li transdonis la folion al Karal.

“Min okulfrapas,” ĉi-lasta diris, “ke vi orientis vian skribon maldekstren, kiam mi diktis “Laŭra Pergame”, sed sur ĉi listo, via skribo estas iom klinita dekstren, strange, ĉu ne? Ĉu vi volis kaŝi vian normalan skribmanieron?”

Ŝi rigardis lin kun tre laca esprimo.

“Vi scias, ke tio tute ne estas stranga. Bonvolu ne turmenti min plu. Jes, la subskribo sur la letero de Laŭra Pergame al la polico estas mia, ne ŝia.” Ŝi ekploris amare. “Mi estas venkita, kaj mi ne plu havas la forton lukti. Mi estis stulta. Krimi postulas pli da nerva energio ol mi imagis. Mi preferas konfesi ĉion. Konduku min, kien vi volas.”

“Elizabeta!” la notario diris kun perceptebla sufero. “Ĉu vere vi faris delikton? Mi ne povas kredi.” Kaj li aldonis per voĉo emociplena: “Ĉu vi ne estis feliĉa ĉi tie?”

Tio plorigis ŝin eĉ pli.

“Ho jes, mi estis feliĉa. Estis bona, agrabla ofico. Mi agis nepardoneble stulte.” Ŝia voĉo iom firmiĝis, kaj ŝi ĉesis larmi. “Min tentis la milionoj. Tio estis mia stulteco. Mi havis bonan vivon kiel sekretariino, neniam revis pri io alia. Sed kiam mi eksciis pri la milionoj...”

Ŝi prenis poŝtukon el la mansaketo, kaj sekigis al si la okulojn, dum la du viroj rigardis nekomprene. Ŝi reparolis:

“Homo vivas simplan, normalan, dungitulan vivon kaj havas psikan ekvilibron. Ĉiuj opinias lin stabila. Sed jen alvenas eksterordinara informo kaj la tuta fortikaĵo ŝanceliĝas. Mi estis ege malsaĝa. Mi konscias klare nun, ke eĉ se mi estus sukcesinta, mi ne povus elporti ĝin, mi malfeliĉus dum la tuta vivo.”

“Sed kio estis tiu novaĵo? Mi nenion komprenas”, la notario diris.

“La edziniĝo de onklino Laŭra al milionulo” ŝi respondis. “Mi estas la nevino de Laŭra Pergame.” Kaj, ekstarinte, ŝi iris preni sian mantelon.

Jano Karal kaj la notaria sekretariino sidis en la policejo.

“Min devojigis mia scivolemo”, ŝi diris amare.

La policano miris pri ŝia kompleta psika ŝanĝo. En la notariejo, ŝi montris la reagojn de besto persekutata. Sed tuj kiam ŝi decidis diri la veron, ŝia sinteno tute aliiĝis. Ŝajnis, kvazaŭ venus en ŝin granda paco, granda psika trankvilo, kvankam miksitaj kun profunda malĝojo.

“Mi agis saĝe dum mia tuta vivo”, ŝi daŭrigis. “Mi tute ne havas brilan intelekton. Mia inteligenteco eble eĉ situas iom sub la meza nivelo. Sed mi ĉiam havis sanan prudenton, kaj mi estas ĝenerale fidinda, serioza en mia laboro. Tion la notario ŝatis en mi. Mi akiris la postenon dank’ al mia ofica fidindeco.

“Vi sciu, ke labori ĉiutage en la plej fama notariejo de la regiono estas stranga sperto. Vizitadas la oficejon ĉiaspecaj homoj, kelkaj videble tre riĉaj, kaj ili enfermiĝas en la notaria kabineto por babili, babili... Kio okazas trans tiu remburlita duobla pordo? Mi estis konfidenca sekretariino kaj jam sciis aŭ divenis multon pro mia ofico, sed mi ege scivolis pri ĉio, kio restis al mi kaŝita.

“Kiam mi instalas mikrofoneton, kiu ebligis al mi ĉion aŭdi, mi tute ne havis krimajn intencojn.”

“Kiam vi ĝin aranĝis?” demandis Karal.

“Foje, kiam la notario devis enhospitaliĝi. Li havas plenan konfidon al mi, kaj mi daŭre venis al la oficejo por tajpi, klasi, ktp. Ĉiam estas laboro farenda. Mi havis la ŝlosilon kaj povis facile resti, post kiam la aliaj oficistoj estis for. Mia amiko Joĉjo, knabo tre kompetenta pri elektroniko, donis al mi ĉiujn necesajn indikojn, por ke mi taŭge aranĝu la aferon.”

“Joĉjo, ĉu tiu knabo, kiu gajnis premion, kaj nun krozadas sur la kariba maro?”

“Jes, ĉu vi konas lin?”

Jano ŝin rigardis: la kompakta korpo, la sportema aspekto, la sinĝena mieno, jes, ĉio ĉi jam estis menciita de Stefano. Kia strangaĵo! Kaj kiel stulte, ke la nevo neniam menciis ŝian nomon!

“Estis bone organizite”, ŝi plu diris. “Mi eĉ ne devis kaŝi min, ĉar mi tajpas el diktokasedoj kaj ofte havas aŭdilojn sur la oreloj por transskribi, kion li diktis. Mi povas konekti la aŭdilojn al la drato de la kabineta mikrofono kaj faras ĝin ofte, kiam iu tie troviĝas kun la notario.

“Estis por mi tre agrabla kaj senkulpa ludo. Neniam estis mia intenco tiri el tiu ludo profiton, sed estis ege kontentige scii, kio estas tie dirata.

“Kiam la pentristo venis, mi aŭskultis des pli ekscitiĝe, ĉar li estas intima amiko de mia onklino, kaj ĉar li epizode loĝas ne malproksime de la loko, kie Rik Ospaci falis. Vi scias, ĉu ne?, ke mi apartenis al la grupo de Rik?”

“Ne. Aŭ pli ĝuste, mi komence ne sciis, sed antaŭ ne tre longe mi suspektis. Vi estas Elizabeta por la notario, sed Lizabeta por la NIFO-grupo, kaj estas vi, kiu ricevas sonĝe mesaĝojn, ĉu ne?”

“Jes, estas mi. Kiel mi diris, mi trovis la sintenon de s-ro Verstrata ege stranga... kaj mi ege scivolis. La gardoŝranko de kara Viljemín estas malnova afero, tute bonorda kaj fortika, sed brua. Mi sciis, kiunumere malŝlosi ĝin, ĉar mi rimarkis, ke ĉiu cifero el la ŝlosa ciferplato faras difinitan nombron da tiktik-bruetoj, simile al telefonaj ciferoj, kaj mi aŭdis tiujn multfoje tra la mikrofono.

“Ju pli la notario maljuniĝas, des pli ofte li forlasas la oficejon, kaj mi restas sola en ĝi, kiom mi deziras. Mi sekve profitis de unu el tiuj okazoj por serĉi en la gardoŝranko. Mi tuj trovis la leteron de s-ro Verstrata. Ĝi surhavis vaksan sigelon, kaj adreson tajpitan per tipoj tute identaj al tiuj de unu el niaj skribmaŝinoj. Mi pensis, ke mi povos malfermi ĝin senriske. Remeti la leteron en similan koverton, tajpi la adreson simile, kaj refari ne-netan vaksan sigelon ja ne estos malfacile. Mi estis certa, ke la notario ne kontrolos tre atente la sigelon, ĉar neniam li imagus, ke oni povus malŝlosi la monŝrankon. Mia rezono poste montriĝis tute prava.

“Tiumomente, mi deziris nur legi la leteron, ne anstataŭigi ĝin per alia, falsa. Sed kiam mi ĝin legis...” Ŝi ĉesis paroli, kaj ŝia gorgo videble streĉiĝis.

“Kio estis skribita? Ĉu vi konservis la leteron?” Karal diris, kaj tiu konkreta demando efikis malstreĉe.

“Ne. Mi ĝin bruligis”, ŝi respondis pli trankvile. “Ĝi estis tro danĝera por mi. Ĝi enhavis kompletan konfeson fare de l’ falsa pentristo. Sed ĉar mi havas la manion – tipe notariecan – konservi arĥivojn, antaŭ ol cindrigi la leteron, mi kopiis ĝin stenografie. Mia stenografio estas absolute nelegebla por iu alia, ĝi estas tiom sekreta skribo, kiom stenografio, tiel ke mi riskis nenion tion farante.”

“Ĉu vi bonvolos tajpi por mi la tekston, kiun vi tiel transskribis? Ankaŭ ni ĉe la polico ŝatas kompletajn arĥivojn.”

“Jes, se vi volas, mi tion faros”, ŝi promesis iom reve. “Sed kion mi rakontis? Ha jes! Kiam mi legis la leteron... Miaj sentoj pli kaj pli flamis. Mi indignis. Mi bolis per indigno. Jen Verstrata profitis dum multaj jaroj de alies laboro kaj talento. Mi ne kapablus priskribi, kion

mi travivis legante. Mia indigno min frenezigis, transformiĝis al kolero. Ke li vivis tiel lukse, ĝuis famon kaj vojaĝojn, kiujn mi, eta honesta sekretariino, neniam povos ĝui, estis neelporteble. Krome, li detruis mian naivan estimon al Rik, montrante lin ĉantaĝisto.

“En tiuj tagoj, mi eĉ pli kaj pli sentis ĝeneralan ĵaluzon, ĉar mia juneta amiko Joĉjo nur pro bona ŝanco faris tian vojaĝon, al kia mi sopiras de jaroj sen povi ĝin pagi por mi.

“Mi unue konsideris informi la policon, sed kiel mi klarigus mian scion? Aliflanke, min impresis la sekreta edziĝo kun onklino Laŭra. Eĉ al mi la nevino – cetere neniam de ŝi tre ŝatata – ili ĝin prisilentis, mi eksciis ĝin nur per tiu letero.

“Tiam mi memoris konversacion, kiun mi foje aŭdis, inter kelkaj notarioj, kiuj kunvenis en la kabineto de Viljemín. Mi streĉe aŭskultis tiufoje, ĉar estis strange interese, kaj mi speciale dankis mian inspiron instali mikrofonon. Prezentiĝis momento, kiam ilia diskuto deflankiĝis al la grandaj riĉoj de Sanktavallo, kaj iu menciis s-ron Verstratan, akcentante, ke li ne havas heredontojn, kaj ke li foje diris, ke li neniam faros testamenton, tiel ke lia tuta havaĵo iros al la ŝtato.

“Memorante tiun interparolon, mi pensis: nun la edzeco tion ŝanĝis, nun heredos mia onklino, kaj kiam ŝi mortos... Kiam ŝi mortos, heredos mia kanada fratino kaj mi. Kiel kontraŭbatali la penson, ke, se ambaŭ mortus, mi tuj fariĝus riĉega? En kelkaj sekundoj, dum mi legis tiun leteron, komplete renversiĝis mia mensa universo. Komprenu min...”

Ŝi ekploris, singulte, dum en Jano kirliĝis, kiel ofte similkaze, diversaj emocioj. Al konfesantaj krimuloj li ofte sentis komprenon, kaj li ilin rigardis kortuŝite, pri kio li kelkfoje sin demandis, ĉu estas vere sana, vere normala reago. Li konsciis la hororan karakteron de la ago de Lizabeta, li abomenis murdon kiel manieron solvi la problemojn, sed la sento de kompatato, kontraŭ kiu li provis sin defendi, estis pli forta ol lia volo.

“Rakontu”, li simple diris, kun tia perceptebla foresto de morala juĝo, ke Lizabeta lin rigardis akre, kaj sammomente ĉesis plori. Ŝiaj okuloj kelksekunde montris miron, kaj tuj poste refariĝis malĝojaj.

“Mi subite vidis antaŭ mi mian tutan estontan vivon: mi estas pli ol tridekjara, inter krozado kaj mi Joĉjo elektis la krozadon, kaj li estas la sola homo, kiu iam iom amis min. Mi neniam estos bela. Mi neniam estos riĉa. Sekve, mi ĉiam estos sola, kaptita inter la kvar muroj de oficejo, frapante la klavojn de skribmaŝino ĝis, ankoraŭ pli sola, mi pensiiĝos. Neniu amos min. Ĉu vi scias, kion mi vidas en la okuloj de la notario, en la okuloj de la NIFO-grupo, en la viaj? Ĉu vi scias?”

Jano sentis embarason.

“Kompaton. Oni kompatas min. Povrulino, jen kio mi estas, jen kio mi estos, ĝismorte

kompatinda povrulino. La homoj dividiĝas en du grupojn, la neaĉulojn, kiel vi, kiuj sentas kompaton, kaj la aĉulojn, kiel onklino Laŭra, kiuj rigardas min de alte, kun klara malestím.

“Ĉu vi ne komprenas, ke homo bezonas dignon? Eĉ ne tre inteligenta tajpistino bezonas dignon! Se vi nur sciis, kiom mi donus, por ke foje oni respektu min!

“Kiel mi eskapus el la penso, ke se mi estos milionriĉa, oni respektos min? S-ro Verstrata estis aĉulo, kaj ĉiuj lin respektis. Rik es..., Rik... Rik...”

Larmkrizo ŝin denove skuis. Evidente, ŝi antaŭe idealigis Ospacin, kaj la rivelado de lia fia konduto efikis disrompe al ŝi.

“Ankaŭ Rik estis aĉulo”, milde prononcis Karal.

“Jes. Mi kredis je la eksterteranoj. Ili por mi prezentis la eblecon fidi al alia mondo, kie pli da justeco regas, kie neniu malestimus min... Sed ili estis nur fantazia elpenaĵo de Rik, favora al la propraj interesoj. Efektive, ankaŭ Rik estis aĉulo, sed li estis respektata, kaj – mi tion bone vidis en la grupo – pluraj lin reale amis. Mi estis morala, honesta, bona, komplezema, servema, kaj neniu respektis min, kaj neniu iam ajn serioze amis min... Mi valoras malpli ol kariba krosado! Sed se mi havus milionojn, mi irus al la plej kostaj hoteloj, kaj oni klinus sin antaŭ mi, mi invitus konatojn al la plej karaj restoracioj, kaj ĉiu ekŝatus min. Ne simplan leteron mi tenis enmane, sed Eldoradon...”

Ŝi paŭzis, kaj Karal, kiu, male al ŝia opinio, ŝin respektis, respektis ŝian silenton.

“Mi estis stulta,” ŝi reparolis pli sobre, “sed esprimante al vi miajn tiutempajn sentojn, ŝajnas, ke eĉ kun la konscio, ke ĝi verŝajne fiaskos, la tento estus tro forta, kaj mi refarus ĝin. Se ili estus bonuloj, tiu riĉo ne allogus min. Sed likvidi du komplotintajn ŝtelistojn, kiuj agis trompe al la tuta mondo, por doni tiun riĉon al iu honesta, tio ŝajnas logika, ĉu ne? Mi komprenas, racie, ke tiu rezono ne estas ĝusta: se mi mem murdas, mi fariĝas aĉa kiel ili, kaj perdas la meriton al riĉeco. Sed tamen, tamen, nur puŝeto, kaj respekton akiri...”

“Kiel vi faris por ilin altiri al la Rafunja-teraso?” la policano demandis post paŭzo emociplena.

“Mi kontaktis s-ron Verstratan, diris al li, ke mi havas lian leteron, ke mi redonos ĝin al li kontraŭ mono. Mi sciis, ke li ne povus fari ion alian ol obei min, se li volis ne iĝi arestita. En tia situacio, mi povis dikti miajn kondiĉojn. Mi fiksas rendevuon al li ĉe Rafunja, klarigante, ke tio montras mian bonvolemon, ĉar mi faciligas al li la aferon proponante lokon proksiman al lia surmonta domo. Mi diris – kaj tio estis vera, kaj mi poste sciis, ke li kontrolis – ke mi devos iri tien supren pro promeso farita al la grupo de Rik iri serĉi spuron, kiun la eksterteranoj tie lasis.

“Kiam li venis, mi stumbligis lin kaj li falis. Ne estis vere malfacile. Mi estas tre forta. Li komence estis suspektema, sed kiam mi diris, ke mi havas la originalon de lia letero, li sekundeton rigardis la paperon tre atente, kaj mi profitis tiun okazon por lin puŝi.”

“Kaj pri via onklino?” Karal demandis.

“Estis eĉ pli simple. Mi iris al la lignodomo, klarigis, ke mi estis tie pro laboro koncerne la eksterteranojn, kaj ke mi vidis viron stumbli kaj fali. Ŝi tuj venis. Ŝi jam maltrankviliĝis pri lia longa foresto – li estis for jam unu horon – kaj estis facile puŝi ŝin.”

“Ĉu ŝi kutimas loĝi kun li tie supre?”

“Mi opinias, ke ne, sed mi sciis, ke tiunokte ŝi iros al Rafunja. Iu diris al ŝi, ke li vidis Gidon eniri la notariejon, kaj ŝi scivolis kial. Ĉar ŝi sciis, ke mi laboras en tiu oficejo, ŝi proponis al mi vespermanĝi kun ŝi. Estas mi, kiu sugestis restoracion en Malpaz, ĉar mi devis iri tien pli frue la saman vesperon. Kiam ŝi proponis al mi kunmanĝi ie, ŝi menciis, ke Malpaz tre taŭgos por ŝi, ĉar poste ŝi iros al la domo de Gido en Rafunja. Tiam mi decidis agi tiun nokton, kaj mi aranĝis la rendevuon kun s-ro Verstrata.

“Kiel vi divenis, mi estas tiu, kiu ricevas mesaĝojn sonĝe de la eksterteranoj. Mian lastan sonĝmesaĝon mi rakontis abunde, kiam la renkontiĝo kun mia onklino en Malpaz kaj kun la pentristo en Rafunja estis fiksita. Mi pensis, ke ju pli da homoj iros tien, des malpli oni suspektos min, ĉar espereble iu el la aliaj estos vidita kaj la aferon oni raportos al la polico.”

“Sed ĉu vi ne timis, ke ili vidos ankaŭ vin?”

“Ili vidos min, sed tio estis favora al mi. Mi ja anoncis, ke mi nepre ne volas maltrafi tiun alteriĝon de kosmoŝipo, kaj ĉiuj en la grupo sciis, ke mi iros. Krimulo ĝenerale ne anoncas antaŭe, ke li troviĝos sur la loko de l' krimo, ĉu? Do verŝajne tio estos argumento favora al mia senkulpeco.”

“Sed oni povus vidi vin efektiviĝi la murdon!”

“Ne, ĉar mi indikis al la aliaj horon konsiderinde pli fruan ol tiu de la rendevuo kun s-ro Verstrata. Atendi plurajn horojn en la malvarmo tie supre, dum nenio okazas... tion ili ne faros. Plie, ĉar mi sciis, ke estas grave ne montriĝi je la mortohoro, mi intencis esti tre singarda, dum la aliaj havis neniun kaŭzon kaŝi sin. Mi ankaŭ pensis, ke kelkaj havos neniun eblecon pruvi, je kiu horo precize ili forlasis Rafunjan, tiel ke la diferenco inter la horoj ne starigis seriozan problemon. Tamen mi prenis sur min stulte gravan riskon provante altiri plurajn NIFO-ŝatantojn al mia krimejo. Kiel mi diris, mi ne estas tre inteligenta. Kaj mi tiom avidis la monon! Fakte venis nur Veronika, aŭ almenaŭ nur ŝin mi vidis.”

“Kaj vi pensis pri ŝi, kiam vi konsciis, ke la polico ne konas la ĝustan horon de la morto de

Laŭra, ĉu ne?”

“Estis por mi terura bato, kiam la notario klarigis tion. Mi aŭskultis per miaj aŭdiloj, kiel kutime, kiam vi estis kun li. Mi antaŭe pensis, ke polico ĉiam povas akurate difini la tempon de morto per nekropsio. Mi ne sciis, ke kelkfoje oni ne havas certecon.

“Tiam mi samtempe furiozis kaj panikis: jen mi akceptis egan riskon, mi fariĝis murdinto, kaj nun eble la tuta riĉego, por kiu mi agis, ekfuĝos for! Mi ne povis toleri tiun penson, sed mi ne sciis, kiel elturni min. Tiam mi pensis al Veronika, sed mi jam dubis pri miaj ŝancoj sukcesi, kaj mi jam duonkomprenis, ke mi neniam povos vere ĝui tiujn milionojn. Mia kulposento malebligos.”

“Ĉu vi pensis, ke Veronika povos negative respondi al via ĉantaĝprovo? Ĉu vi ne konsideris la eblecon, ke ŝi diros: ‘Kial mi komuniku tion al la polico? Rakontu al ĝi, kion vi volas, al mi estas egale?’”

“Mi suspektis, ke Veronika havas ian sekreton, kaj ke eble ŝia ĉeesto en Rafunja estas ligita al tiu sekreto. Sed mi riskis fiaski. Mi faris tion nur, ĉar mi ne havis alian elekton. Absolute necesis, ke oni sciu, ke Laŭra mortis poste.”

“Ĉu ne venis al vi la ideo, ke oni tuj suspektos vin, kiam vi devos diri, ke vi estas la nevino de Laŭra Pergame, por ricevi la heredaĵon? Ke la polico tiam informiĝos pri tio, kion vi faris dum la koncerna nokto, ktp?”

“Jes, mi pensis pri tio. Mia plano estis iri al Kanado al mia fratino kaj tie instaligi por kelkaj monatoj. Mi tiam aranĝus hazardon, kiu konigus al ni la morton de onklino Laŭra, kaj mi agus pere de jurista firmao kanada. Mi proponus al tiu rilati kun notario en Valĉefa, kiu estas vera malamiko de s-ro Viljemín, tiel ke ĉi tiu nenion sciis. Se iu devus persone veni, mi sendus mian fratinnon kun plenkova subskribita de mi. Ŝi tute ne similas min. Estus tre neprobable, ke la polico rilatigus tiun personon el Kanado kun sekretariino de notario niaurba.”

“Nestulte. Eble tio estus povinta sukcesi...” Jano diris penseme, kaj li aldonis: “Kial vi skribis al la polico falsan leteron, kiun ĝi atribuu al Laŭra Pergame? Tio ne estis necesa.”

“Mi opiniis, ke tio forturnos de mi la suspekton. Mi havis la ideon pro la alia letero. Kiel vi vidos, kiam mi estos tajpinta la veran leteron de s-ro Verstrata, li efektive petis la policon fari nekropsion, se li mortos antaŭ ol onklino Laŭra. Fakte, la falsa letero, kiun mi verkis imitante la skribon de s-ro Verstrata, plejparte nur rekopiis lian aŭtentan tekston. Sed ĝi estis multe malpli longa, ĉar mi forprenis la tutan konfeson, nur lasis la partojn pri tio, ke li suspektas ĉe Laŭra intencon lin likvidi. Tio donis al mi la ideon verki similan leteron atribuantan al Laŭra Pergame. Por la polico, mi rezonis, tio estos kvazaŭ pruvo, ke ambaŭ mortis provante faligi unu la alian. Verŝajne ne estis tre saĝe tion fari, ĉar pro tiu falsa letero mi iĝis perdita.”

Karal ne faris komenton, sed lastan demandon submetis al ŝi:

“Ĉu ne venis al vi la ideo, ke, ĉiaokaze, vi ne heredos, ĉar ne al Ronaldo Verostrata vere – kaj do leĝe – apartenis la riĉego, sed al la aŭtenta pentristo, al tiu Gido Verstrata, kiu mortis antaŭ dudeko da jaroj?”

“Mi imagis, ke vi neniam scios pri la interŝanĝo. Ĝi estis konfesita en la letero, kiun mi ŝtelis el la gardoŝranko notaria, sed mi opiniis, ke sen tiu konfeso, vi havas nenion rimedon koni la koncernajn faktojn. Ĉar mia falsa letero ne inkluzivis tiun tutan rakonton, mi kredis min senriska tiurilate.”

“Mi komprenas”, simple diris la detektivo, pensante, ke jen refoje krimulo subtaksis la ŝancojn de la polico iĝi plene informita.

“Kio okazos al mi?” ŝi demandis humile.

“Tion decidos la tribunalo, ne la polico. Kie estas la stenografia kopio de la ŝtelita letero?”

“Sur notbloko en mia oficejo, kune kun diversaj aliaj stenografitaj tekstoj.”

“Akompanu min, mi iros ĝin preni, kaj vi ĝin tajpos por mi. Ĉu vi ankaŭ konsentos tajpi mem vian depozicion?”

“Se vi deziras”, diris la ĉiam komplezema virino. “Mi maŝinskribas tre nete.” Kaj ŝi ridetis sian mallertan, timeman rideton, kiun ĉeestunto malfacile povus akordigi kun la ideo, ke tiu tajpistino antaŭ nelonge malvarme mortigis du personojn.

“Kaj ĉu vi eksciis ion gravan el la vera letero?” Ĝoja demandis.

“Ho jes”, la edzo rakontis. “Verstrata klarigas en ĝi, kiel Rik estis murdita.”

“Ĉu vere? Ĉu kulpas li? Kiel ili povis fari?” la nevo scivolis, kun streĉiĝa intenseco en la voĉo. “Mi estis certa, ke la falsa Gido Verstrata kaj lia kara Laŭra troviĝis en hotelo je 270 kilometroj for de Rafunja en tiu fama nokto.”

“Neniu povas aserti, ke ili efektive pasigis la tutan nokton en Akvoviva. Fakte, dank’ al la aŭtovojoj, tiuj 270 kilometroj forglutiĝas en tri horoj, aŭ tri horoj kaj duono. Nur la lasta peco, la zigzaga monta supreniro de Malpaz al Rafunja estas malrapide farebla.”

“Sed kiel diable ili faris?” demandis la ekscitita nevo. “Ĉu ili rendezuis kun Ospaci en loko tiel inspira por murdi ĉantaĝiston, kaj tiu akceptis? Mi tion ne povas kredi. Li ne estis tiagrade naiva!”

“Eble estos pli bone,” Ĝoja admonis, “se vi lasos vian onklon ĉion rakonti de la komenco, sen konstante interrompi lin.”

Ne atentante la grimacon, kiun la knabo direktis al Ĝoja, Jano komencis:

“Kiam Rik decidis lanĉi sin en politikon, li postulis de Verstrata multe pli da mono ol antaŭe. Laŭ la letero, li estis tre ambicia kaj pensis, ke per multe da mono, li povos fine atingi plej altan pozicion en la lando. Tiu postulo ne plaĉis al la falsa pentristo, kaj Rik verŝajne ektimis, ke tiu provos lin likvidi. Por tion malebligi, li diris al Verstrata, ke parto de la dokumentoj pruvantaj ties kulpon troviĝas ĉe amiko, kiu daŭrigos la ĉantaĝon post la morto de Rik.”

“Ĉu ankaŭ Pitizazo sin fordonas al ĉantaĝo?” Ĝoja demandis, ŝajne sen skrupuli pri interrompado.

“Mi opinias, ke ne”, la edzo respondis. “Tio estis blufado, kaj Verstrata ĝin perceptis, kvankam li tamen estis certa, ke efektive Rik kaŝis dokumentojn aliloke ol hejme. Aŭ almenaŭ li opiniis, ke la eventuale nova ĉantaĝisto ne estos tiel finance avida, kiel la alia ĵus fariĝis. Li do decidis ĉesigi la vivon de Ospaci.”

“Kiamaniere?”

“Tre simple, fakte. Rik postulis tre altan sumon sub formo de monbiletoj. Verstrata ŝajnigis, ke li konsentas pagi, sed petis tempospacon por kolekti la monon nesuspektate. Ospaci akceptis. La falsa pentristo tiam diris, ke pluraj personoj jam scias, ke li intencas ferii tuj en

Akvoviva kun Laŭra Pergame, kaj ke la plej diskreta maniero transdoni tiun grandan kvanton da biletoj estus, ke Rik tien venu nokte. La ĉantaĝisto aprobis kaj ili fiksis rendevuon.”

“La murdo tamen ne okazis tie, ĉu?” diris Stefano.

“Ne. Tie nur komenciĝis la scenaro. La hotelo, kie ili loĝis, konsistas el konstru-unuoj apartigitaj unuj de la aliaj. Je la fiksitaj horo, Rik frapis al la pordo de ilia loĝunujo, kaj eniris. Gido kaj Laŭra staris kaŝitaj ambaŭflanke de la pordo, ĉiu kun revolvero enmane. Per la konstanta minaco de ambaŭ revolveroj, ili devigis lin reveturi kun ili tiun nokton la tutan vojon de Akvoviva ĝis la Rafunja-teraso, kie ili ordonis al li stari sur la ekstrema rando de l’ klifo. Laŭra promesis, ke ili ne mortigos lin, se li malkaŝos la nomon kaj adreson de la amiko, kiu havas la dokumentojn...”

“Kaj li kompreneble rifuzis”, la junulo asertis.

“Tute ne. Kiel diras la letero: ‘Li estis terurita, kaj kroĉis sin iom stulte al tiu lasta ŝanco plu vivi.’ Li fakte nomis Pitizazon, kaj klarigis, kie staras la kofro.”

“Mi trovas tion eksterordinara”, Stefano komentis. “En la sama situacio mi dirus ian ajn mensogon.”

“Ne estas tiel strange el psikologia vidpunkto”, diris la psikologino el la triopo. “Lia forto kuŝis en la saĝula ĉarmo, kiun li disradiis, en lia ĵurnalista trovkapablo, en lia talento organizi kaj intelektu koncepti. Sed li estis sekse, viande, alkohole abstinema. Tiajn homojn ofte teruras minaco de perforto, aŭ la vido de revolvero, tiel ke ilia cerbo preskaŭ paraliziĝas. Ili ne estas nerve ekipitaj por batali kaj barakti. Ili estras situaciojn nur per intelekto aŭ ordona dokumento, inkluzive ĉantaĝan, t.e. per io, kio dekomence certigas, ke ne povos okazi alfrontiĝo, ĉar la viktimo dekomence ne povas sin defendi.”

“Ĉiaokaze, li donis la necesajn indikojn al Verstrata, sed tiu ne intencis lasi lin vivi. Li simple puŝis, kaj Rik falis morten.”

“Kial”, Stefano demandis, “ili revenis al Rafunja, proksime al la domo de l’ pentristo? Ĉu tio ne estis neracia maniero altiri al si la atenton?”

“Li mencias tion en la letero. Li diras, ke li decidis mortigi Ospacin en Rafunja, ĉar la afero pri eksterteranoj povos provizi klarigon pri lia tiea ĉeesto, kaj krome ĉar oni malpli suspektos, se li mortos proksime al Valĉefa, kie multaj eblaj suspektatoj certe vivas, ol se oni trovos lin ie fore – ekzemple en Akvoviva – kie oni riskus pli facile rimarki la samtempan ĉeeston de Verstrata.”

“Tio estas la racia klarigo,” Ĝoja diris, “sed mi min demandas, ĉu ne ekzistas alia kaŭzo, kuŝanta en la nekonsciaj profundoj de lia psiko, nome, ke li volis, ke Ospaci trafu la saman

morton kiel la vera Gido. Iel, la morto de ĉi-lasta estis kvazaŭ modelo de facila maniero likvidi homon. Kaj en tute neracia tavolo de la psiko povis vivi la ideo, ke la korpo de tiu, kiu provis malhelpi plenan ĝuon de la riĉo, iru retrovi la korpon de tiu, el kiu tiu riĉo fontis.”

“Ŝajnas al mi, ke vi aranĝas tre komplekse tute simplan aferon”, la policano diris. “Fakte, ni ne suspektis Verstratan antaŭ ol li mortis, kio pruvas, ke li rezonis ĝuste.”

“Vi ne konsideris lin, sed mi tuj suspektis Laŭran”, diris Ĝoja, kun io infane triumfa en la voĉo.

“Vi ne suspektis,” kontraŭdiris la edzo, “vi deziris, ke ŝi estu kulpa. Tio estas tute alia afero.”

“Kion ili faris post la krimo, ĉu vi scias? Ĉu vi komprenis, kial la aŭto de Rik troviĝis en Malpaz?” Ĝoja deziris scii.

“Ili bezonis aŭton por reveturi malsupren, kaj ili havis nur tiun de Rik. Verŝajne ili tranoktis en la lignodomo, kaj revenis valen la sekvantan matenon, por iri trajne de Malpaz al Akvoviva.”

“Kial ne la tutan vojon aŭte?” voĉis Stefano, sed parolante li jam divenis la respondon: “Ha jes! Kompreneble. Por ne lasi spuron pri Rik tro malproksime de Rafunja.”

“Sendube”, aprobis Karal, kiu aldonis: “Izidoro enketis pri tio surloke. Ili certe troviĝis en Malpaz la tagon post la krimo, kiam ili supozeble estis en Akvoviva. Biletdeĵoranto en la malpaza stacidomo rekonis foton de la “civilizita” Verstrata, kaj – parenteze – apenaŭ kredis Izidoron, kiam tiu diris, ke la fotito estas la fama pentristo.”

“Kio pruvas,” Stefano diris, “ke la aspektoŝanĝo de Verstrata estis vere efika.”

La triopo silentis, pripensante, ĝis la junulo eligis profundan ĝemspiron.

“Kio estas al vi?” la onklino demandis. “Ĉu io malplaĉas?”

“Mi nur bedaŭras,” la knabo respondis, “ke ĉiuj ĉi raciaj klarigoj ne plu lasas rolon al la eksterteranoj. Mi ŝatis ilian ĉeeston fone de ĉi tiu afero. Estis io poezie fantazia en ĝi, ĉu vi ne trovas?”

“Eble jes,” la onklo respondis, “sed, se diri la veron, mi preferas rilati kun teranoj. Mi sentas min pli hejme.”

Kaj, strange – ĉar ne estis tre varme en la ĉambro – li poŝtuke viŝis al si la frunton.

“Bob!”

“Veronika!”

Ili interkisis pasie.

“Veronika!”

“Bob!”

Flamoj fluis en liaj vejnoj, sed tio estis tre agrabla sensaco, eble ĉar samtempe anĝela ĥoro milde muzikis, kaj ili flugis tra la spaco akompanate de miloj da birdoj, kiuj proklamis al la kosmo lian paradizan feliĉon.

“Ili kondamnis nin”, ŝi diris tiel proze, ke li abrupte retroviĝis surtere, “je tre grava puno, se ni ne estus sukcesintaj negoci niajn sciojn kun la kontraŭspiona servo kontraŭ promeso de senpuneco. Ni neniam plu agos kontraŭleĝe, ĉu?”

“Neniam plu”, li diris, kaj li denove regalas ŝin per longa, longa, Hollywooda kiso.

Ili promenis sur la Rafunja-ebenaĵo. Post la streĉaj tagoj travivitaj jen dise jen kune, tiu sovaĝa naturo ŝajnis pli taŭga ol iu ajn kadro por repacigi la korojn kaj ilin provizi per anima trankvilo sopire bezonata. Ŝi rompita la silenton.

“Li estis nekredeble afabla, ĉu vi ne trovis?”

“Jes”, ŝia amato diris, sed lia menso rigardis tro malproksimen por povi vere memori pri la gravulo el la kontraŭspiona servo, kun kiu ili ĵus havis longan konfesan kunsidon.

“Li eĉ ne montris malestimon,” ŝi prononcis, “li komprenis, ke mi estis viktimo, simpla viktimo.”

Li ne respondis, nur plu kontemplantis reve la rokan oceanon.

Ŝi haltis por forpreni ŝtoneton el la ŝuo. Sub la vesperiĝa suno, la rokoj de Rafunja aspektis pli kaj pli songeskaj. Ilin – sed ankaŭ ŝin – Bob rigardis admire. Ŝi remetis la ŝuon kaj rekomencis paŝi. Tenere, li metis la manon sur ŝian ŝultron. Kvankam li havis longajn kruojn, kaj ŝi relative etajn, ambaŭ iris sampaŝe, kaj tiu komuna kadenco estis por li pace feliĉiga simbolo.

“Nu,” ŝi diris, “la ĉefa afero estas, ke ni kuraĝis fronti unu la alian, kaj diri al ni reciproke la

veron pri ni mem. Tio estas mirakla, ĉu ne?”

“Ĉu mirakla? Mi opinias, ke tute simple ambaŭ sentis, ke li aŭ ŝi amas la alian, kaj ke vivi mensoge ne koheras kun la postuloj de feliĉa amo. Ni agis nur pro propra intereso.”

“Eble jes, sed feliĉe niaj personaj interesoj koincidas.”

Li rigardis ŝin oblikve.

“Multo en ni emas koincidi, ĉu ne?” li susuris.

Kaj duafoje en tiu sama tago la ĥaosa naturo de Rafunja liveris kadron al unu el la plej pasiaj kisoj en la homa historio. Sed io lin ĝenetis.

“Kial vi ĉiam kvazaŭ subpremas ridon, kiam mi vin kisas?” li demandis kun nuanco kelke ĉagrena en la voĉo.

Ŝi eligis etan feliĉan ridon.

“Karulo! Mi trovas vin tiom aminda! Nur...”

“Nur kio?”

“Nur tio, ke via nazo min tiklas ĉiufoje.”

Ambaŭ ridis.

“Ne kalumniu mian nazon. Bonan flaron mi havas, ege utilan en la vivo!”

“Ĉu vere? Kaj kion vi flaras nun? Ĉu plej amindan spioninon?”

“Eksspioninon,” li diris per karesa voĉo, “kaj ankaŭ...”

“Ankaŭ kion?”

Li komike flaris plurdirekte, kaj lia mieno fariĝis amuze mistera.

“Eksterteranojn!” li prononcis per drame trema voĉo. Kaj ridante ili salte-dance brak-en-brake paŝis for.

De malantaŭ apuda roko eta homaspekta estaĵo, alta eble 1,40 metron, vestita per strangmateriala supertuto kun rebriloj grize verdaj, rigardis ilin foriri. Li ridetis. Lia tasko estis finita. Post unu (tera) horo, la spacveturilo revenos senbrue por lin forkonduki. La du forirantojn li kontemplanis kun simpatia, iom nostalgia esprimo, kaj li direktis al ili amikan

geston, kiu signifis “adiaŭ”. Sed pri tiu saluto, kaj pri la emocio, kiu ĝin akompanis, ili neniam scios. Kaj, sendube, tiel estas pli bone.

GLOSARO

stél: *En Sanktavallo, kie okazas ĉi tiu rakonto, estas kutime de tempo al tempo elizii substantivon, kiel ni faras nur en kantoj kaj poezio. Oni tie signas la elizion ne per apostrofo, sed per supersigno sur la lasta vokalo, por montri la akcentoŝanĝon. Ĉar tiu sistemo estas tipografie pli oportuna en teksto kun diversspecaj citiloj, ni ĉi tie ĝin alprenos.*

bluĝinso: *(Labor)pantalono el kruda, tre fortika, blua kotonŝtofo (angle: blue jeans).*

simpa: *(slange) Simpatia.*

zumbiciklo: *Motorcikleto, aŭ biciklo provizita per malforta motoro (ofte nomata mopedo, el motoro kaj pedaloj).*